


The Australian Esperantist

Numero 271

Januaro-Februaro 1992

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Ĉefaj artikoloj

Recenzo: *Nova Esperanta Krestomatio (Donald Broadribb)* p.3

La edzino de la ministro subtenas (*Ralph Harry*) p.5

Prilingvaj artikoloj (*Alan Towsey, Marcel Leereveld*) p.7

Baŝkira Esperanto-poeto Gafur Gazizi p.10

Nia konkurso p.14

Internacia studumo pri turismo (*Trevor Steele*) p.18

Nekrologo: Albertus Huts (*Shirley Gradussov*) p.19

Konkurso: nova kovrildeseĝno por TAE p.21

Kiu diris tion? Citajkvizo 8 (*Ralph Harry*) p.23

Nekrologo: Magdalena Rozsa (*Alan Towsey*) p.24

Indekso TAE 1991 p.25

English section

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO
OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562
© (09) 574 1307.

Prezidanto: Trevor Steele

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014, kaj Juĝisto
Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Dennis Murphy, 79 Binnalong Rd,
Old Toongabbie NSW 2146.

Provizora Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern
Highway, Bakers Hill WA 6562.

Membrokotizoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama
adreso). \$15 (minimumo) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la
kasisto.

Bonvolu avizi la redaktoron se via nomo/adreso estas neĝuste presita sur la
adreslipeto. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo, gazetojn por
interŝanĝo, kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta
numero: 1 Marto 1992.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO
VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto* "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amat eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi vian kontribuon en manuskripta formo aŭ sur komputila disko (3.5cl MS-DOS aŭ Macintosh). Manuskriptoj: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. (Ankaŭ tajpaĵoj kiuj estas tro palaj por esti facile legeblaj.) Se vi deziras resendon de via manuskripto aŭ disko, bonvolu sendi afrankitan adresitan koverton tiucele. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO

recenzas DONALD BROADRIBB



Nova Esperanta Krestomatio, red. William Auld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1991. 509 paĝoj. Tolbindita. \$45 de la AEA Libroservo.

La originala Esperanta krestomatio estis la *Fundamenta Krestomatio* redaktita de Zamenhof kaj publikigita en 1903, kiam Esperanto estis ankoraŭ infano. Ĝi estis multfoje represita, kaj en 1954 W. J. Downes (Akademiano) kompletigis la laboron de William Bailey (Lingva Komitatano), nome: redakti kaj publikigi novan piednotitan eldonon de tiu verko, ĝia 17a eldono. En la antaŭparolo de la unua eldono Zamenhof eksplikis kial li publikigas la verkon:

Atentan tralegon de la *Fundamenta Krestomatio* mi rekomendas al ĉiu, kiu volas skribi aŭ paroli uzi la lingvon Esperanto. Sed precipe atentan kaj kelkfojan tralegon de tiu ĉi libro mi rekomendas al tiuj, kiuj deziras eldoni verkojn en Esperanto; ĉar tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon.

Efektive, oni planas reeldoni ankoraŭfoje tiun tre gravan historian dokumenton de nia literaturo. Tamen, kiel diras William Auld en sia Antaŭparolo al la *Nova Esperanta Krestomatio*:

[T]amen ni devas agnoski...[ke] la enhavo de la *Fundamenta krestomatio* plejparte tiel eksmodiĝis, ke ĝi ne plu ŝajnas aktuala al la legantoj kaj malmulte allogas lernantojn per sia materialo.

Pro tio, al UEA venis la ideo eldoni novan krestomation, kiu staru kiel modelo al la modernaj lernantoj...kaj mi starigis al mi tri ĉefajn celojn: (a) prezenti tekstojn lingve modelajn, (b) prezenti tekstojn aktuale interesajn sed ankaŭ el tiu aŭ alia vidpunkto daŭre valorajn, (c) prezenti modestan superrigardon de la reala kulturo de la internacia lingvo, por ke la lernanto pli vastigu sian komprenon pri la dimensioj de tiu kulturo.

Kaj Auld plue diras pri la enhavo de la *Nova Esperanta Krestomatio*:

...kiam vi scipovos uzadi tiel vigle kaj esprimive Esperanton kiel iu ajn el niaj diversaj aŭtoroj, vi rajtos esti kontenta pri via posedo de la lingvo ... vi trovos tiom da 'stiloj' kiom da aŭtoroj...La stilo estas la homo. Sed bona aŭtoro neniam perfidas sian lingvaĵon: li ĝin respektas kaj traktas ame. En tiu ĉi libro vi trovos nur verkojn en imitinda Esperanto — negrave,

kion trovos niaj erumantoj por priĉikani.

Mi jam nun diru ke, miaopinie, Auld bonege plenumis siajn celojn. Krome, li tiel lerte redaktis la materialon ke la leganto tre malofte konscias ke temas pri ekstraktoj el multe pli grandaj verkoj. Oni trovas unue kelkajn tre pripensindajn ekzercojn el la *Fundamento de Esperanto*, poste rakontojn originale verkitajn en Esperanto.

Sekvas tekstoj el la mondliteraturo, de kiel eble plej multaj naciecoj. Grupon de tekstoj “el vivo kaj sciencoj” sekvas prilingvaj artikoloj. Pli ol 140 paĝoj da poezio kompletigas la libron, poemoj pri Zamenhof, pri Esperanto, pri la interna ideo, “aliflanke” (poemoj mokantaj ŝovinistan esperantismon), kaj “Internacia Liriko” konsistanta el tradukaĵoj el pli ol 70 lingvoj kaj kulturoj.

Kompreneble ne ĉiuj verkoj en la libro interesos ĉiun leganton — kvankam mi povas nomi nur kvin tekstojn kiuj tedis min. Konsistigas ĉi tiun antologion fikcio, nefikcio, rakontoj amuzaj apud leĝeraj kaj distraj rakontoj, kaj same la poemoj. Kelkaj tekstoj estas tre teknikaj (ekz. pri astronomiaj objektivoj kaj pri oftalmologio), sed plejparte ĉiu leganto povos kompreni la enhavon de ĉiu teksto. (Havu tamen apude bonan leksikonon, ekz. la *Esperanto-English Dictionary* de Butler, ĉar vi nepre ĝin bezonos!)

La *Nova Esperanta Krestomatia* do ne estas libro por komencantoj, kaj el ĝi povas multon lerni jam kompetentegaj esperantistoj. Sed la ĉefa celo, esti modelo de uzado de Esperanto, faras la libron valorega kaj ĝuoplena studlibro por personoj volantaj perfektigi sian posedon de Esperanto sendolore tamen tute fideble.

Ankaŭ ne supozu ke al vi ĉiam plaĉas la enhavo de ĉiu verko. Efektive, plufoje Auld selektis tekstojn kiuj en sia enhavo kontraŭas unuj la aliajn, por doni ekvilibron al la intelekta enhavo de la libro.

La libro diras ke ĝi estis “Kompostita en la Centra Oficejo de UEA”, kio devus garantii seneraran pretigon — kaj ĝi fakte plenumas tiun anticipon. Maniplenon da prezeraroj (vere, ne pli ol ses) mi trovis. Kaj tre energie mi serĉis! La literoj estas tre malgrandaj, vi eble bezonos lupeon se via okulpovo ne estas forta. Sed entute, mi povas diri ke la fizika karaktero de la libro estas plene tiel profesikvalite efektivigita kiel la redaktado kaj enhavo mem. La prezo ne estas granda por ĉi tiom valora verko.

Ankaŭ kiel legolibro por klasoj ĉi krestomatia estas bona instruilo, kaj mi rekomendas ĝin tiucele, egale kiel por individuaj lernantoj.

...Hmmm. Ĉu mi forgesis mencii ke sur paĝoj 498-499 troviĝas poemo tradukita de mi? Kompreneble tio ne influas mian takson pri la eksterordinare talenta elekto de tekstoj fare de Auld...

□

LA EDZINO DE LA MINISTRO SUBTENAS de RALPH HARRY

La ambasadoro estis malkontenta. La ministro pri Eksterlandaj Aferoj ĝuis la tagmanĝon kaj la postan robbron de briĝo kun la ambasadorezino kiel partnero. Sed dum la tuta vespero la ministredzino, kunludante kun la ambasadoro, ne havis sukceson. Li ne deziris, ke ŝi hejmeniriru sen almenaŭ unu triumfo. Alvenis la lasta mano, kaj la ambasadoro en la suda seĝo havis la jenajn kartojn:

SUDO

- ♠ A, D, F, 10, 5
- ♥ R
- ♦ R, D
- ♣ A, 9, 6, 5, 4

La ministredzino, en la norda seĝo, pasis. La ministro, oriente, ofertis unu karon. La ambasadoro duobligis, por indiki sian forton kaj inviti sian partneron oferti. Lia edzino, okcidente, surprize, ofertis tri kerojn. "Sendube ŝi havas multajn kerojn kaj deziras 'ŝteli' la kontrakton" pensis la ambasadoro. Lia partnero kaj la ministro pasis. "Mia partnero nepre havas kelkajn pikojn" pensis la ambasadoro, "kaj espereble unudu respektindajn trefojn." "Tri pikojn" li ofertis. Lia edzino ne ofertis plu. La ministredzino ridetis. "Nenion riski estas nenion gajni", ŝi diris, gaje, "mi ofertas kvar pikojn".

La ambasadoro ridetis, sed sekrete li horortremis. La sperteco de la ministredzino apenaŭ egalas ŝian aŭdacon. Li atendis, timante.

La ambasadorezino ekludis la karoan dekon. Tiam la ambasadoro mirigite vidis la jenan fantomon:

NORDO

- ♠ 9, 7, 3, 2
- ♥ 9, 8, 6, 3
- ♦ 8, 7, 5, 4, 2
- ♣ —

Bonan ŝancon, partnero", diris la ministredzino.

La ministro, oriente, prenis la unuan trekon per la karoa aso kaj ludis la pikan kvaron. La ambasadoro ludis la damon, finese. Lia edzino forĵetis la karoan naŭon. "Malpleno de trefoj" ŝi substrekis.

Tiam la ambasadoro eniris la fantomon, atutante trefon, kaj revenis al sia mano per la karoa reĝo. Denove li ludis trefon kaj denove atutis en la fanto. Ĉi tiun fojon li ludis la karoan okon, sur kiun la ministro devis ludi la fanton. La ambasadoro atutis. La trian fojon li ludis trefon kaj atutis en la fanto. La karoa sepo estis bona, kaj la ambasadoro forĵetis sian keran reĝon.

La defendantoj gajnis nur la karoan ason kaj la pikan reĝon.

“Gratulojn!” diris la bela fanto, “vi bonege ludis la manon”.

“Estis nenio”, respondis la ambasadoro, “vi lertege ofertis. Estas la unua fojo en mia briĝa kariero, ke oni libere pliigis kontrakton kun mano sen honorkarto.”

“Ni devas ludi denove, baldaŭ” ŝi diris, stariĝante. “Mi tre ĝuas niajn robrojn, kaj mi lernas multon kunludante kun vi, Sinjoro Ambasadoro”.

Post la foriro de la gastoj la ambasadoro kaj lia edzino rekonstruis la kvar manojn:

NORDO

- ♠ 9, 7, 3, 2
- ♥ 9, 8, 6, 3
- ♦ 8, 7, 5, 4, 2
- ♣ —

OKCIDENTO

- ♠ —
- ♥ A, F, 10, 7, 5, 4, 2,
- ♦ 10, 9
- ♣ D, 10, 7, 3

ORIENTO

- ♠ R, 8, 6, 4
- ♥ D
- ♠ A, F, 6, 3
- ♣ R, F, 8, 2

SUDO

- ♠ A, D, F, 10, 5
- ♥ R
- ♦ R, D
- ♣ A, 9, 6, 5, 4

[Bazita sur mano priskribita en *Gvidlibro al Pli Bona Kartludado* de Ron Klinger.]

D-ro Harry kompilis leksikoneton de briĝterminoj. Interesatoj povas kontakti lin ĉe 319 Bayview Gardens, 39-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2109. □



DEZIRAS KORESPONDI

Anatolo Guk, Poŝtamt P.O. Box 43, 347900 Taganrog, Rostovskoj obl., USSR

“Mi estas 42-jara fraŭlo, loĝas ĉe Nigra Maro, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, Esperantaĵojn, interesiĝas pri ĉiu temo.”

Lingva angulo

de ALAN TOWSEY

DA

Antaŭnelonge mi ie vidis la esprimon "multe da miaj amikoj". Tio estas malĝusta. Ĉar la uzo de *da* estas unu el la malfacilaĵoj de Esperanto, kaj ĉar TAE celas aŭstraliajn Esperantistojn, mi ĉarigis ĝin plejparte angle. Kelkajn ekzemplojn mi pruntis el diversaj konsultlibroj.

Between two words, *da* shows that the first word measures the second word, and links an expression of quantity or measure with the *indefinite* noun which relates to it. It is essentially a combination of *da + ia*, and the measuring word that precedes it must be a noun or adverb. So: kilogramo *da* pomoj, peco *da* ŝtofo, multe *da* libroj, iom *da* kuko.

It should not be used after words which in no way express quantity or measure. So: granda perdo de tempo, la manko de mono, tiu speco de floro.

It should not be used:

(1) before the definite article *la*. So: Mi manĝis iom *de* la kuko, kiun li donis al mi (a definitely defined cake). Multo *el* la kolekto restis en la biblioteko. Ĉiu *el* la infanoj.

(2) before *tiu, tio, mia, via, etc.; mi, vi, ili* etc.; *ĉiu, tuta*. So: Mi prenos duonmetron *de* tiu ŝtofo. La nombro *de* niaj partianoj ĉiam kreskas. Li loĝis tie la lastajn dek jarojn *de* sia vivo. Tiom *el* ili ĉeestis la kunvenon, ke la ĉambro estis plena. Granda nombro *el* ĉiuj kongresanoj. Unu *el* ni.

(3) after fractions: duono *de* torto; dum kvarono *de* horo. N.B. miliono *da* homoj, miloj *da* bestoj. But: du milionoj, ducent mil kvarcent tridek vizitantoj.

Note, too, that "bukedo *da* rozoj" indicates a certain *quantity* of roses, and answers the question "Kiom *da* rozoj?" But "bukedo *delel* rozoj" draws attention to the *kind* of flowers, and answers the question "Kia bukedo?" (What *kind* of bouquet?) or "Kiaj floroj?" (What *kind* of flowers?)

Similarly, "Monato estas parto *da* tempo" — because it expresses simply a measure of time. But "Januaro estas parto *de* jaro" — because it expresses, not measure, but something particular, definite, limited. "Kvaronjaro (a measure) estas parto *da* jaro", but "Printempo (Spring — a season; a specially indicated part) estas parto *de* jaro. As Zamenhof pointed out in *Lingvaj Respondoj*, "it should be kept in mind that *parto, peco* etc. contain the idea of measurement very *often*, but not *always*."

"AVO" (Alec Venture) in *Laŭokazaj Lingvaj Notoj* points out that "Ĉiom *da* mia oro" (all my gold) breaks the rules, and recommends "Mia tuta oro". Similarly, "all my life" would be "mia tuta vivo". I see nothing wrong, however, with "ĉiom *de* mia oro".

Note also the Zamenhof usage in "Dum la kelke *da* minutoj *de* tiu ĉi rigardado" (in the few minutes it took to

look) and “Ili ellernis tiun lingvon en la daŭro de iaj kelke da semajnoj” (They mastered that language in the course of some few weeks).

Finally, to quote from Butler’s *Step by Step in Esperanto* (p. 147): “Between *kelkaj, multaj* (individuals) and *kelke da, multe da* (collective), the difference is that between *twelve* (individuals) and *a dozen* (in the lump); between *twenty* and *a score*. *Kelke da homoj* = a few (some) people (taken all together); *kelkaj homoj* = some people (as individuals).” So also (from *Plena Analiza Gramatiko*, § 84):

“Sur la arbo sin trovis multe da birdoj” (Z)— But “Multaj birdoj flugas en aŭtuno en pli varmajn landojn” (refers to several individual species). “Kelke da homoj dronis en la inundo” — but “Kelkaj homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.”

Kiel do oni traduku la frazeron kiu instigis ĉi tiun artikoleon? El la supraĵ klarigoj vidiĝas, ke oni diru “multaj miaj amikoj” — kaj simile: kelkaj el miaj amikoj.” □

LINGVAJ NOTOJ

de MARCEL LEEREVELD

COULD

(1) “*Last week I could still drive through the creek* (, but now the water is too high)” = “*Pasintan semajnon mi ankoraŭ povis aŭtomobili tra la rivereton* (, sed nun la akvonivelo estas tro alta)” = simpla preterito. Notu ke laŭ *Plena Analiza Gramatiko* (kaj PIV) “povis” signifas ne nur ke mi kapablis fari la agon (aŭtomobili) sed ankaŭ ke mi faris tiun agon. Por la nesimpla kondicionalo kun preterita senco de la povo: “*He could have fallen* (, if she had not seized him)” = (oficiale) “*Li estus povinta fali*” anstataŭ la logika “*Li povis esti falunta, se ŝi ne estis tenunta lin*”, ĉar tiu formo ja ne estas oficiala kaj do ne uzenda. Rim.: Kontraŭe al aliaj lingvoj, la angla uzas por la simpla preterito malofte “could” (kiu vorto ja tiom ofte uziĝas por la kondicionalo),

sed anstataŭe “was/were able to”.

(2) “*We could drive from England to Ireland* (, if there were a tunnel)” = “*Ni povus aŭtomobili de Anglio al Irlando*” = kondicionalo = (ĉiam) ne reala, nur imagaĵo. Same en “*Se ni povus flugi* (sed ni ne povas!) *senile, la vojoj havus* (sed ne havas!) *multe malpli da trafiko*”.

(3) Pro influo de etnaj lingvoj Zamenhof (kaj preskaŭ ĉiuj Esperanto-lingvistoj) uzas por “could” la kondicionalan “povus” (=nerealigebla imagaĵo!) kiam temas pri kondicionalo sed pri mild. (ĝentila) ofero de povo kaj de ago: “*I could help you* (if you wanted)” = “*Mi povus helpi vin* (, se vi deziras/us)”. Tio estas malĝusta, ĉar kreas du malsamajn signifojn: (1) “*I can help you if you want* (and you may want it!)” kaj (2) “*I could* (would be able to) *help you* (but I don’t!) *if you wanted* (but you don’t!)”. Por (2) uzendas la us-formo. Por (1) oni uzu la krudan sed ĝustan “*Mi povos se*

vi volas/los” aŭ mildigu la oferon aldonante *eble*: “*Mi povas helpi vin eble*” aŭ, pli bone, aldonante *see*: “*See mi povas helpi vin*”; = pli bona, ĉar klare indikanta la submetiĝon de la ideo pri helpo al la deziro de la helpoto, kaj evitanta la komprenon ke ekzistas ebleco ke mi povos helpi vin (“*Eble mi povos helpi*” = “*I might be able to help*”). Notu ke en la angla oni ofte (malĝuste) uzas por (2) “*I could have helped you if you had wanted*” eĉ se temas pri la nuno (ĝi ĝuste rilatas nur al la pasinteco). Rim. “*Well I could do that too!*” estas vera kondicionalo ĉar signifanta “*Ankaŭe mi povus fari tion* (sed mi ne faras) *se mi estus li aŭ ŝi aŭ ci* (sed mi ne estas)”.

(4) “*He said that he could* (was able to) *change the date* (en la momento de la parolo aŭ poste)” = “*Li diris ke li povas* (aŭ os) *ŝanĝi la daton.*” Notu: ke “*li povis ŝanĝi*” = “*that he had been able to*” (= li ŝanĝis antaŭ ol diri al mi. Notu ankaŭ: “*ke li povos ŝanĝi la daton see*” = “*that he could change the date if we wanted to* (= li ankoraŭ ne sciis ĉu ni deziras)” dum sen “*see*” la signifo estas ke li sciis ke ni volas ke li ŝanĝu la daton.

SHOULD

(1) La prezenco “*shall*” havas du signifojn: (1) futuran kaj (2) “*devas*”. La koresponda preterito de signifo (1) neniam ekzistis en la angla, kaj de signifo (2) ĝi ne plu uziĝas (anstataŭe oni uzas “*had to*”). Por la nesimpla kondicionalo kun preterita senco de la devo: “*They should have* (pli ofte: *would have had to*) *come home if it had*

rained (but it did not)” = (oficiale) “*Ili estus devintaj hejmenveni, se estus pluvinte*” anstataŭ la logika “*ili devis esti hejmenvenuntaj, se estis pluvunte*”, kiu lasta formo ne estas oficiala kaj do ne uzenda.

(2) “*If they were younger now, they should* (ĝenerale *would have to*) *do military service*” = “*Se ili estus nun pli junaj* (sed ili ne estas!), *ili devus fari militistan servon* (sed ili ne faras!)” = kondicionalo = (ĉiam) nereala, nur imagaĵo.

(3) Pro influo de etnaj lingvoj Zamenhof kaj preskaŭ ĉiuj Esperantolingvistoj uzas por “*should*” la kondicionalon “*devus*” (= nerealegebla imagaĵo!) kiam ne temas pri kondicionalo sed pri milda aŭ morala formo de devo kaj devigo: “*He is helping me, and so he should:*” = “*Li helpas min kaj tion li devus*”; “*You should help me tomorrow*”: “*Ci devus helpi min morgaŭ*”; “*Shouldn't you help me?*”: “*Ĉu vi ne devus helpi min?*”; “*I should now finish the job*”: “*Mi nun devus fini la laboron*”. Tio estas malĝusta, ĉar kreas du malsamajn signifojn:

(1) “*Ci devus helpi min* (sed ci reale ne devas tion), *se mi petus* (sed mi ne petas)” = “*You would have to help me* (but actually you don't have to), *if I would ask you* (but I don't)”, kaj (2) “*Ci devas helpi min* (kaj ci vere devas tion), *se mi petas* (kaj mi verŝajne petos)” = “*You should* (have to) *help me, if I ask* (am asking, shall be asking) *you*, (ofte ‘*when*’ anstataŭ ‘*if*’). ”

La signifo sub (1) estas la ĝusta. Por la signifo sub (2) estas do konsilinde uziformon kiu ne havas du signifojn. Se temas pri mildigo de la devo, eblas uzi

“*deveti*”: “*You really should study harder*” = “*Vi devetas studi pli energie*”. Se temas pri morala devo mi ankaŭ uzus “*deveti*”, sed estas aliaj solvoj sen la malĝusta kondicionalo, ekz. “*Plibonas se vi studas/os*”, “*Pli konvenos se vi studos*”, “*Mi konsilas al vi studi...*”, “*Bonvolu studi...*”. “*Devi*” + mildiga vorto kia “*fakte*”, “*vere*”, “*eble*”, “*devi*” sola, konsiderante ke en Esperanto ĝia signifoforteco povas esti pli milda ol la angla “*must*”, retorika demando “*Ĉu vi ne devas studi...*”, la volitivo (*u*-modo) “*Vi studu pli energie*”.

La volitivo estas genia solvo de Zamenhof de la pluraj malsimplaj kaj inter si ne konformaj sistemoj de la etnaj lingvoj por esprimi diversajn specojn kaj gradojn de deziro kaj devigo; ĝi havas nur unu formon por la tuta gamo, el forta ordo ĝis milda deziro kaj morala devo. La nuancoj povas esprimiĝi per diversaj aldonoj, plejofte

adverbaĵoj. Estas do eble, ankaŭ uzi tion se temas pri “*should*” kaj “*ought to*”: “*Oni ne ŝtelu*”, “*Ci helpu min, se mi petas*”, “*Mi nun finu la laboron*”, “*Ĉu vi ne helpu min?*”. Se temas pri devigo ne de homoj sed de cirkonstancoj (inkl. la moralon) oni prefere, sed ne necese, uzas “*devi*” (kaj “*deveti*” por mildigo).

(4) “*Should he lose (have lost) his money, we shall help him*”. Se oni povas aldoni “*if*” en la angla nedemanda frazo “*should*” ne tradukiĝas en la kondicionalo: “*Se li perdus (os, is) sian monon, ni helpos lin*” = “*If he should (were to) lose...*” = “*Should he (were he to) lose...*”.

(5) “*I should think so*” = “*Mi certe atendis (as) tion*”. Komparu: “*Mi devus pensi tion se li ŝtelus*” = “*I should (would have to) think so (have to have such an opinion about him) (but I have not!), if he stole (but he does not).*” □

Baŝkira Esperanto-Poeto Gafur Gazizi

Mia infaneco pasis inter grizaj montoj de la antikva Uralo (baŝkire: “Ŝtona zono”), kiu disigas du kontinentojn: Eŭropo kaj Azio. En la suda parto, kie renkontiĝas la netrapaseblaj urmanoj (baŝkire: arbaroj) kun la kantantaj stipaj stepoj, la historia nasklando de la baŝkira popolo, loĝas nun ununura inter baŝkiroj Gafur Gazizi. Al mi tre plaĉas liaj versoj, kiujn mi renkontis en diversaj revuoj kaj almanakoj. Antaŭnelonge mi la unuan fojon renkontis lin kaj intervjuis lin. Li montriĝis sufiĉe juna (naskita en 1958), sincera kaj nekaŝema homo, tre inteligenta kaj simpatia. Li volonte konsentis doni al mi siajn versojn kaj sendis al mi el sia hejmurbo Salavat (ĉ. 200 km sude de Uga, la ĉefurbo de Baŝkirio) faskon de siaj verkaĵoj. Mi volus konatigi la legantojn de TAE kun la talenta kaj tre originala Esperanto-poeto kaj elektis el ili (i.a. tre subjektive) kelkajn, kiuj tre plaĉis al mi kaj kiuj bone

karakterizas Gafuron kiel, laŭ mi, vere elstaran Esperanto-poeton. Li ne nur verkas, sed ankaŭ tradukas en Esperanton poezion el la baŝkira kaj la rusa lingvoj, kaj eĉ el la franca. Kaj faras tion majstre. Konklude, mi volas ripeti tion, kion diras pri liaj verkoj lia kolego — alia urala Esperanto-poeto el la urbo Permĵ Nikolaj Lozgaĉev en "Prefaco" al la sola poemkolekto de Gafur Gazizi "Zigzage" kiun eldonis en 1986 (en kvanto de 100 ekzempleroj sur tre aĉa papero kaj kun multaj eraroj) la Sverdlovska Esperanto-Rondo "Kulturo": "Kio kaptas en liaj poemoj estas la fajna verstekniko kaj aparta muzikeco. Laŭ lia propra diro, li 'konstante serĉas la belon' kaj trovas ĝin. La poezion de Gazizi distingas milda lirikismo, romantikismo. En sia konkuro kun la 'rivalorevo' li akiras la animan forton kaj sentemon". — N. P. epanov.]

RUSTIKA EROTIKO

Juna blankanuda korpo
elakviĝas el river'.

Ŝin prilumas luna komo,
banas bluo de vesper'.

Kaj saliko amindumas
emas ĉirkaŭpreni ŝin.
Kverko kun suspir' maljune
staras, gapas en proksim'.

Junulino post naĝado
frotas korpon per viŝtuk'.
Steloj tremas pro korbato,
in tentas pufa pug'.

Sed ŝi vestas sin rapide,
alvilaĝas preter kamp'.
Akompanas ŝin ekscite
najtingala amokant'

(el Zigzage, 1986)

Vi estas ĉi-tie, apude,
mi sentas vin en la proksim'.
Flugiloj facilaj tuŝlode
susuras al mia anim'.

Mi aŭdas eĉ flustron kaj vidas
mil bildojn de via belec'.
Vi ruza min tiel incitas,
sed kapti vin mankas eblec'.

Vi kiel fantomo ĉi-tie
(reala lontanas ja vi!)
vizitas min, por mi ne fie
kondu tu en nuna medi'.

Vi scias, soleco min premas,
vi timas, ke mi pro enu'
pereos, kaj tial vi venas
kaj ludas dum la rendevu'.

(1991)

→

KOMPUTILO

NOKT • PENS • AD

Jen en urb nokt ven
nigr iĝ tut mond jam
mi ne dorm pro splen
en la brust brul flam.

Mi ne ŝalt la lum
al mi ĝu as nokt
ĉe la ĝiĉ mi fum
kaj long pens en soft:

Ki as ŝi por mi
se sen ŝi mi — nul?
Ki os mi por ŝi
se mi mort pro l brul?

INFANO DE LA LINGVO

Ne polvon de antikvaj bretoj
deziras nutri mia plum'!
Ĉu loki sin inter poetoj
sur palaj paĝoj en volum'?

Ĉu stari en makuluro
kiel prestiĝo de profan'
en ŝranko, aŭ en eburturo
susuri sub esteta man'?

Aŭ ĉu lumturi sur podio
displande kaj disgambe, aŭ
sin ŝiri en la agonio
glutante plumbon pro l'morgaŭ?

Ne! simplas mia sortofato:
fatalas drono en Lete'!
Mi ludis lingvon en Beato
kiel kubetojn infanet'.

(1991) □

La ĉisupra simbolo indikas la Apple Macintosh komputilojn, kian ni nun uzas por eldonaĵoj de AEA. La bildo montras pomon el kiu oni mordis pecon ("bite"="byte"!). En Usono Macintosh estas la plej multe manĝata pomspecio, do ĝian bildon adoptis la Apple Computer kompanio.

Fojfoje legantojn konfuzas uzado de tri ŝajne sinonimaj vortoj: komputoro, komputero, komputilo. Dum la lastaj jaroj "komputilo" montriĝis la plej uzata termino. Tio ne surprizas, ĉar la baza radiko jam delonge ekzistas kaj nun estas uzata (aŭ uzebla) kun la ĝenerala signifo de la Angla "to compute".

Komputerterminologio aperis malfrue en Esperanto. Kiam en Esperanto oni unue ekuzis la terminojn "komputoro" kaj "komputero" oni havis enmensan bildon de specifaj tipoj de aparato, t.e. la "main frame computer" kaj ĝia ido la surtabla PC ("personal computer"). Sed komputaparatoj nun abundas kun multaj formoj kaj kapabloj. En la Angla, almenaŭ, oni populare diras ke ĉiu aparato enhavanta komputĉipojn enhavas "komputilon" aŭ mem estas speco de komputilo, do pli vasta senco ol tiu unue donita "komputoro/komputero". Ekzemple, multaj stabiloj nun havas en sia elektronika cirkvito tre avangardajn komputĉipojn. Oni prave disputus ke pro tio sola ili ne mem estas "komputiloj". Kiam oni pripensas tajpilojn, la distingo inter elektronikaĵo enhavanta ĉipojn kaj PC fariĝas tre nebula, tiel multe ke distingo inter elektronika tajpilo kaj tekstkomputilo ("word processor") principe malaperis. —DB □

BIBLIOTEKO DE AEA

raportas RALPH HARRY

La biblioteko ricevis donace de Walter Klag (*Australian Esperantist* N^o 269, angla sekcio) la sekvantajn librojn:

Sukero, Nutrado, Kario C₁₂H₂₂O₁₁, Renate kaj Walter Klag, kvara eldono, Vieno, 1991, 20p. Verda Serio 1 (du ekzempleroj). La libreto pritraktas sukeron laŭ kemia vidpunkto, historie, kaj nutre en la familio de la aŭtoro.

Wels — *Urbo en Supra Aŭstrio*, Walter Klag Patro, unua eldono, Vieno 1991, 24p. Verda Serio 2. Ilustrita priskribo kaj historio de la urbo. Nekutimaj vortoj estas klarigitaj, inkluzive kelkajn oficialajn radikojn.

Hospitalo Sepetaĝa, Walter Klag Filo, unua eldono, Vieno 1991, 16p. Verda Serio 3 (du ekzempleroj). Novelo originale verkita en Esperanto. Streĉa intrigo.

La samaj aŭtoroj eldonis kvar aliajn libretojn kaj kvin estas en preparado. La stilo estas bona, kvankam mi persone ne ŝatas la formojn "Rigardanta el la fenestro Mo vidis" kaj "la doktoro tre malmulte parolintis" kaj estas kelkaj eraroj, ekzemple: "Mi proponas, ke d-ro Do daŭrigas" kaj "oni havas malfermita fenestron". Estas ankaŭ bedaŭrinde, ke la aŭtoroj ne havas skribmaŝinon aŭ komputoron kun brevo super la Ŭ. Cirkumflekso ne taŭgas. Tamen ni treege dankas por la donaco! □

KULTURA ESPERANTO-DOMO GRÉSILLON

La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 18-hektara parko. Ĉiujare ĝi gastigas

kursojn diversgradajn
prelegojn diverstemajn
distraĵojn diversspecajn
ekskursojn en belega regiono

Ĝi disponigas al la restadantoj
kurso-ĉambrojn
riĉan bibliotekon
interesan "butikon"
sport-teronon

KULTURAJ ARANĜOJ 1992

Internacia renkonto de infanoj: 18

aprilo - 25 aprilo (por infanoj kiuj jam eklernis la lingvon): kursoj, promenadoj, distraĵoj. (Kursgvidantoj kiuj deziras partopreni tiun staĝon havos la okazon kompari siajn spertojn.)

Internacia amika renkonto 24 junio - 9 julio: Kursoj, gvidata konversacio, komunaj promenadoj, distraj vesperoj.

Prelegoj kaj kursoj 9-22 julio & 6-19 aŭgusto. *Lernu, praktiku kaj perfektigu* — *seminario Cseh-metodo* 23 julio - 5 aŭgusto. *Instruado kaj instru-helpiloj* 20 aŭgusto - 2 septembro.

Por informoj, detaloj, kaj prezoj skribu al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé, Francio. □

NIA KONKURSO

La listo de vortoj donita sur paĝo 24 de n^o 270 (novembro-decembro 1991) aperis unue en la *Fundamento de Esperanto* kaj estis represita en la 1954 eldono de la *Fundamenta Krestomatio* (ambaŭ de Zamenhof). Margaret Chaldecott kaj Alan Towsey ĝuste identigis la liston. Jen sugestita traduko de la vortoj, kompilita laŭ iliaj listoj plus kelkaj inspiritaj (??) sugestoj de la redaktoro:

malsana — sick
malsanado — chronic illness, constant ill health
malsanaro — collection of illnesses
malsane — in a sick (unhealthy) manner
malsaneco — ill-health, diseased state
malsanema — sickly
malsanemeco — sickness
malsanemulo — a sickly, delicate person; hypochondriac (?)
malsaneraro — collection of such symptoms
malsanero — a symptom, a characteristic of a disease/illness,
malsaneta — unwell, out of sorts, ill disposed
malsani — to be sick
malsaniga — unhealthy (conditions etc.), insanitary
malsaniĝi — to fall/become ill
malsano — illness
malsanulejo — hospital, infirmary
malsanulido — an invalid's child, an offspring of a sick person
malsanulino — sick woman
malsanulista — relating to sick-nurses (etc.); nurses' (award etc.)
malsanulisto — sick attendant, sick-nurse, medic
malsanulo — a patient, a sick person, an invalid
nesana — unwell, not healthy
remalsaniĝo — being taken ill by a recurrence of disease
remalsano — a diseased state suffered a

second (third etc.) time
resanigi — to cure, restore to health (stronger than *sanigi*)
resaniĝanto — a convalescent
sana — well (adj.), healthy
sane — in a healthy manner, healthily
saneco — healthiness
sanejo — a place of health, health resort
sani — to be well
saniga — healthful
sanigebla — urable
sanigejo — place of healing, sanatorium etc.
sanigi — to cure/heal
sanigilejo — medicine cabinet
sanigilista — relates to the person doing such treatment; relating to a dealer in/maker of medical supplies/equipment
sanigilo — a means of healing, a curative, restorative
sanigilujo — first aid kit; doctor's bag
saniginda — worth healing
sanigista — relates to a health worker; sanitary (Board etc.)
sanigisto — health worker, sanitarian; sanitation expert
sanilaro — medical equipment
sanilista — pertaining to a worker involved in maintaining health or providing medical supplies/equipment
sanilo — a means of maintaining health, a health requisite; a curative
sanilujo — = sanigilujo; a container for something which maintains health, e.g. a vitamin bottle
sanisto — health specialist; health fanatic
sanigi — to become well, recover
sano — (good) health
sanu — be/keep well!
sanulajo — mark of a healthy person; something, (e.g. a blood sample) showing no sign of disease present
sanulo — a healthy person

SAN

[Fiŭhhhhh! — Odlo]

CHILDREN AROUND THE WORLD
(INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO)
by CHARLOTTE KOHRS

In May 1987 some Esperantists in San Diego, California, U.S.A., formed the non-profit cooperative Children Around The World (CATW), soon known internationally as Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo (IĈLM).

- Our goals:
1. To help introduce Esperanto to children in the United States and other countries;
 2. With the help of Esperantists around the world, who will act as a language bridge between children who don't know much Esperanto, to help children communicate, work together on projects, and learn about each others' customs and countries without a language barrier;
 3. To create and offer free or inexpensive teaching materials to those who are teaching Esperanto to children; and to exchange materials.

Here are our publications — the basis of other activities. They have been financed chiefly by donations from individuals, also by grants.

1987 *Let's Talk Around the World*: a step-by step guide, with eight lesson plans, for introducing Esperanto in school classrooms. Sold at cost, US\$3.85 (=A\$4.85)¹. English and Esperanto.

1987-1991 Four issues of *La Revuo de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo* ("The Journal of Children Around The World"). Each issue includes an Esperanto lesson with parallel English translations, drawings, short essays, puzzles by children. Three issues include a "Volas Korespondi" ("Wishing to Correspond") page, giving names of teachers whose classes wish to correspond. The first four issues include contributions from children in 25 cities in 13 countries. Free to members [of Children Around The World] and to Esperantists who are teaching groups of children.

1987, 1988 Two videos. Theme: *Children Teach Each Other Esperanto*. Sold at approximate cost: US\$6.35 (=A\$8.00) each.

¹Prices fluctuate depending on the current rate of exchange. Orders may be sent to The Esperanto League For North America, Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA. International postage extra.

1988; 1990 Song Cassette (1988): *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano: 12 Konversaciaj Kantoj por Komencantoj* ("Sing in Esperanto with Janice and John: 12 Conversational Songs for Beginners"). Eleven of the twelve songs are original songs that, step by step, illustrate basic grammar and give practice in common conversational sentence patterns. US\$7.00 (≈A\$8.00) including an Esperanto-English "lernolibreto" ("study pamphlet") (1990) based on the songs. Illustrated by children.

1989 Two "bildlibretoj" (picture books): *Bonvenon, Amiko, Ĉu Vi Parolas Esperanton?* ("Welcome Friend, Do You Speak Esperanto?") and *Bonveno kaj Saluton! Parolu Esperanton Kun Ni* ("Welcome and Greetings! Talk Esperanto With Us"). Created, with some help from adults, by the children in the 3rd/4th grade class of Carolyn Goodfellow, Freese School, San Diego. The goal: to give children booklets that they can use to introduce Esperanto to other children and to adult relatives and friends.

1991 *Ni Esploru La Mondon! Libreto Unu* ("Let's Explore the World! Booklet One"): a booklet with questions and answers about the geography of eight countries, written, with help from Esperantists, by children in the countries. Includes flags, maps, games and a geography word list: "Gravaj Vortoj Kaj Frazoj Pri Mondgeografio" ("Important Words and Phrases Concerning World Geography"). Illustrated by Children. US\$1.00 (≈A\$1.25).

We published *Ni Esploru la Mondon* partly in order to demonstrate to school personnel that through Esperanto children in many countries can work together to create a booklet that is useful in learning a school subject. But it is not just an interesting booklet with a few geographical facts. It is a tool teachers can use in any class (adults or children) to stimulate students to speak Esperanto within the first two months of learning.

1991 Video: Theme: *Children Teach Each Other Esperanto*. (1) In four short lessons, four groups of children in a 5th/6th grade class introduce Esperanto in dialogues and games based on world geography; (2) in seven short lessons, a 3rd/4th grade class introduces Esperanto; each lesson based on a different song of our song cassette. US\$6.00 (≈A\$7.50) for those who teach or plan to teach Esperanto to children; or will use it to introduce others to Esperanto. Included with the video is *Learn Esperanto With Dialogs and Songs*, guidelines for introducing Esperanto with the seven songs.

What have we achieved and learned in our first four years?

In the past four years, in San Diego I have introduced Esperanto to several hundred children in elementary school class-rooms (grades 3 through 6), usually one hour weekly, teaching the whole class and the teacher. Here are some of the things I've learned:

- (1) Children respond at once to the idea of an international second language.
- (2) They are delighted that from the very first lesson they can speak Esperanto. They love the language itself. They love the fact that it is regular, and they are excited because it is made up of words from many different languages.
- (3) Partly because of continued successes, they develop a very positive attitude about learning another language.
- (4) Because the vocabulary of Esperanto is developed from many other languages, and because of their contacts with other countries, they become interested in other languages, other peoples, and in world geography.

[Abridged and adapted from an article published in *EsperantoUSA* 6/1991.]

WINDOW ON THE WORLD

Cuba: Three international congresses are scheduled in Havana this year. On April 23-26 as part of the *EXPOCUBA 1992* there will be an international linguistic congress *EXPOLINGUA HABANA '92*, of which one day will be devoted to Esperanto. Topics to be discussed at *EXPOLINGUA* will include problems of language teaching, automatic translation by computer, applications of computer linguistics, and Esperanto in Latin America, among others.

The other two congresses will be the *INTERNATIONAL CONFERENCE "ESPERANTO '92"*, in September, concerned with topics related to the fifth centenary of the discovery of the Americas by Europeans; and, also in September, the *SECOND CONGRESS OF THE CUBAN ESPERANTO ASSOCIATION*.

U.S.A.: At the University of California (Berkeley Campus) Esperanto has been taught now for seven years under the auspices of the Linguistics Department, as part of the program in Democratic Education at the U. of Cal. Lecturers for the second semester 1991 were Charles Galvin of San Francisco and Prof. Ĉien Mingĉi of Shanghai.

A new cultural magazine in Esperanto, the *Arizona Suno* ("Arizona Sun") began publication in the second half of 1991 and now has subscribers in 25 countries. The new magazine is particularly concerned with environmental and humanitarian issues.

Youth Congresses: The international Esperanto Youth Congresses are to be held in Montreal in 1992 and Vraca (Bulgaria) in 1993. The 1994 Congress will be held in Korea (city not yet determined). A word of caution: it is reported that in Karlskoga Sweden during the International Youth Congress 1991 three beers cost US\$20! This made the Congress unintentionally non-alcoholic. (NB Adults up to the age of 30 are allowed to participate in the Congress.)

Intergovernmental organisations: a survey undertaken in 1991 of 250 international inter-organisations gave the following statistics of their official working languages — English 143, French 134, Spanish 56, German 43, Arabic 25, Russian 24, Portuguese 12, Italian 11, and 18 used other languages. (The number adds up to more than 250, since all but 31 use two or more working languages.)

The European Community has the largest translation service in the world. It employs 2500 translators and 3100 interpreters, and publishes approximately a million pages a year. Its official journal is published in nine official languages.

Switzerland: Dr Arthur Baur, who for 44 years has been the man behind the microphone for the twice weekly Esperanto broadcasts on Radio Switzerland, retired on September 23 last. The broadcasts were begun in 1946 by Prof. Edmond Privat, an eminent Swiss diplomat and Esperanto scholar who founded Radio Geneva in 1925. The new announcers for the Esperanto broadcasts are Andy Künzli and Claude Gacond.

UNESCO: a new Esperanto association, *Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo* (World Collaboration for Education, Science and Culture) was set up during the World Esperanto Congress in Bergen, Norway, last year. Intended to be a link between Esperanto and UNESCO, the new association publishes a journal, *Monda Forumo* (World Forum).

POŝTKARTO DE FERIANTO ODLO BOKSERP

Pro la varmiĝo de nia planedo, la nova glaciepoko, la truo en la ozontavolo, la superabundo de ozono en la supra atmosfero, la konjunkcio de Neptuno kun Alfa Centaŭri, kaj doloro en la dekstra malgranda piedfingro de mia *ŝino*, la kalendaro radikale ŝanĝiĝas kaj

ĵus pasinta jaro havis nur kvin monatojn. Mi bedaŭras, sed tiel estas. Nu, kiel mi jam diris — aŭ planis diri — mia jarraporto devas pritrakti nur kvinmonatan jaron. Vi devus / devas/ estus devinta / estas devunta/ebliĝas jam scii ke nia universale prestiĝa aŭstralia gazeto, redaktata sur la asteroido Esperanto¹ kaj kompostata sur la asteroido Zamenhof² mem, estas preparata per nova komputilo, utiliganta novan literumkontrolan programon preparitan por Esperanto. Ha, nia reaktoro kredis min venki per tio! Sed se vi zorge legos la novembran numeron — ĉar kompreneble vi ne jam legis ĝin, ĉu ne? — vi trovos ke mi plu daŭrigas mian mondfaman laboron kaj jam la dekmilan fojon mi donis al mi la Nobelpremion *presfuŝado*. Kiu deziras foton de mi ...n la Nobelpremio, tiu bonvolu sendi tricent mil dolarojn usonajn al Poŝtkesto 1991-1992, Bakers Hill, California kie mi nun helpas prepari la novan oaz³...

Pardonu, mi ĵus ricevis informon ke la oazon trafis falinta asteroido, ŝajne tiu nomita Cockneyakĉento Anglia steldistrikto 19RUR92, do la projekto estas nuligita. Tuj kiam ni sukcesos lanĉi anstataŭan asteroidon mi plu raportos pri la oazprojekto, kiun oni nun planas starigi en la centro de Sidnejo honore al la Olimpikoj tie okazontaj⁴ se la LKK sukcesos ĉantaĝi la internacian Komitaton.

Mia kuzo Horo promesis verki por ni pri la aliaj eventoj de 1991 artikolon aperontan en nia marta numero, do mi nenion pli raportos nune.

Kun ĉiuj gratuloj kaj mi volegas ke vi kunestu, via ĉiama,

Odlo Bokserp

5

(Red.: tie surgluu la foton kaj sekvu la signo indikanta la finon de artikolo. Dankon — O.B.)



¹Vidu la anglalingvan sektion de la novembra numero de TAE. — la red.

²Relegu la saman anoncon en tiu sekcio. — o.b.

³Ankoraŭ denove relegu tiun paĝon. — o.b.

⁴Mi kredas ke "Olimpikoj" kaj la antikva sanktej-nomo "Delfoj" estas la solaj singularsignifaj substantivoj kun plurala formo en nia lingvo (—Odlo).

ĈU VI LABORIS ALILANDE ANTAŬ OL VENI AL AŬSTRALIO?

Se vi laboris en alia lando antaŭ ol veni al Aŭstralio, vi eble rajtas ricevi pension el tiu lando. La kontribuo kiun vi faris laborante povus helpi vin rajti je tio, eĉ se vi laboris tie dum nur nelonga periodo.

La Socia Sekureco dissendos leterojn kaj formularojn por peti pensiojn, al tiuj pensiuloj kiuj eble rajtas je eksterlanda pensio.

Se vi bezonas helpon por plenigi la formularojn aŭ se vi bezonas ricevi pli

da informo anglalingve, telefonu la Informservon de Socia Sekureco ☎ 008 112 468. Por informoj en aliaj lingvoj, bonvolu telefoni la Multlingvan Pertelefonan Informservon ☎ 008 039 009. Telefonu inter 9.00 atm. kaj 5.00 ptm. (Aŭstralia Orientborda Tempo) Lunde-Vendrede.

[Anonco farata helpe al la Departemento de Socia Sekureco de la aŭstralia federala registaro.] □

RECENZETOJ

Dek Rakontoj el Vieno, de Walter Klag. Vieno: Eldonejo Klag, 1991. Verda Serio 4. 32 paĝoj, broŝurita. Prezo: 4.80 guldenoj (≈ A\$3.00) ĉe UEA.

Serio de tre mallongaj sed bone verkitaĵaj kaj interesaj rakontoj, originale preparitaj por dissendo en la Esperanto-programoj de la Aŭstria Radio. Pluraj desegnoj ilustras la rakontojn. Facila legaĵo por postkomencanto, utila por legpraktikado en klasoj aŭ por hejms-tudo. DB

Ĉinaj Batalartoj. kompilita de Zhaohua, tradukita el la angla de Superklubo Internacia. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990. 40 paĝoj. Broŝ. \$3.20 de la AEA-Libroservo.

Multaj kolorfotografaj ilustrantaj la Ĉinan batalarton *Uŝuo*, kun nelongaj priskriboj por ĉiu foto. Belaspekta bildlibreto.

LEGAĴOJ POR INFANETOJ

Mi Estu Patrino, Bona Baobao, Ni Kune Ludu. 24 + 20 + 22 paĝoj. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990. Po \$1.50 de la AEA-Libroservo.

Kolorbildlibretoj por tre junaj infanoj. La infano rigardu la bildojn dum la patr(in)o legas la teksteton.

Amuzaj Karikaturaj. 20 paĝoj. \$1.50 de la AEA-Libroservo. Koloraj bildstrioj, plejparte sen teksto, por mezjuna, infanoj (ĉ. 5-10jaraj).

Paŝtisto kaj Feino, kompilita de Zheng Zhenjie, tr. Li Baofa kaj Yao Baoyin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990. 68p. Broŝurita. \$1.90 de la AEA-Libroservo.

Dek mallongaj folkloraj rakontetoj kun tradiciistilaj ilustraĵoj. Utilaj por klasoj de progresantoj, kaj por personoj dezirantaj koni la ĉinan folkloron.

Impeto '89, red. I. Zacev & A. Ševčenko. Moskvo: Eldonejo "Progreso", 1989. 240 p. Broŝurita. Speciale mendenda.

La libro nomas sin "Socipolitika kaj beletra almanako", kaj estas ia komunikso de jarlibro kaj gazeto. □

U N E S K O

ESPERANTISTA UNESKO-ASOCIO FONDITA

Dum la Universala Kongreso en Bergen fondiĝis nova internacia asocio kun la nomo "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo" (Mallonge: Monda Kunagado). Ĉirkaŭ 60 personoj partoprenis la fondkunvenon, diskutis la statuton kaj elektis konsilantaron kiel gvidorganon de la asocio.

Monda Kunagado celas agi per propraj interesaj projektoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, perante la ideojn de paco kaj internacia interkompreniĝo, kongrue kun la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj kunlabore kun ĝi. Ĝi subtenas la starigon de kontaktoj inter UNESKO kaj la Esperantomovado. Tiucele ĝi kontaktis la UNESKO-sekretariaton, kiu sendis salutmesaĝon al la fondkunveno. En sia mesaĝo al la UK, ankaŭ la ĝenerala

sekretario de UNESKO, F. Mayor, aparte bonvenigis la fondon de esperantista UNESKO-agado.

Por publikigi siajn ideojn kaj projektojn, Monda Kunagado eldonas la revuon *Monda Forumo*, kies provnumeron ĉiu kongresano trovis inter siaj kongresaj dokumentoj. Unuaj projektoj estas preparataj kaj celas i.a. informadon pri la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo, la aplikon de scioj kaj talentoj de esperantistoj por eduki unu la alian, kaj la starigon de subtenaj internaciaj individuaj kontaktoj helpe de la publikigo de vivprotokoloj el ĉiuj mondpartoj.

Kiu deziras kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de *Monda Forumo* kaj la statuton, informojn pri la projektoj de Monda Kunagado, aŭ iel ajn kontribui al ĝi, skribu al Ulrich Becker, Küstromger Str. 3, DO1092 Berlin, Germanio. □

M

PETO EL MALAJZIO

La Malajzia Esperanto-Asocio estis fondita en majo 1989. Ni dissendas nian novaĵleteron al niaj membroj kaj Esperantujo. Ni volas averti, ke la kvalito lingve kaj enhave estas ne bona. En nia lando oni ne povas aĉeti Esperanto-libron pri gramatiko aŭ io tia. Pro tio ni tre bezonas bonan literaturon. Donacoj de gramatiklibroj novaj kaj malnovaj estos multe dankataj. Skribu al: Chan Sook Wai, 1008 Jalan Selesa 4, Happy Garden, 58200 Kuala Lumpur, Malajzio. □

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KOMENCO BONA, ĈIO BONA?

de TREVOR STEELE

Laŭ invito de Andrzej Grębowski la direktoro de Esperantotur, mi gvidis la unuajn etapojn de naŭmonata "Internacia Studumo pri Turismo" en Bydgoszcz, la ĉefsidejo de Esperantotur.

Oni esperis, ke venos lernantoj ankaŭ el aliaj landoj, sed ĉiuj en tiu ĉi unua grupo estas el Pollando, ĉefe el Bydgoszcz kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kelkaj jam ĉesis partopreni, sed novuloj aliĝas de tempo al tempo, kaj la lernantoj nombras inter 25 kaj 30. Preskaŭ ĉiuj estas dudekjaraj.

Grava elemento de la stumumo estas lernado de lingvoj. Komence estis tri semajnoj da Esperanto, kvin tagojn semajne po kvar horoj. Sekvis ekskurso al Litovio, kie la junuloj renkontis esperantistojn. Post ilia reveno al Bydgoszcz mi gvidis trisemajnan kurson de la angla. Tiam okazis ekskurso al Ukrainio (Lviv kaj Kievo), revoje por kontakti esperantistojn.

Sekvos kursoj de la franca, germana, rusa kaj litova, interrompotaj de pluaj ekskursoj, kaj pollingvaj studoj pri specife turismaj temoj. Eble la plej grava ekskurso okazos en marto, kiam la lernantoj ĉeestos turisman konferencon en Budapeŝto, kaj de tie vojaĝos al Vieno, kie ili trejniĝos por mem gvidi busojn al kaj tra la aŭstria ĉefurbo okaze de la UK.

Poste la sukcesintoj ricevos diplomon

agnoskitan de la pola ŝtato kaj povos dungigi ĉe turisma kompanio aŭ eble lanĉi propran agentejon.

Neniam antaŭe okazis io simila, kaj laŭdire eĉ multaj esperantistoj skeptikis. Estas tro frue por fari konkludojn, kaj ĉiu eksperimento estas risko, sed jen kelkaj impresoj.

Se oni bezonus pruvon pri la relativa facileco de Esperanto, oni havus ĝin ĉi tie. Nur kelkaj el la lernantoj iom konis la lingvon antaŭe, kaj mi povus nur tre

pene komuniki kun ili en la pola. La tutan tempon mi parolis esperante, enkondukante ĉiutage zorge elektitajn gramatikajn elementojn, afi-

ksojn kaj vortstokon. Je la fino de la tri semajnoj ili povis kompreni preskaŭ ĉion (ili ridis ĝustamomente pri ŝercoj!) kaj multaj el ili povis eĉ iniciati liberan konversacion. Preskaŭ senescepte tiu parto de la kurso estis sukcesa, kaj la entuziasmo de la lernantoj po Esperanto estis tre kontentiga.

Pri la angla la atingoj estis malpli kontentigaj. Jam dekomence estis problemo, ke eble du trionoj de la klaso jam studis la lingvon unu, du aŭ kvar jarojn. Kiel kombini ilin kun komencantoj? Krome, kiujn fragmentojn de la angla oni instruu en tri semajnoj? Ebla respondo estus: nur tiajn esprimojn, kiajn bezonas turisma gvidisto.

"Neniam antaŭe okazis io simila, kaj laŭdire eĉ multaj esperantistoj skeptikis."

Esperanto estas evidente la plej grava lingvo en la studumo. Ĉu estas konsilinde proponi tiom da aliaj lingvoj po nur tri semajnoj? Nu, ni devas atendi.

Alia planita parto de la studumo estas vesperaj prelegoj pri diversaj temoj. Laŭplane lokaj esperantistoj ĉeestus kaj helpus enkonduki la lernantojn en la

movadon. Pro diversaj kialoj tiu parto plimalpli fiaskis. Se oni eksperimentas...

Se estontece la studumo daŭros kaj la partoprenantoj estos el diversaj landoj, ekestos impona esperantlingva lernejo. Ĉiukaze mi dankas, ke mi povis partopreni en la esperigaj unuaj etapoj. □

ALBERTUS ("HAPPY") HUTS 1917-1991 †

verkis SHIRLEY GRADUSSOV

Forpasis la 28an de oktobro malnova ano de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kaj amiko Albertus ("Happy") Huts. En la nomo de la Ligo adiaŭis lin ĉe la tombejo Karakatta la Prezidanto de la Ligo Len Eddington, René Smeets, Vera Payne kaj Galina Sliwa.

Liganoj de la jaroj 1975-1986 bone memoras lin, ĉar, tiam bonsana, li kutime ĉeestis ligkunvenojn kaj flue parolis pri siaj militspertoj en Nederlando dum la nazia okupado. Efektive, li parolis kaj verkis artikoletojn diversteme, eĉ pri abelkulturo.

*Happy eklernis Esperanton en Nederlando, antaŭ la Dua Mondmilito; sed post la alveno en Aŭstralio en 1955 li laboregis senĉese por starigi hejmon kaj familion. Finfine li iĝis membro de ELOA, kaj eĉ iĝis Prezidanto de ELOA dum 1977-78. Eble iuj legantoj rememoras belan piknikon kiun li aranĝis apud la Rivero Cigna, ne tre for de la ponto Garrett Street. Happy veturigis ligojn sur la rivero en sia eta motorboato. ĉa plezura okazo! Liganoj kiuj tiutempe helpis presi **La Nigra Cigno** eble rememoras okazon kiam la presmaŝino formaĉis la stencilon. Happy tuj persvadis filinon sian retajpi la tutan tekston. Tiun taskon ŝi sukcese plenumis sen eĉ scipovi la lingvon.*

Dum la lastaj kelkjaroj Happy mankis al ni pro malsano. Sed ni ne forgesos lin. Adiaŭon, Happy!

[Teksto represita, kun modifoj, el **La Nigra Cigno** Decembro 1991.] □

UMEA SHINODA-KURACEJO

raportas D-RO WLODZIMIERZ OPOKA

U
M
E
A

Nome de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) mi havas plezuron sciigi vin, ke en Krakovo estas oficiale malfermita Centro pri Orienta Medicino UMEA SHINODA-KURACEJO omaĝe al D-ro Hideo Shinoda, jam forpasinta Honora Prezidanto de UMEA. Kunposedanto de tiu ĉi Kuracejo estas Direktoro de la Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko en Tokio s-ano Masayuki Sai-onĵi. En tiu ĉi Kuracejo oni aplikas metodon de s-ro Masayuki Saionĵi — Orientan Specialan Diinan Masaĝon, akupunkturon, Ĉinan masaĝon, klasikan masaĝon k.a.

Ĉiujn malsanulojn antaŭ kuracado diagnozas kaj intervjuas polaj kuracistoj kaj ekzamenas dum kaj post kuracado por konstati la efikon.

En la UMEA SHINODA-KURACEJO ni intencas kuraci malsanulojn kaj organizi multajn internaciajn kursojn pri orientaj kuracmetodoj, kompreneble en la inter-

nacia lingvo Esperanto. Niaj ĝisnunaj pacientoj estas tre kontentaj kaj dankas nian helpon. Ankaŭ vi mem povas sperti la efikojn de kuracmetodoj aplikataj en nia Kuracejo. Por niaj malsanuloj ni povas certigi malmultekostan loĝejon en hotelo (egalvaloran ĉ.\$4 por unu tranoktejo). Pro tio, ke nia Kuracejo merdevas pagi ĉiujn elspezojn — por kuracado ĉe ni oni devas pagi.

Interesitoj estas petataj kontaktiĝi kun UMEA SHINODA-KURACEJO. Mi mem estis paciento de s-ano Saionĵi kaj kelkaj kuracistoj en Krakovo kaj ni ĉiuj alte taksas tiun ĉi kuracmetodon. Kompreneble la nombro da pacientoj kiujn s-ano Saionĵi helpis jam estas tre alta en Pollando.

Esperantistoj de la tuta mondo jam havas Kuracejon en kiu ili povos interkompreniĝi kun kuracistoj kaj terapistoj per Esperanto.

Adreso: UMEA SHINODA KURACEJO, ul. Centralna 32, 31-586 Kraków. (☎44-67-00 w. 17) □

EXPOLINGUA HABANA, KUBO 1992

La 23-26 aprilo 1992, en la kadro de *Expocuba 1992*, okazos speciala, grand-skala *Expolingua 1992* en Havano. Ĝi estos renkontiĝejo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri instruado, disvastigo kaj aplikado de fremdaj lingvoj, jen fake, pedagogie, akademie, science, ekonomie, socie aŭ jen simple persone. La Kuba Esperantistaro disponos tutan tagon kadre de la lingvofoiro por

pridiskuti la rolon de la Internacia Lingvo en tiu mondparto. Se vi deziras partopreni, aŭ eĉ prezenti prelegon en la kadro de la diskuto, nepre kontaktu la organizantojn kiel eble plej baldaŭ.

Skribu al: Expolingua Habana 1992, Organiza Komitato, Nacia Kapitolo, Poŝtfako 2014, 10200 La Habana, Kubo. □

KONKURSO: NOVA DESEGNO POR LA KOVRILO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

Ekde la julia numero de *La Aŭstralia Esperantisto* ni bezonos uzi novajn kovrilpaĝojn, ĉar la nuna stoko estos jam eluzita. Ni deziras uzi novan desegnon por la titolpaĝo (ekstera kovril-paĝo). Ni invitas proponojn por tiu nova desegno. Ni ne povos pagi per mono, sed la aŭtoro de la akceptota desegno rajtos skribi sian nomon (kiel artisto) en malsupra angulo de la desegno, kaj ankaŭ elekti libropremion.

Bonvolu atenti la sekvantajn regulojn:

1. La desegno devas esti taŭga por fotoreproduktado. Sekve, nur linia desegno.
2. Estas dezirinde ke la desegno estu presebla per verda inko sur blanka papero.
3. La supro de la paĝo devos havi, kiel nun, indikon de la titolo de la gazeto (ni preferas ke tio estu en Esperanto *kaj* en la Angla) kaj spacon por la indiko "Registered by Australia Post / Publication no. WBG 2488" (tion postulas la aŭstralia poŝto).
4. La desegno devas taŭgi por paĝo kun la dimensioj de la nunaj paĝoj de la gazeto. Estas akcepteble ke la desegno estu reduktenda por atingi la necesajn dimensiojn.
5. Ĉiu propono devas atingi la redaktoron antaŭ la 1 Majo 1992, ĉar necesos tiam presigi novan stokon por uzo ekde julio.

L SP R NTO KOM N MO

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonadoj...

La plej kompleta Esperanta libroservo regalaĵo vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...


La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por efike aktivi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Sendu viajn kompletajn nomon kaj adreson, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizo (vd. kotiztabelon sube) al via landa peranto:

Aŭstralia E-Asocio, p/a S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W. 2036

MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 59 dolaroj
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 59 dolaroj
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 24 dolaroj
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 24 dolaroj
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 10 dolaroj
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 1475 dolaroj



KIU DIRIS TION?
CITAĴKVIZO 8
KOMPILITA DE RALPH HARRY



Kelkaj eminentuloj parolis pri la naturo, aero, akvo, kaj arboj. Penu parigi la personon kun la citaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

- | | |
|-----------------------------|--------------------------------|
| (a) John Keats | (g) F. Severin |
| (b) Antoine Vincent Arnault | (ĝ) Joyce Kilmer |
| (c) George Meredith | (h) Thomas Campbell |
| ☞ H. W. Longfellow | (ĥ) <i>Alta Kanto</i> [Biblio] |
| ☞ William Wordsworth | (i) Charles Kingsley |
| (e) S. O. Iosif | (j) William Cowper |
| (f) Moritake | (ĵ) Rudyard Kipling |

1. Dek vivojn mi bezonas
por kanti vin, naturo
2. Falis kverk', mia subteno,
Per ventego detruema
3. Ĝardenfonto, puto de vivanta akvo,
kaj riveretoj elfluantaj el Lebanon.
4. Kamparon faris Dio, urbon hom'.
5. Ĉi tiu estas la praarbaro.
6. Dolĉa kiel Edeno estas la aero.
7. Dio donas al ĉiuj homoj la tutan teron por ami.
8. Ĉu florfolio
Post fal' revenis branĉen?
9. Mi vidis arbaron, kaptiton de vintro
Kiu mole vekiĝas lantege spiras
☞ En blua aero verdiĝas arbegoj
☞ Arbara parfumo la stepojn transiras
10. Moviĝantaj akvoj laŭ sia pastreca tasko
De pura lavado ĉirkaŭ teraj bordoj.
11. Klare brilanta en aer' senfuma.
12. Neniu odo aŭ poemogarbo
Tiele belas kiel arbo
13. Indulgu la fagon, arbisto
14. Kiam la mondo junas, knab',
Kaj ĉiu arbo verd'.



MAGDALENA ROZSA



verkis ALAN TOWSEY

Ege malĝojigis min ekscii, ke mia bona kaj longtempa amikino Magdalena Rozsa forpasis la 6an de decembro, 1991, post kelkmonata malsano.

Mi unuafoje renkontis Magdalenan tri-kvar jarojn post la Dua Mondmilito. Ŝia patro, Frank Acs, fuĝis kun sia familio (lia edzino jam mortis) el Hungario, kaj post kelke da tempo en Germanio, ili alvenis en Aŭstralio kaj estis senditaj al la Migrulejo en Parkes, N.S.K.

Frank estis Esperantisto, kaj, trovinte miajn nomon kaj adreson en la Jarlibro de UEA, skribis al mi — mi estis tiam lingvoinstruisto en la Parkse-a Gimnazio — petante konatiĝon. Mi invitis lin al mia hejmo, kaj tuj kiam ni ekvidis unu la alian, ni sentis komunan simpation kaj ekde tiam fariĝis bonaj amikoj. Poste mi konatiĝis kun lia filino, el kiu Magdalena estis la plej aĝa.

Bela, ĉarma kaj inteligenta junulino, ŝi konatiĝis kaj poste edziniĝis kun Paul Rozsa, alia elmigrinta Hungaro, kaj mia edzino kaj mi ĉestis ilian geedziĝon. Mi memoras, ke dum la nupta festeno ŝia patro Frank, kiu estis ankoraŭ lernanta la anglan, faris sian festparoladon germane, kaj mi interpretis anglan. Paŭlo siavice stariĝis kaj diris: "I will speak in English!" ("Mi parolos angle!"). Kaj tion li faris — bonege!

Poste la familio transloĝiĝis al Orange, N.S.K., kaj Magdalena, estante plene okupata pri siaj edzo kaj infanoj (kiel ŝi, ĉarmaj kaj ĝentilaj!), tiutempe ne ŝajnis interesi sin multe pri Esperanto. Ŝi rapide lernis paroli kaj skribi perfekte angle, kaj je peto de sia patro tradukis anglan el la hungara libreton pri la travivaĵoj de iu Hungaro sub la komunistoj (Frank estis fervore kontraŭkomunista!), kaj mi kontrolis ŝian (bonegan) tradukon.

Post la morto de sia patro en la 70aj jaroj Magdalena reinteresiĝis pri Esperanto, kaj daŭrigis la laboron de sia patro por la Internacia Lingvo, fondante grupon en Orange kaj en la lastaj jaroj ankaŭ en Port Macquarie, kien ŝi transloĝiĝis por mallonga tempo. Sed post kiam mi forlasis Parkes je la fino de 1959, mi nur malofte renkontis ŝin — plejparte ĉe Esperanto-Kongresoj! — sed ĉiujare ni interŝanĝis Kristnaskajn kartojn.

Magdalena estis ĉiam ĝentila, bonkora, ĉarma, helpema kaj tre inteligenta, energia virino, kaj ŝian foreston sentos ne sole ŝia familio, sed ankaŭ la aŭstralia Esperanto-Movado. □

INDEKSO: THE AUSTRALIAN ESPERANTIST 1991

KODO:

265 = Januaro-Februaro

266 = Marto-Aprilo

267 = Majo-Junio

268 = Julio-Aŭgusto

269 = Septembro-Oktobro

270 = Novembro-Decembro

Post la kodnumero sekvas la paĝnumero. Ekzemple: 268/8 = Julio-Aŭgusto 1991 p8.
Mallongaj notoj estas inkluditaj en la Indekso nur se ili temas pri io grava.

AEA: Statement of accounts 268/15

Statuto 268/25

Statute 269/9

Banham, F.R.: Biografio (Audrey Bruton) dissendita kun numero 266

Briĝo, diplomata ludo (Ralph Harry) 270/3

Citaĵkvizoj (Ralph Harry): Ĉiunumero

El la regionoj: 267/25, 268/27, 269/26, 270/26

Ĝeneralaj artikoloj:

Ĉu Zamenhof estis pola kuracisto? (Bernard Golden) 266/13

Komentoj (N.P. Stepanov) 270/20

22-a somerlernejo en San Francisco (Margaret Furness) 269/23

Feliĉaj memoroj (Eddie Hearne) 270/17

Klubraportoj bezonataj (La redaktoro) 286/3

Malnova Bjalistoko sur poŝtkartoj 270/27

Niaj propagandajoj (Donald Broadribb) 270/7

Nur fragmenteto (Idyss Einihovici) 268/18

Pri miaj spertoj en la Esperanta movado (Eddie Hearne) 268/13

Hearne Edmund: 91-jara 265/6

Indekso: The Australian Esperantist 1989-1990 285/23

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj 266/10

Kantoj: "La vera frataro" (Harrison Hill) 265/20

"Pac-kanto de la esperantistoj" (G. Sellin) 265/22

Kiu Diris Tion? (Citaĵkvizoj — Ralph Harry) Ĉiunumero

Kongresoj: AEA-NZEA 1992: 267/24, 268/26, 269/22, 270/13

UK 1992 270/18, 25

ŝngvaj temoj:

Ĉu vi faras tiujn ĉi semantikajn erarojn en Esperanto? (Bernard Golden)

265/18

Kiel juĝi esperantecon? (Marcel Leereveld) 269/24

Komentoj de la Prezidanto de l' Akademio (André Albault) 268/5

Konkurso (vortoj formitaj el la radiko "san") 270/24

La boŝo (Brian Fox) 267/13

La lernprocedo en etnaj lingvoj kaj en Esperanto (Marcel Leereveld)

270/5

Lingva Angulo (Alan Towsey): "Mortinta" 268/4, "Wonder" kaj

"Know" 270/22

Mi serĉis vinkton... aŭ ĉu? La labirinto de niaj leksikonoj (Donald Broadribb) 269/6

- Pravigo de la termino lancjetilo anstataŭ vumero (Bernard Golden) 268/14
- Pri "si" (Akademio de Esperanto 1971) 269/13
- Prilingva Averta (Donald Broadribb) 268/4
- Respondo al Vera Payne Nov.1990 (Marcel Leereveld) 265/7
- Maguire, Ernest: Kiu konas Ernest Maguire? 269/14
- Sur la spuroj de Ernest Maguire 270/12
- Nekrologoj: Strochnetter, Clarence (Mac LeFevre) 270/22
- Thomas, Edward Carson (Jean Lehane) 267/21
- Torr, Harry Roydon (Joyce Torr kaj Ralph Harry) 266/4
- Odlo Bokserp: 11-monata jarraporto 268/22b?
- Platono: La Respubliko 268/6, 269/5
- Poemoj: Dek sturmoj (Niĉjo Nicholas) 267/9
- El Carmina Popularia (tr. José Fco Martín del Pozo) 269/21
- Provu vian vortoscion: 286/5
- Radio 3ZZZ (Svetislav Kanaĉki) 266/11, 269/11
- Rakontoj: Alberto, Kutberto kaj Egberto (Elvie Rowe) 268/3
- La perfekta virino (Elvie Rowe) 269/19
- Spertoj 2 (Donald Broadribb) 267/1
- Spertoj 3: Pri tramoj kaj taso da teo (Donald Broadribb) 269/16
- Recenzoj:
- Anatomia Nomenklaturato (rec. Ralph Harry) 270/14
- Aspektismaj Reguloj (rec. Alan Towsey) 267/15
- Aŭstralia-Esperanta Vortaro (rec. Marcel Leereveld) 265/10
- Respondo de Ralph Harry 266/15
- Komentoj (Alan Towsey) 267/17
- Pliaj komentoj (Marcel Leereveld) 267/23
- Ĉernobil (rec. Donald Broadribb) 270/15
- Enigmo (gazeto rekomendata) 265/17
- Kiu Posedas Danion? (rec. Marcel Leereveld) 270/14
- La Nova Plena Ilustrita Vortaro (ŝercrecenzo. Odlobok Tupmok) 265/3
- Profilo de Zhou Enlai (Rec. Ralph Harry) 267/11
- Sed Nur Fragmento: La legantoj aljuĝas (Vera Payne) 268/9
- Septaga Murdenigmo (rec. Donald Broadribb) 270/23
- Tabuaj Vortoj en Esperanto (rec. Donald Broadribb) 270/21
- Skolta Esperanto-Ligo 266/10
- Ŝercartikolo: La Nova Plena Ilustrita Vortaro (Odlobok Tupmok) 265/3
- UN Asocio, konferenco en Melburno (Marcel Leereveld) 267/23
- USSR: Notoj el Sovetunio (Trevor Steele) 268/8
- Pri bicikloj, buso, kaj ĉampano (Trevor Steele) 269/3
- Raporteto el Sovetunio (Trevor Steele) 267/19
- USSR: ĉu ankoraŭ lando? (Trevor Steele) 266/7

INDEX: THE AUSTRALIAN ESPERANTIST 1991

KEY:

265 January-February 1991 268 July-August 1991
266 March-April 1991 269 September-October 1991
267 May-June 1991 270 November-December 1991

Africa — Esperanto organisations in 269 p.4
Books: The House of the Spirits by Isabel Allende: 267
 New Hebrew Anthology in Esperanto 266
 Plato's Republic 268
Einihovici Foundation travel grant: 267, 268, 269 p.4
Environment — "Esperanto helps solve global problems" (Ralph Harry) 270
 Esperanto language: The nature of Esperanto verbs (Donald Broadribb) 268 p.2
Hungary, Esperanto teaching in (Walter Klag interviews Katalin Smideliusz) 269 p.2
Justice Kep Enderby on ABC Radio 268
Nepal (Joachim Werdin): 266
Queensland Federation, Jim Fouras patron of: 266
Radio broadcast on Esperanto (Shirley Landquist) 269
Radio: see also "Window on the World" 265
Religious associations using Esperanto: 266 p.4
Summer school in Adelaide (Idyss Einihovici): 266
Universal Esperanto Congress in Norway (report by Idyss Einihovici) 270 p.2
Who's Who In Australia, 1991, Four Esperantists included: 266
Window on the World: Computer translation, Audible journal, Radio Esperanto, Chinese
 Esperanto clocks, Esperanto in China, Taiwan and Rumania, International Esperanto
 weeks in France, Help for African students: 265
 Esperanto in Isabel Allende's book The House of the Spirits, Esperantist Youth
 congress in Montreal 1992, International Festival of Esperanto Culture (Hungary),
 Esperanto record a collector's item in USSR, Banking via Esperanto, Esperanto text
 of the Catholic Mass approved by the Vatican: 267
 Plato's Republic, 75th Universal Esperanto Congress in Norway, TV film Return to
 Poland, Brazilian Esperantist Youth Ecological Congress 1992, Expedition around the
 world, International children's drawings competition in Yugoslavia: 268
 Chinese massage, Esperanto Congress in Seoul, Asteroids named "Esperanto" and
 "Zamenhof", Intensive summer Esperanto course at the University of Hartford (USA)
 270

Respondoj por la Citaĵkvido

1e, 2b, 3h, 4j, 5ĉ, 6c, 7j, 8f, 9g, 10a, 11d, 12ĝ, 13h, 14i


Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562; printed by SNAP, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 26101, Australia. © Copyright The Australian Esperanto Association, 1992.

The Australian Esperantist

Numero 272

Marto-Aprilo 1992

Registered by Australia Post
Publication no. WBG 2488



Ĉefaj artikoloj:

- La Kongreso en Sidnejo (*Ray Ross*) p.3
Nekrologo: Kathe Schwerin (*Robbie Robinson*) p.8
Analoj Maloficialaj de 1991 (*Ridanta Henĉjo*) p.9
La Mankintaj Diamantoj (*Donald Broadribb*) p.12
La Biskvita Familio (*Doug Portmann*) p.16
La Atutoj de la Ambasadoro (*Ralph Harry*) p.18
Lingva Angulo (*Alan Towsey*) p.20
Seryŝev Innokentij Nikolajeviĉ (*N.P. Stepanov*) p.21
Retrokomete (*Dorothy Threlfall*) p.24
Diversaĵoj p.26

English Section

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.
© (09) 574 1307.

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014 & Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Help-kasisto: Dianne Lukes, 26 Noll St, Toowoomba Qld 4350.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publika): Ronald Gates, MSF 2350 Wangaring, Kelly's Plains Rd, Armidale NSW 2350.

Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.

Membrokotizoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). \$15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adres-slipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunik-aĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 majo.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Ni akceptas verkojn sur 3.5-colaj diskoj IBM-kongruaj kaj Macintosh-aj, kaj ankaŭ manuskriptojn. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio. Netajpitaj manuskriptoj estos malakceptitaj. (Ankaŭ tajp-ajoj tro palaj por esti facile legeblaj.) Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

LA 28a A.E.A. kaj 57-a N.Z.E.A. ESPERANTO-KONGRESO EN SIDNEJO

raportas RAY ROSS

La kongreso okazis ĉe Hawkesbury Kolegio, Universitato de Okcidenta Sidnejo, de la 11a ĝis la 19a de januaro, 1992. La Kolegio ĉijare festos la cent jaran datrevenon de sia starigo kiel agrikultura kolegio en pitoreskaj kaj historiaj ĉirkaŭaĵoj. Entute 101 aliĝis al la Kongreso, kaj 97 ĉeestis, inkluzive de 13 el Nov-Zelando, 5 el Eŭropo kaj 1 el Usono.

Inaŭguro: La Kongresprezidanto Kep Enderby bonvenigis vizitantojn, Prof-on Sweyne el la Universitato kaj S-inon Wendy Sledge, urbestro de Hawkesbury, kaj membrojn al la Kongreso. S-ino Sledge varme salutis la starigon de la Kongreso en Hawkesbury, kaj citis elstarajn punktojn pri ĝia historia regiono. Prof-o Sweyne menciis la rolon de la Kolegio ekde la tre fruaj jaroj ĝis la nuntempa situacio, kiam la Kolegio estas integra parto de la novestariĝinta Universitato de Okcidenta Sidnejo. Plej grave, li proponis eblan ligon inter Esperanto kaj la Universitato.

La kongresprezidanto invitis anojn saluti la kongreson: Por UEA kaj Nederlando, Ramona Ruiĝ de Vries, kiu ankaŭ laŭtleĝis leteron de Simo Milojević, ĝenerala direktoro de UEA; por Nov-Zelando, Brian Fox; por Aŭstrio, Emil Vokal; por Francio Lucien Giloteaux kaj Gaston Cathala; por Germanio, Francisca Reisel; por Usono, Erika Vathis; por AEA, Alan Towsey; por Adelajdo, Max Wearing;

por Brisbano, Ray Ross; por la Esperanto-Federacio de Kvinslando, Gaye Phillips; por Esperanto-Ligo de OA, Vera Payne; por Tasmanio, Dudley Parkinson; por la Esperanto-Federacio de NSK, Margaret Chaldecott; por Sidnejo, Tom Elliott; por Manlio, Eunice Graham; por Melburno, Herbert Koppel; por SAT, Marcel Leereveld.

✦ *Ĝenerala Kunveno* — *eroj:* la propono far la fluglinio Luft-hansa, pri prezarbato por ir- kaj reven-flugo al la UK en Vieno ricevis konsideron, kaj Max Wearing prizorgas la detalojn, ne nur al la UK sed ankaŭ al la Pacifika Kongreso en Qindao, kaj aliaj eventoj inter Aŭstralio kaj Eŭropo. Delegitoj multe interesiĝis pri la UN Konferenco, ECO 92, ĉijare en Rio de Janeiro, kaj promesis sendi erojn al la grupoj en Brazilo kiuj aranĝos ekspozicion sub la aŭspicio de la du koncernaj Esperanto-Asocioj tie.

🌳 Laŭ propono de Margaret Chaldecott, memorarbo en la ĉefa alirejo de la Kolegio estis plantita ceremonie de Kep Enderby kaj Profesoro Sweyne: *Grevillia Robusta* (Silky Oak). Poste, taŭga plako certigos por la estonto pri la ligo inter Hawkesbury Kolegio kaj Esperanto.

Laŭ alia propono fare de Margaret estis memorarbo en Jerusalemo

honore al Katie Schwerin, kiu forpasis en decembro lastjare.

✦ Dum multaj jaroj Katie kaj Paul Schwerin estis elstaraj subtenantoj de Esperanto, precipe en Sidnejo.

Adelajdo akceptis respondecon pri la AEA Kongreso en 1994, gratulojn! Reklamado en *Unity* estis aprobata, kunlaborado kun la Esperanto Federacio de Viktorio, ĝis kiam la estraro povos taksu la rezultojn, kaj eblas fari pluan rekomendon.

La tri proponitaj statutŝanĝoj al reguloj 5, 29 kaj 32 estis akceptitaj kaj aperos en la *Adresaro de AEA*.

Decidoj de la Estrarkunsidoj: estis decidite proponi al JAGE, ke ili aliĝu al TEJO, kaj AEA pagu ĉiujn kostojn tiurilate. Pri la Medaliono Torr, aprobata estis la propono de ELOA ke la gajninto kaj tenanto dum 1992/93 estu Donald Hughes kiu instruas al 60 lernantoj ĉiusemajne Esperanton. Por la Einihovici Premio ne estis kandidato kiu plenumas la kondiĉojn. Speciala laborgrupo, kun almenaŭ po unu el ĉiu stato, estis starigita por varbi lernantojn kaj kandidatojn el diversaj kolegioj, universitatoj kaj aliaj taŭgaj institucioj. Dianne Lukes estros la grupon. Honoraj Dumvivaj Membroj de AEA estis aprobataj, jene: Arthur kaj Eileen Oliver, Donald Broadribb. Por daŭrigi la historion de AEA, estis decidite eldoni *Esperanto en Aŭstralio* (2) en 1995, kaj tiel dekjaraj historioj de AEA sekvos por certigi ke eroj ne malaperos dum la intervenaj jaroj. Ĉiu ŝtato/grupo (se necese) elektu analiston kies devo estas sendi al AEA

novajon jaron post jaro, por konservi tion por posteularo, per la dekjara eldono.

🏠 La estraro gratulis al Tom Elliott pro la progreso ĝisdate rilate al Esperanto-Centro en Sidnejo. Nur manko de volontuloj nebligas finfinan sukceson. Samtempe neniu kritikas iun pro tio, ĉar estas malfacile dediĉi tempon konstante.

Fakkunsidoj: Kunsidoj de UEA, kiam Alan Towsey raportis pri sufiĉe kontentiga dujarperiodo, sed, pro maljuniĝo ekzistis kiel ĉefdelegito de UEA; Brian Currie nun estas la ĉefdelegito. SAT ankaŭ kunvenis, sub la estrado de Kep Enderby. Bahaanoj kunsidis, sub gvidado de John MacLeod.

Lingvaj Seminarioj: gvidis seminariojn Ray Ross (klason por komencantoj), Alan Towsey (konversacian klason), Marcel Leereveld (superan klason), Vera Payne (sesion por instruistoj).

Kunveno de NZEA: sub la estrado de la prezidanto, anoj de NZEA kunsidis.

Prelegoj kongrestemaj: Ralph Harry prezidis dum ĉi tiu grava programero; la sekvantaj kontribuis per prelegoj: Owen Loneragan, Eunice Graham, Rosalie Schultz, Marj Ellyard, Ron Gates, Vera Payne, Margaret Chaldecott. Iliaj paroladoj estas nun eldonitaj kiel aparta libro.

Invititaj parolantoj: kontribuis al la tagprogramo per diversaj temoj jene: Brian Fox, Marcel Leereveld, Emil Vokal, Rita Aargard, Eileen Olsen, Bill Olsen.

Ekskursoj: tri duontagaj ekskursoj,

kaj unu tuttaga ekskurso al diversaj regionoj kaj vidindaĵoj provizis bonvenajn oportunojn por konatiĝi kun la naturaj kaj konstruitaj aspektoj de Sidnejo. Postkongresaj ekskursoj: tri apartaj ekskursoj al elektitaj lokoj kaj vidindaĵoj finis la kongreson.

♣ *"Kune"*: dum la sama ceremonio, kiam la Esperanto-memorarbo estis plantita, alia memorarbo, *Brachichiton Acerofolia* (Illawarra Flame Tree) nun kreskas apude, je la memor' de Pastro Tom Dunlea. Profesoro Sweyne denove partoprenis en la ceremonio, kaj Kevin Smith reprezentis la komitaton surloke, je la okazo de la 22a datreveno de la morto de la Pastro.

♀ *Vesperaj Sesioj*: Vespersesio aranĝita kaj estrita de Margaret Chaldecott. Ĉeestantoj el diversaj fidoj, inkluzive de Bahaanoj, el la Kongreso, kontribuis al ĉi tiu vespero. Ĉiuj ege ĝuis la prezentadon de Dennis Murphy kaj liaj pupoj. Dramo-Ŝild-Konkurso: Brisbano prezentis *Ne Kalkulu Viajn Kokidojn*, Perto prezentis *La Diluvo*. Manlio ne konkursis sed prezentis *Prov-prezenton de Spertuloj pri la "Unua Helpejo"* (Sukurado).

♫ La Brisbana Kantgrupo estis la sola kiu konkursis cele la kantŝildon per *Venu Man' en Mane*, *Tango Romantika*, *Fernando*, kaj *Mia Lando*. Roger Springer multe kontribuis al la distraj vesperoj, per reĝisorado kaj per ludo de sakŝalmo. La Brisbana kantgrupo, kune kun Romana de Vries, Eileen Olsen kaj Phillipa Maddern prezentis tri

kantojn el la muzikdramo *Hair* ("Haroj"): "Haroj", "Amforo", "Stellumsaluton"; pupteatraĵojn *Pedro la Fiŝkaptisto*, *Abba Dabba*. Emil Vokal kaj Lucien Giloteaux montris lumbildojn pri Vieno kaj Bergeno. Tom Elliott gvidis "sapskatolon"¹. Kay Andersen pianludis por komunkantado kaj ĉiuj aliaj eroj dum la kongreso.

♫ *Bankedo*: Robbie Robertson reĝisoris dum la Bankedo. Li proponis la toston al la Reĝino. Kep Enderby proponis toston al la Eksterlandanoj, kaj respondis Emil Vokal. Toston al la LKK proponis Brian Fox kaj respondis por la LKK-anoj Tom Elliott. La LKK konsistis ankaŭ el Les Scott, Bes Scott, Betty Cleminson, Betty Hart, Irina Timonin, Eunice Graham, Kitty Gasner, Sylvia Burkitt, Roger Springer, Eric Hart, Dorothy kaj Kep Enderby. Herbert Koppel prezentis la Dramo-ŝildon al la Pertanoj, Vera Payne akceptis la trofeon. Roger Springer prezentis la trofeon Fritz Muller Soraŭ al la Brisbana Grupo, Kay Andersen akceptis. La Medaliono Torr estis aljuĝita al Donald Hughes, el Darlington Elementa Lernejo, Vera Payne akceptis por Donald. Honor-insignojn prezentis Kep Enderby jene: al Les Scott, kiu akceptis kaj respondis; al Jean Lehane, kiu pro rompita brako ne povis ĉeesti la Kongreson — Dianne Lukes akceptis por Jean. La naciaj

¹"Sapskatolo" = Libera forumo. (Tiel nomita pro la iama uzado de granda sapskatolo kiel podio.)

himnoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando malfermis la bankedon, kaj komun-fermis la kongreson kaj transdonis la
kantado aldonis al la Esperanto AEA flagon al Margaret Furness,
etos. La prezidanto, Kep Enderby, prezidanto de la Adelajda Esperanto
Societo, kiu taŭge respondis. □

ESTRARO DE A.E.A. 1992-1993

Prezidanto	Kep Enderby
Vicprezidanto	Vera Payne
Vicprezidanto	Max Wearing
Sekretario	Ray Ross
Vicsekretario	Herbert Koppel
Kasisto	Owen Loneragan
Helpkasisto	Dianne Lukes

KOMISITOJ DE A.E.A.

P.R.O.	Ronald Gates
Biblioteko de A.E.A.	Ralph Harry
Ekzamenoj	Donald Broadribb, Prezidanto
	Fay Koppel
	Ray Ross
	Marj Ellyard, Sekretario
	Niĉjo Nicholas
Instruiloj kaj instrumentoj	Vera Payne
	Shirley Gradussov
Korespondaj Kursoj	John Moore
Korespondantoj	Betty Aulsebrook
Libro-Servo	Tom Elliott
Redaktoro TAE	Donald Broadribb
UEA Komitatano	Les Scott
Ĉefdelegito de U.E.A.	Brian Currie

PRELEGOJ PRI EKOLOGIO

La prelegoj pri ekologio dum la Kongreso estas aparte presitaj kaj sendiĝos en la formo de libro al ĉiuj ricevantoj de *La Aŭstralia Esperantisto*. Pro postuloj de la Aŭstralia Poŝto, ni ne povas inkludi ekzemplerojn en la kovertoj kun *La Aŭstralia Esperantisto*. □

LA DRAMO-KONKURSO

Unu el la plej popularaj eroj ĉe ĉiu Aŭstralia Esperanto-Kongreso sendube estas la Dramo-Konkurso. Ĝin gajnis ĝis nun Brisbane kvarfoje, Manly trifoje, Perto dufoje kaj Kanbero unufoje.

Ĉi-foje ni estis bonŝancaj, ke pro la multaj ĉeestantaj transmaraj kongresanoj, ĉef-juĝisto Herbert Koppel povis elekti internacian, tute neŭtralan, juĝistaron. S-ino Romana de Vries, el Amstelveen, Nederlando; S-ino Erika Vatis el Spokane, Usono; S-ro Gaston Cathala el Toulouse, Francio; kaj S-ro Emil Vokal (Vieno), Vic-Prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio estis juĝantoj.

La konkurso komenciĝis per teatraĵo prezentita de la Brisbana

Esperanto-Societo, *Ne Kakulu Viajn Kokidojn* verkita de Gaye Phillips. Estis tre amuza teatraĵo, en kiu elstaris Ray Ross kaj Gaye Phillips.

Sekvis la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo, Perth, kiu prezentis la teatraĵon *La Diluvo* verkitan de Vera Payne. Impresis la multaj geaktoroj, el kiuj elstaris Vera Payne kaj D-rino Phillipa Maddern.

La ĉeestantoj devis atendi kvar tagojn, ĝis kiam, ĉe la bankedo, Herbert Koppel anoncis la gajnton. Tiu esis la Okcident-Aŭstralia Esperanto - Ligo, Perth, kiu gajnis la konkurson per 91.5 poentoj, laŭ unuanima decido de ĉiuj kvin juĝantoj. □

MESAĜO AL LA AEA-NZEA KONGRESO

de SIMO MILOJEVIĆ
ĝenerala direktoro de UEA

Faras al mi apartan plezuron saluti viajn du kongresojn en la nomo de Universala Esperanto-Asocio. Estas aparte salutinda la fakto, ke la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj organizas ĉi tiun Kongreson kune kaj komune. Tiaspecaj komunaj aranĝoj estas relative maloftaj en la Esperanto-movado. Kial estas tiel, mi ne scias. Ni esperantistoj, kiuj proponas al la mondo la lingvon de egalrajteco kaj kunlaboro, devus lerni pli multe kunlabori ene de niaj propraj vicoj. Gratulon al vi, kiuj donas bonan ekzemplon sur tiu kampo.

Ĉar ĉi tiun mesaĝon bonvole portas al vi s-ino Romana Ruig-de Vries, mi volas tuŝi temon, kiu bele ligiĝas al Romana. Ŝi estis tute brila sekretario de la Loka Kongresa Komitato antaŭ tri jaroj ĉi tie en Roterdamo. La temo do estas demando al vi ĉiuj:

Kiam okazos Universala Kongreso de Esperanto en via mondparto? Kun pluraj estraranoj de UEA mi tuŝis tiun demandon en la lastaj monatoj. Pluraj el ili, ankaŭ la prezidanto prof. Wells kaj la ĝenerala sekretario s-ro Jackson, favoras la ideon, ke ni

ekdiskutu kun vi la eblecojn okazigi iun el la venontaj Universalaj Kongresoj en Aŭstralio. Memkompreneble, ke en tia okazo la antaŭkongreso aŭ la postkongreso okazus en Novzelando.

Ni diskutis pri tiu temo antaŭ ses aŭ sep jaroj kaj niaj diskutoj venis en sakstraton. Mi kredas, ke tio ne estas kaŭzo rezigni pri nova provo, des pli ke en la lasta duonjaro pluraj kongresaj centroj el via lando iom sieĝas nin per la demando, kial ni ne kongresu en Aŭstralio. Mi ĉi tie havis eĉ viziton de reprezentanto de la Kongresa Centro en Adelaide. Al ĉiuj ili ni klarigis, ke la vojo inviti

Universalan Kongreson iras tra nia landa asocio.

Kiel vi verŝajne scias, ni jam plenigis nian kongresan kalendaron ĝis inkluzive 1996. Ni do parolas pri iu jaro ekde 1997. Ni volonte venos amase al via lando. Ĉu vi pretas akcepti nin? Kompreneble, mi baldaŭ ekstraktos ĉi tiun demandon kun la du landaj asocioj, sed ne estas malbone, se vi jam dum via komuna kongreso iom priekzamenus la ideon.

Kun multaj bondeziroj por la labora kaj nelabora (ofte pli grava) partoj de via Kongreso. Havu tre prosperan 1992! □

Kathe Schwerin †

verkis ROBBIE ROBINSON

Mi unue renkontis S-inon Schwerin antaŭ 26 jaroj, kiam mi aliĝis al la Manlia Klubo kiel progresinto, post komenca kurso en Redfern. Tiutempe ŝi kaj la kara edzo Paul zorgis pri progresantoj kaj altgradaj kursoj, kaj ĉiun jaŭdon ili entreprenis la longan vojaĝon per pramoj de Norda Sidnejo ĝis Manlio. Ili tre bone scipovis la gramatikon de la internacia lingvo, kaj la internacian parolmanieron de meza Eŭropo, ĉar ili ja estis veteranoj de la movado.

La unuan lingvaĵon, kiun mi tralegis en Esperanto, estis broŝuro titolita Gaja Leganto en Esperanto. Ĝi estis taŭga helpilo por la progresantoj, ĉar la lingvo estis simpla kaj senerara. Estis necese tralegi nur kelkajn frazojn por ricevi tujan rekomendon per kompreno de amuzaj ŝercoj.

Post la morto de la kara edzo, S-ino Schwerin translokiĝis al apartamento por gemaljunuloj, sufiĉe apud la Stanton Biblioteko en Norda Sidnejo. Mi kutime renkontis ŝin tie, ĉar tre plaĉis al ŝi piediri la mallongan distancon por tralegi germanajn kaj francajn librojn. Ĝis la fino, ŝi aspektis vigla kaj parolis inteligente.

Elkore, ni Esperantistoj povas diri:

"Adiaŭ, Kanjo, multan dankon pro viaj dumjaraj kontribuoj."

[Mallongigita el Teloĥe, Februaro 1992]

ANALOJ MALOFICIALAJ DE 1991

de RIDANTA HENĈJO

En la jaro 1991 estis denove granda kresko de turismo en la mondo, super ĉio el la oriento al la okcidento kaj inverse.

Frue en la jaro dekmiloj da aglolandanoj, kun normanda ĉiĉerono, kaj ankaŭ multaj brutoj kaj aliaj komunumistoj vizitis la sudan arbaron ĉar ili interesiĝis pri kajtoj. Antaŭe estis irinta amasa fluo de turistoj el Interriverlando al Kajtio kaj la kajtoj flugis al la suda arbaro. Kiam venis la agloj estis brilaj fajrartaĵoj. Sed pro dezerta ŝtormo ĉiuj devis plui al Interriverlando kaj Kajtio. Dume pro daŭra premo fare de la Sadisma Husaro, okazis nova turista fluo de krudaj nomadoj en Kurtion. Sed la kurtenoj ne ŝatis tiom da turistoj, kaj la restado de la krudaj paŝtistoj estis kurtigita. Ili devis reveni al Interriverlando por serĉi azion en la montoj.

Tiam komenciĝis turistaj vojaĝoj fare de oficistoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj venis al Riverlando por ludi diversajn ludojn. La aglolandanoj preferis la golfon, la ŝatatan ludon de ilia prezidento, Georgo Arbusto, kiu ofte ludas sur sia persona golfejo. Poste grupo da Unanoj ludis longan ludon de kaŝado-serĉado en Interriverlando. Estis ankaŭ multaj turistoj, kiuj preferis la krozadon sur la maro. Kelkaj el Kangurulando prezentis laman teatraĵeton sur sia ŝipo. Estis tiom da turistoj, ke estis malfacile por la ŝipoj de Interriverlando mem

navigi. Bedaŭrinde ankaŭ oni lasis iom da nafto flui en la maron, kaj multaj birdoj kaj fiŝoj mortis, tiel ke la turistoj preferis iri hejmen. Kelkaj homoj el Interriverlando iris per aviadiloj en najbaran Persikolandon. Persikoj estas tre fieraj persanoj, kaj ili longe gastigis la aviadilojn kaj ties pasaĝerojn, kaj ankaŭ la pilotojn.

En Urslando la Gobiĉefo, kiu laboregis por doni al ĉiu glason nekostan, supozeble da vodko, kaj transportadon per ies troigo, havis someran libertempon, kun sia familio, en la Krimejo. Oni proponis al li, ke li daŭrigu sian restadon tie senfine, sed li preferis reiri al la ĉefurbo, ĉar lia edzino ŝatas muskovitojn. Bonŝance lia amiko, Borso, la Prezidento de la Urso Respubliko sukcesis aranĝi bonvinon. Kaj multaj turistoj el Brutio kaj el Aglolando venis por aŭskulti liajn aventurojn en la Krimejo.

Fakte en la Malnova Mondo estis multaj turistaj fluoj. Urslandanoj, precipe samkredanoj de Zamenhof, amase vojaĝis al la promesita lando. La problemoj estis, ke la indiĝenoj ne ŝatis la turistojn kies vizitoj ŝajnis daŭrigeblaj, kaj ili organizis infanan movadon. La alpistina junularo ĵetis botelojn da malbona vino aŭ donacis moltufajn koktelojn al la ursaj turistoj. Eĉ agla bakisto, kiu ofte vizitis la Sanktan Landon, ne sukcesis organizi tagmanĝon, kiun la Alpistinoj konsentus tie partaĝi kun la ebruloj. Sed poste li ja aranĝis bankedon je

nomada rido en la Ebria Duoninsulo, kie la alpistinoj, la ebruloj kaj la arbaranoj parolis unu al la alia. Sed ĉiam la Hara Fato, estro de la poloo-teamo, insistis, ke oni ne konstruu hotelojn en la arbaraj landoj por la turistoj el Urslando.

La homoj de Litanio, Latunio kaj Estrarano kiuj ĵus anoncis sian sendependecon, decidis organizi sian propran turistan servon. Multaj vojaĝis al Aglolando por partopreni en la kunvenoj de UN. Ili petis, ke la baltaj statoj fariĝu tabljaj ŝtatoj, kaj ke oni provizu al ili la necesajn financajn rimedojn por organizi taŭgajn gastigejojn por turistoj.

La brutoj ankaŭ multe vojaĝis. Ili nova ĉefo, majora politikisto, plurfoje vizitis Ursion kaj ankaŭ tre ĝuis la pekinanojn kiuj tute ne estas pekulinoj *By Jingo!* Por helpi la turistan komercon de la bruta kelonio, en Honorkongo li konsentis pri nova flughaveno. La honorkonganoj havis balotadon por aprobi la novan aeroporton, sed ili jam havis tro da turistoj, ĉefe el Vetamantejo. Ili timis, ke estos eĉ pli da turistoj kiam la brutoj forlasos sian kelonion. Fine la brutoj persvadis la vetamantojn konsenti, ke iliaj 50 000 turistoj iru hejmen iom post iom, vole nevole. Tiel la migrena problemo de Honorkongo ĉesis.

El Blanklando iris granda turista fluo en la somero per ŝipoj trans la hadriana muro al la lando konsiderata esti talio de Eŭropo, sed la talianoj ne ŝatis tiom da malriĉaj turistoj, kiuj ne povis pagi la hotelkontojn ĉar ili ne havis blankajn

ĉefojn kun si. Oni insistis, ke la ŝipoj reiru al Blanklando. Tamen kelkaj blanklandanoj ludis en la stadio dum la restado.

Estis iom da turistado eĉ en la Karabena Maro. El la Hejtila Respubliko multaj turistoj ekvojaĝis al Aglolando, sed la ŝipoj erarvagis kaj alvenis al Kastorolando, kie ili loĝadis en tendejo afable provizita de la agla armeo. La fidela Kastoro mem ne vojaĝis, ĉar ne restis ruĝaj prezidentoj por lin inviti.

Dank' al la klopodoj de la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj de Kangurulando, turistoj denove vizitis Kampaĉejon. La Eta Princo, Setanuko, revenis por daŭrigebla restado en sia restaŭrita palaco. La ĉefo de la ruĝaj kimeroj havis du tre mallongajn vizitojn, antaŭ la fino de la jaro sed li ne trovis bonan vinon kaj ne ŝatis la bruon. Kelkaj kanguruoj ankaŭ alvenis, por helpi pri la organizo de diskreta baloto.

La kanguruoj ĉefe saltadis interne de sia kontinento kaj ne ricevis multajn gastojn pro la ekonomia krizo. Sed sufiĉe grava fluo de turistoj okazis la lastan tagon de la jaro kiam amaso de aglolandanoj, inter ili la familio Arbusto venis al Kangurulando por spekti la fajr-artaĵojn super la haveno, kaj por bonvinigi la Novan Jaron. Ili renkontis ankaŭ la novan ĉefministron, Paŭlo Kitio (sekvanto de pavo kaj akcipitro). Lia edzino Anjo estas bela lingvisto kaj povis interpreti inter la agloj kaj la kanguruoj. Eĉ kvankam kompaspo perdiĝis kaj nova strio prokrastiĝis, la

grupo de kelkcent sukcesis alteriĝi en la sidejo sur la du strioj de la flughaveno. Nur la verduloj kaj terkulturistoj protestis, kaj kriis: For la algoj, for la agloj, kaj (en ne kulturita versio de bruta proverbo): "Bonan vinon ne bezonas arbusto".

Kaj en Esperantujo, kiel kutime, la turistoj flugis amase el ĉiu kontinento al la Universala Kongreso en Begino en Nordio. Oni eĉ bonvinigis ŝipon el Orientio, kiu

venis sen la necesa ruĝa rubando. La ĉefa decido de la Aferkunsido estis kunvoki la verdstelanojn amase veni al vino en 92.

(La analisto petas pardonon pro la multaj eraroj, kiujn faris lia nova, unua, komportilo, kaj esperas, ke ĉiu trovos almenaŭ iom da amuzo en la raporto. Plendojn oni sendu al la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) por eldono en *Internacia Ĵurnalisti*.) □

ALDONO AL LA LIBROKATALOGO 1992

- 761: *Aerlumo*. Flavio Fonesca. Kasedo. "Eĉ Se, Samideanoj, Reciproka Ŝtelo", k.a. \$28.00.
- 118: *Eseoj V (Kaj la Ceter' Nur Literaturo)*. Gaston Waringhien. 350p., broŝ. \$29.00.
- 838: *The Esperanto Movement*. Peter G. Forster. 411p., bind. \$40.20.
- 682: *Esprimo de la Sentoj en Esperanto*. Edmond Privat. 60p., broŝ. \$7.70.
- 887: *Festoj de Kristnask'*. Kasedo. "Sankta Nokt', Boaco, Sankta Nikol', Stelo de l'Dezir", k.a. \$24.30.
- 338: *Folioj de Mia Memoro*. Amzejev, Ĵomart/Gerlaĥ, Nataŝa. Kasedo. "Nia Vivo, Aŭskultu Min, Telefon', Vi kaj Mi, Frua Mateno" k.a. \$26.00.
- 689: *Frosta Nokto*. Bakin. Familia tragedio dum 1944-45 en Chongqing. 300p. bind., \$9.00.
- 688: Insigno #11 Broĉo "ESPERANTO universala lingvo". 37mm. \$1.50.
- 278: *Internacia Komerca Ekonomia Vortaro*. 11-lingva. \$52.60.
- 616: *Kiel Diskonigi Vian Asocion*. UEA. 24p., vink. \$2.80.
- 041: *Kisa Malsano*. Claude Piron. 78p., broŝ. \$10.20.
- 331: *Look Sharp: Ĝeneralaj Sciigoj*. Stefan MacGill. 36p., broŝ. \$7.60.
- 437: *Meznokta Metrolo*. Krys Ungar. 110p., broŝ. \$15.40.
- 777: *Montara Vilaĝo*. Chun-Chan-Yeh/William Auld. Ĉina. 264p., bind. \$7.50.
- 700: *Ribelo Kontraŭ la Ĉiela Palaco*. Tang Deng. Kolorilustrita fabelo. 184p., broŝ. \$1.50.
- 329: *Romeo, Julieta kaj la Tenebro*. Jan Otcenasek. Stafeto-serio. 175p., broŝ. \$7.70.
- 447: *Saltego Trans Ĵarmiloj*. Jean Forge. Nova eldono de klasika Esperanta romano. 196p., \$7.70.
- 242: *Speciala Premio*. Ĉinaj rakontoj. 117p., broŝ. \$2.10.
- 590: *Tiel Diru*. Eld. SAT. 127p., broŝ. \$9.30.
- 552: *Verkoj de Verda Majo*. Ĉina. 501p., bind. \$8.00.
- 432: *Vojo al Feliĉo*. Huberto Rohden. Spiritisma. 90p., \$3.50.

LA MANKINTAJ DIAMANTOJ

noveleto de DONALD BROADRIBB

Lunde: Mi sidis en mia fotelo, ripozante iom antaŭ ol komenciĝos la venanta konsulthoro. La paciento estos mia delonge terapiata skizofreniulino Margareta. Kiam ŝi komencis konsulti min antaŭ tri jaroj mi trovis ŝin ĉarma, afabla, kaj ofte tre bon-senca persono, malgraŭ ŝiaj oftaj halucinoj. Dum niaj konsulthoroj, tri-foje dum ĉiu semajno, mi klopodas firmigi en ŝi naskiĝantan kapablon distingi inter realo kaj halucina imago. Kaj iom post iom mi sukcesas.

Hodiaŭ Margareta evidente estis tre eksciŭta. Apenaŭ ŝi ek-sidis, ŝi komencis iom neklare paroli:

"La diamantoj...ĉu halucino aŭ realo?...ili reaperis." Parolante ŝi estis videble angora, kutima stato dum skizofrenio. Mi atendis ke ŝi plu parolu. "La egiptaj diamantoj ... ili mankis ... mi tion diris al vi jam antaŭ longe, ĉu ne? ... sed ili ne mankas, ili sidas sur sia breto en la ripozĉambro." Ŝi parolis kvazaŭ-panike, spiregante inter ĉiu vortgrupo.

Mi bone memoris la "egiptajn" diamantojn. Laŭ pretendo de la patro de Margareta, eminenta arkeologo en Perto, iujn dimantojn laŭdire el la antikva egipta civilizacio trovis arkeologo en 1902. Ili estis malaŭtentikaj, kompreneble. La antikva egipta kulturo ne konis

diamantojn. La trovo tamen ekscitis la trovinton, kiu multe fanfaronis pro la neatendita trovo. Li malpli fanfaronis kiam juvelistoj ekzamenis la "diamantojn" kaj konstatis ke ili estas senvalora vitra falsajo. Dum pluraj jardekoj la falsitaj diamantoj malaperis el la arkeologia memoro de la publiko, sed en 1970 ili subite reaparis kiam ido de la trovinto prezentis ilin kiel donacon al la Perta profesoro pri arkeologio, la patro de

Margareta. Ricevinte la "diamantojn", ŝia patro diskonigis ilian historion al ĵurnalistoj.

"La pseŭdodiamantoj donitaj al via patro gratule pro via naskiĝo? Jes, mi bone memoras ilin," mi diris.

"Pseŭdodiamantoj, jes ... mi scias ... tial estis strange ke iu volis ŝteli ilin. Sed ni eraris, ili ne estis ŝtelitaj, ĉar ili plu sidas sur la breto." Margareta parolis per malsinkonfida tono, kian ŝi kutime uzas kiam ŝi estas necerta pri la realeco de iu viditaĵo.

Mi gratetis mian kapon kaj pensis. La "diamantoj" estis relative bone faritaj sed plene falsitaj, valorantaj maksimume eble kelkdek dolarojn. Tial ili ne estis asekuritaj. Sekve, en 1990, kiam ili malaperis el la domo de la patro de Margareta, la polico ne tre fervoris serĉi la ŝtelinton. Nur Margaretan tre trafis la perdo, ĉar ŝi sentis kvazaŭ iu atencas ŝian vivon.



Ilia ekapero ja signis ŝian naskiĝon, do, tiel rezonis ŝia menso, ilia ekmalapero sendube signas ŝian morton. Sed, kompreneble, ŝi ne mortis, kaj iom post iom ŝi kaj mi sukcesas restabiligi ŝiajn emociojn pri la afero.

“Do,” mi klopodis kompreni la aferon. “La paro da ŝtelitaj diamantoj nun reestas en sia antaŭa pozicio en la domo, kaj vi demandas al vi kaj al mi ĉu eble ilia malapero estis halucino, ke ili ĉiam restis tie?”

“Jes. Mi iam vidis televidan programon en kiu hipnotisto kredigis al kliento ke sur tablo troviĝas nenio eĉ kvankam oniaj okuloj facile vidas sur tiu tablo sukerujon.” Margareta memorigis min pri temo kiun ni jam antaŭ longe diskutis dum du-tri horoj, ĉar ĝi estis bona ekzemplo de tromphalucino kian ŝi fojfoje spertis.

“Sed ne povas esti tiel,” mi komentis. “La polico ja ne tre serioze pritraktis la ŝtelon, ĉar temis pri tiel senvalora ŝtelaĵo. Sed ili ja konstatis ke ŝtelo tute sendube estis okazinta — ke sendube iuj buboj volis imponi al iuj amikoj per sia tiel ŝtelita arkeologia pseŭdotrezoro.”

“Se do ili estis ŝtelitaj, kiel povas esti ke ili plu troviĝas sur la breto en la domo?” Margareta kontraŭis. “Mi estas konvinkita ke ili ĉiam estis tie, ke mi nur imagis ilian malaperon.”

“Ĉu iu diris tion al vi?” Mi ekpensis ke eble iu fiŝercemulo volas trompi ŝin.

“Neniu diris al mi. Mi vidis ilin kiam mi eliris celante veni al jena nia konsulto.” Margareta parolis tre certmiene.

Mi prenis la telefonon kaj ciferumis celante paroli kun ŝia patro. Estis somero, li ne instruas klasojn nun, sed prilaboras sian planatan libron pri moneroj babiloniaj. Post kelkaj momentoj li respondis. Jes, la pseŭdodiamantoj vere reaperis. Ne, li ne scias kial nek kiel. Eble la ŝtelitaj buboj hontas pri sia krimeto kaj decidis malŝteli ilin. Ja ne gravas. Se ŝtelisto volus ion valoran, ja estas tre valoraj, asekuritaj trezoroj en la domo, sed neniu tuŝis ilin. Mi dankon diris kaj ĝisis.

“Do klaras ke ne temas pri halucino,” mi raportis al Margareta. “Ili vere estis ŝtelitaj, kaj nun vere reestas en sia loko. Mi ne scias kial tio okazis, sed ĝi ja vere okazis.”

Margareta ekmalstreĉiĝis, kvazaŭ senigita je granda ŝarĝo. “Do mi ne bezonos pli da flufenazino,¹” ŝi diris, kontente.

La reston de la horo ni diskutis ŝian aktualan problemaron ĝeneralan.

Merkrede: Margareta venis akurate. Sidiginte, ŝi malfermis sian saketon kaj transdonis al mi la pseŭdodiamantojn. “Por ke vi pruvu al mi ke mi ne halucinas,” ŝi diris. “Sed eble tiu pruvo mem estus halucina.”

Tipa skizofrenia parolaĵo. Mi komentis ke ŝiaj halucinoj kutime estas plenaj de teruro, sango, kaj

¹Medikamento uzata por severe skizofreniaj pacientoj. Margarita ricevas injekton de flufenazino ĉiun trian semajnon, normalan dozon por “normala” skizofreniulo.

murdo, ne de pseŭdodiamantoj.

“Sed povas esti ke mi komencas novan etapon en mia skizofrenio,” ŝi protestis.

Mi respondis ke tio estus konsiderinda nur se ŝi eble provas trompi min, por tiri min en la saman halucinon.

Sekvis iom da diskuto pri la “nodo” (laŭ la konceptaro de la psikanalizisto R. D. Laing) dismalimplikenda: ĉu eblas ke oni halucinas ke oni halucinas? — tia diskutado estas unu el la mensludoj plej amataj de Margareta.

Mi zorge ekzamenis la pseŭdodiamantojn kaj komparis ilin kun foto publikigita kiam ili malaperis antaŭ unu kaj duona jaroj. Estis klare ke temas pri la samaj objektoj.

“Jen la kodnumero sur la mal-supro” Margareta indikis al mi.

Mi rigardis, per lupeo, kaj klare vidis la klasifikan numeron: ED382-69, kiun surgravurigas la profesoro kiam li ordigis sian kolekton.

“Sed tiu kodnumero ne aperas en la originala foto kiu troviĝas en la fotaro montranta miajn naskiĝdonacojn,” objetis Margareta.

“Ĉu?” mi demandis. Margareta denove malfermis sian sakon kaj transdonis al mi fotolibron pri ŝia naskiĝo. Mi zorge rigardis la foton, iom pensis, kaj diris: “Verŝajne via patro nur gravurigas la kodnumeron poste, kiam li klasifikis siajn arkeologiaĵojn kaj asekurigis ilin.

“Tamen,” mi pludiris, “se vi volas, mi portos la ‘diamantojn’ al juvelista amikino mia por ke ŝi zorge ekzameni ilin.”

Margareta kapjesis.

Do, dum la vesperiro al mia domo mi haltis ĉe la domo de mia amikino, por lasi ĉe ŝi la “diamantojn” por eksperta takso. Ŝi estis konsultita de la asekurkompanio antaŭ jaroj, kiam la profesoro decidis akiri asekuron por siaj posedaĵoj.

Sendube vi jam divenis la rezulton. Mia amikino post zorga ekzameno deklaris ke la nunaj “pseŭdodiamantoj” estas tute malpseŭdaj. “Mi eĉ kuraĝas deklari,” ŝi duonserce diris, “ke ili estas eksperta kopio de la malaŭtentikaj, pli lerte farita ol mi iam vidis antaŭ nun.”

Do jen la dilemo, ĉu ne? Kutime krimisto ŝtelas aŭtentikajn juvelojn kaj anstataŭigas ilin per malaŭtentikaj. Ne inverse. Kial oni tranĉus aŭtentikan diamanton tiel ke ĝi estu kopio de falsita malaŭtentika ekzemplero?

Mia amikino estis tute konfuzita, kaj ankaŭ mi mem. Ni tuj telefonis la profesoron, kiu estiĝis, kompreneble, eĉ pli perpleksita ol ni.

La solvo aperis nur kelkajn semajnojn poste. La profesoro, patro de Margareta, petis konsulthoron kun mi. Mi supozis ke por diskuti Margaretan kaj ŝian plu boniĝantan staton. Ĉar kvankam ankoraŭ skizofrenia, ŝi bezonas nun malpli grandan dozon da flufenazino kaj ŝia kapablo, sub la influo de la medikamento, distingi inter fantazio kaj realo nun fariĝas multe pli forta.

Sed ne, tuj kiam li alvenis, estis evidente ke la profesoro volas diskuti sin mem. Lia konscienco komencas piketi lin.



WINDOW ON THE WORLD

"GO": This oriental game is the speciality of the International Esperantist Go League, which is sponsoring its Third International Correspondence Go Tournament which began in January this year. For information, contact Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, D/O-5503 Ellrich, Germany.

The Greens: The Second Congress of the Green Party of Ukraine, meeting in Ternopil in early June last year, adopted a resolution calling for the use of Esperanto for international communication among Green parties, and has invited the Ukraine Esperanto Association to actively collaborate in this goal.

At the same time the Sixth International Congress of Green Parties, meeting in Zürich, Switzerland, accepted Esperanto as an official language alongside English, French and German, and for which simultaneous interpretation service is available (!).

The Verdula Esperanto-Asocio ("Green Esperanto Association") was founded to coordinate activities of national Esperantist "Greens". Secretary: Alberto Menabene, Via Monti Sibillini 3, I-00141 Rome, Italy.


Tourism in Mongolia: The Ayan Turisma Servo has been established in Ulaanbaatar, the capital city of Mongolia, in collaboration with the Juulchin/Zuulchin Tourism Company. The new Esperantist tourist service caters for tours, lodging, Esperanto speaking guides, etc. not only in Ulaanbaatar but in various parts of Mongolia. Address: Tz. Batzaya, PO Box 57, Ulaanbaatar 211110646, Mongolia.

Esperanto Radio: Incomplete statistics indicate that Esperanto programs on public radio stations (primarily short wave) were regularly broadcast in/from twelve countries in 1991: Austria (Vienna), Brazil (regional only: Rio de Janeiro and Sorocaba), China (Beijing), Cuba (Havana), Esthonia (Tallinn), Hungary (Budapest), Italy (Rome), Lithuania (Vilnius), Poland (Warsaw),

Switzerland (Bern), the Vatican and Yugoslavia (Zagreb). 4531 broadcasts totalling 1713 hours were counted. They ranged from a high of two hours per day from China to a low of four two-minute broadcasts a week from Vilnius. The major broadcasters were Beijing, Bern, Havana, Vienna, and Warsaw. Overlooked in the statistics are the weekly Esperanto programs in Melbourne and Paris, and presumably other local stations. The decline in the total hours broadcast (2072 hours in 1990) was due to a drop in broadcasting hours by Radio Warsaw from 871 hours to 486.

Scholarly Studies: A new "Ivo Lapenna Foundation" has been established to make grants available to university students who in the preceding year have successfully completed Honours, MA or PhD theses on Esperanto from a linguistic viewpoint "in the spirit of L.L. Zamenhof and Ivo Lapenna". Dr Zamenhof was the founder of Esperanto in 1887. Prof Lapenna was Professor of Law at London University for many years. The first grant was given in 1992. Requirements for the grant in future years are available from Peter Zacho, N rreg rdsvej 91, DK-2610 R gdovre, Denmark.

The 65th Congress of S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda = "Nationless Worldwide Association") will be held in Kaunas, Lithuania, August 5-18, 1992. Interested persons may contact Justice Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

 *Lost in translation.* A joke taken from a special English-language edition of *Sibirskaya Gazeta Weekly*, July 1991. "The tenth year of perestroika. A man is standing in the long line for canine meat. On his approaching the counter the shop assistant says loudly, 'Only the seventh sort of this meat remains on sale; the rest is sold out.' Poor buyer utters a sigh and asks to weigh out two kilograms, for there's nothing at home all the same. On his coming home his wife starts screaming, 'What is it you've brought? There are only wooden chips here!' Indignant the man rushes back to the store. 'What have ye sold me?' 'Why, don't you know the seventh sort of canine meat is cut with kennel

only?'

(From *ELNA Update*, 4/1991.)

San Francisco State University Summer 1992 Program in Esperanto
June 29-July 17. Sponsored by the Esperanto League for North America. Courses will be held on five levels: (ESP 594) *Beginning Esperanto* Welcome to Esperanto (3 units) — Specific training in standard spoken and written Esperanto for students completely new to the language. (ESP 595) *Intermediate Esperanto I* Gaining Confidence in Esperanto (3 units) — conducted in Esperanto, stressing conversational ability. (ESP 596) *Intermediate Esperanto II* Esperanto in Practice, Language & Literature (3 units) — discussions based on readings; opportunity to work in the computer laboratory. (ESP 597) *Advanced Esperanto* Esperanto Literature, Language, and Culture (3 units) — Entirely in Esperanto. (ESP 699) *Independent Studies* Directed Studies in Esperanto (3 units) — Participation is limited to students who have already studied intermediate or advanced Esperanto at SFSU. (ESP 598) *Methods of Teaching Esperanto* (optional 4th unit), to be taken only in conjunction with ESP 596 or 597.

Fees: Course, US\$309 for 3 weeks (3 units). For 4th credit add US\$4103. Housing, US\$400 for three weeks (plus 1 meal daily obligatory US\$120, 3 meals daily US\$360). The SFSU Fellowship Fund of the Esperanto League for North America can provide partial financial support for needy students in the program. For information about courses, fellowships, housing and application forms contact Cathy Schultze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA 94010, USA.

← *Planning Esperanto travel in 1992?* E.g. To the San Francisco State University summer school 29 June — 17 July; Universala Kongreso in Vienna, 25 July — 1 August; Pacific Regional Esperanto Congress in Qingdao, 17-22 August. Esperanto Travel, c/- Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5068 can offer three itineraries, prices now offered if a minimum of ten bookings are made with the same agent: 1. Sydney (Melb/Ad/Perth/Bris) — Tokyo — San Francisco — Prague or

Vienna — Beijing — Qindao — Beijing — Tokyo — Sydney (Melb/Ad/Perth/Bris) An up to 12 months ticket with Japanese Airlines, Lufthansa and China Airlines, \$2885.00. 2. Sydney (Melb/Ad/Bris) — Vienna — Beijing — Qingdao — Beijing — Hong Kong — Sydney (Melb/Ad/Bris) an up to 12 months ticket with Lufthansa, China Airlines and Cathay Pacific, \$2935.00. 3. Sydney (Melb/Ad/Bris/Canb) — Vienna return with an additional stopover (e.g. London, Prague, Warsaw), an up to three months ticket with Lufthansa, \$2230.00. 4. Sydney-Qingdao return, an up to three months ticket with China Airlines. \$1570.00.

In Poland the tenth annual Esperanto Arts Festival (Artaj Konfrontoj en Esperanto, [ARKONESO]) was held in Poznań Oct. 18-20, 1991. The theme was "Cultural diversity — the basis for co-existence or for conflict?" Featured were a drama *Wolf-gangeral* by Gunnar Gällmo (Sweden), the "Harmonio" Youth Ensemble from Smolensk (CIS), the "Espero" Singing Group from Kozalin, "musical poetry" on Saint Francis' love of nature by the J. Badowska-Muszynska, and a trip through Polish poetry by Lidia Lugeza. But financial difficulties have taken their toll here as in the other one-time Eastern Block countries: "Unfortunately, full participation with meals was too expensive for many of those attending (half a month's wages!)." It is unlikely that the Arts Festival can be held this year, because of the financial uncertainty, and the local Orbita Cultural Centre is likely to have to close though lack of finance.

60 Action E3 is the name of an international Esperantist endeavour, now 25 years old, to provide professional eye treatment and glasses to sufferers in the third world. One of their most successful projects, despite many setbacks, has been in Ethiopia. Funds to make it possible to continue to provide eye care and prescription glasses are urgently needed. Contact Agado E3, Henegouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Netherlands.

Ekologio, ("Ecology") is the name of a book containing this year's talks on the subject at the combined Australian and New Zealand Esperanto Congress held in Sydney in January of this year. A free copy is being sent to all subscribers to *The Australian Esperantist*.

“Mi mem ŝtelis la diamantojn,” li diris post pluraj paŭzoj.

“Vi ŝtelis...kiujn? La pseŭdo-diamantojn, aŭ la aŭtentikajn?” mi demandis.

“Ambaŭ. Dufoje, efektive.”

Tiu deklaro vere mistifikis.

“Kiam mi estis juna,” diris la profesoro, zorge kaj malrapide elektante siajn vortojn, “min ofte ĉagrenis vidi la trezorojn kiuj iras al muzeoj — kaj, ni estu honestaj pri tio, ne ĉiam al la rajthavantaj muzeoj. Ofte muzeoj subaĉetas arkeologon, aŭ nacian oficialulon, por ke trezoro laŭrajte apartenanta al la nacio kie ĝi estis trovita iru al ili kaj ne al la nacia muzeo konforme al la leĝoj. Kaj pli ol unufoje mi vidis arkeologon enpoŝigi tre valorajn trovaĵojn.”

“Kaj vi trovis ĉi tiujn diamantojn kaj simile enpoŝigis ilin?” mi konkludis heziteme. “Kaj la tuta historio de la originala trovo en 1902 estis elpensajo via? Kaj neniuj donis ilin al vi en 1970, vi mem aperigis ilin el kaŝejo? Sed kiel vi, aŭ iu alia persono, povus trovi falsitajn diamantojn en antikva egipta tombo?”

“Ne, vi ne komprenas,” li diris. “Antaŭ la Dua Mondmilito, dum mi ankoraŭ estis juna, mi partoprenis en arkeologia ekspedicio. Iu arkeologo...nuntempe jam mortinta...venis al nia bivako kaj mi...nu, mi estis tiam tre juna, sciuj...mi traserĉis lian valizon dum li estis for, unu tagon. Kaj en la valizo mi trovis...diamantojn. Ne el egipta deveno, evidente. El hinda. Mi ne scias de kiu periodo...hindaj diamantoj estas speciala fako, kaj mi ja ne povis

demandi la havinton!”

“Do kiam tiu arkeologo trovis la perdon de siaj diamantoj — ĉu ili estis aŭtentikaj aŭ falsitaj?”

“Aŭtentikaj, kompreneble. Neniu volus kontrabandi senvalorajn imitaĵojn. Nu, kiam li trovis la perdon, mi jam estis tre malproksima...mi ja ne restis tie. Kaj li, nu, li ne povis raporti al la polico la perdon de ŝtelita kontrabandaĵo, tio ja estus klaŭnaĵo!”

“Sed mi estas konfuzita,” mi objetis. “De vi oni poste ŝtelis falsitaĵojn, ne aŭtentikajn diamantojn.”

“Vi pravas, sed ‘oni’ ne faris tion, mi mem faris.”

“Sed kial?” Mi plu estis senkomprena.

“Nu, mi apenaŭ povus ekspozicii kontrabandajn diamantojn en mia domo, ĉu? Do mi farigis lertan kopion kaj en 1970 tion montris al la mondo. Estis amuze, rigardi kaj legi la komentojn de tiel nomataj ‘ekspertoj’ kiuj en la revuaro diskutas la ‘donacon’. Mi planis, kompreneble, sekrete anstataŭigi ilin per la aŭtentikaj diamantoj post kelkaj jaroj. Tiel la tuta mondo plu kredos ke la veraj diamantoj sur mia breto estas la falsitaj.”

En mi ekbrilis lumeto de kompreno. “Sed dum oni diskutadis kaj volis ekzameni la falsitajn, vi ne povis enlumigi aŭtentikajn kiujn vi ŝtelis.”

“Ĝuste tiel. Mi do kaŝis ilin en banka sekurejo.”

“Kaj,” mi ankoraŭ pli komprenis, “post tiom da jaroj onia interesiĝo jam delonge antaŭ nun forvaporigis kaj vi povas sentime anstataŭigi ilin per la aŭtentikaj, ĉar la tuta mondo

kredas ilin falsitaj.”

“Tiel,” li diris.

“Sed kial mistere vi malaperigis la falsitajn el via domo? Tio estis danĝera ago. Oni ja dispublikigis la raporton pri la nova, falsita ‘ŝtelo’, kaj tiel retiris atenton al vi.”

“Nu, tio okazis efektive pro akcidento. Mia edzino eniris la domon ĝuste dum mi entreprenis anstataŭigi la falsitajn per la aŭtentikaj. Mi ja ne povis ekspliki al ŝi, do mi rapide enpoŝigis ambaŭ juvelparojn kaj diris al ŝi ke mi ĵus trovis ke oni ŝtelis ilin.”

“Ahhh. Do tial la diamantoj devis manki sur la breto dum iom da tempo, por prui al ŝi la ŝtelon.” La lumo de kompreno komencis fariĝi fajro.

“Ĝuste tiel. Kaj antaŭ kelkaj tagoj

mi decidis ke nun estus sendanĝere plenumi mian originalan planon kaj reaperigi la ‘diamantojn’ sur la breto, sed ĉifoje aperigi la aŭtentikajn kaj ne la falsitajn.”

“Mi plu ne komprenas unu parton,” mi diris. “Kial fari ĉion ĉi, se vi neniam povos asekurigi aŭ vendi la diamantojn? Kian valoron ili havas por vi, sur la breto?”

“Mmm. Ja estas tre kontentige povi montri al vizitantoj verajn multevalorajn diamantojn, sed trompi per deklaro ke ili estas nur senvaloraj kopioj, ĉu ne? Kia amuzo!”

Nun mi komencis kompreni pro kio Margareta frenezigis.

[Averto al la leganto: ĉi tiu rakonto estas plene fikcia, kaj estas bazita sur neniu ajn eventoj. — D.B.] □

LA BISKVITA FAMILIO

esperantologia studo, de DOUG PORTMANN

[Resumo de artikolo aperinta en la angla lingvo en *esperanto/USA* 1991 (7)]

En ĉi tiu artikolo mi pritraktos la problemon kiun prezentas kvar Esperantaj vortoj: *biskvito*, *flano*, *krakeno*, kaj *kringo*.

Ĉi tiuj vortoj apartenas al la *Fundamento de Esperanto*, do estas vortoj selektitaj de Zamenhof mem.

BISKVITO:

Laŭ PIV “biskvito” estas: “Speco de pano aŭ de kuko, dufoje aŭ longe bakita, ĝis plena sekeco: *soldata -o*.” La *Fundamento* donas ĉi tiujn ekvivalentojn en aliaj lingvoj: A. *biscuit*, F. *biscuit*, G. *Zwieback*, R. *biskvit*. Se ni

povus konkludi ke *biskvito* = [Usona] *biscuit*¹, ni tute ne bezonus pritrakti ĉi tiun vorton. Sed Zamenhof, eŭropano, sendube celis la Britan *biscuit*, do (1) cookie aŭ (2) cracker. Kiun li celis?

Butler en sia *Esperanto-English Dictionary* diras *cracker*. La germana *Zwieback* signifas *rusk*. La franca *biscuit* estas ambigua, kun signifoj egalaj al tiuj de la Brita vorto. Kion

¹La leganto memoru ke en la Usona vortuzado “biscuit” = Aŭstralia “scone”. — La Red.

pri la Rusa *biskvit*? Du Ruslingvaj konsultverkoj akordas: *biskvit* estas *sponge cake*!

PIV ankaŭ parolas pri “marbiskvito” tradukebla angle per *hardtack*. Esperanto jam havas apartan vorton por *cookie*: *kekso*. [*PIV*.] Eble *biskvito* estus konservebla por tre malsekaj *cookies*, ekzemple *gingersnap* (*zingibra biskvito*).

FLANO

Ĉu ni uzu la plej similaspektan Anglan vorton, *flan*? La Angla vorto temas pri *tart*, precipe *fruit tart*. Tamen *PIV* alie difinas: “Ĉia plata, rondforma bakaĵo el pasto”. Butler tradukas per *very thin cake or wafer*, la signifo uzita en la Esperanta traduko de la Biblio. La *Fundamento* tradukas tiel: A. *flawn* [tiel!], F. *flan*, G. *Fladen*, Plinse, R. *blin*. La Rusa *blin* signifas *pancake*. *PIV* tradukas la Rusan *blin* per *blino*. La Germana *Fladen* estas rondforma, plata pastaĵo. Wells in sia *Esperanto-English Dictionary* proponis “(thin, flat) pastry; girdle cake, dropscone, baked custard tart” kiel Britajn tradukojn.

Klare la elasteco de la *PIV*-difino permesas plurajn signifojn. Eblaj estas (1) *griddle cake*, (2) *pie crust*, (3) *flan*, (4) *small thin cake or wafer*, (5) *toasta flano* = English *muffin*, *crumpet*¹, (6) *Itala flano (pico)* = *pizza*, (7) *meksika flano* = *tortilla*, kaj eble (8) *brita flano* = *scone*. Elasta difino povas

¹English *muffin* kaj *crumpet* havas mem apartajn signifojn en Aŭstralia parolado.—La Red.

nuligi la bezonon uzi neologismojn. Pri (6), la *Suplemento al PIV* jam tradukas la Anglan *pizza* per *pico*.

KRAKENO

PIV difinas tiel: “Malgranda, seka, sukerita kuko, kiu krakas sub la dento. ☞ *kringo*”. La *Fundamento* diras: A. *cracknel*, F. *craquelin*, G. *Brezel*, R. *krendel*. *Krakeno* estas verŝajne parenco de la Esperanta radiko *kraki* = *to crackle*, aŭ *to crunch*. La Angla traduko eble estas malklara por kelkaj niaj legantoj. *Cracknel* estas malnova Angla vorto signifanta *hard, brittle cake or biscuit*.² La Franca vorto havas pli-malpli la saman signifon. Sed la Germana kaj Rusa terminoj signifas *pretzel*. Mi rimarkis ke en tri Esperantaj vortaroj, el kiuj du estas Germanaj, oni donas la vorton *breco* (neologismon ne troveblan en *PIV* nek *PIV-S*) por traduki la G. *Brezel* kaj sekve la A. *pretzel*.

Konforme al la ĝenerala difino donita de *PIV* mi proponas (1) *cracknel*, (2) *Graham cracker*, (3) *maiza krakeno* = *caramel popcorn*.

Alternative, *krakeno* povus = *cracker*. Du Esperantistoj en malgranda grupo kiun mi demandis preferis tiun signifon por *krakeno*. Tio estus ebla se *biskvito* = *cookie*, kontraŭe al mia supra rekomendo.

KRINGO

PIV diras “Malgranda seka sen-

²Tiel difinita en la *Macquarie Dictionary*—La Red.

sukera kuko, plejofte ringforma." La *Fundamento* diras: A. *ring shaped cake*, F. *gimblette* (*pâtisserie*), G. *Kringel*, R. *bublik*. Ŝajne Zamenhof faris la vorton *kringo* laŭ la G. *Kringel*. Kio estas *Kringel*? Bedaŭrinde, la Germanaj vortaroj kiujn mi konsultis ne multe helpas. Unu diras *cracknel* kaj la alia parolas pri ia manĝaĵo ringforma, ŝajne sensukera. La Franca *gimblette* ankaŭ estas ringforma, kaj ŝajne pastaĵo. La Rusa *bublik* estas *thick bagel*. La Rusa ŝajnas grava: *kringo* = *bagel*. Tio nuligus la bezonon krei

neologismon *bejgelo*, uzatan en la ankoraŭ ne eldonita *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Pete Benson.

[Postnoto: Rüdiger Eichholz atentigas ke *PIV* atribuas la difinon de la *PV-a* "kringo" al "krakeno" kaj inverse. Li komentas: "Laŭ mia sento 'kringo' devus esti dolĉa kaj nekrakanta, dum 'krakeno' estas nesala kaj krakanta."]

(Esperanta resumo farita de D.B.)

LA ATUTOJ DE LA AMBASADORO

de RALPH HARRY

La ambasadoro estis kontenta. La edzino de la ministro evidente studadis la libron, kiun li pruntedonis. Ŝi jam ludis unu manon kompetente, frue eltirante la atutojn de la kontraŭuloj. "Via libro instruis, ke oni devas ĉiam eltiri la atutojn kiel eble plej frue", ŝi diris. "Mi ankaŭ majstris la konvencion de Blackwood", ŝi aldonis, "kaj mi ofertas kvar senatutojn se ni eble povos sukcesi en ŝlemo".

"Kion signifus respondo de kvin trefoj?" demandis la ambasadoro.

"Ke vi havas neniun ason", ŝi respondis.

"Jes, aŭ ke mi havas ĉiujn asojn", li diris. "Vi certe bone studis".

Post du-tri disdonoj la ambasadoro,

sude, ricevis la jenan manon:

- ♠ A, 4
- ♥ A, D, 9, 8, 3
- ♦ A, 7, 6, 3, 2
- ♣ A

Li ekofertis per unu kero. Lia edzino, okcidente, pasis, kaj lia partnero anoncis "Unu pikon". La ministro, oriente, pasis.

Post iom da hezitado la ambasadoro ofertis: "Tri karoojn".

La ministredzino ne hezitis. "Kvar senatutojn!" ŝi diris triumfe.

La ambasadoro estis danko, ke ili jam diskutis la konvencion. "Kvin trefojn", li diris. Kaj tuj venis la ĝojiga oferto de lia bela partnero: "Sep kerojn!"

Estis la unua fojo, ke ili ludis

grandan ŝlemon, kaj la ambasadoro atendis iom time, dum lia edzino, okcidente, ekludis la trefan damon. Lia partnero sternis la fantomon:

- ♠ R, D, 6, 5
- ♥ R, 10, 4
- ♦ R
- ♣ F, 9, 6, 5, 2

“Dank’ al Blackwood”, ŝi diris, “sed mi ĝojas, ke estas vi, kiu devas ludi la manon.”

La ambasadoro venkis per la trefa aso. Tiam li prenis la pikan ason, la karoan reĝon kaj la pikan reĝon. Sur la pikan damon de la fantomo li forĵetis karoon. Tiam li ludis trefon el la fantomo kaj atutis en sia mano. Li daŭrigis la krucatudon, kaj eĉ atutis sian propran karoan ason, ĝis li havis nur du altajn kerojn — atutojn — en sia mano. Tiam, kaj nur tiam, li ludis atutojn! La kvar atutoj de la ministro senutilis.

“Gratulojn, partnero” diris la ministredzino, “kvankam mi miris, kiam vi ne elteris la atutojn.”

La ambasadoro ridetis. “Ni danku Blackwood” li diris.

Jen la kompletaj manoj:

NORDO

- ♠ R, D, 6, 5
- ♥ R, 10, 4
- ♦ R
- ♣ F, 9, 6, 5, 2

OKCIDENTO

- ♠ 10, 9, 7, 3
- ♥ 5
- ♦ F, 8, 4
- ♣ R, D, 10, 4, 3

SUDO

- ♠ A, 4
- ♥ A, D, 9, 8, 3
- ♦ A, 7, 6, 3, 2
- ♣ A

ORIENTO

- ♠ F, 8, 2
- ♥ F, 7, 6, 2
- ♦ D, 10, 9, 7
- ♣ 8, 7

(Tiun manon ludis ludanto el Yunnan en konkurso en Hongkongo kontraŭ Sidneja grupo en aŭgusto, 1991, laŭ raporto en *La Bulteno* la 24-an de septembro.)

[D-ro Harry kompilis leksikoneton de briĝterminoj. ✉ D-ro Ralph Harry, 319 Bayview Gardens, 39-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2109.] □

NIA KONKURSO PRI LA RADIKO “SAN”

En la novembra numero aperis konkurso konsistanta el listo de vortoj formitaj de Zamenhof per la radiko “san-”. Pro neceso pretigi la januaran numeron pli frue ol estis anoncote, kompleta listo de sukcesintoj en la konkurso ne povis aperi antaŭ nun. Entute kvin personoj identigis la tekston. Kvar personoj sendis traduk-proponojn —

Z. P. Abbott

Margaret Chaldecott

Bernard Golden

Alan Towsey

Mark Ward (nur identigis la

liston). □

FERVOJISTOJ

IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio), la plej vasta esperantista faka organizo, intencas pligrandigi sian aron en ĉiuj landoj, ĉefe kie ankoraŭ ne estas kunordigitaj aŭ izolitaj membroj fervojistaj.

✉ D-ro Romano Bolognesi, Via Misa 4, I-40139 Bologna, Italio. □

Lingva angulo

de ALAN TOWSEY

LEARN

to learn to speak/Esperanto etc.	= lerni paroli/Esperanton ktp.
to learn by heart	= lerni parkere
I learnt of his death/that he had died	= Mi <i>eksciis (informiĝis)</i> pri lia morto/ke li mortis

CONCLUDE

konkludi = (*PIV*) draw by reasoning logical consequences from arguments, principles or facts, e.g.:

Mi konkludis el tiu fakto, ke...
veni al la konkludo, ke...
fari/tiri la konkludon, ke...
konduki al la konkludo, ke...
Tiu ĉi konkludo estus tute erara (*Z*).

a wrong conclusion = misa konkludo

That was a foregone conclusion = Tio estis jam antaŭvidebla.

to jump to conclusions = antaŭtempe decidiĝi, antaŭjuĝi la aferon

konkludi ne egalas fini! Do:

He concluded his speech with the words... = Li *finis* sian paroladon per la vortoj...

Let me conclude by quoting... = Mi finu (ĉi tiun artikolon ktp.) citante...

In conclusion = Fine, Por fini

The meeting came to a conclusion without any definite decision = La kunveno finiĝis sen ia definitiva decido.

At the conclusion of the meeting = Je la fino de la kunveno

APPEAR

appear en la senco de *seem* = *ŝajni*. Do:

He appears/seems (to be) sensible = Li ŝajnas (esti) prudenta.
The weather appears/seems favourable = La vetero ŝajnas favora.
It appears/seems that... = Ŝajnas, ke...

appear = 1. to appear, become visible, show/turn up (= ekesti, vidiĝi):

Aperi ĉe la pordo/antaŭ la publiko.
Jam aperis la unuaj burĝonoj.

2. to present oneself (= sin prezenti):

Li aperis antaŭ la tribunalo.
Se la demando aperas...

3. to turn out to be in reality (do, la *malo* de *ŝajni*):

Li aperis mensoganto (Z) = He turned out to be a liar.
Esperanto vere aperas kiel sola kandidato por lingvo internacia (Z).

4. to be published (= eldoniĝi)

La libro ĵus aperis. □

FAMA RUSA ESPERANTISTO AŬSTRALIA:

SERYŜEV INNOKENTIJ NIKOLAJEVIĈ

de N. P. STEPANOV

La homo, pri kiu temas, estis Seryŝev Innokentij Nikolajevič. Jen kion mi sukcesis trovi en kelkaj fontoj. Unue, ni tralegu pri li en *Enciklopedio de Esperanto* (Budapeŝto, 1933/1986, p.489):

“*Seriŝev Inocento*, siberiano, ruso; grek-ortodoksa pastro, pedagogo, ‘Esperantisto’. Naskiĝis 15 aŭgusto 1883 en Kudara. De 1906 ĝis 1917 laboris kiel pastro en Siberio, okupis sin multe pri popoloeduko. Dum cara

reĝimo sidis en la malliberejo pro politika akuzo kaj Sovetion li forlasis ‘pro ruĝa despotismo kaj arbitro’. Tri jarojn loĝis en Japanujo, esploris la japanan edukistemon, por kio piede vojaĝis 200 mejlojn. Nun loĝas en Sidney. Esperantisto de 1910. Unu el pioniroj de Esperanto en Siberio. En 1910 faris kune kun sia fratino (Varvara S.) rondvojaĝon tra 13 landoj de Eŭropo per Esperanto. Ĉiam, ĉie kaj ĉiel li propagandis

Esperanton; multaj paroladoj, artikoloj, prop. broŝuroj kaj kursoj. Ĉiuj familianoj estas Esperantistoj. Kunlaboris al *Int. Socia Revuo* kaj aliaj Esperanto-gazetoj. Aperigis 250-paĝan verkon pri *Siberio* (originalaj kaj tradukitaj verkaĵoj), 1914, kaj ducent-paĝajn volumojn de revuo *Oriente*, Harbin, 1925. Ampleksaj originalaj kaj trad. verkoj en manuskripto.

(*Seriŝeva Varvara N.*, sovetiano, rusino, fratino de la antaŭa, instruistino. Aŭtoro de rimarkinda porinfana Esperanto-lernilo *Verda Steleto*, 1926.)”

La dua fonto estas libro de memoraĵoj: Toporov A.M. *Mi Estas Instruisto (rememoroj)*. Moskvo, Detskaja Literatura, 1980, 158p. 0.45 rub. (eldonkvanto 100 000 ekz.) [Ruse.] Sur p.113-116 li tre detale kaj favore skribas pri *Innokentij (Inocento) Seriŝev*. Jen estas elskribaĵoj:

“...Antaŭ mi staris altstatura svelta homo ĉ. 33-jaraĝa kun delikata, inspirita vizaĝo kaj saĝaj helaj okuloj. Li estis kurte tondita, sur kolo havis kolumeton el holanda tolaĵo, sur silka pastro-robo — krizolita steleto, sur ĝi literoj: ‘Esperanto’...Fininte lecionon, li proponis: ‘Vizitu min vespere...Ni interparolu...’

Loĝis la pastro kun edzino (Ekaterina, li nomis ŝin ‘Katjuŝa’) kaj bopatrino. Infanoj mankis. Ni ekparolis tre facile, kaj mi eksciis, ke la pastro en juneco finis elementan lernejon, poste Tomskan Politeknikan Instituton. Li havis bonegan kleron, posedis kvin aŭ ses lingvojn, ludis fortepianon, kantis, multege

legis...

Li multe verkis, pentris bildojn... [Poste Toporov detale rakontas, kiel li esperantistiĝis, sufiĉe rapide ekposedis la lingvon, aniĝis en UEA kaj eĉ abonis ŝanhajan revuon *Voĉo de Popolo*].

...Kiel mi komprenis, la pastro multege laboris, verkis artikolon en peterburga revuo *Sobraj Ĝermoj (Trezvyje Vshody)* aperigis broŝurojn kontraŭ drinkado, librojn pri kooperativo, pri Esperanto — unuvorte, li estis laborulo, sobrulo, tre talenta homo. Kaj mi neniel miriĝis, kiam poste, tuj post la Februara Revolucio, li forĵetis pastro-robojn kaj komencis labori kiel sekretario de la Altaja Kulturkleriga Unio. La lasta eldonis lernolibrojn, librojn kaj revuon *Siberia Tagiĝo (Sibirskij rassvet)* ... Forverurante Barnaŭlon, Seryŝev faris por kamparanoj valoregan donacon — li transdonis al lernejo plejparton de sia biblioteko...

Ankaŭ stranga estas lia posta sorto. Komenciĝis civitana milito, alvenis kolĉakistoj, sed li, juĝante laŭ ĉio, malmulton komprenis. Ĉiuokaze, dum plej maloportuna tempo li forveturis Japanion — por akiri paperon por la kulturkleriga unio. Li forveturis sola, sen edzino, do sekve ne intencis tie resti, tamen okazis tiel, ke li jam ne revenis patrujon. Lia vivo estis plena de misortoj. De esperantistoj el diversaj landoj, kun kiuj mi daŭre korespondis, fojfoje mi eksciis pri verkoj de la homo, ĉiam neatenditaj.

Ekzemple, li aperigis en Esperanto libron *Lando de Samurajoj* pri siaj

vagadoj tra Japanio, kaj ankaŭ pri la eduksistemo de la lando. En angla lingvo, kiun li ankaŭ sciis perfekte, li aperigis gravan albumon pri agantoj de rusa kulturo. Kune kun biografioj de Séĉenov, Méĉenov, Pávlov, Koní, Pleváko, Sikórskij, li enigis en ĝin vivpriskribojn de princino Olga, episkopo Tíĥon Zadónskij, Sankta Sergeo ktp. Multaj el la verkoj de I.N. Seryŝev estas, kiel mi eksciis, en Lenina Biblioteko en Moskvo. [Jes, mi vidis en katalogo la kartetojn kun mencio de la supremenciitaj libroj — N.St.]

Lin mem mi plu ne vidis, spurojn perdis, opiniis, ke li jam delonge mortis. Tamen subite — cetere, ne subite, sed post la flugo de German Tivov [6 aŭgusto 1961. La dua sovetia kosmonaŭto, fama pro sia flugo en la kosmoŝipo Vostok-2] — mi ricevis aerleteron en Esperanto el Sidnejo. De kiu do? De Inocento Seryŝev! Li skribis al mi, ke nur en Aŭstralio li kuniĝis kun sia edzino, tamen poste mortis Katjuŝa, li vivas sola, patrujon memoras kaj ankaŭ ne forgesis pri mi. Ni interkorespondas ĝis nun. [Temas pri la komenco de 1980. Mi menciis ĉi tie, ke A.M. Toporov estis ankaŭ persekutata pro Esperanto, kaj dum dudek jaroj troviĝis en malliberejoj kaj koncentrejoj kaj tiutempe jam loĝis kun sia filo en la urbo Nikolajev, suda urbo en Ukrainio. — N. St.] Innokentij Nikolajevič havas malnovan kutimon numeradi ĉiujn leterojn al siaj gekorespondantoj.

Lastan leteron al mi li markis per numero II 218. En ĝi li skribas, inter alie, ke en la Rusa Instituto de Kolumbia Universitato [en Novjorko, Usono] troviĝas lia aŭtobiografio en kvin volumoj... Li ja traveturis la tutan Eŭropon, tutan Azion, promenis en Londona Hajdparko, estis rikiŝisto en Pekino, stratvendisto en Tokio, trairis kun bastono la tutan Aŭstralion. Ankaŭ skribas li, ke tute certe li multe rakontas en ĝi pri sia amata Siberio, estas en manuskripto ankaŭ ĉapitro pri mi.

Ho, rusaj sortoj! Ĉu ne estas mirindaj la laboremo, vivkapableco kaj energio de la homo! Oni amaras konscii, ke ili estis perditaj por granda scienco..."

Ankaŭ en libro de Ray Ross, *Esperanto en Aŭstralio (1905-1985) (Historio de AEA)*, Brisbano, 1985, p.99 mi ekvidis la nomon "Pastro I. Serišev (FD) 1950-61" en la rubriko Sydney en listo de UEA-delegitoj en Aŭstralio.

Estus tre interese se iuj gesamideanoj en Aŭstralio rakontus iom pli detale pri lia vivo en Aŭstralio, pri liaj sortoj kaj Esperantagado. Tio reciproke pliriĉigus nin kaj, krome, oni eble povus skribi pri nia talenta sampatrujano en nia (loka) gazetaro. Ankaŭ mi vidis aliajn rusdevenajn nomojn kaj familinomojn en la libro de S-ro R. Ross kaj ankaŭ en la *Jarlibro 1991* de UEA — S. Gradussov, N. Levitkin, M. Stanislaus, E. Bantik, kaj multaj aliaj. Kaj ĝenerale estus ankaŭ interese priskribi la vivon de aliaj aŭstralianoj,

devenaj el Rusio/Ruslando. Antaŭ nelonge mi aŭdis per radiostacio Radio Rossii rakonton de iu rusa virino (bedaŭrinde mi ne aŭdis ŝian nomon kaj ne memoras ŝian loĝlokon) — ŝajnas, ke ankaŭ ŝi estis, se ne el Sidnejo, do loĝas ie apud Sidnejo, kaj kvazaŭ tie troviĝas tuta rusa kolonio, kie oni strebas konservi

kaj la rusan lingvon kaj la rusan kulturon. Estus bone priverki ankaŭ iliajn vivon, sorton kaj vivmanierojn. Eble tio helpas aliajn homojn, kiuj povos poste ekkonatiĝi kaj ekamikigi ktp.

[SU-117571 Moscow, ul.26 Bak. komissarov 7-3-78, Stepanov N.P., Rusio.] □

Retrokomente de DOROTHY THRELFALL

Mi aludas al la artikolo de Donald Broadribb en *The Australian Esperantist* Novembro-December 1991, "Niaj propagandajoj". Mi konsentas al ĉiuj liaj argumentoj krom unu. Mi ricevis la mesaĝon ke se Esperantisto ne scipovas flue paroli, li/ŝi ne utilas al nia Esperanto-afero. Se li/ŝi estas kompetenta verkisto aŭ tradukisto, ĉu tio signifas ke scipovo nepre ne estas taksinda?

Kiam mi unue vizitis en Parizo la Sorbonnen en 1938, mi renkontiĝis kun multaj studentoj el la Universitato ĉe Oxford en Anglujo. Tie, ili jam elstudis dum tri jaroj la francan kun escepto de kapablo konversacii. Tio mirigis min ĉar en la Universitato de Okcidenta Aŭstralio studentoj lernis jam de antaŭ multaj jaroj francan paroladon kaj komprenadon. Mi mem dum multaj jaroj instruadis ĝin sed mi bone sciis ke mia parola kapablo iomete mankas. Do mi vizitis la Sorbonnen por

plibonigi mian komprenon kaj parolkapablon de la franca lingvo. Ĉe la Sorbonne mi vizitis la klasojn de la Brita Instituto.

Kompreneble, mi neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto. Sed dudek jarojn poste en 1958 mi renkontis ĝin, eklernis ĝin, sen instruisto ĉar mi ĉiam loĝis en kamparaj vilaĝoj en Okcidenta Aŭstralio pro tio ke mi devis instrui en la tieaj liceoj.

Nun mi revenas al la artikolo de Donald Broadribb: mi interkonsentas kun li, ke en Aŭstralio Esperantistoj tre malofte renkontas lertajn Esperanto-parolantojn. Aldone, plejparte Esperantistoj kiuj lernis la lingvon dum la infaneco forlasas ĝin ĝis emeritiĝo

Mi neniam aŭdis pri Esperanto ĝis kiam mi revenis al Perth antaŭ ĉirkaŭ kvardek jaroj. Mi studadis Esperanton sed mi estis tro maljuna por ĉeesti klasojn kiuj ĉiam okazis nokte. Tamen mi studis Esperanto-lite-

raturon, verkis multajn artikolojn, tradukis kaj eldonigis *Vivo de Gandhi* verkitan de Privat (1980), ankaŭ alian japanan verketon.

Nun, mi multe volus ke Donald komentu pri ĉi tiu ideo: Ĉu estas neeble ke Esperantisto kiu tre bone scipovas verki kaj paroli sian propran lingvon kaj ankoraŭ kiu scipovas verki la Esperantan lingvon traduku verkon el Esperanto en sian propran lingvon? Mi faris tion kiam mi tradukis la personan historion de Senzi Yamagati pri liaj teruraj suferadoj pro la A-bombo en Nagasaki kiam li estis nur dekkvarjara knabo kaj dum multaj jaroj poste, kiam li rakontis la historion en la japana lingvo. Japanaj Esperantistoj tradukis ĝin en Esperanton en 1959 kaj mi tradukis la Esperantan historion en la anglan, kaj eldonigis ĝin.

La eldonistoj diris: "Ni eldonas lian verkon en Esperanta tradukaĵo esperante ke oni legos ĝin en ĉiuj landoj. Tial ni petas ke niaj lertaj Esperantistoj tutmonde traduku ĉi tiun broŝuron en siajn proprajn lingvojn kaj eldonigu ĝin por fortigi la popolan opiniadon kontraŭ nukleaj armiloj". Tio estas unu paŝo al la bela paco, la fina celo de ĉiuj fidelaj Esperantistoj.

Nuntempe en 1992, ĉu la lingva problemo kaj la nuklea milita problemo ne estas pli teruraj kaj minacaj ol iam antaŭe? Laŭ Juĝisto

Enderby, estas almenaŭ 3000 naciaj kaj gentaj lingvoj kiujn ni devas el-lerni antaŭ ol ni ekkomprenos la parolantojn. Kaj se ekekestas centoj kaj miloj da novaj nacioj, gentoj, triboj, ĉiuj konkurantaj al nukleaj armiloj, atom-bomboj, kaj kiam riĉkrimuloj regas nin ŝtele, inside per avido, hipokriteco, kion ni faros? La tasko estas preskaŭ ne venkebla dum hierarkiaj politikaj sistemoj regas la planedon ĉar tio necesigas ke militoj estu senĉesaj.

○ Mia ideo estas: Kuraĝigu la virinojn lerni Esperanton. Faciligu la opor-tunojn studadi en la hejmo. Eĉ se kelkaj virinoj ŝajnas militemaj, ili ne volas ke la infanoj, genepoj, estu mortigitaj, kripligitaj. Kuraĝigu la patrinojn, la avinojn, la praavinojn, la onklojn, la instruistinojn, la monaĥinojn, la vartistinojn, la flegistinojn, la inajn kuracistojn, leĝistojn, politikistojn, ĉiujn inajn partojn de la homaro. Faciligu al ili la studadon de Esperanto, kaj klarigu al ili la kialon.

[Kiam mi skribis "parolantoj" de Esperanto mi celis ĉiujn personojn kapablajn aktive uzi la lingvon, do ankaŭ verkantojn, tradukantojn, kc. Nepre Dorothy estas unu el niaj plej eminentaj kaj kapablaj aŭstraliaj Esperantistoj, kaj multe kontribuis al la diskonigo kaj disuzado de Esperanto. Pri la cetero de ŝia artikolo mi ankaŭ akordas kun ŝi. — DB] □

ARTEMULOJ

Bonvolu ne forgesi nian konkurson por trovi novan kovrildeseĝnon por *La Aŭstralia Esperantisto*. Por detaloj vidu p. 21 de nia jan.-feb. numero.



DIVERSAĴOJ

† Mortis la 27an de decembro 1991 Dr William Solzbacher, en Hawaii, longtempa membro de la Akademio de Esperanto, iama prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, kaj poste membro de la Esperanto-Ligo de Norda Ameriko. D-ro Solzbacher siatempe estis estro de Esperanto-dissendoj de La Voĉo de Usono. □

† En la sama monato, je la 20a, mortis en Francio Profesoro Gaston Waringhien, iama prezidanto de la Akademio de Esperanto, unu el la ĉefaj leksikologoj de Esperanto kaj literaturisto. Kvankam laŭ propra deklaro ateisto, li estis unu el la plej helpaj konsilantoj de via redaktoro dum la eldonado de *Biblia Revuo*, kaj multe kontribuis al lia preparado de nova traduko de la Psalmoj (nur parte eldonita). □

En Albanio aperis numero 1 de *Albana Esperantisto*, en decembro 1991, eldonita de la Albana Esperanto-Ligo. Ĝis la lastatempaj reformoj en Albanio, kontakto kun eksterlandanoj estis oficiale konsiderata kiel ŝtatperfido. Nun la popolo estas libera, sed mono kaj rimedoj mankas. □






Poemojn de la eminenta albana verkisto Aleks Stavre Drenova ("Asdreni"; n. 1872, m. 1942) en Esperanta traduko de Vasil Pistori eldonis en 1991 la Albana Esperanto-Ligo en Tirano. 24paĝa broŝureto. I.a. Asdreni estis aŭtoro de la Albana nacia himno, 1912, aperanta en Esperanta vesto en la poembroŝuro. □


"Mi deziras fondi Esperantolingvan asocion pri la nifologio [scienco pri neidentigitaj flugantaj objektoj = UFO-j]. Mi tre volonte sendos informojn kontraŭ IRK." Pártay Dénes, Kaposvár, Damjanich u. 1/I. 3/2, H-7400 Hungario. □

Cerbumige (sed verŝajne eksplikeble): UEA redaktas kaj presas sian gazeton *Esperanto* en Nederlando, sed ial dissendas ĝin el Anglio. SAT redaktas sian gazeton *Sennaciulo* en Francio, sed presigas ĝin en Nederlando kaj dissendas ĝin el tie. (Cetere, la dissendanto de *Sennaciulo* estas 90jara esperantisto nederlanda, certe unu el niaj plej maljunaj aktivuloj.) □

Odlo Bokserp feris en Usono. "Ĵus mi ricevis mian ekzempleron de la 'Literatura Suplemento'", skribis verkinto en *esperantoUSA*, "kaj ekrimarkis miajn donitaĵojn! Ekposte mi rimarkis ke, Ho Ve! al la 'Kaleŝeto' mankas kapo. Preskaŭ la unuaj 2 (el 5) manuskriptaj paĝoj forflugis kun la preskoboldoj. La

restaĵo estas memstara iasence, tamen la enkonduko ankaŭ valoras. Domaĝe..." Odlo tamen raportas al ni ke al li pagis la redaktoro de *esperantoUSA* nemalgrandan tantiemon — po unu botelon da inko por ĉiu mankinta paĝo.

Odlo ankaŭ feriiis en Francio, laŭ la januara numero de *Sennaciulo*. Post lia triumfo en nia pasintjara julio-aŭgusta numero, en kiu Odlo sukcesis malaperigi la literon ŝ sur pluraj paĝoj, la preskoboldo  e la kompostejo de SAT invitis lin uzi sian talenton en Parizo. Do sur p.8 de la aludita numero de *Sennaciulo* Odlo sukcesoplene anstataŭigis  iun ŝ-on per 7: "la fre7datajn eventojn", "de la 7tato kaj de la socio", "dervi7oj dezirantaj kontroli nian sanktecon aŭ nian profanecon" kc.  ar Odlo planas partopreni la UK-on  ijaran, li revenos al Aŭstralio ne antaŭ la fino de aŭgusto. Ĝis tiam, via redaktoro mem devas plenumi ankaŭ liajn taskojn. 

Norda Prismo, unu el la plej elstaraj literaturaj gazetoj postmilitaj, reaperas. Ĝi estas abonebla pere de la AEA Libro servo, kiu akceptos abonojn ĝis Majo. La prezo por jarabono (4 numeroj) estas A\$19.00. 

Dezirataj Korespondi

Laŭ decido de la AEA/NZEA Kongreso en Sidnejo, Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428 nun prizorgas liston de eksterlandanoj dezirantaj korespondi. La sekvantaj estas nur malgranda parto de la listo. Por pli da adresoj, bonvolu kontakti Betty'n.

Ø Subhash Dixit, National Life & Insurance Co. Ltd, Post Office Box 4332, Kathmandu, Nepalo. 25-jara studento.

Ø Vladimir Melnikov, USSR 193313 Leningrad, ul Kollontaj 21-2kv 78. 33-jara pedagogo. Interesiĝas pri historio, geografio, literaturo.

Ø M'hamed Bettahar, Tizli Mascara 29130 Alĝerio. 29-jara, deziras amikinson. Instruas Esperanton.

Ø Mirosław Mazur, PL-24-211 Ratoszyn Kalonia Kepa Pollando. 28-jara, komencanto, interesiĝas pri literaturo, turismo, arto, historio, fotografio.

Ø Sedbedji Ekoue, B.P. 61296 (Be) Lome Togo Okcidenta Afriko. Lernas tri lingvojn. Interesiĝas pri legado, sporto, turismo.

Ø Korsun Juri, P.Box-7 Shostka-*7 Sumska obl Ukrainjo 245110.

Ø Arun Kumar Bhattacharyya, 151 B.B. Salt Lake City, Calcutta 700064, Hindio.

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562; printed by SNAP, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101, Australia.

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

La Aŭstralia Esperantisto

ARTIKOLOJ:

Krizo en la orienteŭropa Esperanto-movado (Trevor Steele)	3
Ambasadora ruzo (Ralph Harry).....	4
Kion povas fari la ordinara homo por efike protekti la medion? (Wolfgang Gunther). 6	
Fino de perfekta tago (Eddie Hearne).....	9
Deziras korespondi.....	10
Diversaĵoj.....	11
Pri televida kurso de Esperanto (Venezuela Esperanto-Asocio/IEI).....	14
Lingva angulo (Alan Towsey).....	16
"Shall, will, would" (Marcel Leereveld).....	18
Nekrologo: Dulcie Sawkins (Vera Payne)...	20
El la regionoj.....	26
Informiloj de AEA.....	27

SPECIALA NOTO

Nia desegno-konkurso.....	5
---------------------------	---

LIBROJ

<i>Manuskriptoj por bruligo</i> de Ljubomir Trifončovski (rec. Donald Broadribb)	8
<i>Winnie-La-Pu</i> de A.A. Milne (rec. Donald Broadribb).....	13
<i>Ne facilas esti... sloveno en Italio</i> de Anita Perič Altherr (rec. Vera Payne).....	21
Du novaj enciklopediaj verkoj (rec. N.P. Stepanov).....	24



Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2488
Numero 273 Majo-Junio 1992

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.

☎ (09) 574 1307.

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014 & Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne VIC 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Help-kasisto: Dianne Lukes, c/o Post Office, Meringandan QLD 4352.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publika): Ronald Gates, MSF 2350 Wangaring, Kelly's Plains Rd, Armidale NSW 2350.

Prezidanto de la Ekzamen-Komitato: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.

Membrokotizoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ekster Aŭstralazio, abono al *La Aŭstralia Esperantisto* kostas A\$33 (45 ned. gld.) kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de AEA; aŭ al la UEA-konto de la Libroservo de AEA aal-w kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 1 julio.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi vian verkon al ni tajpitan aŭ sur 3½ -colaj diskoj MS-DOS aŭ Macintosh. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

Nia Kovrilo: La desegnon faris Jay Grant (Kvinslando), por nia konkurso. Por detaloj pri la rezultoj de la konkurso, legu paĝon 5.

KRIZO EN LA ORIENTEŬROPA ESPERANTO-MOVADO

de TREVOR STEELE

La grandaj politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo kaŭzis grandan krizon por la Esperanto-movado en tiu parto de la mondo, kie ĝi estas nombre plej forta.

Neniu esperantisto, kun kiu mi parolis, bedaŭras la malaperon de la antaŭaj totalismaj registaroj, kiuj nomis sin "socialismaj". Kaj ĉiuj ĝojas, ke nun eblas vojaĝi al aliaj landoj kaj aĉeti librojn antaŭe malpermesitajn —se oni havas sufiĉe da mono.

Dum multaj jaroj post la Dua Mondmilito nia lingvo oficiale ne rajtis ekzisti oriente de la rivero Odro. Kaj ĝis la fino de tiuj "socialismaj" ŝtatoj necesis nur decido de iu superulo por ree forpreni ĝian ekzistojn. Sed endas diri, ke la esperantistoj lerte ekspluatis la sistemon kaj iom post iom trovis niĉon en la diversnomaj "kulturligoj" de siaj landoj. Kompromisoj necesis — kelkaj esperantistoj spionis kontraŭ aliaj kaj foje necesis traduki ian nelegotan paroladon de iu partiestro. Sed kion fari? Se oni *ne* konsentis al kompromisoj, ne sin cenzuris, oni povis nenion atingi. Sed la movado ricevis financan apogon kaj sidejojn, la ŝtatoj pagis salajrojn al profesiaj esperantistoj kaj eldonis foje valorajn verkojn.

Kaj dank' al unu politikajo, en si mem kondamninda, Esperanto vere proponis ion allogan al civitanoj de la orienteŭropaj ŝtatoj. Ofte tiuj civitanoj ricevis vizon por viziti aliajn (eĉ socialismajn!) ŝtatojn nur, se ili ricevis invitilon el la koncerna(j) lan-

do(j). Kaj esperantistoj estas invitemaj homoj! Per Esperanto, multe pli ol aliaj lingvoj, oni povis esperi vojaĝi.

Necesas aldoni, ke la ekonomia situacio antaŭ la politikaj ŝanĝoj estis pli sekura kaj antaŭvidebla ol nun—eĉ se ĝi ne spronis la laboremon kaj ne riĉigis. La homoj ĝenerale ne streĉe laboris kaj havis tempon por tiaj okupoj, kia Esperanto. Kaj aldonendas, ke la eksaj registaroj pretendis havigi kulturon al ĉiuj civitanoj. Kiaj ajn estu iliaj motivoj, kaj malgraŭ tro ideologia interpreto de kulturo, tiuj reĝimoj penis provizi monon al kulturflegaj grupoj multe pli, ol estas kutime en "okcidentaj" landoj. En tiaj cirkonstancoj ankaŭ nia movado profitis kaj finance kaj kiel agrabla tempopasigilo.

Kaj nun? Mi ne volas malfeliĉigi vin per detaloj, sed el ĉiuj landoj mi ricevis sobrigajn raportojn (krom el Rumanio—tie Esperanto apenaŭ vivis antaŭ la mortigo de Ĉauĉesku). Nun oni aplikas kapitalismajn kriteriojn: se la movado povas pagi la novajn, altajn luprezojn, ĝi rajtas reteni sian sidejon. Pardonu?—Vi ne povas pagi? Bedaŭrinde, sed la tempoj ŝanĝiĝas—Adiaŭ. Ne, ni ne plu disponigos monon aŭ laborlokojn al neprofitigaj grupoj. Eldoni librojn? Hm, ĉu ili amase vendiĝos?

Nun la orienteŭropanoj rajtas vojaĝi sen invitilo—la nova bariero estas financa. Esperanto ne plu rolas tiurilate. Ankaŭ lernado de Esperanto draste malpliigis: oni havas pli urĝajn bezonojn—ekzemple trejniĝi por no-

va laboro. Kaj tiucele estas pli prudente lerni la germanan, foje la francan, sed unualoke la anglan. La angla ŝajnas esti la portanto de la moderna okcidenta kulturo, kaj preskaŭ ĉiuj volas aparteni al tiu usoneca kulturo.

Do kien la movado? La prognozo por la proksima estontaĵo estas ne esperiga. La orientanoj devas nun alfronti la samajn pure materialajn

kriteriojn, kiujn ni "okcidentanoj" bone konas.

Sed realismo ne permesas pesimismo. En posta artikoleto mi skizos manierojn por helpi niajn orientajn samideanojn transponti la krizon.

[Adreso de Trevor Steele ĝis majo-junio:

Trevor Steele (bei Söllner)

Plaussiger Str. 39

D-07050 Leipzig, Germanio.] □

AMBASADORA RUZO de RALPH HARRY

La amikaj tagmanĝoj kun la Ministro kaj lia edzino daŭre ĝojigis la ambasadoron. Lia partnero en la postmanĝaj briĝobroj evidente serioze studis la librojn, kiujn li pruntedonis al ŝi. Ŝi ne tiom timis fari ofertojn. Fakte ŝi komencis ludi eĉ tro kuraĝe. Baldaŭ li devos protekti ŝin kontraŭ la danĝeroj de troa aŭdaco.

Antaŭ la hazardiro de kartoj por decidi la disdononton por la unua ludo, la ambasadoro demandis al sia partnero ĉu ŝi memoras la komencan oferton de 3 en koloro. "Ho, jes", ŝi respondis. "Mi ofertas tri se mi havos bonan seskartan koloron kaj alian eblan trekon, kun ne pli ol duono de honorpoento", kaj ŝi aldonis: "Sed mi esperas, ke hodiaŭ vespere ni povos sukcesi en ŝlemo. Mi studis la signalojn pri asoj laŭ la sistemo Gerber". "Bone", respondis la Ambasadoro, kaj, al la Ministro: "Ĉu vi estas preta, Ministra Moŝto? Via edzino kaj mi intencas vin venki senkomplete!"

La disdonanto por la unua mano

estis la edzino de la Ambasadoro, sidanta oriente. Ŝi pasis, kaj la Ambasadoro, sude, trovis la jenan manon:

- ♣ A, R, F, 8, 7, 6
- ♥ 10, 7, 3
- ♦ 10, 9
- ♠ D, 9

Li ofertis 3 pikojn. La Ministro, okcidente, pasis. Lia partnero, norde, ridetis dufoje kaj diris: "4 trefojn!" Obeante al la konvencio la Ambasadoro, post ol lia edzino pasis, ofertis 4 kerojn, indikante nur unu ason. La Ministredzino hezitis, kuntirante la brovojn, sed fine ŝi diris: "4 pikojn, kaj bonan ŝancon, partnero". Ĉiu pasis, kaj la Ministro ekludis la trefan sepon. La fanto estis:

- ♣ 10, 3, 2
- ♥ A, D, 6
- ♦ A, R, D, F
- ♠ 10, 3, 2

La Ambasadoro ludis la trefan duon el la fanto, kaj kiam lia edzino ludis la trefan ason, li senhezite ludis sian damon. Kiam ŝi daŭrigis la trefojn li ludis la naŭon. Li ĝojegis, kiam la

Ministro ŝanĝis sian atakon kaj ludis la keran duon. Li prenis la trekon per la kera aso en la fanto kaj ludis pikon. Lia edzino ludis la kvinon. Li finesis per la pika fanto, kaj tremetis, kiam la Ministro surmetis la damon. Sed la Ministro daŭrigis per atuto kiun li prenis. Li eltiris la atuton restantan, prenis la kvar superajn karoojn, forĵetante sian trefon, kaj la 4 pikoj estis gajnitaj. La tuta mano estis:

	Nordo	
	♠ 10, 3, 2	
	♥ A, D, 6	
	♦ A, R, D, F	
	♣ 10, 3, 2	
Okcidento		Oriento
♠ D, 9, 4		♠ 5
♥ 2		♥ R, F, 9, 8, 5, 4
♦ 8, 5, 4, 3		♦ 7, 6, 2
♣ R, F, 8, 7, 6,		♣ A, 5, 4
	Sudo	
	♠ A, R, F, 8, 7, 6	
	♥ 10, 7, 3	
	♦ 10, 9	
	♣ D, 9,	

“Bone ludite”, diris la edzino de la Ministro. “Mi ege deziris oferti ŝlemon, ĉar mi ja havis 16 punktojn. Sed kiam mi eltrovis, ke vi havas nur unu ason mi decidis ludi konservative”.

“Konservative?” diris la Ministro, “Se la Ambasadoro ne estus ruze ludinta siajn trefajn damon kaj naŭon vi ne estus sukcesintaj eĉ pri kvar!” La

Ambasadoro ridetis diplomate. “Vi ofertis tre lerte”, li diris. “Mi esperas, ke la venontan fojon vi povos oferti kaj gajni grandan ŝlemon”.

[D-ro Harry kompilis leksikoneton de brig-terminoj. ✉ D-ro Ralph Harry, 319 Bayview Gardens, 39-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2109.] □

EKOLOGIO

La libro *Ekologio, La Alia Verda Movado*, redaktita de Ralph Harry kaj Donald Broadribb, estis dissendita samtempe kiel nia marta numero al ĉiuj niaj membroj. Se iu membro ne ricevis ĝin, tiu bonvolu kontakti la kasiston.

Ekologio, La Alia Verda Movado estis presita por membroj de AEA, kaj dissendita en 350 ekzempleroj, per malavara donaco donita de Ralph Harry. Ni ĉiuj volas elkore danki lin pro lia granda kaj detala prizorgado de la enhavo de la libro kaj la eblo ĝin dissendi. La libro estas grava kontribuo al la “verdaj” movadoj (ambaŭ-signife!) en Aŭstralio. La originala ekzemplero estas nun elĉerpita sed represojn oni povas mendi de la AEA-Libroservo, po \$8.00 □

NIA DESEGNO-KONKURSO



Nin atingis desegnapropoj de ses personoj, por nia konkurso. Sur la kovrilpaĝoj de ĉi tiu kaj la venontaj du numeroj ni uzas la tri plej taŭgajn

desegnojn, kaj poste ni petos niajn legantojn voĉdoni por tiu kiun ili preferas. Kontribuoj kies desegnojn ni tiel provas jam ricevis avizon pri tio.

KONTRIBUO AL DISKUTOJ PRI LA MEDIO:

KION POVAS FARI LA ORDINARA HOMO POR EFIKE PROTEKTI LA MEDION?

de WOLFGANG GUNTHER

Dum la jaro 1989 furoris en Usono la nepre aĉetinda libro *50 Simple Things You Can Do To Save The Earth*¹ en kiu troviĝas la jena konstato:

“Malmultaj el ni povas fari ion por teni survoje milbarelaĵajn petrolŝipojn tra danĝeraj maroj. Ĉiuj el ni ĉiutage povas fari ion por ke malpli da petrolŝipoj estu bezonataj... La 90aj jaroj alportas novan konscion, ke institucioj solaj ne kapablas solvi la problemojn amasiĝantajn el la ŝajne nekonsekvencaj agoj de milionoj da individuoj... Kiomgrade ni estas la fonto de la problemo, tiomgrade ni ankaŭ estas la fonto de ĝia solvo. Do, eku!”

Sekvoj de homa misagado

La vitrodoma efiko; forkonsumo de la ozono, acida pluvo, aerpolucio; polucio de la grundakvo; malapero de la sovaĝa naturo; danĝera rubo; ruboamasiĝoj.

50 paŝoj por savi la teron

A. 28 tre facilaj paŝoj:

1. Haltigu la amaspoŝtaĵojn, reklamojn, ktp. kiuj venas sen peto (en kelkaj landoj oni rajtas postuli la forigon de sia nomo el la koncernaj listoj)!
2. Anstataŭ plastaj sakoj, uzu ŝtofsakon, korbbon, k.s. por butikumi!
3. Plene evitu la polistirenan ŝaŭmon!

4. Distranĉu la plaston, kiu ligas sesopojn da bierskatoloj ktp!

5. Ne malpurigu strandojn kaj plaĝojn; helpu rilate ilian purigadon!

6. Ne disflugigu balonojn!

7. Uzu la povon de la aĉetanto; bojkotu, ekzemple eburon, tinuson...!

8. Uzu la telefonon kaj informiĝu!

9. Elektu novajn mediotauĝajn materialojn por la kuirejo!

10. Informiĝu pri toksaj aldonajoj kaj aĉetu malpli nocajn alternativojn!

11. Uzu puran kemian purigilon-lesivon!

12. Rezignu pri toksaj kaj poluciantaj farboj!

13. Rezignu pri ozon-produktiloj, kaj ozon-detruiloj!

14. Ne uzu insekticidajn kolzonojn por viaj dombestoj!

15. Prefere uzu reŝargeblajn bateriojn, kaj reciklu ĉiujn bateriojn!

16. Ĉu via hejma aparataro funkcias efike?

17. Evitu nenecesan hejtadon!

18. Alĝustigu la hejtilon (temperaturmezurilo, izolado, sensedimentigo)!

19. Ŝparu energion per disciplina uzo de la lumo kaj uzu modernajn neonampolojn!

20. Ĉu la aŭto funkcias kiom eble plej efike? Ĉu vi kontrolas la ellasajojn? Ĉu vi veturas ŝpareme?
21. Elektu la ĝustan benzinon!
22. Ĉu la pneŭoj estas la bezonata tipo, alĝustigitaj, reciklitaj?
23. Nepre reciklu vian motoroleon!
24. Ĉu vi uzas fluantan akvon sen-pense kaj senbezone?
25. Enigante aeron en la kranojn, malpliigu la elfluon de la akvo!
26. Malpliigu la akvokvanton de via necesejo per enmetado de ekzemple briko en la akvujojn!²
27. Uzu duŝsprucigilon, kiu ne tralastas tiom da akvo!
28. Tondu la gazonon alta kaj akvumu ĝin ŝpareme dum la nokto! Rezignu pri la uzo de kemiaj herbicidoj, insekticidoj, ktp.!

B. 14 pli penigaj paŝoj:

29. Uzu paperon avare, reciklitan kiam ajn eblas, kaj organizu kolektadon kaj recikladon!
30. Reciklu vitron, eĉ se vi mem devas organizi la recikladon!
31. Nepre reciklu aluminion: skatolojn, foliojn, konstrupartojn, ktp.!
32. Nepre reciklu aliajn materialojn (metalojn, vakspaperon, ktp.)!
33. Preciklu, t.e. "antaŭ-reciklu": reduktu rubon per via aĉetopovo (ekz. elektu bio-redukteblajn materialojn, evitu tro da pakajoj!)
34. Utiligu ŝtofvindotukojn!³
35. Evitu produkti danĝerajn rubaĵojn: uzu alternativojn kiam eblas,

forigu aŭ prefere reciklu la danĝeran rubon!

36. Izolu⁴ konsekvence vian loĝejon (murojn, plafonojn, plankojn, fenestrojn, pordojn, ktp.)!

37. Ekologiigu vian laborejon!

38. Fondu pendolveturan komunajon por dividi aŭtojn⁵ kaj subtenu la publikan transporton!

39. Konstruu rezervejeton por plantoj kaj bestoj en via ĝardeno!

40. Uzu naturajn rimedojn kontraŭ insektoj kaj trudherboj!

41. Plantu arbojn, eventuale grupe kun aliaj homoj!

42. Helpu protekti la tropikajn arbarojn: subtenu la koncernajn organizaĵojn, pripensu alternativojn por tropika ligno!

C. 8 sindonaj paŝoj:

43. Kompoŝtigu vian bio-rubon aŭ uzu kompoŝtcentralon!

44. Kulturu aridorezistajn kaj akvo-konservajn plantojn!

45. Instalujon por reuzi akvon!

46. Manĝu malpli da viando (ekzemple: produkti unu pladon da kokinaĵo bezonas preskaŭ 1500 litrojn da akvo)!

47. Kiam eblas, ne uzu la aŭton!

48. Iniciatu recikloprogramon! Kvantam precikli (vidu supre) estas eĉ pli bone, recikli estas pli bone ol forbruligi aŭ deponi rubaĵojn.

49. Restu engaĝita: daŭre informiĝu, havu la kuragecon agi individue kaj kolektive!

50. Informu aliajn kaj konsciigu ilin pri la medio!

“Konservado do ne signifas ‘frosti en la mallumo’, kiel diris Ronald Reagan. Konservado povas esti efektivigata per simplaj, ekonomiaj paŝoj kaj rimedoj, kiuj postulas malmultajn ŝanĝojn en la vivostilo. Por homoj, kiuj volas savi la Teron tio ja estas bona novaĵo!”

[Represita el *Monato*, Marto 1992.]

¹Earthworks Press, Berkeley CA, 1989.

²[Ĉi tiun rimedon malrekomendas la Akvo- kaj plumbilaŭtoritatuloj, kiuj diras ke ĝi misfunkciigas la aparaton. Ili rekomendas ke oni uzu aparaton kiu havas du aŭ tri akvokvanto-reguligilojn.—Red.]

³[Vindotukoj = nappies]

⁴[Izolu = insulate]

⁵["Set up a share the ride system"] □

ALVOKO

Propralingvaj apartaĵoj (“idiotismoj”) konsistigas en la internacia lingvo seriozan danĝeron, se ni volas gardi la internaciecan, neŭtralan karakteron de la lingvo.

Internaciaj lernolibroj devas atentigi pri tiuj influoj kaj danĝeroj, kiuj devas troviĝi ankaŭ en internacia metodologia konsilaro. Tial mi celas verki studon pri la etnolingvaj influoj en Esperanto, kaj lanĉas alvokon al interesitaj fakuloj en ĉiuj landoj por ricevi respondon al jenaj demandoj:

1. Ĉu ekzistas specifaj influoj de via lingvo en la lernado kaj uzo de Esperanto (akcento, prononco,

vort- kaj frazkonstruo, ktp)?

2. Kiajn apartaĵojn vi konstatas ĉe alilandaj esperantistoj laŭlingve?

3. Kiuj estas la malfacilaĵoj kiujn spertas uzantoj de via lingvo por lerni kaj regi Esperanton?

4. Ĉu ekzistas artikoloj, studoj, disertacioj pri tiuj problemoj rilate al via lingvo? Se jes, bonvolu komuniki ilin al mi (eventualajn kostojn mi volonte repagos). Mi anticipe dankas pro via kunlaboro.

Edward Symoens,

Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout, Belgio. □



MANUSKRIPTOJ POR BRULIGO

de Ljubomir Trifonĉovski. Sofio:Pres-Esperanto, 1992. 32 paĝetoj. Broŝurita. Speciale mendenda, verŝajne havebla ĉe UEA.

Efektive ne bruligindaĵo sed aro da malgrandaj juveloj literaturaj. La ĉefverko estas delikata poezia drameto “BALADO PRI LA LUNO KAJ LA CERVO” kiun ne ignoru la kompilonto de dua eldono de *Nova Esperanta Krestomatio*. Ankaŭ rimarkinda estas ironia “pup teatraĵo por la plej etaj infanoj” kun la titolo “DU KOKIDOJ KVERELADIS”. Klopodu havigi ĉi tiun broŝureton al vi, vi ne bedaŭros. —D.B.

FINO DE PERFEKTA TAGO de EDDIE HEARNE

Mi ne ĉesis labori ĝis mi estis 70jara. Tiam mi trovis tempon por fari pli ol miajn arbar-marŝojn kun mia klubo, kaj marŝojn kun mia edzino, kiu ankaŭ marŝis kun sia virina klubo. Fojfoje mi preparis mian marŝpakon kaj eliris sola per trajno aŭ per buso, eble 50 mejlojn, al montoj. Jen estas pensoj pri iu vespero, tute sola kaj tute feliĉa—

La tago estis perfekta, plaĉa sunbrilo tamen fojfoje plezuriga eŭkaliptodora venteto. Ĉiu mejlo tra la arbaro estis plena de intereso. Puncaj Rozel-papagoj ofte traflugas, kelkfoje mi vidas ilin manĝi sur la tero sed ili suprenflugas subite kiam mi alvenas, kolorplena vidaĵo. Ankaŭ mi vidas grizan Ventumilvostulon flirti antaŭ mi, ŝajne por kapti insektojn kiujn mi maltrankviligas pro mia ĉeesto. Brulruĝa objekto vidiĝas. Estas ruĝa Rubekolo. Kiel la Ventumilvostulo, ĝi ofte lasas min veni tre apuden, antaŭ ol ĝi forflugas. Sed ĝi nur flugas mallongan distancon, kaj ofte ripetas tion, ĝis ĝi ŝajne venas al la fino de sia teritorio. Lia malpli brila edzino estas pli retirema, kaj mi nur kelkokaze vidas ŝin inter la arbustoj. Mi aŭdas la krakon de Vipobirdo, tre laŭtan kaj klaran, en filika valo. Mi vidas Lirvostulojn, kiuj tiel bone imitas aliajn birdojn, ankaŭ homdevenajn sonojn, kiel de segilo aŭ hakilo. Mi maltrankviligas unu kiu kurflugas kun sia alarmvoko "viz-viz!". Unu aspektas tre ridinda kiam mi alvenas. Maldekstre estas altakruta rokmuro kaj dekstre

estas alta densa kreskaĵo. La Vipo-birdo svinge kuras laŭlonge la vojeton, kiel koko forkuranta antaŭ hakilo. Dum mia vivo mi ofte havis oportunon kviete marŝi ĝis tre proksime de Lirvostuloj kaj vidi la gracian etendon de la plumoj de la belega birdo. La vibrantaj delikataj plumoj estas mirinda vidaĵo. Precipe kiam la nuboj estas malaltaj, la glora kanto de tiu tute neordinara birdo estas io, kion mi neniam forgesos. Mi ĝojas ke mi ofte povis konduki miajn edzinon kaj filinon por ĉeesti tiajn koncertojn.

Nun, post longa tago mi venis al unu el la tendlokoj, kiujn mi konis, alte en la montoj—mi deflankiĝis de la vojeto al valetio. Antaŭ multaj jaroj oni faris digon trans la etan valon. Arbetoj, filikoj ktp. ekkreskis ĉirkaŭe kaj lageto spegulis la arbojn. Akvo murmuris ĉe unu fino de la digo. Mi demetis mian pakadon kaj konstruis mian tendeton, kolektis foliojn kaj filikojn por mia lito kaj disetendis mian dormsakon. Tiam mi konstruis etan fajron ĉe la rando de la digo, surpendigis mian bilipoton por la tre necesa teo. Ĉu estas pli bela trinko ol teo farita el monta akvo, kiam oni marŝis dum tuta tago?

Mi sidas tre proksime al la akvo kaj la fajro dum mi manĝas, rigardante trans la akvon. Io vibras en la aero super la akvo, estas la varmecondoj de mia fajro. Sur la akvo estas spegolataj eŭkaliptoj, filikoj kaj foje nubo, kun la blua ĉielo. Mi rimarkas brueton "plop!", estas ranido venanta al la surfaco por aero. Mi rimarkas multajn en

la akvo kaj ofte aŭdas la "plop!". Mi konjektas ke ili provas siajn kreskantajn pulmojn, plu faras tion dum la tago pasas. Kelkaj birdoj flirtas en la arboj kvazaŭ ili ne povas decidi kie ripozi por la nokto. Multaj ranoj, ĉe la junkoj, plenigas la aeron per siaj variantaj notoj. Mi vekigaĝas de tiu bela sonĝo por prepari mian teon, ĝi estas "nektaro por la Dioj". La zorgoj de la tiel nomata civilizacio estas tute for.

Pli malfrue mi iras al mia tendo, enirigas miajn lacajn kruojn en la dormsakon, metas mian kapon sur kusenon faritan per miaj botoj kaj vestaĵoj. Mallaboreme pensante pri tre interesa tago kaj pri kien mi iros morgaŭ, mi grade iras al la lando de dormo kun la funebraj krioj de la noktbirdoj. Dormo, meritoplana dormo. □

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

/ Kabindra Raj Shakyra, PO Box 282, Kathmandu, Nepalo. Deziras gazetojn, vortaron Esperantan-Anglan.

/ Sushil Upadhyaya, C/o Mrs. Medha Upadhyaya, National Computer Centre, PO Box 1573, Kathmandu, Nepalo. Nova lernanto.

/ Lappalainen Tapani Kralarotikyla, SF-37500 Lempaala, Finnlando. Fraŭlo 33jara. Scipovas ses lingvojn. Deziras korespondantaron.

/ Kestas Kruzinauskas, Birutes Kruzinauskas, 4270 Vickauiskis, Litovio. Fraŭlo.

/ Phorn Hongly, 21 Ez Rue 140 Group 62 Section Monorom Khan 7 Makhra Phnom Penh, Kamboĝo. 19jara.

/ Jiri Pastor, Khajku 2968, 73801 Frydek Mister, Ĉeĥoslovakio. Amas librojn; librobindas. □

"ESPERANTO INSURRECTIONISTS"

Tiel nomiĝas grupo da 150 anoj de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. La Guild of Undergraduates (studentasocio) donacis al ili \$1000 por T-ĉemizoj portantaj la vorton "Esperanto". La grupo filiigis al ELOA kaj AEA.

[El *la Nigra Cigno* majo 1992.]



DIVERSAĴOJ

● *Ĉu legomoj aŭ ĉarpentado?* En la populara TV-serio "What's Cooking" (kanalo 10, 11 marto 1992) la fama franca kuiristo Gabriel Gaté instruis la preparadon de fritita legomaĵo. Li informis sian helpantinnon ke ŝi devas "turn the vegetables". Perpleksa, ĉar ankoraŭ nenio estis fritata, ŝi staris senkomprena do post kelka atendo li deklaris ke li instruos al ŝi kiel tion fari. Ankoraŭ senkomprena, ŝi staris cerbumante dum li paroladis pri "turning the vegetables" kvankam ankoraŭ nenio kuirigās kaj li nur plu tranĉas karotojn. Fine li decidis ne plu paroli pri la tasko al sia evidente "stulta" helpanto.—Kio efektive okazis? En la franca lingvo la verbo "tourner", kiu sonas identa al la angla "to turn", signifas "formigi, ĉizi", kaj en kuirado ĝi signifas tranĉi la legomojn! Bedaŭrinde ĉi tiu lingva "falsa amiko" faris veran malamikon pro tiu miskompreno. [Iama, jam plene arkaika, senco simila por la angla verbo restas en nia esprimo "joiner and turner" (artikisto kaj tornisto).]

● *El Ukrainio venas nova gazeto: Voĉo el Ukrainio.* La ekonomia kaj socia kazo sekvinta la kolapson de la iama USSR ankoraŭ kaozigas la esperantistan agadon en la nova KŜŜ (Komonvelto de Sendependaj Ŝtatoj). Malnovaj Esperantaj gazetoj ekmalaperas, novaj ekaperas efemere—kelkaj eble daŭre? En decembro 1991 aperis numero 1 de *Voĉo de Ukrainio*, 20p., ilustrita, tre bone preparita kaj prezentita gazeto kun varia enhavo tre

leginda. Adreso: D. Cibulevskij, Abonkesto 9307, 310003 Ĥarkovo 3, Ukrainio. Abonprezo por 1992: 25 nederlandaj guldenoj (≈A\$20) pagenda al ĝia konto ĉe UEA kodo "cibuj", kun samtempa avizo al la eldonisto.

● *Simpozio: Pacifiko, Lingvo, Kulturo, Kooperado* [t.e. kunlaborado—Red.] okazas la 22-29 majo 1992, okaze de la 100-jariĝo de la Esperanto-Societo Pacifiko en Vladivostok. Domaĝe ni ne ricevis informon pri ĝi pli frue por bontempa aperigo. Tamen se iu povos, lastminute, partopreni, kontaktu Esperanto-Societon Pacifiko (S-ro Aleksandr Titajev, prezidanto), 90 Okeanskij Prospekt, 690002 Vladivostok Rusio.

● *Ĉu vi aŭ via grupo posedas la ludon Mozaiko?* Ĝi similas la Anglalingvan ludon Scrabble sed la literoj estas laŭ la Esperanta alfabeto. Ĝi venas de la Tokia Esperanto-Kooperativo kaj estas aĉetebla ĉe la AEA-Libroservo je \$13.50. Ĉiujara internacia konkurso estas organizata de la Tokia Kooperativo, kun premioj por la plej sukcesaj gajnintoj. [El *Telopeco*.]

● *"Novuloj"* (*Ligo de junaj kaj mezaĝaj Aŭstraliaj Esperantistoj*) estas fondita kun 17 anoj tra Aŭstralio. Ilian bultenon redaktos Philippa Maddern, 26/81 King William Street, Bayswater WA 6053. Ĝi aperos monate, abonprezo: \$15 por salajruloj, \$10 por nesalajruloj. [El *La Nigra Cigno* Marto 1992.]

● *Pro la iometa kazo rilate al la Premio Einihoviĉi*, Dianne Lukes estas elektita kunordigi la aktivecon pri tiu premio

tra Aŭstralio. Detalojn bonvolu peti de ŝi (✉c/o PO, Meringandan Qld 4352).

● *La 5a Pacifika Kongreso de Esperanto* okazos en Qindao, Ĉinio, la 17-22 aŭgusto. La Libroservo de AEA estas oficiala peranto. La aliĝo kostas ≈A\$85 (ĉi tiu kaj aliaj prezoj en aŭstraliaj dolaroj iom variadas pro la ŝanĝiganta kurzo de la aŭstralia dolaro). Loĝkostoj estas inter ≈A\$630-A\$1200 depende de la ĉambro, kaj inkludas ankaŭ manĝojn, enurban transportadon, dumkongresajn ekskursojn kc. Multaj diversaj antaŭ- kaj postekskursoj ankaŭ eblas, kun longo inter 6-14 tagoj, kaj estas aparte pagendaj. Mendoj kaj pago devas atingi Ĉinion antaŭ 30 junio, do se vi planas partopreni, tuj kontaktu la AEA-Libroservon.

● *Doktoro John Mills*, redaktoro de *La Nigra Cigno* eldonata de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio—kaj vicprezidanto de tiu Ligo—transloĝiĝis al 28 Kerswell Way, Warnbro WA 6169. Bonvolu korekti lian adreson en la nova *AEA-Adresaro*.

● *Bonvolu korekti* en la marta numero de *TAE*: la verkinto de la nekrologo pri Katha Schwerin estis Profesoro Robertson, ne "Robinson". La redaktoro pardonpetas pro la misuzo de la †-signo apud la nomoj de S-ino Schwerin kaj Profesoro Waringhien. S-ino Schwerin estis juda, Profesoro Waringhien ateisto.

● *Ankaŭ bonvolu korekti* en la Kongresraporto aperinta en nia marta numero: p.5, maldekstra kolumno, malsupre, la teksto devas diri "La Brisbana Kantgrupo, kune kun Romana de Vries, Eileen Olsen kaj Philippa Maddern prezentis du kantojn: 'Paca Kanto' kaj 'Vera Fratara'. La Brisbana

grupo prezentis tri kantojn el la muzikaĵo *Hair* ('Haroj') 'Haroj'..." Ankaŭ en la kongresraporto estis el-lasita la nomo de Margaret Chaldecott inter la LKK-anoj.

● *Krome, en la sama Kongresraporto* estis misliterumitaj la nomoj de Bess Scott kaj Kitty Gassner. Ni pardonpetas ankaŭ al ili.

● *Nia fore disvaganta prezidinto Trevor Steele* plu ekaperas neatendite. Laŭ *Moskva Gazeto* dum la konferenco Baltaj Esperanto-Tagoj, en ĉi ties Somera Universitato, Trevor prelegis pri ekologio. La BET okazis en la urbo Tartu (Estonio), je nemenciita dato.

● *Ankoraŭ alia nova Esperanta gazeto estas menciinda*: La Germana gazeto *Esperanto aktuell* nun aperas okfoje jare po kvarfoje German- kaj Esperant-lingve. La Esperantlingva serio estas abonebla sen la Germanlingva, je reduktita prezo. Ĝi enhavas bone elektitajn artikolojn kaj informojn kiuj interesas ankaŭ Aŭstralianojn, estas bonaspekte prezentata, kaj ni rekomendas abonadon. La Esperanta serio aboneblas je 20 Germanaj Markoj (≈A\$16), mendu de la Germana Esperanto-Asocio, Lambertstr. 12, D-W-6430 Bad Hersfeld, Germanio.

● *Nova dusemajna gazeto Eventoj komencis aperi en marto*. Deklarate esti "Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado", ĝi estas eldonata en Hungario. La unuaj numeroj estas tre bone redaktitaj, bonaspektaj, kaj informoplenaj. La redakcio anoncis planon ĉerpi interesajn artikolojn el ĉ. 120 Esperantaj gazetoj, kiel ankaŭ aperigi originalajn verkojn pensinstigajn. Abono por unu jaro kostas 49 Nederlandajn guldenojn (≈A\$40).

Mendu per internacia poŝtmandato sendenda kun via adreso al Eventoj, H-1675 Budapeŝt, pk 87, Hungario. Vi povas ankaŭ mendi pere de UEA (kontokodo ell-s) kun samtempa atentigo al la redakcio de *Eventoj* pri via mendo.

● *Language Expo Australia* estas la nomo de la unua ĉiujara kvartaga prilingva ekspozicio Aŭstralia, okazonta en Melburno 4-7 novembro 1992. Ĝin okazigos la National Languages Institute of Australia, kaj estos organizita per subteno de la federala registaro Aŭstralia. Inter ĝiaj fundamentaj celoj: La Angla kaj malanalfabeteco por ĉiuj; Subteno de la Aborigenoj kaj la Insulanoj de Torres Strait; Lingvo alia ol la Angla por ĉiuj; Egalrajtaj kaj disvastigitaj lingvoservoj. AEA kaj Aŭstraliaj regionaj Esperanto-grupoj

intencas partopreni la ekspozicion.

● *La 79a Kongreso de Japanaj Esperantistoj* okazos 29-30 aŭgusto en Matusima apud Sendai (350 km norde de Tokio). Por detaloj skribu al la Organiza Komitato, 980-91 Sendai, P.O.Kesto 120, Japanio.

● *Nia amata kunlaboranto Odlo Bokserp, nun ferianta en Eŭropo, helpas redakciojn laŭeble.* Lastatempe li helpis la novan redaktoron de la TEJO-gazeto *Kontakto*, István Ertl. Odlo sukcesis presigi la saman artikolon dufoje en la sama numero, sub du titoloj—"Infanoj en gasmaskoj" kaj "De Bagdad al Madrid". Gratulojn, Odlo! Odlo ankaŭ forviŝis ĉiun mencion pri TEJO el la tuta gazeto—kvankam Ertl sukcesis reenŝovi ĝin en reklameton sur la 23a paĝo. □



WINNIE-LA-PU EN ESPERANTO

recenzas DONALD BROADRIBB

Winnie-La-Pu, de A.A. Milne, tr. Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin. Ilustrita de Ernest H. Shepard. Red., enkonduko, kaj vortareto de Humphrey Tonkin. 2a eldono. Rotterdam, UEA, 1992. 164p. Tolbindita. Prezo: \$23.00, de la AEA Libroservo.

Kiel recenzi mondfaman kaj tutmonde amatan libron por infanoj junaj kaj maljunaj? Mallonge mi diru: ĉi tiu versio de *Winnie-La-Pu* estas egale ĉarma laŭ enhavo kaj aspekto kiel la originala angla eldono. Ĝi okupas, do, tre honorindan pozicion en la Esperanta porinfana literaturo.

Interesaj kaj nekutimaj en la libro estas la anglalingvaj partoj. Ŝajne oni

celis ke la libron uzu lernejanoj kiel parton de kurso. Antaŭ la Esperantlingvaj rakontoj mem estas konciza prezento en la angla lingvo de la gramatiko de Esperanto. Post la rakontoj estas 15-paĝa vortareto Esperanta-Angla kun ĉiuj vortoj uzitaj en la rakontoj. Negrave ĉu vi estas infano, kaj negrave ĉu vi studas en kurso, tio estas granda helpo por komencantoj kaj progresantoj en la lernado de Esperanto, ĉar eblas facile, rapide kaj fideble serĉi ĉiun nekonatan vorton kaj tiel ĝui la rakontojn.

La vortludoj kaj poeziaĵoj de Pu estas laŭdeginde transdonitaj en la Esperanta traduko. □

PRI TELEVIDA KURSO DE ESPERANTO Propono de la **VENEZUELA ESPERANTO ASOCIO**

[De kelka tempo estas diskutata plano por pretigi per internacia kunlaborado televid-filmon pri Esperanto. Ĉisube sekvas teksto, iomete mallongigita, de J.E. Bachrich, ĝenerala sekretario de la Venezuela Esperanto-Asocio.]



Ni daŭre kredas, ke bonkvalita TV-kurso sukcesus en multaj landoj instrui Esperanton amase. Ni konscias, ke ne ĉie eblus havi senpagan tempon por la disendo de tiu kurso, speciale ne en komercaj televidstacioj. Tamen, en la landoj kie ekzistas ŝtate subvenciataj kulturaj TV-stacioj eblus, per pena kaj fortostreĉa laboro, konvinki tiujn staciojn disvidigi pli-malpli 20-lecionon (po proks. 20-25 minutoj) kurson.

Laŭ nia opinio, la kolektado de US\$80 000 da kapitalo estus necesa—malfacila sed realigebla tasko. Certe ne sufiĉus seka alvoko pere de kelkaj revuoj. Estas bezonata tutmonda vendokampanjo en ĉiuj esperantaj informiloj kaj informejoj dum unu aŭ du jaroj. Oni devas klarigi al la esperantoparolanta publiko la projekton kaj la profundan ŝanĝon kiun ĝi povas okazigi al nia ŝatata sed stagnanta movado. Ne forgesu, tiu kurso ne nur taŭgus por amasa TV-instruado, sed ankaŭ por anstataŭigi la multajn nebonkvalitajn kursojn kiujn oni organizas tra la tuta mondo kun ne trobone preparitaj instruistoj. Ĝi estus kompleta kurso, ne nur "helpilo". La kampanjo por la monrimedoj devas esti intensa kaj komuna entrepreno de UEA, ILEI, SAT kaj aliaj gravaj Esperanto-organizaĵoj, kun

ĉiumonataj artikoloj pri la projekto el diversaj vidpunktoj, kaj ĉiam substrekante la esperatan tutmondan rezulton. Devas esti vera varbkampanjo, kun nereakta reklamado, kaj eventuale la plej gravaj mecenatoj devus esti kontaktotaj persone. Kvankam la kolektado de la bezonata monsumo devus komenciĝi tuj, la vera kampanjo por la kontribuajoj povas komenciĝi nur kiam oni havas seriozan planon kun taŭga kaj aprobita kursmaterialo, detala buĝeto, strukturo, estroj de la entrepreno, ktp.

La ĝenerala sekretario de la Venezuela Esperanto-Asocio, Profesoro J.E. Bachrich, oficiale informas, ke li estas preta aĉeti por US\$20 000 la unuajn akciojn de la internacia kompanio proponata de S-ro Roman Dobrzyński [vicprezidanto de UEA kaj iniciatinto de la projekto] kiel komenca kapitalo por la TV-kurso-projekto.

Ni kredas ke la [proponitaj] provoj kiujn povus fari S-roj Günther Becker [honora prezidanto de TEJO] en Germanujo aŭ/kaj Sointu Taranto en Finnlando devas esti esplorataj. Sendube tiuj provoj kaj spertoj estos multvaloraj kaj helpos al ni ege en la definitiva filmado aŭ muntado de profesia TV-kursbendo (samopinias ankaŭ S-ro MacGill [prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Komisiito por Internaciaj Ekzamenoj de UEA]).

Ni kredas ke estas reala ebleco kolekti la bezonatan sumon por la TV-kurso kun sufiĉaj lecionoj por instrui Esperanton sur baza sed kompleta



WINDOW ON THE WORLD

University of Hartford, Connecticut, USA: Due to the outstanding success of the University Esperanto Summer School last year, this northern summer there will again be a University accredited Summer School, July 13-18 1992. Courses will be offered on three levels: Beginning, Intermediate, and Advanced. Course lecturers will be Prof. John C. Wells, a renowned linguist from the University of London, Prof. Duncan Charters, from Principia College, Prof. Humphrey Tonkin, president of the University of Hartford, and Prof. Jane Edwards, professor of English literature and sociology at the University of Hartford. Course cost: US\$220, housing US\$85.00. Details, in English, from Mrs Hilda Grossman, Director of Summer Programs, University of Hartford, West Hartford CT 06117, USA.

"Welcome to the Second African Esperanto Congress" was the wording on the sign at Cotonou Airport, Benin, December 28-30, 1991. Surprisingly, Esperanto has been very slow in making an impact on Africa (nearly a century, in fact). The Congress and its venue proved quite a culture shock to the 17 Europeans participating. The central problem for Esperanto in the African countries is similar to that in the rest of the "third world", a lack of textbooks and reading material, with no money to pay for their publication, so that they must rely on gifts of books and journals from the wealthier parts of the globe.

The fourth Zamenhof Prize for International Understanding was presented on December 13, 1991, to Sir Brian Urquhart, Assistant Secretary General of the UN 1974-1986. He has worked for the UN since its founding in 1945, and was personal assistant to its first Secretary General, Trygve Lee, as well as author of a biography of Dag Hammarskjöld, the second Secretary General of the UN. The Zamenhof prize is named in honour of Dr L.L. Zamenhof, the initiator of Esperanto. It is presented by the Universala Esperanto-Asocio in recognition of and support for persons who have notably contributed to international understanding and communication. Previous recipients have been Robert Mueller, one-time Assistant Secretary General of the UN, Amadou Mahtar M'Bow, one-time Secretary General of UNESCO, and James P. Grant, Director General of UNICEF.

Comparative linguistics: PhD theses on Esperanto are nothing new. But a recent thesis on a *Study of the Morphological Contrasts of Korean and Esperanto*, [morphology is the nature and construction of words] presented at Konkuk University is a first for that country and language.

It has often been observed that although Esperanto vocabulary is primarily taken from the European languages, its grammar is quite unique.

Winnie-La-Pu is the title of one of the most beloved of children's stories in its Esperanto guise. Republished in its second edition earlier this year, in a sturdy cloth bound edition, by the *Universala Esperanto-Asocio*, it retains all the original Ernest Shepard drawings. You might like to try out one of Pooh Bear's hums on your children:

*Kiel dolĉe esti Nubo
Kiu flosas en la Bluo!
Ĉiam laŭte kantas nubo:
Tio estas ekster dubo.*

*Kiel dolĉe esti Nubo,
Kiu flosas en la Bluo!"
Li plenplenas je fiero,
Ke li flosas en l'aero.*

Or of course that magnificent hum in Pooh Bear language:

*Tra-la-la, tra-la-la,
Tra-la-la, tra-la-la,
Ram-tam-tidi-lam-tam
Tidi-lidi, tidi-lidi
Tidi-lidi, tidi-lidi
Ram-tam-tam-tidi-tam.*

Whichever hum you like best, this book would make a beautiful present for your favourite child. It's available from the Australian Esperanto Association Book Service, PO Box 230, Matraville NSW 2036, at \$23.00 plus postage.

A literacy program in *Togoland* for six months in 1993 is to be conducted by the Esperantist youth organisation TEJO in conjunction with the Coordinating Committee of the International Volunteer Service. Fifty children aged 11-14 will participate in the project. They will be country kids who, as part of a wider project, will also study their own language and other basic subjects. Two hours daily, five days a week, they will be learning to read and write Esperanto. It is hoped that by the end of the project they will have greater self-confidence, understand a bit about the outside world, be more accepting of other ethnic peoples, and, in particular, be motivated to continue study.

A parallel "control" group will also be organised without the teaching of Esperanto. It is conjectured that the results will show that the children studying Esperanto will not only gain a better grasp of their own

language, but also be more inter-ethnically minded.

Details (in Esperanto) from Sabira Ståhlberg, Baggbölevägen 9 A 3, SF-00630 Helsingfors, Finland.

[From the UEA journal *Esperanto*, Feb. 1992]

In China, 9-15 May this year, the Beijing International Symposium on the Application of Esperanto is being held by the Beijing Esperanto Association in collaboration with the Chinese National UNESCO Committee and other organisations. Apart from working sessions there will also be provision for excursions and sightseeing.

[From the UEA journal *Esperanto*, Feb. 1992]

THE BASICS OF ESPERANTO

It is often asked what keeps the Esperanto language from splitting into dialects, and to what do Esperantists appeal if they are unsure of some point of grammar, vocabulary or meaning.

The short answer is the book *Fundamento de Esperanto* ("Basics of Esperanto"). Its nature and history are important for an understanding of what makes Esperanto what it is.

The Polish ophthalmologist Ludovic Lazarus Zamenhof (usually called L.L. Zamenhof, to make the name less of a mouthful) published the first booklet on Esperanto in 1887. This was published in Russian, Polish, French and German. A series of other booklets and publications followed, and for almost twenty years these were the primary reference literature on Esperanto. By 1905 it had become apparent that there was a need for a single book which would set out the basics of Esperanto and serve as a standard upon which the language could develop and evolve.

For this purpose Zamenhof collected together three documents from his various books and publications, giving the compilation the title of *Fundamento de Esperanto*. It was adopted by the first world-wide general congress of Esperantists (Universala Kongreso de Esperanto), in 1905, as the formal basis of Esperanto.

The *Fundamento de Esperanto*, after a short Introduction, contains a very brief sketch of the grammar of Esperanto, a series of 42 exercises ("Ekzercaro") which show how the grammar is to be applied, and a basic vocabulary ("Universala Vortaro") with Esperanto words defined in French, English, German, Russian and Polish. The total basic Esperanto vocabulary given in the *Fundamento de Esperanto* amounts to 2759 terms.

The same 1905 Congress also approved the creation of a Language Committee (Lingva Komitato) to review the development of the language. This Committee, now called the Academy of Esperanto (Akademio de Esperanto)

has the authority to publish supplements to the *Fundamento de Esperanto* when, in its view, a new item of vocabulary has become so frequent in Esperanto usage as to be judged "standard" Esperanto. It also defines and clarifies points of Esperanto grammar according to the principles set down in the *Fundamento de Esperanto*. These decisions are published as "Official Supplements to the *Fundamento de Esperanto*" (*Oficialaj Aldonoj al la Fundamento de Esperanto*). The Akademio de Esperanto does not have authority to create new terms or to introduce new grammatical rules.

The *Fundamento de Esperanto* has been kept in print since 1905. Various editions differ in regard to the specific languages into which the grammar is translated. There have also been editions with detailed annotations.

The *Fundamento* and the *Oficialaj Aldonoj* are the only normative basis on which to say that a particular grammatical usage is right or wrong or that a word is used correctly or incorrectly in some particular way, although the definitions and number of words in the vocabulary have been considerably enlarged in the course of Esperanto usage.

As a practical textbook and dictionary of Esperanto the *Fundamento de Esperanto* obviously has many shortcomings, although even many practiced Esperantists would benefit from studying the *Fundamento's* easy-going approach to grammatical forms and rules.

Detailed textbooks and dictionaries have long been the route by which Esperanto is learned. Some have become widely accepted and are internationally used as reference books, though they have no official status. The most notable is the *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Complete Illustrated Dictionary of Esperanto) with more than 1300 closely printed double columned pages listing and defining Esperanto terms in Esperanto. Another book which enjoys widespread usage is the *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Complete Analytical Grammar of Esperanto) with 600 pages of grammatical presentation. These two books are handy for reference but are not ultimate authorities in determining what is acceptable or unacceptable Esperanto. As with all languages, what is good or bad Esperanto is determined by general usage, on the basis of tradition and the best literary artists.

At one time there was also a widely commended, but totally unofficial, style book, the *Fundamenta Krestomatio* (Basic Anthology) edited by L.L. Zamenhof. This book is not to be confused with the *Fundamento de Esperanto*. Published in 1903, the *Fundamenta Krestomatio* has largely become a collector's curiosity because of the archaic flavour of its contents, due to the enormous growth of Esperanto literature in the past hundred years. Recently a new book, the *Nova Esperanta Krestomatio* edited by William Auld has attempted to provide a style guide for the 1990's. Its popularity is yet to be determined.

nivelo. Ni aplaŭdas la ideon de internacia kompanio kaj ankaŭ la ideon de bildinformilo en Esperanto. Ni certe ĝojus, se la grava spertulo kaj esperantisto Roman Dobrzyński mem povus estri la kompanion, krei la TV-kurson kaj realigi la aliajn proponojn.

Ni kredas, ke oni povus vendi

bonkvalitan kaj kompletan profesie faritan kurson sur vidbendoj por US\$150 aŭ eĉ US\$200 al la lokaj kluboj kaj asocioj en la pagipovaj landoj.

[Kontaktadreso: J.E. Bachrich, Ĝenerala Sekretario de la Venezuela Esperanto-Asocio, Apartado 70782, Caracas 1071A, Venezuelo.]

En la februara numero de la UEA-gazeto *Esperanto* aperis la sekvanta anonco:

KONKURSO

Internacia Esperanto-Instituto en Hago anoncas konkurson por verkemaj esperantistoj. La celo de la konkurso estas verki internacie uzeblan tekston por 3-hora vidbendo kun 12 lecionoj por 15 minutoj. La teksto:

1. estu taŭga por instruo al homoj en aĝo de 18 ĝis 30 jaroj;
2. prezentu scenojn pri Esperanta vivo, ekz. pri kongresoj, E-ferioj, E-familioj, lingvaj problemoj (ekz. diverslingvaj najbaroj);
3. estu en formo de dialogoj.

La teksto estu instrua *laŭ rekta metodo*, prezentanta al spektantoj la logikecon de la gramatiko, la simplan strukturon de la lingvo, kaj la eblojn de rapida komunikado per ĝi en aktualaj,

interesaj, ofte spritaj situacioj, sen nepra studado de gramatikaj reguloj. La gramatiko estu limigita al la necesaj por simplaj konversacioj, surbaze de la formoj *-as, -is, -os* kaj *-us*, sen uzo de participaj formoj. La serio *ne* estu komplementa lingva kurso, sed pli *varb-informa*.

Kontribuojn bonvolu sendi, *plej laste la 31-an de decembro 1992* al IEL, Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. La aŭtoro(j), kies verko(j)n oni elektos por filmi, ricevos monpremion en valoro de 300-800 nederlandaj guldenoj [=A\$220-\$575—Red.].

[NB Ni ne scias ĉu la du ĉisupraj projektoj estas kunordigataj; ambaŭ estas gravegaj.—Red.] □

PAROLAS ĈINIO AL AŬSTRALIO PERE DE FRANCIO

René Debernadi (Francio), kiu vizitis Aŭstralion lastjare, skribis: "Mi ricevis du libretojn: *The Australian Esperantist* kaj *Ekologio*. Mi dankas la sendinton, kiu ne subskribis. Mi dankas ankaŭ pro la skribado kaj sendo de revuo al la nova Esperanto-grupo de Singapuro. Mi aŭdis de ĉina radiodissendo pri gajno de premio fare de la esperantistoj de Perto. Gratulojn!"

[El *La Nigra Cigno*, majo 1992.] □

LINGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

La vortoj kaj gramatikaj eroj, kiujn mi diskutas en ĉi tiu *Lingva Angulo* estas elektitaj surbaze de eraroj, kiujn mi trovas dum mia legado. Sed kelkfoje mi demandas al mi, ĉu iu ajn vere atentis ĉi tiun rubrikon—antaŭnelonge mi trovis eraron, kiun mi jam diskutis, en la sama gazeto, kie mi origine vidis ĝin! Kiel ajn ni iam plialtigos la nivelon de la lingvouzado de la aŭstraliaj Esperantistoj?

JUST

Adjektivo: Justa homo—A just/fair person

Ne estas juste, ke...—It's not fair/right/just that...

Tio ne estas justa—That's not fair

Adverbo:

1. I have just three apples left—Restas al mi nur ĝuste/precize tri pomoj
It was just three o'clock when he arrived—Ĝuste/Precize je la tria li alvenis
Just as I was about to leave...—Ĝuste (tiam), kiam mi estis forironta...
Just then—Ĝuste tiam. Just there—Ĝuste tie
Just in time—Ĝustatempe. Just for that—Ĝuste pro tio
He is just like his brother—Li ĝuste/precize similas al sia frato
That's just what I want—Tio estas ĝuste/precize (tio), kion mi volas
She is just the same as I remember her—Ŝi estas ĝuste/precize la sama, kiel mi memoras ŝin
Do it just like I do—Faru precize tiel same, kiel mi
He is just the man for the job—Li estas la ĝusta homo por la tasko
2. Just before I left—Tuj antaŭ ol mi foriris/antaŭ mia foriro
Notu ankaŭ: Mi informos lin *tuj kiam* li alvenos—I'll tell him as soon as he arrives
3. He has just come in—Li ĵus envenis
4. He just escaped death/being killed—Li apenaŭ eskapis el la morto/evitis la morton/evitis esti mortigita
He just managed to escape—Li nur malfacile sukcesis eskapi
Notu ankaŭ: He had a narrow escape — Li apenaŭ saviĝis
5. It's just as well that...—Estas ja bone, ke...

EXTEND, REACH

Etendi (trans.) = spread, extend; make straight, stretch out; draw out

Li etendis la brakojn al la ĉielo^Z
 La birdo etendis la flugilojn
 Etendi risorton (= stretch a spring)
 Etendi vitran tubon al fadeno en flamo^Z
 Ŝi etendis sin sur la lito
 Etendi tapiŝon sur la planko(n)
 Etendi (*aŭ*: sterni) pajlon sur la tero
 Etendi sian povon
 Oni devas etendi la regulojn al ĉiuj similaj okazoj^{PTV}

Etendiĝi (netrans.) = reach (to), expand, run, spread

La arbaro etendiĝis ĝis la maro
 Nebulo etendiĝis super la valo^{PTV}
 La nemezurebla maro etendiĝis antaŭ li^Z

(= make longer)

Plilongigi la pagperiodon
 Extension ladder—plilongigebla/teleskopa eskalo

(= make larger etc.): Pligrandigi (pliriĉigi) sian vortprovizon—extend one's vocabulary

atingi (trans.) = reach, attain; achieve; arrive at

Ili atingis la maron vespere
 Ŝi ne povis atingi la sonorilon (= reach the bell)
 Li atingis sian celon (= reached his objective/goal)
 Atingi kontentigan rezulton/sukceson
 La stango ne estis sufiĉe longa por atingi la fundon (= reach the bottom)
 Atingi profundan aĝon (= reach a ripe old age)
 Afabla vorto atingas pli ol forto^Z
 Atingi ke...—get (someone) to (do something)
 Fine mi atingis, ke li prenis la kvitancon^Z—I finally got him to take the receipt
 Mi penos atingi, ke la Esperantistoj akceptu miajn naŭ plibonigojn^Z—I'll try to get the Esperantists to accept my nine improvements
 Out of reach—neatingebla
 Within easy reach—facile atingebla; je mallonga distanco

(netransitiva:)

La akvo ekstere atingis ĝis la fenestro^Z (= reached as far as...)
 Mi preferas: ...*atingis la fenestron*; sed tio ne ĉiam estas ebla, kiel en la sekvanta ekzemplo:

La noĉoj atingis (*aŭ*: etendiĝis) ĝis la supro de la arbo

□



SHALL, WILL, WOULD

de MARCEL LEEREVELD

La tri estas modaj helpvortoj, t.e. ili formas kun alia verbo novan signifon; ili donas iun modon al la precipa verbo; ili aldonas agon tiamaniere ke la du agoj okazas samtempe (simile al ekz. *laborigi*). Pro tiu funkcio estas nefacile kompreni, ke fakte la moda helpverbo estas gramatike la ĉefelemento kaj la ĉefa verbo la flankelemento. Pli klare tiu rilato vidiĝas en la (ĝuste malofte uzataj) kunmetaĵoj *li servdevas, ŝi ripozvolas, mi helppovas* (neniam **deuservas, *volripozas, *povhelpas*).

Shall

En la angla, *shall* havas du malsamajn signifojn, kvankam la uzo de la unua daŭre malpliĝas:

1^a) Kun la subjekto en la unua persono (mi, ni), kaj en la dua persono nur en demanda frazo, ĝi formas la futuron de la ĉefa verbo, kiu ĉiam estas en infinitiva formo (por la aliaj personoj oni uzas en tia kazo *will*). Ekz.: *We shall come = Ni venos; Shall you wait? = Ĉu vi atendos?*

2^a) Kun la subjekto en la dua (vi, ci) aŭ tria (ŝi, ili, substantivo, ktp.) persono, *shall* signifas devon, ordonon: *You, he, my children, shall repair that = Vi, li, miaj gefiloj, devas(os) riparition.*

La uzo de *shall* en la unua kazo ŝanĝiĝadas al *will* (*I won't mind = I will not mind = Mi ne kontraŭos; Will you come = Ĉu vi venos?*), dum la uzo de *shall* en la dua kazo ŝanĝiĝadas al *must* kaj al *have to* (*You have, he has to do that = Vi, li devas fari tion*). Por la preterito oni ekskluzive uzas *had to* (aŭ *was*

obliged).

Will

Will ankaŭ havas du signifojn kvankam la unua estas arĥaikaĝanta:

1^a) Ĝi povas signifi volon (kaj ofte kombinaĵon de *voli* kaj futuro) kaj do en Esperanto estas *voli*. Tiu malnova signifo konformas al la substantivo *the will* ankoraŭ signifanta *la volon*. Anstataŭ *will* oni nun uzas por esprimi *voli* la verbon *want*, kiu antaŭe signifis *malhavi* kaj *bezoni*.

2^a) Ĝia ĝenerala uzo estas por formi la futuron (*You won't do that = Ĉi certe ne faros tion*). (Konforma substantivo ne ekzistas en la angla, nek en Esperanto.) Estas interese noti, ke tri najbaraj lingvoj disvolvis malsamajn helpverbojn por tiu funkcio: angle *will*, nederlande *shall*, kaj germane *become*.

Would

Would, la preterita formo de *will*, havis tri signifojn, sed unu el tiuj ne plu uziĝas, nome la preterito de *will = voli* (**the king would abdicate = la reĝo volis abdikati*). Nuntempe uziĝas anstataŭe *wanted to*.

La dua signifo de *would*, la (subjunktiva) preterito de *will = os*, estas uzata nur en la nereкта parolo por la futuro de verbo en la rekta parolo: *He said: "I shall come back" = Li diris: "Mi revenos"*. *He said that he would come back = Li diris ke li revenos*. Notu ke Esperanto ne bezonas tian preterit-futuran tempindikon, ĉar ĝi uzas la samajn modon kaj tempon en la nereкта kiel en la rekta paroloj.

La ĝenerala uzo de *would* estas por fari la kondicionalon (= la nereala imagaĵo!), sed nur en la frazo kiu ne komenciĝas per *if = se*. En Esperanto la kondicionalo estas uzata en ambaŭ frazoj: *I would come if I had* (ĉiam preterito en la kondicionala *if*-frazo!) *time = Mi venus* (sed mi **ne** venos), *se mi havus* (sed mi **ne** havos!) *tempon*. Kelkfoje, sed ne ofte, en la angla estas tendenco uzi la kondicionalon por realigebla imagaĵo kun realigebla kondiĉo: *I would* (and I may well) *refuse, if he asked me* (and he may well) = *Mi rifuzos se li petos*. (Pli bone en la angla: *I shall refuse if he asks*.)

Nature eblas formi pli komplikajn temp- kaj modkombinojn de *shall*, *will*, kaj *would*. Ekz. *We shall have eaten = Ni estos manĝintaj; I shall have to be able to swim = Mi devos povi naĝi; Having had to walk, I shall be wanting to drink but you won't be able to help me = Devinte piediri mi estos volanta veni, se...; He said that he would have been able to finish the work when leaving = Li diris ke li estos povinta fini la laboron kiam li*

foriros (iomete malsama al: ...*ke li povos esti fininta... = ...that he would be able to have finished...*).

Noto: *I want to help = Mi volas helpi; I am willing to help = Mi konsentas, pretas, oferas helpi*.

Would aperas ankaŭ en stranga signifo, nome por la imperfekto: *We would get the milk delivered = we used to get, we usually got, we regularly got = Ni ricevadis (ekhavadis, kutime ricevis) la lakton liverita, aŭ Ni (regule) liverigadis la lakton*.

Fine: *Would that he had survived the hurricane = Se li sedé** (aŭ nur aŭ *almenaŭ*) *estus postvivinta la uraganon!* Ne malofte ni esprimas nur unu frazon el la du necesaj en kondicionala esprimo (la samo okazas ĉe nekondicionala paro de kondiĉo kaj sekvo): aŭ la *se*-frazon (= kondiĉo) aŭ la ĉeffrazon (= kio sekvas se la kondiĉo estus plenumita). Ĉe tia elipso oni jam antaŭe esprimis aŭ aludis la mankantan duonon. Ekz.: *Mi certe farus tion!* (= ekz. *se mi estus li*); *Se mi estus pli juna!* (= ekz. *mi farus tion*). □

* <*sedé*, adverba uzo de *sed*—Red.

TRANSSKRIBO DE URBNOMOJ

En *La Letero de l'Akademio de Esperanto* 18/1992 estas detala kaj interesa artikolo de Bernard Golden pri la problemoj kiuj okazas kiam oni provas transskribi naciajn urbnomon en Esperanton. Ĉikaze la nomo estas la svisa urbo La Chaux-de-Fonds. Diversaj uzataj transskriboj estas *Ĉodefono, Ŝodefono, Ŝodfona, Ĉaŭdefono, Laŝodfona, Ĉaŭdefondo, La Ŝo-de-fon, Laŝodefondo, Ĉaŭdefonujo, La Chau de Fond!* Golden ankaŭ diskutas la problemon: kion fari pri la "la" en tiu nomo? Tio pensigas min pri la stranga fenomeno en Aŭstralio, kie la urbnomo Alice Springs estas familiare konata kiel The Alice. Ĉu do iuj proponus **Fontoj-de-Alico/*Lalico?*—Cetere, ne nur pro tiatemaj diskutoj sed ankaŭ pro multaj aliaj egale cerbumindaj *La Letero* estas tre aboninda (\$29 de la AEA Libroservo). □

DULCIE SAWKINS

verkis Vera Payne

La 19-an de marto dek membroj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio ĉeestis la funebran ceremonion de nia kara amikino Dulcie Sawkins, kiu forpasis 15 marto 1992, post kuraĝa batalo kontraŭ kancero. Inter la belaj bukadoj sur la lasta ripozo troviĝis bunta papilio, simbolo de libereco kaj gajeco. Tiu papilio akompanis Dulcie dum ŝia malsano hejme kaj en la hospitaloj. Dulcie antaŭvidis pluan vagadon...

Esperanton ŝi eklernis en Subiaco, kie ŝi frekventis la vesperajn klasojn dum kelkaj jaroj, kun sia bona amikino Joyce Dawson. Ŝi ankaŭ studis la Internacian Lingvon dum tri jaroj en la kurso ĉe la Mt Lawley kampuso de WCAE. Ŝi bone profitis sian Esperanto-scipovon, partoprenante ne nur plurajn Aŭstraliajn kongresojn, sed ankaŭ la Universalan Kongreson (kaj Post-Kongreson) en Ĉinio dum '86. Dulcie tre ŝatis vojaĝi; ŝi papiliis tra la mondo. En Finnlando ŝi renkontis unu el siaj Esperanto-plumamikoj. Internaciema, ŝi helpis al eksterlandaj studentoj paroli la "Aŭstralian", kaj post la morto de ŝia edzo, loĝis kun ŝi junaj azianinoj.

Paralele, ŝi estis ĝisoste Aŭstraliido, amante sian propran landon kaj gloranta en ĝiaj bonajoj kiaj la indiĝenfloroj, la Rivero Cigno, la marbordo (ŝi estis ĉiutage naĝanta preskaŭ la tutan jaron), kaj la insulo Rottnest. Dulcie ne ofendiĝus se mi dividas kun vi unu el miaj fruaj memoroj de ŝi. En la Subiaco-klaso dum diskuto pri la vetero mi ŝerce demandis la klasanojn "Ĉu iu el vi naĝas nuda?" Kvieti grizhara avinjo respondis "Jes, mi naĝas nuda". "Ĉu publike?" "Jes." "Jes, Dulcie kaj Frank ĝuis la sunon kaj maron ĉe Swanbourne en la tute natura naĝkostumo. Antaŭ pli ol 15 jaroj tio ŝajnis al mi ege aŭdackuraĝa! Post tio oni neniam taksis Dulcie museto.

Malpuŝema homo, ŝi tamen konsentis fariĝi nia kasisto, kaj tiam ŝi montriĝis juvelo. Dum kvar jaroj ŝi plenumis la taskojn diligente kaj tre kompetente. Dulcie fidele ĉeestis niajn multajn, diversajn kunvenojn, kaj ŝi helpis kiam ajn helpo bezoniĝis. Ŝi deĵoris je loteribiletvendado kaj monkolektado, kaj ŝi estis unu el la kurantoj por la Einihovici-Premio. Ŝi ĝojis pri nia Esperanto-Domo kies aĉeton ŝi unue kuraĝigis kaj poste grandanime aprobis. Nelonge antaŭ sia forpaso, ŝi donacis al la Ligo \$500.

Granda desappointiĝo por Dulcie estis la neebleco partopreni la januaran Kongreson en Sidnejo. Ŝi jam estis lerninta siajn liniojn kiel rolulino en "La Diluvo". Ankaŭ al ni ŝi mankis, kaj la prezenton en Sidnejo ni dediĉis al ŝi.

Ĉiam estis ŝia intenco inviti nin al la "baptovarmigo" de la bela nova domo ĵus finkonstruita. Kiam ŝi konsciis, ke por tio ŝi estas tro malsana kaj ke ŝia vivo elĉerpiĝas, tamen ŝi aranĝis, ke oni invitu la funebrantojn al ĝojplena kunveno ĉe 50 Robertson Street Nedlands. La spirito de Dulcie papiliis inter ni, precipe en sunoplena ĉambro kiun ŝi speciale desegnis kaj aparte ĝuis. Ni tre sincere kondolencas al la familianoj de nia kaj ilia kara Dulcie. Ni longe memoros ŝin kun estimo kaj kun amo.

[El La Nigra Cigno, Aprilo 1992]

AŬDIGI VOĈON DE ETA POPOLO

NE FACILAS ESTI... SLOVENO EN ITALIO

recenzas VERA PAYNE

Ne facilas esti... Sloveno en Italio, de Anita Perič Altherr. Eld. Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, Eschweiler (Germanio), 1991. Numero 1 en serio "Etnoskizoj". 160p., ilustrita; broŝurita. Mendenda de UEA.

La ridetanta vizaĝo de Anita Perič Altherr, dorskovrile de ĉi tiu libro, estas bone konata inter la aŭstralia Esperantistaro, pro tio ke ŝi jam vizitis nin en nia lando. Mia persona intereso en la verko fontas ne nur en tio sed ankaŭ en la fakto, ke mi naskiĝis en Istrio, tre proksime al la koncerna loko, dum la faŝista epoko. Do mia intereso ne estas nure objektiva.

En sia enkonduko, la respektata itala Esperantisto, Renato Corsetti, opinias: "...la anoj de grandaj popoloj...ŝtelas ĉion, inkluzive de la animoj de la anoj de malgrandaj popoloj." Jen la kerno de ĉi tiu informoplena, kelkfoje korŝira, neni-am teda verko. Temas pri fizika kaj psikologia persekuto, pri kultura imperiismo kontraŭ malplimulta popolo.

Por sciigi samtempe al Italoj kaj Slovenoj la celon de la libro kaj ankaŭ la funkcion de Esperanto, la Enkonduko kaj la Notoj de la Aŭtorino troviĝas trilingve: en la itala, en la slovena, kaj en Esperanto. Tiel ankaŭ informo pri IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) kiu eldonis la belaspektan, formato-plaĉan libron. La korpo kaj la koro de la 160-

paĝa enhavo estas en nia, sen-diskriminacia lingvo, Esperanto. La fina ĉapitro, ankaŭ trilingva, "Kio estas IKEL" respondas al sia propra demando. Mallonge, IKEL celas skui la Esperantistojn pri la maljustecoj kiujn suferas la etnaj minoritatoj. "Aŭdigi voĉon de eta popolo, kiu baraktas por plua ekzisto, kvazaŭ ĝi sendus helpo-alkokon; jen kaŭzo pro kiu naskiĝis tiu ĉi presajo; pere de Esperanto ĝi atingos legantojn dise tra la mondo, informos homojn pri la asimilado, kiun suferas la Slovenoj en Italio."

Tre kompleksaj cirkonstancoj produktis la heterogenecon en tiu nord-orienta teritorio de Italio, kiu landlimas kun Aŭstrio kaj Slovenio. La slavaj praloĝantoj alvenis tien antaŭ 1400 jaroj kaj sukcesis kiel komercistoj, metiistoj, vinberejstoj kaj salbedistoj. En 1202 slovenaj nomoj troviĝis inter tiuj de la plej elstaraj urbanoj, sed pli lastatempe la urboj pleniĝis je Italoj, dum la Slovenoj loĝis kaj laboris en la kamparo, provizante por la urbanoj la ĉiutagajn vivobezonojn. Antaŭe parto de la habsburga (aŭstria-hungara) imperio, en Jan. 1921 la marborda teritorio estis aneksita al Italio, kaj la situacio radikale malboniĝis por la Slovenoj kaj Kroatoj. La plej amasa formigro de Jugo(sudaj)slavoj okazis dum la faŝista reĝimo kaj post la Dua Mondmilito, plejparte al Ameriko kaj (kiel mia familio en Jan. '38) al Aŭstralio. →

Ĝuste kiel la Aborigenoj en Aŭstralio kaj la Nigruloj en Sud-Afriko, la Slavoj sin trovis fremduloj en sia propra lando. Tavolo da Italoj kiuj kontraŭis la multnacion, multlingvan, multreligian kaj etne heterogenan enloĝantaron insistis je asimilado de ĉio kio ne kongruis kun italeco. La "flava danĝero" en Aŭstralio paraleligiĝis en la "pericolo slavo" tie. La Slovenoj kaj Kroatoj devis vivi kiel kulpuloj. En 1920 la insultoj kulminis per la bruligo de la plurcela, kultura "Narodni Dom" (La Popola Domo), siaspece la unua tia juvelo en Eŭropo. Ĝi entenis krom lernejn, teatrajn kaj muzikajn instituciojn, ĵurnalarhivon, bibliotekon, bankon, presejon, hotelon, restoracion, kafejon, gimnastikejon kaj sidejojn de diversaj aliaj socioj. Sistema persekutado komenĉiĝis post Oktobro '22 kiam la faŝista partio prenis la povon. Paroli la slovenan estis malpermesate; ĉiuj slavaj lernejoj, organizaĵoj, institucioj estis fermitaj; presajoj likviditaj; lokaj kaj personaj nomoj italgigitaj—eĉ sur tomoŝtonoj! Arogantaj junuloj vangofrapis sloven-parolantajn kamparanojn; pli sadistaj uloj sovaĝe torturis ĝis frenezigo kaj morto. Imagu la trinkigon de maŝinoleo...

"Italio postulas, ke ĝiaj civitanoj parolu la lingvon de la ŝtato, tion ili faru kun pravigita orgojlo. Mi konsciigas vin, ke la itala kulturo ĉiam estis lumturo de civilizacio, honoro kaj gloro de nia popolo." Antaŭ la Unua Mondmilito la sloven- kaj kroatlingvaj lernejoj por profesiaj fakoj estis plurnombraj kaj altnivelaj, plie la mezgradaj kaj superaj. Sed fine, nur kaŝe kaj eksterleĝe, kun grandaj riskoj, oni povis instrui en la propra patrinlingvo. 1200 geinstruistoj estis

forigitaj el siaj postenoj. Anstataŭis ilin italaj. Ankaŭ la pastroj ricevis ordonon eduki nur en la itala lingvo. (La Slovenoj kaj Kroatoj, kiel la Italoj, estas plejparte Romkatolikaj.) Malobeantojn oni persekutis kaj maldungis. En mia propra vilaĝo, la tre amata pastro estis forigita kaj itala, faŝisteca pastro venigita.

La infanoj ne nur estis malpermesataj uzi la gepatran lingvon en la lernejo, sed ankaŭ ekstere, eĉ en la propra hejmo! La instruistoj estis kruelaj. "La dekjara Marija Tuŝar... estis brutale batita de sia instruistino...ĉar ŝi babilis slovenlingve kun siaj samklasanoj. Marija devis pasigi plurajn semajnojn en hospitalo pro la vundoj." Mian fraton oni premiis per piedbatoj kaj kapofrapoj kaj en la lernejo kaj en la preĝejo, ĉar li aŭdacis paroli en sia propra lando sian propran patrinlingvon, la kroatian, anstataŭ la trudan, fremdan italan.

Ĉio slava estis malpermesata. Sed eĉ pli efika estis la pli subtilaj agadoj kiaj la delogo de la infanoj. (Lumiga estas la instigletero de itala instanco en 1961 al triesta patro laboranta en Aŭstralio, ke li ne enskribu sian filineton en slovenlingvan lernejon, kaj la dignoplena respondo de la patro, Italo, kies edzino estas Slovenino.)

En 1941 invadis Jugoslavion la itala, germana, bulgara kaj hungara armeoj. Ili dividis, aneksis, asignis al si la teritoriojn. En 1943 Italio subskribis armisticon kun la Aliancanoj; post tio la nazioj transprenis la povon. En granda eksa rizoprilaborejo en Triesto ili instalas fifaman koncentrejon kun kremacia forno. Dum tiu "finsolvo"-periodo la nazioj kaj faŝistoj ekstermis milojn da slavoj kaj judoj. Tiun "plej

tragikan sorton indus diskonigi tra la mondo", precipe nun kiam dekstruloj klopodas misinformi, ke en tiu fi-ujo ne okazis la obscenaj kiuj ja okazis. Ni mem lastatempe televidis la nepinon de Mussolini (ŝi emas fariĝi parlamentano) deklari sian avon Benito ne nur "bonulo" sed eĉ "grandiozulo". Indas citi unu epizodon de tiu hororo. Post partizana mortigo de tri italaj soldatoj, sep vilaĝoj estis forbruligitaj, 32 ostaĝoj mortpafitaj, kaj 462 lokaj homoj translokigitaj en la koncentrejon. Anita senkaŝe priskribas la postmilitan venĝon, kiun la Italaj bone memoras, kvankam ne la fakton ke slovenaj familioj kaŝis, nutris, vestis grandan nombron da italaj soldatoj kiuj fuĝis antaŭ la germanoj post la 1943-a armistiko.

En 1954 la Aliancanoj, post dekjara administrado de Triesto, transdonis al Italio la regadon de la urbo kaj de ĝia ĉirkaŭa teritorio. Rekomenciĝis kontraŭ slovena diskriminacio, faŝisteca, kiun la Alianculoj malmulte malhelpis. (Estis la tempo de la "malvarma milito".)

Kvankam ĉiam la Slovenoj partoprenas en italaj kulturaj okazantaĵoj, de la itala flanko ne ekzistas reciprokeco. Kaj Slovenoj ankoraŭ atendas la realigon de leĝo kiu ekzistas por ilin protekti.

Tre plaĉa estas la netordita, simpla stilo, kun riĉa vortostoko. Al PIV mi kelkfoje devis rifuĝi. Nun ankaŭ mi komprenas la signifon de "aŭtoktono", "karsta", "glagolico", "iredentismo", "liktoro", "roto", "haĉita", "pelmele" (jes!), "kvestoro", "demiurga", "raslo". Mapoj kaj trafaj fotoj logas la okulon, kiel ankaŭ la kovrilpentraĵo fare de slovena artisto.

Troviĝas informplenaj kvankam

koncizaj ĉapitroj pri la Ekonomio, la Amaskomunikiloj, la Religio, la Sporto, la Folkloro (ni paroprenantoj en la lasta Somerlernejo en Adelajdo spertis la korvarmigan slovenan spiriton en la formo de muzikistino, Darja Baĥ), la Lingvo (la slovena, parolata de du milionoj, estas hind-eŭropa lingvo de la slava familio), la Artoj, la Universitatoj en-kaj eksterlandaj. La riĉa arto ne estas kuraĝigita oficiale, sed esperu Slovenoj: en Aŭstralio nun la aborigena kulturo burĝonetas kaj evidentiĝas pli kaj pli sur la blankula scenejo.

Animotuŝa estas la fragmento de la adiaŭa letero al sia fianĉino, de junulo kiu estis ekzekutita la 15an de Decembro 1941. El la literaturaj fragmentoj min trafis la poemo de Marko Kravo, kiu naskiĝis en '43 en koncentrejo. Ĝi estas himno al la slovena libroemo. Kaj la korŝira novelo *Floroj por Leprulo* de Boris Pahor, kiu en sia 17-a jaro spektis la bruligon de Narodni Dom. (Spektaklo kiu "gravuris lian animon porĉiame". Li ankaŭ nevole sin trovis sur la libia fronto, kaj travivis la traŭmatizajn naziajn koncentrejojn.) Ĝi plenas je imagobildoj aludantaj la persekuton de la Kristo. La mondo de D.H. Lawrence speguligas en la *Historio de Alia Mondo* de Ferruccio Clavora (jen Sloveno kun itala nomo). Temas pri laboro en karbminejo. Ĝi memorigis min ankaŭ pri mia patro, orministo en Boulder. "Mi sentas honton, ĉar mi mem ne konis tiajn lokojn, lokojn en kiuj tagon post tago, jaron post jaro, homoj vivas kaj laboras en nehomaj kondiĉoj...kie la agonio estas longa se la morto ne abruptas. Mi pensas al ĉiuj, kiuj perdis la sanon kaj sentas sin neniigitaj fizike kaj spirite, mi pensas

al tiuj, kiuj al la tero donis sian vivon..." Troviĝas la slovena himno, *Tosto*. Kiel kroatdevena etulino mi aŭdis la melankoliajn vortojn de alia slovena himnokanto: "Ho Slovenoj, ankoraŭ vi vivas, ankoraŭ vi vivas, ho Slovenoj".

Ofte dum tralego de tiu ĉi libro mi pensis pri la sorto de Esperanto. "La kvalito, jen la sola afero, per kiu ni povas garanti nian estontecon al ni

mem" (p.126). Miaopinie troviĝas Esperanto-verkoj kiuj ne meritas la naskangorojn. Sed ĉi tiu estas gratulinda verko. Estas facile por ni, privilegiuloj, leĝere forgesi pri la hontiga sorto de la originaj posedantoj de "nia" lando. Anita devigas nin atenti kiel devas vivi la malpli egalaj homoj. Kaj tamen la spirito soras! Ĉiu Esperanto klubo en Aŭstralio aĉetu almenaŭ unu ekzempleron. □

DU NOVAJ ENCIKLOPEDIAJ VERKOJ

de N. P. STEPANOV

(Moskvo, Rusio)

Hodiaŭ mi volas rakonti pri du interesaj libroj, aperintaj en nia lando (oni ne povas diri "sur nia merkato", ĉar ĝi fakte mankas; ĉio pli malpli valora/interesa/utila tuj malaperas). Kvankam ambaŭ estis verkitaĵoj en la rusa lingvo, mi estas certa, ke ili altiros la atenton de seriozaj interlingvistoj.

La unua el ili estas monografio *Mejdunarodnyje vspomogatelnye jazyki* ("Internaciaj helplingvoj"), verkita de bone konata interlingvisto ALEKSANDER DULIĈENKO—profesoro de Tartua Universitato (Estonio), lerninto de fama esploristo akademiano PAUL ARISTE. (Tallinn, Valgus, 1990, 448p., eldonkvanto 1000 ekz.) En la vere fundamenta verko estas realigita enciklopedia principo de prezentado de la lingvoprojekta materialo pri ĉiu el pli ol 900 lingvoprojektoj de internacia artefarita helplingvo, kiujn oni proponis dum la tuta historio de serĉado de la IL, t.e. de la 11a

jarcento ĝis la komenco de la 70aj jaroj de la 20a jarcento, en 40 landoj de la mondo.

Ĉiu artikolo enhavas jenajn informojn: jaro de kreo de la lingvoprojekto (LP), ĝia ĝenerala numero, lingvonomo (nomo / titolo de LP), kreinto/aŭtoro, lando, loko, ĝenerala karakterizo (struktura tipo, specifeco de gramatiko ktp), gramatika skemo (per speciale ellaborita sistemo de cifera markado), specimena teksto, bibliografio.

Por ke la principo de la ekciklopedieco estu sinsekva, la aŭtoro aldonis al la verko kelkajn indeksojn: kronologian, lingvonoman, laŭaŭtoran, laŭlandan, indekson de LP havantaj specimenajn tekstojn, kaj indekson de manuskriptaj LP—kiuj, laŭ mi, ege plivalorigas la verkon, ĉar ili tre helpas al ĉiu esploristo fari proprajn esplorojn pri jam ekzistaj LP kaj ankaŭ, kiu scias, pri kreado de propraj "ĉefverkoj".

Ekzemple, mi tuj trovis, ke en Aŭs-

tralia oni ellaboris entute kvar LP:

1) *Lingvologia Lingvo*. Hanhiniemi E., Australia, Ingham (N. Queensland), 1966, aprior-aposteriora, bazita sur "lingvologia" koncepto de l'aŭtoro, laŭ kiu ĉiu vorto havas nur unu signifon, kaj la gramatikan signifon oni esprimas analize, t.e. per alia aparta vorto. Oni donas ekzemplon de la teksto kaj informon pri Esperantolingva bulteno *Lingvologia Revuo* n° 1-7 (1971).

2) *Semantography*. (Blissymbolics). Bliss Ch.K., Australia, Sydney 1942 1949. Pazigrafia sistemo, konsistanta el 30 simboloj internaciaj kaj el sama nombro da simboloj faritaj de la aŭtoro mem. Granda bibliografio 1946-1964.

3) *Unolok*. Wilshire H, Australia, Brisbane (Queensland), 1957. LP aposteriora kun uzo de multnombraj radikoj el diversaj lingvoj de la tuta mondo, inkl. rusan kaj japanan. (Manuskripto ĉe la aŭtoro, kaj aliaj bibliografiaj fontoj.)

4) *Panhomel*. Australia, Sydney (?), 1921-1923 (?). "Internaticziencial lingwo Panhomel". LP de nekonata aŭtoro. Mankas aldonaj (faktaj kaj bibliografiaj) informoj. P. Stojan opinias, ke la LP ne estis publikigita.

Nu, jen estas malgranda esploro, kiun mi faris dum kvin minutoj. Unuvorte, ege valora kaj interesa libro.

La alia same fundamenta verko estas nova "Lingvistika Enciklopedia Vortaro" (*Lingvistiĉeskiĵ Enciklopediĉskij Slovarj*). Ĉefredaktoro: V.N.

JARCEVA. Moskvo, Sov. Enciklopedia, 1990. 685p., ill., 150 mil ekz. La Vortaro, kiu fakte estas vera enciklopedia eldonaĵo, celas doni al legantoj (filologoj, lingvistoj, esploristoj, pedagogoj kaj studentoj, psikologoj, filozofoj, historiistoj, fakuloj pri logiko, literaturo, etnografio ktp) sisteman aron da sciencoj pri homa lingvo, pri lingvoj de la mondo, pri lingvoscienco kiel faka disciplino. La eldonaĵo estas unika por rusa pri-lingva literaturo ne nur pro tio, ke nuntempe oni tute objekte kaj "juste" priskribas la ĝis nun "krimajn temojn" (apartaj artikoloj estas dediĉitaj al interlingvistiko, al internaciaj kaj artefaritaj lingvoj, al Esperanto), sed ankaŭ pro tio, ke oni sukcesis enmeti tiom ampleksan materialon en unu sufiĉe kompaktan volumon. Nur indas ekmemori pri la problemo de elekto kaj reprezentado de l'materialo, kolekta kaj organiza laboro de granda kolektivo de fakuloj (pli ol 300 aŭtoroj), redaktoroj, kaj teknikaj helpantoj! Vere grandioza laboro! Plibonigas la vortaron bibliografiaj listoj, kiujn havas la plimulto da artikoloj. Ankaŭ valora estas detala notita nomindekso de sciencistoj/fakuloj, kies nomojn oni mencias en la tekstoj de ties artikoloj. Unuvorte, vere fundamenta verko, kaj mia opinie ĉiu serioza esploristo/fakulo, interesiganta pri lingvoj alte pritaksos ĝin.

Oni povas mendi la verkojn pere de Instituto pri Internacia Komunikado, SU 111524 Moskvo, a/k 25. Fakso (7095) 292-65-11 INTERLING 7790.

EL LA REGIONOJ

Zamenhof-festoj: Tro malfrue por inkludo en nia januara numero nin atingis raportoj pri la Zamenhof-festoj en Perto, Brisbano, kaj Toowoomba:

En Perto la 13an de decembro en University House (UWA) 38 anoj kaj amikoj partoprenis la feston. Postmanĝe D-ro Philippa Maddern prelegis pri la "facileco" de Esperanto; ŝia prelego estis presita en *La Nigra Cigno*, marto, 1992. Al Dorothy Threlfall oni donis dumvivan membrecon en ELOA, kun atestilo en alloga kadro. Al klasanoj (Shirley Landquist, Bob Billing, Rita Godfrey, Elvie Rowe, Triska McGreevy, Rosalie, Philippa, Galina, Maureen, Peggy, Doug, Gino, Zoë Abbot kaj Garry Harris) oni donis diplomojn/atestilojn, kelkaj kun plenumbreco en la Ligo.

Brisbano: Okazis la kutima Zamenhof-festo ĉe la klubejo en Woolloongabba, la 14-an de decembro. Partoprenis 37 anoj kaj vizitantoj. Ray Ross tributis al la memoro de Zamenhof. La Brisbana kantgrupo prezentis kantojn. La St. Lucia grupo skeĉon. Peter Keates reĝisoris la tutan programon.

En Toowoomba oni festis je la 23a de novembro. Bela vetero, sed pro multaj diversaj kialoj, malmultaj ĉeestis. Tamen, la kelkaj ĝuis festenan kunsidon kaj "trezor"-serĉadon ĝardene.

QLD: Okazis la unua konferenco en 1992, la 10-12an de aprilo ĉe la James Byrne-Centro, Highfields, iom norde de Toowoomba. Entute 35 partoprenis ĉi tiun novearanĝitan semaj-

finon. Estis plezuro bonvenigi el Sidnejo Kep kaj Dorothy Enderby, Eric kaj Betty Hart kun du geamikoj, Ron Gates el Armidale, Joyce Turner el Rockhampton, kaj anojn de la Sunbrila Marbordo, Brisbano kaj fine la energian komitaton el Toowoomba. Bedaŭrinde pro aŭtobusa paneo Max Wearing, Adelajdo, ne povis ĉeesti. La konferenceto situas en pli ol cent akreoj da pitoreska regiono ĉirkaŭata de arboj, ĝardenoj kaj Aŭstraliaj boŝcenejoj. Tute nova aliro al la programo certigis plensukcesan konferencon jene: Vendredvespere gastparolanto John Donaghue prelegis pri "Instigado"; la Brisbana kant/dramo-grupo kantis kaj legis drametojn, Annie Spencer gitaris kaj kantis; Kay Andersen per akordiono muzikis por komunkantado. Denove, sabatvespere la Brisbana Grupo kantis / drametis; okazis komunkantado, kaj dancado kiun la rolantoj lernis nur la saman tagon. Sabate / dimanĉe oni rajtis elekti el ses malsamaj sesioj jene:


1. Phil Thompson gvidis (per antaŭpreparita temo de Max Wearing) "Ĉirkaŭ la mondo en okdek tagoj per Esperanto".
2. Laborsesio estrata de Ron Gates "Kiel verki noveleton".
3. Artaj desegnoj pri Esperanto, gvidata de Tom O'Grady.
4. Esperanto per muziko (kiel traduki kantojn) kaj dancado, instruis Kay Andersen kaj Gaye Phillips.
5. Esperanto kaj ĵurnaloj, radio, televido. Peter Keates per lerta skeĉo prezentis la temon en "radio-re-

responda" sceno.

6. Dianne Lukes plensukcese instruis al kvin lernantoj enkondukajn lecionojn de Esperanto per la rekta metodo.

Kep Enderby estris la finan kunsidon kiam la gvidantoj de sesioj resumis la rezulton de la semajnfinaj laborsesioj. Multe da demandoj kaj respondoj pri diversaj punktoj sekvis. Kep dankis al ĉiuj kiuj konferencis kaj gratulis al Dianne, Jean Lehane, Sandra Connors kaj Joff Bell (LKK). Dianne kompilis dekpaĝan libreton pri la tuta semajnfino, *Weekend of Esperanto at Highfields*, kiu estis donita al ĉiu partoprenanto.

Publikeco: vendredvespere Jean Lehane aperis en televidprogramo, kaj dimanĉe raportisto kaj fotisto de la loka tagjurnalo *Toowomba Chronicle* intervjuis kaj fotis anojn.—Raportis Ray Ross.

 *Ridetu!* La nepo de Dianne [Lukes] estas unujaraĝa. Lia nomo estas Drew. Ĝis nun li parolas nek la anglan nek Esperanton. Tamen antaŭnelonge, oni rimarkis lin kun la domkatoj. Li montris al la katoj la bildojn en sia bildlibro kaj klarigis babiladante en bebo-lingvo. La katoj ne komentis. [*El Tereno, Feb.-Marto 1992*]

WA: Inspirite de la sukceso en la AEA-NZEA Kongreso, la "trupo" de la dramo *La Diluvo* grandioze sukcese prezentis la dramon jaŭde la 5an de marto, 1992, al O-Aŭstralianoj en la konstruaĵo de la Aŭstralia-Azia Asocio.—Vera Payne instruas Esperanto-

kurson en la TAFE en Mount Lawley al 13 novaj gelernantoj. □

INFORMILOJ

AEA nun disponas je 9 informfolioj por disvastigi scion pri Esperanto:

1. AEA kaj Korespondaj Kursoj, 2p.
2. What is Esperanto? 4p.
3. The Structure of Esperanto, 4p.
4. The International Language, 2p.
5. The Latin of Democracy, 4p.
6. A Language for the Modern Age, 4p.
7. Esperanto in Australia, 4p.
8. An Eight Page Course in Esperanto, 8p.
10. Everything You Always Wanted to Know About Esperanto..., 4p.

(Numero 9 estas la 12-leciona Kurso Perkorrespondanta.)

Ĉiuj estas nove verkitaj aŭ reviziitaj kaj nove (re)presitaj. Ni esperas ke inter ili vi trovos folio(j)n taŭga(j)n por la celulo. La folioj estas senkoste haveblaj kontraŭ pago de la poŝtkosto (ĝenerale, 60 folioj por \$1.10). Ĉar ilia pretigo ja kostas al AEA, ni petas ke vi uzu ilin nur por serioze interesotaj personoj kaj ne malŝparu ilin. Petu ilin de la AEA-Libroservo.

Ni invitas vin sendi al ni taŭgajn informilojn kiujn vi opinias aldonindaj al la serio. □

La Aŭstralia Esperantisto

(The Australian Esperantist)

Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2488



Numero 274 Julio-Aŭgusto 1992

La Aŭstralia Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. ☎(09) 574 1307.

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014; Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Help-kasisto: Dianne Lukes, 26 Noll St, Toowoomba Qld 4350.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Ronald Gates, MSF 2350 Wangaring, Kelly's Plains Rd, Armidale NSW 2350.

Membrokotizoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). \$15 (minimumo) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ekster Aŭstralazio, abono al *La Aŭstralia Esperantisto* kostas A\$33 (45 ned. gld.) kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de AEA; aŭ al la UEA konto de la Libroservo de AEA acal-w kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adres-slipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikajojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 31 aŭgusto.

La kovrildeseĝno: Ĝi tiu deseĝno estis preparita de Terry Manley. Ĝi estas la dua en serio de tri deseĝnoj elektitaj el proponoj por nia kovrildeseĝno. La septembra numero uzos la trian, kaj ni petos niajn legantojn voĉdoni por tiu, kiu al ili plej plaĉas.

En ĉi tiu numero:

Bonan vojaĝon (Trevor Steele).....	3
Kial mi malamis labori en karbminejoj (Eddie Hearne).....	7
Lingva angulo (Alan Towsey).....	12
La ekludo (Ralph Harry).....	14
La vladivostoka simpozio (Yoshimi Umeda).....	16
Deziras korespondi.....	22
Diversaĵoj.....	23
Universala Kongreso 1997 en Aŭstralio.....	26
El la regionoj.....	27
Nekrologo:	
Flora Averkoff.....	13
Libroj:	
Esperanto-kalendaro 1993.....	11
Aldono al la librokatalogo 1992.....	18
Biblioteko.....	19
Ek al leg' (recenzas Vera Payne).....	20

Malgrandaj notoj:

Via redaktoro: akademiano	15
La estonta junularo dependas de vi! (Idyssa Einihovici).....	25
Nova soci-kultura revuo en Esperanto ..	26

Aldonaĵoj:

Balotilo kaj teksto de amendoj de la AEA statuto.	
English Supplement.	

**SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO
VERKU ARTIKOLON!**

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi vian verkon al ni tajptitan aŭ sur 3½-colaj diskaj MS-DOS aŭ Macintosh. Se vi sendas manuskripton bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezono ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

BONAN VOJAĜON!

de TREVOR STEELE

Oni invitis Nian Heroon (NH) dumsekunde loĝantan en Leipzig, al Esperanto-Printempo en Vieno. Ĉiam prudenta, NH konsultis mapon: evidente la plej malmultekosta vojo estus preskaŭ rekta, tra Dresdno kaj Prago. NH eĉ demandis postenulon, kies tasko estis scii, ĉu necesas akiri vizon. Ne, dank' al Dio, tiaj ĝenoj ne plu ekzistas.

Do bone, NH kun revenbileto Leipzig — Vieno — Leipzig ekveturas. Baldaŭ la neinteresa ebenaĵo ĉirkaŭ Leipzig troviĝas malantaŭe kaj oni traveturas la agrablan pejzaĝon de suda Saksio. Se tiun ĉi tute veran rakonton akompanu muziko, ĉi-loke estus leĝera, ritma vojaĝmelodio.

Tute senprobleme oni atingas la ĉeĥan landlimon. En la urbo Dĉĉin venas salute doganistoj en olivkolora uniformo: Pasportoj! Refoje nenia problemo, almenaŭ se oni estas EK-ano. Sed NH daŭre faras la krimon esti aŭstraliano; kun defora ĝojo uniformulo sin ĵetas sur tiun ofendan blukovrilan dokumenton — fine lia laboro havas sencon, celon, li ne plu apatimiene trafoliumas germanan aŭ aŭstrian aŭ alian neatakeblan pasporton. "Australia raus!" NH montras malemon sekvi tian ĝentilan peton kaj siaflanke petas klarigon. La olivkolora sinjoro deklaras, ke aŭstraliano senvisa estas memkontraŭdiro en la Lando de la Ĉeĥoj. NH montras sian

bileton kaj insistas, ke li simple honoras Ĉeĥlandon transite, ke oni senspire atendas lian aperon ĉe altnivela internacia konferenco en Vieno la postan tagon. Olivulo insistas ke senvisa aŭstraliano estas neeblaĵo. (Misagorda kverelado inter kord-instrumentoj kaj bloviloj). Aperas supera olivhomo kaj verdiktas: NH rajtas ricevi vizon unudirektan, se li tuj pagos 60 germanajn markojn en la kason de Ĉeĥio. NH juĝas tiun sumon (\$50) iom troa por kelkhora traveturo, sed prudente klinas sian kapon antaŭ la Fortoj de la Destino. Malpli peza je DM60 li daŭrigas sian alsudan mision. (Smetana-muziko, sed iom bridata). Oni avertas nian simpatian heroon, ke li nepre donacu pluajn DM60 al la ĉeĥa konsulejo en Vieno por ricevi vizon por la revenveturo. NH diras, ke li eble tion pripensas—direblas, ke tiu diro ne estis ege prudenta.

Vieno. La Esperanto-Muzeo. Ĉefa programero: la nekredeble verva, deklamema s-ro Piron, kies vortoj pensigas. Sed aliloke pri tio.

Vendredo, la sola tago, kiam eblus viziti la ĉeĥan konsulejon, estis la 1-a de majo. Butikoj, kaj eĉ pli devige konsulejoj, restas fermitaj.


NH pasigis la posttagmezon dimanĉan kun Herbert Mayer, la organizinto de la rekontiĝo. Vizitis plaĉaspekta senlabora aktorino Brigitte. Je 20.40h NH ekveturas de Vieno kun germano Armin, alia amiko de Herbert. Armin persvadis NH lui litkupeon: ĉar la finanĉaj rimedoj de

* Germane, "Aŭstralio eliru!"

NH nepretervideble ŝrumpis (aŭ pro mistemo de multaj biletoj aŭ pro ŝtelo), Armin pruntedonas la necesajn DM55.

Norden sagas la vagonaro (ankaŭ la lokomotivo, ni supozu). Ĉi-loke la muziko estu mallaŭta, endormiga sed ne sen iaj misfajfaĵoj, ĉar NH malgraŭ kuŝado kaj forta volo dormi ne sukcesas.

Grincade la trajto haltas. Ordonaj frapoj ĉe la kupea pordo: Pasporto. Olivunifformuloj. "Australia raus!" NH parolas trankvile pri Vieno, pri la ferio, pri siaj spertoj pri vizo, kaj vidigas DM60. Juna, atvoĉa olivulo restas volforte ĉe sia



postulo ke Australia raus, kaj aldonas, ke bagaĝo devas ankaŭ raus. Armin per tragedia voĉo apelacias kontraŭ tiu senkora regulo: la aŭstraliano, li oratoras, havas laboron en Leipzig kaj perdos sian poston, se li ne alvenos ĝustatempe morgaŭ. Ke la germano elokventis angle kaj la aŭstraliano elokventis germane, ne moligis tiun ĉeĥan koron. (Violonoj segas laŭte, pete, maltrankvile, fone tamtamo monotonas.)

NH devas haste eltrajniĝi kun sia bagaĝo, sed lasas la brakhorloĝon kaj eble aliajn aferojn en la kupeo. La trajno tuj malaperas en la nordan mallumon. Oni marŝigas lin en ĉambreton, kie dolore brilaj lampoj provas malebligi pensadon. Tie sidas kunkrimulo senviza el la Lando de la Leviĝanta Suno.

Estas 23.30h. La japana kaj aŭstralia pasportoj foriris kun iu olivhomo. Ĝis la 3.00 matene la du fiuloj estos en tiu ĉambreto, kiu ne tute malsimilas

ĉelon de karcero. Neniu venos ion klarigi.

Bonŝance, NH kunportis manuskripton de romano. Dum la tuta malliberado li furioze verkas. Lia kompatinda komplico havas nur libron kun trajnhoraroj. Kun orienta obstinemo li serĉas ian fascinantan informon en sia literaturaĵo, sed foje dormo faletigas lian kapon; ĉiufoje li salte ekvigliĝas kaj kun vitrecaj okuloj brave penas trovi ĝuste tiun scion, kiu vekos lian spiriton.

La horoj pasis facile por N verkanta H, sed je la 3.00 aperas la uniformo kun la fremdlandaj pasportoj. Unuvortaj frazoj en la germana enrajnigas la kanaj-

lojn. S-ro Olivo staras en la apuda koridoro, ŝajne konvinkita ke la japano kaj la aŭstraliano planas forkuri kaj vivi inkognite en la Io de la Ĉeĥoj. La trajno jam grunte emas antaŭeniĝi, antaŭ ol la pasportoj povas celebri reunuiĝon kun siaj mastroj.

La bileto, kiu intencis porti NH al Leipzig, perdis sian validecon. Kaj nun li devas aĉeti revenbileton al Vieno. Interesa ludo, sed nun NH certe ne havas sufiĉon por kompletigi sian nekutiman manieron atingi Leipzig. (Violonoj elvokas kaj koleron kaj ploremojn.)

Ree saluton al vi, Vieno! (Blovinstrumentoj rikanas, violonoj sarkasme redonas pecetojn el "La Blua Danubo".) NH havas tujan celon: akiri monon. Li retrovas la apartamenton de Herbert Mayer. Aŭ Herbert mortis aŭ li ne estis hejme. NH memoras Brigitte, la lindan aktorinon. Eble ŝi povas helpi. Onidire ŝi loĝas "ne tro malproksime". En la centro de Vieno,

kie loĝas miloj da homoj sur ĉiu kvadratmetro, estas konsilinde, se oni serĉas homon, koni la familian nomon kaj scii pli pri la adreso, ol ke ĝi estas ne tro malproksima.

Nia sentima heroo laŭiras la mal-larĝajn vienajn stratojn, legante nom-ŝildetojn ĉe dompordegoj. Preskaŭ nur familinomoj. Sed jen, apenaŭ 150 metrojn for, loĝas iu Brigitte Aufischer—ĉu tamen bonŝance? (Optimismaj triloj de flaĝoleto.) Tiu B.A. kompreneble loĝas tute supre en alta senlifita domo, sed ĉu NH grumblas? Atinginte la supran etaĝon, li alparolas alian virinon en la koridoro. Ĉu ŝi scias, ĉu la tie loĝanta damo estas aktorino? Ŝultroj elokvente levigas. NH demandas, ĉu temas pri relative juna kaj bela damo. “Nu, ŝi estas ja juna,” vienaninas la nebelulino, kiu ŝajne ne scias, ke dum kelkaj sekundoj de sia tera ekzisto ŝi estas honorata per ekkonversacio kun NH persone. Ial tiu sinjorino decidas, antaŭ ol malaperi en sian apartamenton, ĵeti malfide ĉiun rigardon al NH. Cio vana. Malgraŭ lerta multfoja premado de la sonorigilo de Brigitte Aufischer, NH ricevas nek konfirmon nek neon al sia demando, ĉu el ĉiuj Brigitte-oj de Vieno ĝuste tiu estas enamige bela senlabora aktorino. Alia silenta apartamento. (Flaĝoletoj plorĝeme mortas).

NH ne facile perdas sian kuraĝon. Herbert ne estis en sia apartamento, kaj estas malprobable, ke li estos en sia laborloko, la Esperanto-Muzeo, je la oka matene. Sed ni provu. Sed ho ve! Troveblas tie nur solenaj sinjoroj puŝantaj cementon tra koridoroj per ĉaroj. (Multaj instrumentoj laŭvice levas demandojn.)

Nu kompreneble! (Vigljaj taktoj). NH memoras, ke li havas konton ĉe la Deutsche Bank en Leipzig. Jes, devas esti filio en Vieno. En la plej apudan poŝtoficcejon: telefonlibron, mi petas. Jen ĝi: Deutsche Bank (Wien), Hohenstaufengasse 1. Jes, mapon de Vieno, mi petas. (Dume esperigaj, energiaj tonoj.) Nu...do tie ĝi estas, inter tiuj serpentumaj stratetoj. NH facile venkas la defion. Guten Tag, mi estas kliento de via banko en Leipzig kaj...kaj...Ho ve, mi elkore bedaŭras, mein Herr, sed nia banko ne estas filio de la germana Deutsche Bank, ĝi estas nur Tochtergesellschaft (filina societo = ?) kaj laŭe ne estas enigita en la komputilan reton...kaj...kaj. Longa rakonto, mallonga mesaĝo: neniu mono por mein Herr.

(Muziko estas alterne defie malagorda kaj peze pesimisma.) Kion faru nun NH? Eble strangoli riĉan maljunulinon en obskura anguleto de la apuda parko? Esplorado tiutema ne donas esperon: el ĉiuj homoj en obskuraj anguletoj eĉ ne unu estas ina aŭ maljuna aŭ supoziga pri riĉa predo. Sed en Vieno svarmas riĉaj usonanoj. Eble NH sin lerte puŝu inter ilin kaj malŝarĝu unu-du poŝojn? Post mallonga pripensado NH venas al la konkludo, ke al li mankas la nepra talento. (Profunde malgaja, trenata muziko.)

Kiel li povus forgesi! (Eksonu “Vals’ kun Matilda”.) En Vieno devas esti ambasadejo de lia propra kara hejmlando. Kiom da fojoj li jam spertis, ke aŭstralianoj estas senescepte noblaj, bonkoraj, helpemaj; ili savos lin! Rea konsultado de diversaj publikigaĵoj: Australische Botschaft, Mattiellistrasse 2-4. Tien! (Salato de antikvaj aŭstraliaj melodioj, ekz. “Come on Aussie,

C'mon".)

Your passport, please. Bonvolu skribi pri via peto. Sed sur la slipo mankas spaco por verki veran raporton pri la ĉeĥaĉoj ktp. Do ni ignoru tiujn monstrajn tiranojn kaj simple diru, ke oni ŝtelis la horloĝon, la fervojan bileton, la monon ktp. Jes, tiel.

Oni informas NH, ke Frau Vogel (Birdineto) nun intervjuos lin. Birdineto havas vizaĝon de rezoluta kaj neniel amikema bubalo, kaj ŝia intelekto havas similajn trajtojn. Ŝiaj malongaj frazoj komenciĝas per *kiam, kial, kie, kien, kio, kiom da, kiel* kaj foje per *ĉu*. Birdineto elektis maltaŭgan karieron; oni devus ŝin malkateni kaj lasi pridemandi la plej malmolajn mafianojn. NH tre rapide glitas de unu travidebla mensogo al alia: li metis sian horloĝon kaj fervojan bileton kaj monujon — ne, ne la monujon—kaj la plejparton de sia mono en plastan sakon, kiu estis ŝtelita, kaj tion li unue konstatis hieraŭ vespere—ne, hodiaŭ matene—ah! (Violonoj kriĉaĉas, dum tamburoj pensigas pri marŝo al ekzekutejo.) NH, tute venkita, scias, ke post du pluaj demandoj li kolapsos, ruliĝos sur la planko, bebe ploros kaj balbutos senkohere la veron.

Ial Birdineto amare grimacas kaj demandas, "Ĉu vi volas paroli kun la konsulino?" NH hezitas: se tia estas la subulino, kia drakino nun voros min? Tremlipe li diras, ke jes.

Eliras Birdineto, eniras s-ino Konsulino. (Mortaŭgura singultado de ĉiuj instrumentoj.) S-ino K., evidente informite de Birdineto, severe okulfiksas la nerazitan mizerulon kaj ordoninvitas lin en sian ĉambron. Aj! Ĉu tie troviĝas du batemuloj kun la staturado kaj intelekto de Arnold Sch-

warzenegger (li ja estas aŭstro), aŭ almenaŭ mankatenoj? Apenaŭ marŝipova NH eniras kaj falas sur la ordonitan seĝon. (Muziko tute nigra.)

S-ino K.: Kial vi entute estas en Vieno.

NH: Nu, vidu; a, hm, estis...estis renkontiĝo de kelkaj homoj... e...esperantistoj...

S-ino K: Esperantistoj? Ĉu vi estas esperantisto?

(Ereto de fluta optimismo, sed eventualo de eĉ pli profunda kaj neelirebla tragedio.)

NH: ...je...jes.

S-ino K: Ĉu vi konas Ralph Harry?

(Nedubeble pli esperiga melodieto.)

NH: Nu, kompreneble...

S-ino K: Certe li ne memorus min—mi estis tiam Katherine Bretz. Do vi fakte legas Esperanton? Mi ofte aŭdis pri ĝi. Kiel ĝi aspektas?

(Ekas gaja viena valso, plilaŭtiĝonta.)

NH: (Prenas romanon el sia sako.) Mi povas montri al vi.

S-ino K: (Ĉirkaŭiras la tablon por sidi apud NH, rigardas la kovrilon de la romano.) Kio? Vi verkis tion mem? Ĉu vi verkas en Esperanto? Mirinde! (Malfermas je paĝo 259.) Ĉu mi rajtas laŭlegi?



Sed Nur Fragmento

S-ino K. laŭlegas, NH kun milda aŭtoritato korektas, laŭdas fakte ĉiam pli kompetentiĝantan s-inon K. S-ino K. ruĝiĝas, knabinece fieras pri laŭdvortoj de la instruisto. Fine s-ino K diras, "Cetere, kiom da mono vi bezonas?" (Plenĝoja tutorkestra finalo.)

NH aĉetas bileton al Leipzig, evitante Ĉeĥoslovakion. □

KIAL MI MALAMIS LABORI EN KARBMINEJOJ de EDDIE HEARNE



rigardante malantaŭen, mi pensis ke estus interese transdoni miajn pensojn antaŭ ol mi forpasos por ĉiam. Mi estas 92jara, kaj ne anticipas multe pli da vivo.

Mia patro estis tre lerta ministro. Ni iris el Skotlando en 1910, kaj ekloĝis en karbminista distrikto apud Ipswich, Kvinslando.

Mia bofilo Bob kaj du aliaj, pli junaj fratoj, ŝajne instigis nian patron revii pri minejo por la familio. Rimarkinde, miaj du lernejoj amikoj fariĝis administrantoj de minejoj.

Tuj kiam mi estis 14jara, mia patro trovis por mi lokon por labori—en karbminejo eble du mejlojn de nia hejmo. Irante tra arbaro en la freŝa matena aero, mi ne ŝatis lasi la sunlumon por malsupreniri 600 futojn al la mallumo kaj strange odoranta aero de la mino. Tiutempe ni uzis malgrandajn lampojn iom similajn al etaj kafopotoj, en kiujn ni metis oleon. Ili donis fulman lumon. Ni perhoke ligis ilin al niaj ĉapoj.

Mia unua tasko subtera estis sidi ĉe "Buffalo"-blovilo kaj turni ventumilon; ĝi sendis aerblovon al nova laborejo kien la ĉefa aersistemo ne povis penetri. Tre monotona tasko por juna knabo, kiu sidas tute sola kun nur la lumo de eta lampo. Tre malofte iu venis. Tute malsama estis mia posta tasko: mi direktis ĉevalon laŭ unu el la du ĉefaj tuneloj kiuj iris de la ŝaktfundo.

Mia tasko estis tiri aron da vagonetoj, plenaj de karbo, al la ŝakto. Ili estis kolektitaj disde diversaj laborlokoj kaj kuplitaj en arojn po ses ĝis ok. Mi hokĉenis la unuan vagonon kaj vokis la ĉevalon antaŭen. Survoje mi pasis tra pordon kiu deturnis la aeron pelitan de granda ventumilo. Tio estis necesa por elpeli la malpuran aeron. Multaj el la tuneloj estis dividitaj per tolsakŝtofo, kaj la aero iris laŭ unu flanko kaj revenis laŭ la alia. Kompreneble, kiam la aero iris tra multaj laborlokoj ĝi ne estis tre pura kaj havis specialan odoron. Plie, ĉe ĉiu laborloko oni uzis eksplodaĵojn por disrompi la karbon kaj la fumo aldonis malpuraĵojn.

Imagu la rezulton en homo kiu enspiras tian aeron tagon post tago. Mi neniam estis kontenta esti ministro. Mi vidis maljunajn ministrojn kiuj havis palajn vizaĝojn kaj daŭre tusadis.

Kelkfoje kiam mi direktis ĉevalon estis ekscito. Parto de la vojo estis iom dekliva kaj la vagonoj iris tre rapide. Por tio mi havis kelkajn sprogojn (metalajn stangojn iom similajn al ponardoj, sed pli pezaj). Mi pelis ilin en la rapide turniĝantaj radonj, kiuj sekve ekĉesis turniĝi. Kiam mi maltrafis kelkajn radonj, povis esti kolizio ĉe la ŝaktfundo kaj mi devis rapide malhoki la ĉenon de la ĉevalo. Mia koro ofte rapidegis en tia situacio.

Estis du ĉevaloj en tiu mino. Ĉiun matenon mi kaj la alia ĉevaldirektisto portis po sakon da nutraĵo por niaj ĉevaloj. Kiam ni venis al la ĉevalejo ni

verŝis la nutraĵon en la trogon por ke la ĉevaloj manĝu dum ni brosis ilin kaj surmetis la jungilaron. Iun matenon mia amiko kriis "Serpento!" Mirinde, li estis portinta serpenton de la surfaco, kaj ĝi mordis lian manradikon. Ni eliris al elektra lumo kie li lavis la vundon per teo sed ne havis tranĉilon. Mi elverŝis mian botelon da lampoleo kaj rompis la botelon. Tiel ni ekhavis tre akran tranĉilon kaj mia amiko tranĉis la vundon kaj suĉis. Post tio ni iris al la ŝaktfundo kie oni rapide kondukis lin al la surfaco. Nia kruda kirurgio ŝajne efikis kaj poste li revenis al laboro.

Mia patro laboris en alia mino kaj kiam mi estis 15jara li kondukis min por labori kun li kaj alia viro elhakante karbon. Ili ĵus komencis elhaki novan tunelon, laŭ ioma deklivo de la ĉefa vojo. La karbotavolo estis alta kvin futojn, kaj super tio estis tavolo de ardezo proksimume unu futon dika. En la mezo de ĉiu tunelo oni faligis tiun tavolon sed plejparte subtenis ĝin per lignaj fostoj. Ni faris du eksplodojn en la karbo kaj mi iris supren, trenante mian ŝovelilon por plenigi vagonon. Mi aŭdis krakon kaj rigardis la tegmenton super mia kapo. Jen estis fendo. Mi saltis antaŭen dum granda amaso falis kun laŭta bruo. Ĝi gratis mian brakon, preskaŭ trafis unu boton kaj premis mian ŝovelilon kiun mi trenis. Mia patro kriis "Mia filo, mia filo!" eĉ pli agitite ol mi. Konstatinte ke mi ne estis vundita, la du viroj tuj metis du-tri fostojn por certigi ke pli el la tegmento ne falos, kaj mi revenis kun alia ŝovelilo por plenigi vagonon per karbo. Mi ne hontas diri ke dum kelkaj tagoj mi tremetis kiam ajn mi aŭdis krakon de karbo pro la granda premo desupra.

Ĉiun tagon ni uzis eksplodilojn por elrompi la karbon. Unu el miaj taskoj estis prepari eksplodilojn. Ĉiu eksplodilo konsistis el kelkaj pakajoj. Mi prenis unu, disvolvis la vakspaperon de unu fino, faris kavon en kiun mi enmetos la detonaciilon, latuna kuglosimila eksplodigilo. Mi prenis unu detonaciilon el skatoleto, blovis en ĝin kaj frapis ĝin delikate por eligi la segpolvon en kiu ĝi estis pakita. Mi metis



meĉon en ĝin kaj krampis la finon sekure al la meĉo. Ni havis specialan ilon por fari tion, tamen mia patro montris al mi pli simplan metodon: meti la detonaciilon en

mian buŝon kaj ekmordi ĝin por firme ligi ĝin al la meĉo. Mi eĉ nun ne komprenas kial mia patro instruis sian 15jaran filon fari tion nur por ŝpari momenton. Tamen, li faris tion dum granda parto de sia vivo. Mi mem ne memoras ke mi timis. Mi metis la detonaciilon en la preparitan kavon de la unua eksplodaĵo kaj ligis la paperon ĉirkaŭ la meĉon. Mi ankaŭ preparis kelkajn falsdetonacilojn, jam faritajn el pecoj da papero volvitaj ĉirkaŭ balailbastonojn, faldis unu finon kaj plenigis la cilindron per ŝtonpolvo. Kiam ĉio estis preparita, mi portis la aranĝitan nombron da eksplodaĵoj apud la truon boritan en la karbon. Mi ankaŭ apudmetis kelkajn falsdetonacilojn.

Mia patro enmetis la eksplodaĵojn en la truon, puŝis ĉiun al la fino per balailbastono. Laŭ la leĝo oni fine devis lasi meĉon pendu ekster la truon. Mia patro ne deziris atendi tion longe, do li tranĉis mallongan pecon de meĉo, bruligis la finon kaj puŝis ĝin en la truon. Mi tuj enmetis unu

falsdetonaciilon kaj mia patro forte puŝis ĝin en la truon apud la eksplodajon. Tuj mi enmetis alian, kaj daŭris tiel ĝis la truo estis plena. Tiam ni ambaŭ kuris for, ofte ni ne estis longatempe ekster danĝero kiam la eksplodo okazis. Eĉ tiam ni devis atendi iom antaŭ ol la plejmulto de la fumo foriĝis. Neniu kontrolis la uzon de mallongaj meĉoj do ni ofte uzis ilin.

Iam mia patro kaj lia kunulo alprenis specialan taskon: ili tuneligis al najbara malnova mino kiu estis plena de akvo. Ĉar estis risko ke ili hazarde trarompos al la akvo, kaj tial estus inundodanĝero, ili boris longajn truojn antaŭen, dekstren, kaj maldekstren. Multaj opiniis ke estis risko kaj kelkaj forlasis nian minon. Finfine oni atingis la akvon kaj reguligis la fluon kiu iris al nia ŝakto, kie ĝi estis pumpita al la surfaco kun nia propra akvo.

Mi fieris pri mia patro. Tre lerta ministro, li faris aliajn specialajn kaj danĝerajn taskojn.

Dum multe da tempo mi estis "speciala laboristo", kiu alprenis taskojn de iu, kiu estis for pro malsano ktp. Foje mi kontrolis ĉe "ĝigo": tio estis kruta vojo kie estis du fervojetoj. Ĉe la supro estis cilindro, ĉirkaŭ kiu turniĝis ŝtala ŝnuro. Ĝi havis hokon ĉe ĉiu fino. Unu fino apud la cilindro kaj la alia ĉe la fundo de la deklivo. Oni hokkaptis kelkajn vagonojn kun karbo, ĉe la supro, kaj iu hokligis kelkajn malplenajn vagonojn ĉe la mal-supro. Viro ĉe la supro reguligis la rapidecon per bremsoj kaj la pezo de la plenaj vagonoj iris la malplenajn apud la cilindron.

Se la deklivo estis alimaniere, oni uzis elektran motoron por levi la

plenajn vagonojn.

Unu tasko kiun mi ŝatis estis helpi la "vojiston". Li aranĝis etendi la fervojetojn kiam la diversaj tuneloj progresis. Li ankaŭ reguligis la konstruon de specialaj lignaĵoj ĉe danĝeraj lokoj. Ni ofte skribis informon sur la finon de vagono per kreto, ĉar kutime ni ne vidis aŭ povis paroli al la viro ĉe la alia fino de la "ĝigo". Tiu vojisto estis nebone edukita, tamen li kapablis tre lerte desegni, kaj per kreto povis tre rapide desegni perfektan similaĵon de persono, ofte ridigan karikaturon. Li estis tre bona homo kaj ni estis feliĉaj amikoj.

Iufoje, kiam mia tasko estis veturigi vagonojn for de la karbhokistoj, iu diris ke viron trafis akcidento. Ĝi estis okazo simila al tiu kiu preskaŭ mortigis min. Granda peco de supra tavolo falis. Tiu viro falis sed diris al sia kunulo ke li ne estis grave vundita. Tamen, kiam li vidis ke la ostoj de la supra brako estis puŝita tra la ŝultron, li tuj svenis. Kelkaj homoj portis lin kaj ni ĉiuj donis niajn lanajn ĉemizojn ĉar li malvarmiĝis. Estis malfacila tasko sed oni portis lin al la surfaco. Tie oni trovis ke li ne havis danĝerajn difektojn, sed li mortis pro ŝoko. Destino estas stranga. Ĉi tiu viro estis unu kiu foriris de la mino pro la risko de inundo kaj antaŭ nelonge revenis.

Kelkajn monatojn pli frue, kiam mi laboris elhaki karbon, mi aŭdis krion: "Ĉesu labori, viro mortis!" Mi surmetis mian lanan ĉemizon. Ni ĉiam laboris nudaj de la talio. Ĉe la ŝakto mi ektrovis ke temis pri juna kunulo de mia bofrato, ĉirkaŭ 20jara. Similan akcidenton spertis la aliaj. Tre granda amaso falis post eksplodo kaj tuj mortigis lin. Mia bofrato Bob estis frapita tiel ke li senkonsciiĝis. Kiam li

vekiĝis en plena mallumo, li ne ricevis respondon de sia kunulo. Iel li sukcesis elkuri por helpo. Li estis vundita en la dorso kaj ambaŭ ŝultroj, sed ne grave. Tamen la markoj restis dum lia tuta vivo.

Mia memoro vagas. Ĉe tiu mino mi iam veturigis vagonojn al kaj de paroj da karbhakistoj, laŭvice. Unufoje mi preterpasis unu paron por doni malplenan vagonon al alia paro. Unu viro, tre granda kaj forta, kriegis ke mi donu ĝin al li. Li venis al mi kvazaŭ sovaĝa virbovo. Tamen, mi diris "Ne estas via vico". Li venis tre proksimen al mi kaj mi tremis. Li haltis kaj lia vizaĝmieno tute ŝanĝiĝis al rideto: "Bonega knabo, vi estas kuraĝa." Ni fariĝis bonaj amikoj kaj mi laboris forte por certigi ke li havos sufiĉe da vagonoj. Kompreneble kiam oni elhakis multe da karbo, ĉiu vagonpleno estis pli da mono. La vagonoj havis lokon kie metiĝis bronza kalkuldisko sur kiu estis numero. Tiel oni povis krediti al la diversaj paroj kiam oni pesis la vagonon ĉe la surfaco.

Kelkaj el miaj memoroj estas feliĉaj. Inter la ministoj estis kelkaj anoj de la "Kimra Ĥoro". Ili havis belajn kaj fortajn voĉojn. Fojfoje okazis paneo de la maŝinaro kaj laboro haltis. Tiam, kelkaj viroj kuniĝis ĉe unu loko por babilo. Ofte iu komencis kanti. Estas trezormemoroj por mi la resonantaj belaj voĉoj echantaj en la limigita spaco. Du kimraj fratoj estis kantistoj, unu estis svelta kaj la alia tre dika. Mi memoras ke iufoje ili rolis parton de komika opero. La svelta viro kantis per virineca voĉo kaj la dika per profunda voĉo. Ja estus tute taŭge por granda teatro.

Mi ĉiam deziris esti tute for de la malsanaj minoj, kaj mi studis por

fariĝi elektromekanikisto. Tamen en 1918 miaj gepatroj disiĝis. Estis tragedio, du, laŭ mi, bonaj kaj laboremaj homoj. Ni havis bonan hejmon, mia patro, mia bofrato kaj mi gajnis bonajn salarojn. Mi ĉiam emis subteni la malfortan flankon, kaj ni, ok familianoj, iris de Kvinslando al Melburno kun nia patrino. Estis granda batalo kontraŭ malriĉeco. Mi estis 18jara, kaj povis trovi nur laboron por malpli ol duono de mia salajro ricevata en la minoj. Mi devis forgesi pri mia revo fariĝi elektromekanikisto. Post pli ol unu jaro mia bofrato iris al karbminoj en Wonthaggi, proksimume 70 mejlojn de Melburno. Mi sekvis lin. Ĉiunmonate ni revenis por semajnfino al nia patrino en Melburno por doni niajn ŝparaĵojn al la hejmo. Ni laboris kiel karbhakistoj. Ĉiun trimestron oni okazigis lotumon (loterion por egaligi la oportunon havi bonan laborlokon). La karbfosistoj laboris pare, ili laboris en du skipoj. Do du paroj dividis inter si la profiton. Mia kunulo estis iom maljuna kaj aspektis tre malforta. Li havis kanceraspektan vundon sur la lipo. Mi tre kompatis lin kaj uzis mian junan forton por kontraŭagi lian malfortecon. Tamen ni ne povis labori tiel bone kiel la alia paro. Ili estis bonaj homoj kaj ne plendis kiam ni devis egale dividi inter ni la profiton. Je la proksima lotumo mi iris al alia loko, mia maljuna kunulo eniris hospitalon.

La nova loko estis kie oni hakfaris la "kolonojn" kiuj subtenis la tegmenton. Oni jam elhakis ĝis la limo de la uzebla karbo. Estis la "bord-kaj kolonsistemo". La karbo estis elhakata en tuneloj, "bordo", egaldistancaj, kaj oni elhakis transtunelojn. Tio lasis kolonojn, la ĉefa subtenilo de la

tegmento. Ankaŭ subtenis multaj lignaj fostoj. Mi laboris hakfarante unu el la kolonoj, kaj pro la premo estis facile elhaki kaj ni enspezis bone. Specialaj laboristoj tiris la lignajn fostojn iom for de la laborlokoj kaj la tegmenta roko pli-malpli grade malleviĝis. Tio ne okazis senbrue, kaj fojfoje estis iom terura krakado. Iun tagon mi laboris sola ĉar mia kunulo estis malsana. Mi ĵus finis plenigi vagonon per karbo kiam pli granda krakado okazis. Ne longdistance de mi, mi vidis, kelkaj fostoj iom frakasigis pro la premego. Juna viro venis kaj kriis "Eliru tuj!" Mi iris kun li kaj renkontis du-tri aliajn laboristojn. Sed unu el la pli maljunaj kaj spertaj ministoj haltigis nin ridante. Li longe kutimis je tiaj situacioj. Tamen la bruo daŭris kaj estro venis kaj decidis ke ni foriru ĝis kiam la supra roko alĝustigos. La maljuna viro proponis eniri por kolekti miajn ilojn kaj la vagonon plenan de karbo. Mi estis nervoza sed mi hontus lasi lin fari tion por mi; tamen mi spiris pli trankvile kiam mi eliris.

Kelkajn monatojn antaŭe mi renkontis la junan virinon kiu ŝanĝos mian vivon. Ĉar ŝi loĝis en Melburno, mi havis alian pli fortan kaŭzon por foriri la minojn. Mi revenis al Melburno. Mi ne sciis tiam sed estis komenco de multa baraktado. Mi ne

povis gajni tiom da mono kaj devis atendi kvin jarojn antaŭ ol miaj pli maljunaj gefratoj kreskis sufiĉe kaj mi povis aĉeti novan malgrandan hejmon kaj edziĝi kun mia amata Vera. Bedaŭrinde, post kelkaj jaroj la Granda Depresio okazis kaj ni perdis nian hejmon. Ni havis belan etan filinon. Estis terura tempo por ni.

Por ni estis du helaj aspektoj, tamen, de tiu epoko. Ni trovis la feliĉon de preskaŭ senkosta promenado, unue laŭ la multaj vojetoj apud la urbo, kaj grade pli for al la arbaroj kaj montoj. Ankaŭ ni aliĝis etan grupon de Esperantistoj en Coburg.

Grade aferoj pli prosperis, sed mi ofte pensis pri tiuj jaroj da miksitaj malĝojoj kaj feliĉo. Mi lernis kaj instruis Esperanton, ni aranĝis teatraĵetojn kaj dancojn.

En 1964 mi kaj Vera havis dekmonatan libertempon, ĉefe ni promenadis en la kamparo de Anglio, Kimrio, Skotlando kaj Irlando, grimpante multajn el iliaj montoj. Ofte ni estis tute solaj en tiuj multthomaj landoj.

Ni ankaŭ ĝuis la Esperantan Kongreson en Nederlando. Mirinda sperto. Ĉe tablo por kvar ni manĝis ĉiam kun paro el alia lando.

Tre interesa vivo. Ni estis interamantoj dum 68 jaroj. □

ESPERANTO-KALENDARO 1993

Eldonejo Prometeo en California eldonos murkalendaron 1993 en Esperanto. Anstataŭ bildo, super ĉiu monatpaĝo estas paĝo pri la gramatiko de Esperanto. Ĉe ĉiu tago estas esperanta "vorto por la tago" lernenda. Entute, speciale valora por komencantoj. La prezo estos inter A\$7.50 kaj A\$8.50 plus poŝtkosto (A\$1.00). Necesas antaŭmendi ekzemplerojn, do se vi volas la kalendaron, bonvolu laŭeble plej baldaŭ tiel informi la AEA-Libroservon jam nun en julio. □

L

INGVA ANGULO

DE ALAN TOWSEY

PLI PRI “DA”

En la numero de *TAE* por Januaro-Februaro, en mia artikolo pri *da*, mi skribis, ke *da* = *de* + *ia*. Tion nia estimata redaktoro (aŭ eble Odlo Bokserp!) ŝanĝis al *da* + *ia*, tiel detruante la logikon de miaj klarigoj!¹ Sed tute evidente *neniu* vorto, kiu konsistas el du elementoj, povas *mem* esti unu el tiuj elementoj! Ekzemple, *nasztuko* ne estas kombinaĵo de *nasztuko* kaj *tuko*, sed de *naz(o)* kaj *tuko*.

En *Lingvaj Respondoj*, Zamenhof diras (p.72): “la vorto ‘da’...enhavas kaŝite la sencon de ‘ia’”; kaj Maurice Hyde, en *The Esperanto Guide* (eldonita en Melbourne iam inter 1913 kaj 1930), diras (p.72): “Da = de ia”.

Tio klarigas la diferencon inter “iom *da* (= de ia) kuko kaj “iom *de tiu* kuko”—la *ia* forfalas, ĉar “*ia tiu* kuko” havas nenian sencon.

LIKE

Like his friends, he was a rogue—Kiel liaj amikoj, li estis fripono.

A man like him—Viro kia li (= viro *tia*, kia li estas).

I like that—Tio plaĉas al mi.

I like to go to the theatre—Plaĉas al mi iri al la teatro.

I like her—Mi trovas ŝin simpatia/Ŝi estas simpatia al/por mi./Mi havas simpatian al/por ŝi.

Likeable = simpatia (ekz., Li estas simpatia viro).

N.B. Laŭ la *Universala Vortaro* de la *Fundamento de Esperanto* kaj *PIV*, *ŝat-* = esteem, appreciate. Ekz., La grandan amikecon de viaj intencoj mi ŝatas tre alte². Bono posedata ne estas ŝatata². Anglalingvanoj ofte malĝuste uzas *ŝati* kun la senco de angla “to like”.²

Kio kondukas nin al

SYMPATHY

Simpatio = (*PIV*) 1. reciproka inklino de du personoj, bazita sur simileco de gustoj, temperamentoj, opinioj, ktp. 2. favora inklino de iu por alia persono, kies sentojn tiu iel dividus (= kunhavas).

¹ La ŝanĝon faris Odlo. Mi sendis al li la tekston de ĉi tiu plendo (li nuntempe ferias en Aŭstrio) kaj li faksis responde: “**Hal Neĝenŭ min, mi ferias!**” Do kvankam tute senkulpa, mi devas, kiel ĉefe de la redakcia stabo, hontante akcepti la respondecon.—La Red.

²Por traduki “to like”: laŭ *PIV* la verbo *ami* estas multe pli larĝasenca ol la angla *to love* kaj ankaŭ inkludas la sencon de *to like*.—Red.

Butler: liking, congeniality, affinity, fellow feeling, instinctive attraction. *Ne* = kunsento.

Vidu do la suprajn ekzemplerojn sub **Like**.

simpatia = naskanta (arousing, giving rise to) simpation.

Pluaj ekzemploj: La du ideoj (virinoj) ne estas en simpatio (= don't go together, have nothing in common).

Nia movado havas lian simpation/Li havas simpation al/por nia movado (= is sympathetic towards).

Sympathy en la kutima angla senco estas *kunsent(ad)o* aŭ *kondolenco*, kelkfoje *aprobo, favoro* (= approval, favour—laŭ la senco de la frazo). Do:

esprimi kunsenton kun suferanto. Mi kunsentas kun vi (I sympathize with you). Li estas tre kunsentema/kompatema (sympathetic). (**Kompati** = pity, have compassion). Kondolenci ion al iu (= sympathize with after a death etc.), prezenti/esprimi kondolencan/kunsenton al iu.

Kondolencan leteron (letter of sympathy/condolence).

Pro la perdo de via patro volu akcepti mian koran kondolencan.²

Fine, du malgrandaj eroj:

1. Pri la *Lingvaj Notoj* de Marcel Leereveld in *TAE* januaro-februaro 1992:
You must not do that! = Tion vi devas ne fari!
Vi ne devas fari tion = You don't have to do that.
2. It's about *this* big (indikante per la manoj) = Ĝi estas proksimume *ĉi tiom* granda.

Ne forgesu: se vi havas problemon pri uzado, ne hezitu skribi al mi—eble aliaj, inkluzive de mi mem, ankaŭ profitos de la respondo!

Alan Towsey
19 Market Street
Tahmoor NSW 2573 □

FLORA AVERKOFF

verkis Ray Ross

Forlasis nin Flora Averkoff, ano de nia Federacio dum kelkaj jaroj. Flora alvenis al Esperanto per U3A kaj rapide progresis en la lingvo. Flora suferis pro malsano de muskoloj, kaj pro tio devis uzi rulseĝon. Ŝi ĉeestis kelkajn Zamenhof-festojn de Brisbana Societo, kaj multe korespondis eksterlande kun Esperanto-handikapuloj. La funebra ceremonio okazis ĉe Kremaciejo Mt Thompson. Flora aranĝis sian propran ceremonion, kaj direktoro de "Life Line" prizorgis tion. Simpla kaj rekta tributo al tre amata ano de nia societo.

[El La Voĉo, Junio 1992]



LA EKLUDO de RALPH HARRY

La ambasadoro ridetis. La edzino de la Ministro fariĝis kapabla ludanto kaj ĝuis la nun ĉiumonatan tagmanĝon kaj robbron da briĝo. En la orienta seĝo li rigardis sian manon:

♠ 10 9 5
♥ 10
♦ A 8 2
♣ A D F 10 9 7

La ambasadorezino, norde, disdoninte anoncis unu trefon.

La ambasadoro, anticipante oferton de senatutoj fare de la Ministro, sude, demandis al sia edzino ĉu "unu trefo" estas konvencia oferto. Ŝi jesis. La ambasadoro, kun duonpalpebrumo al sia partnero daŭrigis: "Do, ĝi ne signifas, ke vi havas fortajn trefojn". Lia edzino respondis, iom acerbe: "Tute ne".

La anoncado daŭris jene:

Okcidento	Nordo	Oriento	Sudo
	1♣	Paso	1♥
Paso	1♠	Paso	2 SA
Paso	3 SA		

Miregis la ambasadoro kiam la bela edzino de la Ministro, okcidente, ekludis la karoan trion.

La fanto estis:

NORDO
♠ A R D 2
♥ F 8 3
♦ 10 6 5
♣ R 6 2

La Ministro ludis la dekon el la fanto. Penante kaŝi sian ĝenon, la ambasadoro ne kaptis la trekon, ĉar li deziris reteni la karoan ason kiel enirilon por gajni poste per la trefoj.

La Ministro ludis la keran trion, (sur kio la ambasadoro ludis sian dekon) kaj finesis per la damo, sed lia edzino okcidente havis la reĝon. Denove ŝi ludis karoan. Ĉi tiun fojon la ambasadoro prenis per la aso kaj ludis trian rondon de karoj. La Ministro prenis per la reĝo.

Tiam la Ministro ludis kerojn kaj kiam lia edzino ludis la seson, finesis per la oko. Tiam li enkasigis tri trekojn en pikoj kaj (pro la revelo de la ambasadoro, ke li deziris, kaj la fakto, ke lia partnero ne ekludis trefojn) sciis, ke li atingis la jenan situacion:

	NORDO	
	♠ 2	
	♥ F	
	♦ -	
	♣ R 6 2	
OKCIDENTO		ORIENTO
♠ F		♠ -
♥ 9 6 4		♥ -
♦ F		♦ -
♣ -		♣ A D F 10 9
	SUDO	
	♠ -	
	♥ A 7	
	♦ -	
	♣ 8 5 4	

La Ministro ekludis malaltan trefon. Tio devigis la ambasadoron preni, kaj daŭrigi trefojn. Post la aso kaj alia trefo la ministredzino estis stringita. Se la Ministro ne ludus la trefan ason, sed elirus per la damo, Okcidento havus nur pikon kaj du kerojn kaj la fanto gajnus per la reĝo, enkasigus la keran bubon kaj elirus per la pika duo. Jen la tutaj manoj:

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO STATUTAMENDO AKTO POR KORPORACIIGO DE ASOCIOJ 1991

Ankoraŭfoje AEA devas amendi sian Statuton por konformi al kondiĉoj postulataj en Parlamenta Akto de 1991, rilate al korporaciaj asocioj en la Aŭstralia Federala Teritorio. Ĉi tiu Akto anstataŭas la Akton de 1953 laŭ kiu AEA iĝis Korporacia Asocio. La Akto de 1991 postulas Ĝeneralan Kunvenon ĉiun jaron, por elekti estraron kaj akcepti raportojn. La ĝisnuna Statuto de AEA tekstas pri dujara periodo, kun Ĝenerala Kunveno en la kadro de tutlanda kongreso: reguloj 15 kaj 16. La Estraro de AEA decidis ke AEA amendu la du koncernajn regulojn jene:

15. Ordinaraĵ kaj Specialaj Kunvenoj. Almenaŭ unufoje ĉiun jaron okazas ordinara Ĝenerala Kunveno de la Asocio por aŭskulti kaj eventuale diskuti la raportojn de la Estraro, por decidi pri la venonta agadmaniero kaj pri la kotizoj de la Asocio, por elekti la oficistojn kaj Estraron por la venonta jara periodo, kaj por elekti, se necese, specialajn komisionojn. Se triono de la membroj skribe petas specialan ĝeneralan kunvenon, la Sekretario aŭ alia Estrarano aranĝos tion.

16. Anoncoj. La Sekretario anoncas en la oficiala organo almenaŭ tri monatojn antaŭe, la daton kaj lokon de la ordinara ĝenerala kunveno. Ĝi okazos en la kadro de Tutlanda Kongreso, Somerlernejo aŭ Konferenco.

Ĉi tiuj proponitaj amendoj jam estas aprobitaj de la Juĝregistrejo en Brisbano.

Por certigi ke Korespondkursoj de AEA estu liberaj je vendimpostoj, aldona Regulo 28A estas proponata por oficialigi Korespondkursojn:

28A. Korespondaj Kursoj kaj Lernejoj. La Asocio organizas Korespondajn Kursojn kaj lernejojn por la tuta lando, kaj nomas komisiitojn por administri instruprogramojn por klasoj, por aljuĝi atestojn pri niveloj de studatingoj, por taksu nivelojn rilate al instrumentoj kaj instruiloj. La Estraro nomas administranton kiu intertraktas kun komisiitoj pri ĉiuj aspektoj de instruado, kaj la administranto indikas al la Estraro necesan agadon por atingi la instrucelojn.

Post eldono en *The Australian Esperantist* anoj perpoŝte voĉdonos per ilo inkludita en la sama eldono de la nacia revuo. Sukcesaj amendoj ebligos starigon de Ĝenerala Kunveno dum la Somerlernejo en januaro, 1993, kaj tiel konformos al la devigaj kondiĉoj en la 1991-a Akto.

Ray Ross, Sekretario

Sur p.c vi trovas oficialan balotilon. Bonvolu indiki vian deziron, subskribu kaj sendu al la Sekretario de AEA, Ray Ross, PO Box 313, Sunnybank Qld 4109.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION PROPOSED AMENDMENTS TO THE CONSTITUTION

The AEA must amend its Constitution in order to conform to conditions required by the Parliamentary Act 1991 concerning associations incorporated in the Australian Federal Territory. This Act replaces the Act of 1953 under which the AEA was incorporated. The Act of 1991 requires a yearly General Meeting to elect officers and accept reports. The current Constitution of AEA, sections 15 and 16, speaks of a two-yearly period, with a General Meeting taking place within the framework of a national congress. The Executive Committee of AEA has decided on two amendments to the Constitution as follows.

15. Ordinary and Special Meetings. At least once each year there shall be an ordinary General Meeting of the Association to receive and discuss the reports of the Executive, to decide on future policy and the subscriptions of the Association, to elect office-bearers and the Executive for the ensuing yearly period and to elect as necessary special commissions. If a third of the members in writing request a special General Meeting it shall be arranged by the Secretary or another member of the Executive.

16. Notices. The Secretary shall announce, at least one month in advance, the date and place of the ordinary General Meeting. It shall normally take place in the framework of a Nation-wide Congress, Summer School or Conference.

To ensure tax exemption from its correspondence courses the Association also proposes a further amendment:

28A. Correspondence Courses and Schools. The Association shall organise Correspondence Courses and Schools Australia-wide and appoint commissioners to administer class syllabuses, to award certificates for student levels of achievement, and to assess levels of teaching methods and aids. The Executive shall appoint an administrator to liaise with the commissioners regarding all aspects of instruction, and the Administrator shall then indicate to the Executive action necessary to achieve instruction aims.

After publication in *The Australian Esperantist* members will vote by post, using a ballot included in the same issue of the national journal. Successful amendments will make it possible to hold a General Meeting during the January 1993 Summer School and will therefore conform to the conditions required by the 1991 Act.

An official ballot is included, on p.C. Please indicate your wishes, sign, and forward to the Secretary of AEA, Ray Ross, PO Box 313, Sunnybank Qld 4109.

[Please note that in the event of any conflict arising from varying interpretations of the Esperanto and English texts of these amendments, the Esperanto text is, by virtue of Section 5 of the Constitution of AEA, the official definitive text.]

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO
AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

BALOTILO/BALLOT
JULIO 1992/JULY 1992

Pri la proponitaj amendoj al reguloj 15 kaj 16 kaj la enhavo de nova regulo 18A, por la Statuto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (eldonitaj en numero 274 de *The Australian Esperantist*) mi voĉdonas jene: (Kruco sufiĉas.)/Concerning the proposed amendments to articles 15 and 16 and a new article 18A, for the Constitution of the Australian Esperanto Association, (as published in issue number 274 of *The Australian Esperantist*) my vote is as follows: (an X will suffice)

Pri regulo 15/Article 15: Por/For

Kontraŭ/Against.....

Pri regulo 16/Article 16: Por/For

Kontraŭ/Against.....

Pri regulo 18A/Article 18A: Por/For

Kontraŭ/Against.....

Subskribo/Signature:.....

Dato/Date:.....

Sendu al:

Send to:

La Sekretario
Aŭstralia Esperanto-Asocio
PO Box 313
Sunnybank QLD 4109

THE OTHER SIDE OF THIS LEAF CONTAINS THE OFFICIAL BALLOT FOR PROPOSED AMENDMENTS TO THE CONSTITUTION OF THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION. WE REQUEST ALL MEMBERS OF THE ASSOCIATION TO DETACH THIS LEAF, FILL OUT THE BALLOT AND SEND IT TO THE SECRETARY OF AEA.

SUR LA ALIA FLANKO DE ĈI TIU FOLIETO ESTAS OFICIALA BALOTILO POR LA PROPONITAJ AMENDOJ DE LA STATUTO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO. NI PETAS ĈIUN NIAN MEMBRON ELŜIRI ĈI TIUN FOLIETON, INDIKI SIAN AKORDON/MALAKORDON KUN LA AMENDOJ, KAJ SENDI LA BALOTILON AL LA SEKRETARIO DE AEA.



WINDOW ON THE WORLD



*In China, at 10.45 am. on September 29, 1991, the first Chinese amateur Esperanto radio station went on the air, at the Children's House in the Jianggan district of Hangzhou (capital of Zhejiang province). Participating in the broadcast were Esperantists in Hangzhou and Tokio. The broadcasting equipment was a gift from a visiting Japanese Esperanto group.— From *El Popola Ĉinio*, Feb. 1992. [NB: amateur Esperanto broadcasts have been on air elsewhere for many decades, but such communication with China has been rare until now.]*

*The Zhengzhou Medical College in Henan Province has introduced Esperanto as an obligatory subject for its students. The first course began in October 1991, taught by Zhang Haoguang, rector of the college and president of the Esperanto Association of Henan Province.—From *El Popola Ĉinio*, April 1992.*

*The Qindao Watch Factory has released a collection of ten "Esperanto style" watches, ranging in price from A\$32.00-48.00. The watches portray variations on a world globe with the word Esperanto, and in some instances the Esperanto green star emblem. Two sales agents have been appointed: Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende, Belgium (Fax: [059] 802342) and Jack Snarberg, Johan Skyttes Väg 14, S-55448 Jönköping, Sweden (Fax: [036] 113799). Photographs of the models available, with a variety of watch bands, featured on the back cover of *El Popola Ĉinio* April 1992.*

Still in Qindao: the first hotel in China to have all staff fluent in Esperanto has opened in time for the 1992 Pacific Esperanto Congress to be held in that city 17-22 August. It has 112 beds in 44 rooms.

Venezuela: The eightieth anniversary of the Venezuelan Esperanto Association is to be celebrated in Caracas at the association's jubilee congress October 17-18.

Grants available: The Esperantic Studies Foundation [U.S.A.] initiated a program of scientific grants in November 1991. Grants are available for scientific training and for research aimed at solving problems, producing reports and conferences, and improving scientific and educational skills in interlinguistics and Esperantic studies.

*The application process is informal, with no deadlines. First review ESF's interests as represented in Issues 1-3 of *Esperantic Studies* (available on request from ESF, 3900 Northampton Street N.W., Washington DC 20015 USA). If your work falls within ESF's interest area, write a letter describing your proposed activity and the support*

you will require. Include a sample of your prior work. Send a copy to the ESF office and to any member(s) of the Board of Directors [addresses listed in *Esperantica Studies*] with expertise relevant to your proposal. Proposals are evaluated nondiscriminatorily on the basis of the scientific merit of the proposed and prior work of the applicant, ESF's current scientific interests, and ESF personnel's ability to supervise or evaluate the proposed work.

The 1992 Hungarian telephone book has Esperanto instructions for using the phone, along with the same instructions in Hungarian, English, German, French, and Russian. Because the workings of the telephone system vary from country to country in Europe, the instructions in Esperanto fulfil a real need. (From *Eventoj* 1992 no.4.—It's not clear whether this refers only to Budapest, or to the whole of Hungary.)

Ukraine: In Slavjansk last year a new (for the ex-USSR) type of school of advanced education was established, the All Union Institute of Administration, providing courses in management. As of September last an Esperanto division has been part of the school. Australians might need to keep in mind that the one-time USSR contained an extraordinary ethnic mix with an abundance of languages, so that Esperanto has for some time served as a link for communication between the Republics.

Russia: On 24-28 May the Symposium on "The Pacific: Language, Culture and Cooperation" was held in Vladivostok just one week after explosions temporarily closed down the city. The Symposium was organised by the Vladivostok Esperanto Club and the International Cultural Workshop of Tokio, primarily as a "poor man's version" of the Pacific Esperanto Congress to be held in Qindao, China, in August. (Few residents of the CIS can afford trips out of the country under present economic conditions.) The choice of Vladivostok for the venue was significant symbolically since until the start of this year Vladivostok was a closed city off limits to foreign and USSR visitors alike. Paradoxically, the Vladivostok Esperanto Club is the oldest Esperanto society in Asia, having been founded in 1891, just four years after the first booklet on Esperanto was published in Poland. This year's Symposium attracted attention not only from local newspapers and TV but was also reported by TASS.

Australia: Dr Donald Broadribb, a psychoanalyst in Western Australia and editor of *The Australian Esperantist*, has been elected to the Akademio de Esperanto (Academy of Esperanto). This world-wide body of 45 expert Esperantists is charged with supervision of the evolution of the language. It is an independent body, originally set up by the first World Congress of Esperantists in Boulogne-sur-Mer, France, in 1905. It is a self-perpetuating body whose members are elected for ten year periods.

Our Correspondence Courses by John Moore

1. Introductory Course—Bonan Tagon

What makes a good introductory course? Just as a new house, dam or cathedral needs a solid foundation, so each new student of any language should receive an adequate grounding in the basic principles of that language, before proceeding further.

As all teachers know, language learning consists of around 5% theory and 95% practice (with Esperanto, more like 1% to 99%). We learn a little, practise it, learn a little more and practise that also, thus keeping ahead of the constant, natural forgetting which goes on all the time, and establishing a solid foundation of basic knowledge on which we can build.

AEA's first correspondence course, *Bonan Tagon*, is designed to work in just that way.

100% Australian apart from its British dictionary, *Bonan Tagon* was originated as a school course, by a professional teacher then actively teaching Esperanto. Now adapted to suit all comers from all backgrounds, its emphasis remains on firstly ensuring correct pronunciation—largely a matter of remembering which letter has which sound, out of the few which differ from English—while gradually introducing word-building and sentence-construction skills with simple translations between English and Esperanto.

Its 46 pages are sprinkled with little rhymes, songs, and "how to say it" reminders, reinforcing its 3rd-generation cassette on which all words and phrases used are clearly spoken. Often a little rhyme will stay in the memory long after the point which it illustrates might otherwise have been forgotten.

Its companion booklet *Mia Bildlibro de Esperanto* gives extra practice with basic, correct Esperanto sentence-forms (not merely word-for-word translations) and with the practical use of several correlatives and of the ending -n which is such an integral part of Esperanto. *Mia Bildlibro* gives some of that "mechanical repetition" which seems to be an essential part of learning to use a language, as distinct from just knowing all about it.

The Nixon two-way dictionary issued with *Bonan Tagon* gives not only words, but also many phrases illustrating their correct usage. The Nixon should be retained for use also with our Course Two, *Jen Nia Mondo*, which does not have a dictionary of its own.

Experienced linguists work through *Bonan Tagon* quickly; people unused to study take longer—but all enjoy it, and gaining confidence, want to learn more. Having worked through *Bonan Tagon* they are well equipped to do so.

John Moore is Director of Correspondence Courses for the Australian Esperanto Association. He can be contacted at 7 Pelican Street, Emu Park Qld 4702.



BOOKS FOR REFERENCE



by DONALD BROADRIBB



The student of any foreign language is faced with a dilemma: where to find reliable, manageable dictionaries (eg. both English-to-Esperanto and Esperanto-to-English); a large, all inclusive dictionary in the foreign language itself; and a good reference book on that language's grammar. A number of small Esperanto dictionaries are available for beginning students. For the more advanced student the choice is very limited.

The best modern *Esperanto-English Dictionary* is that by M.C. Butler. As its title suggests, it is a "one-way" dictionary; that is, it helps you find the meaning of Esperanto words but is of no help if you want to find the Esperanto equivalent for an English word. Its 300 closely printed pages of fine print use a bewildering array of abbreviations, and manage to contain all the Esperanto vocabulary in common usage, along with many helpful hints on word usage. Butler was a long-time member of the Akademio de Esperanto. It is unfortunate that the dictionary has not been updated in the course of its reprints, but it still serves its purpose well. It costs \$15.30 plus postage from the AEA Libroservo, P.O. Box 230, Matraville NSW 2036.

There is at present *no* large scale English to Esperanto dictionary in print. An American, Peter Benson, has for some years been working on a *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*, but no date for publication has yet been set. Privately obtained copies of the computer disks for the *CEED* indicate that it will fully complement Butler's Esperanto to English dictionary mentioned above. In the meantime the now very out-of-date *English-Esperanto Dictionary* by Fulcher & Long must suffice (\$12.50 paperback, \$17.60 hardback from the AEA Libroservo).

Two large all-Esperanto dictionaries serve the advanced student well. The *Plena Ilustrita Vortaro*, published in 1970 (with a small supplement in 1987) is the largest and most reliable dictionary with definitions entirely in Esperanto. Its price reflects its voluminousness, \$122.60 plus postage, from the AEA Libroservo. (The reprint of an earlier edition from the 1930's, titled *Plena Vortaro*, is easier on the pocket at \$24.60 but is very out of date.)

Fortunately there is another all-Esperanto dictionary, not as comprehensive as the *PIV* but much cheaper (\$64.00), the *Esperanta Bildvortaro*, ed. Rüdiger Eichholz, published in 1988. This consists of drawings of thousands of objects in everyday use together with their Esperanto names. The objects are classified according to use, and a comprehensive index lists the Esperanto names alphabetically with the reference number(s) for each picture.

For a reference grammar, M.C. Butler's excellent *Step by Step in Esperanto*, now in its 9th edition, will be available in August from the AEA Libroservo at about \$19 and is as good as you can get in English.

NORDO
 ♠ A R D 2
 ♥ F 8 3
 ♦ 10 6 5
 ♣ R 6 2

OKCIDENTO
 ♠ F 8 7 4
 ♥ R 9 6 4 2
 ♦ F 9 4 3
 ♣ -

SUDO
 ♠ 6 3
 ♥ A D 7 5
 ♦ R D 7
 ♣ 8 5 4 3

ORIENTO
 ♠ 10 9 5
 ♥ 10
 ♦ A 8 2
 ♣ A D F 10 9 7

Veis la ministredzino: "La ekludo en senatutoj estas ĉiam malfacila!".

PROBLEMO

La ambasadoro en la suda seĝo devas preni la restantajn 7 trekojn. Pikoj estas atutoj. Jen la situacio:

NORDO
 ♠ A D 6
 ♥ -
 ♦ A 8 4
 ♣ 3

OKCIDENTO
 ♠ R 2
 ♥ R
 ♦ F 7 6
 ♣ R

SUDO
 ♠ F
 ♥ A F 2
 ♦ D 10
 ♣ A

ORIENTO
 ♠ 7 4 3
 ♥ D
 ♦ 5 3 2
 ♣ -

Kiel la ambasadoro povas ekludi kaj preni ĉiujn sep trekojn?

SOLVO

1. La ambasadoro ekludas la karoan dekon. Se okcidento ludas la fanton li prenas per la aso, kaj la oko estos bona post kiam la damo prenis trekon. Se okcidento ne ludas la fanton la ambasadoro finesas la okon, kiu venkas.

2. La ambasadoro ludas la karoan kvaron el la fanto, kaj prenas per la damo en sia mano.

3. Tiam li ludas la keran ason el sia mano kaj atutas en la fanto per la pika seso.

4. El la fanto li ludas la restantan karoon (la ason aŭ okon), kaj forjetas la trefan ason el sia mano.

5. El la fanto li ludas la trefan trion. Oriento devos ludi atuton, sed la ambasadoro superatutas per la fanto.

6. Li ludas keron el sia mano. Se okcidento ludas la atutan reĝon, li ludas la ason en la fanto. Se okcidento ludas la pikan duon, la ambasadoro atutas per la damo, ambaŭokaze kolektante atuton ankaŭ el la orienta mano.

7. Fine la ambasadoro ludas la restantan atuton (ason aŭ damon) el la fanto.

[D-ro Harry kompilis leksikoneton de briĝ-terminoj. ✉ D-ro Ralph Harry, 319 Bayview Gardens, 39-42 Cabbage Tree Road, Bayview NSW 2109.] □

Via Redaktoro: Akademiano

En majo Donald Broadribb, via redaktoro, estis elektita en la Akademion de Esperanto. (Li antaŭe estis membro en la periodo 1973-1982.)

[Bedaŭrinde nia kolego Odlo Bokserp, kiu ricevis -36 voĉojn, ne estis kunelektita. Odlo promesis, tamen, senofice kunlaboradi en la Akademio almenaŭ tiel efike kiel en la preparado de *La Aŭstralia Esperantisto*.]

LA VLADIVOSTOKA SIMPOZIO INAŬGURIS NOVAN FAZON DE LA ESPERANTO-MOVADO EN LA AZIA-PACIFIKA REGIONO

raportas YOSHIMI UMEDA



En la urbo Vladivostoko, situanta en malproksima orienta parto de Rusio, kunvenis 80 esperantistoj el Ĉinio, Japanio, Koreo kaj Rusio por sukcesigi Internacian Simpozion laŭ la temo "Pacifiko: Lingvo, Kulturo, Kunlaborado" dum kvin tagoj, de la 24-a ĝis la 28-a de majo, 1992. Tiu ĉi Simpozio estis kunvokita de la Esperanto-Klubo "Pacifika" en Vladivostoko kaj la Internacia Kultura Laborejo en Tokio por honori la centjaran funkciadon post 1891 de la unua esperantista organizaĵo fondita en Azio en la rusa ĉemara urbo kaj por levi la kurtenon de la Esperanto-movado sur la nova scenejo prezentata post drasta ŝanĝiĝo de la monda situacio.

Nur semajnon antaŭe la urbo Vladivostoko altiris la atenton de la mondo pro akcidenta eksplodo de municiaj tenejoj de la rusa mararmeo, pri kio la amaskomunikiloj informis vaste tra la mondo kiel katastrofon kaŭzantan eĉ la evakuon de la loĝantoj kaj malpermeson de vizitantoj. Tio ĉi aliflanke timigis la eksterlandajn partoprenantojn ekvojaĝi tien. Malgraŭ tio la Simpozio povis sekure okazi, dank' al la klopodado de la lokaj organizantoj sub la aŭspicioj de oficialaj instancoj de la urbo kaj regiono.

Dektri simpozianoj el Japanio kaj Koreo kolektiĝis en la urbo Niigata ĉe

la Japana Maro la 22-an de majo kaj karavane ekflugis al la rusa urbo Ĥabarovsko, kie atendis la reprezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo, fluginte de Harbino. Post unutaga ekskurso tie, la eksterrusiaj partoprenantoj trajne alvenis en la simpozian urbon, en kies ĉefstacidomo atendis dekoj da rusaj esperantistoj kaj la reprezentantoj de la Pac-Komitato de la Primorje-Regiono, kiuj varme akceptis la alvenintojn per tradicia rusa bonveniga ceremonio.

Kiel simpoziejon la urba instanco ofertis tre dignan Doman de Intertraktado, uzatan kutime por diversaj oficialaj kunsidoj. Aldone en la malferma soleno de la simpozio salutis la reprezentantoj de la regiona parlamento kaj la urba filio de la Rusia UNESKO-komisiono, kiuj komune montris kaj substrekis sian fortan subtenon de la simpozio.

Rilate la priatenton al la simpozio flanke de la amaskomunikiloj, jam la antaŭan tagon, la 23-an de majo, du regionaj ĵurnaloj aperigis tre favorajn artikolojn pri la simpozio, anoncante pri la Esperanto-lingva prezentado en la municipa pupteatro kiel unu el la kulturaj prezentaĵoj dum la simpozio.

Krome, raportistino de TASS, la plej granda novaĵagentejo rusa, ĉeestis la sesiojn de la simpozio, intervjuis la simpozianojn kaj sendis la raportojn enlanden kaj eksterlanden. Ne mankis ankaŭ la filmistoj kaj raportistoj de la regiona televida stacio, kiu dissendis

en la novaĵhoroj pri la internacia simpozio de esperantistoj okazanta en la urbo.

La urbo Vladivostoko disvolviĝis kiel malproksimorienta ĉemara haveno enira kaj elira de Rusio por internaciaj kontaktoj, sed dum la lastaj jardekoj de la Sovetunia epoko la urbo estis fermita kiel grava marmar-bazo kaj aktualaj informoj pri la urbo absolute mankis al la ekstera mondo kiel izolita loko, eĉ por sovetianoj, kies vizitado estis severe limigita. Nur en januaro 1992 la urbo estis malfermita kaj la urbanoj nun povas libere kontakti la eksteran mondon. En tiaj cirkonstancoj okazis la simpozio kun subteno de oficialaj instancoj, kio altiris la atenton de multaj homoj pri Esperanto kaj vekis ankaŭ la dormantajn esperantistojn en tiu ĉi regiono, kiuj sin anoncis en la simpozio.

La simpozio konsistis el partoj sesia, kultura, kaj interamika. En tri sesioj dekkelkaj reprezentantoj el Ĉinio, Japanio, Koreo kaj Rusio (el ok regionoj kaj urboj) prezentis siajn referaĵojn laŭ la simpozia temo po dekkvin minutojn kaj preskaŭ ĉiuj partoprenantoj elpaŝis per siaj komentoj, proponoj kaj opinioj, tiel ke la simpozio ĉiam plenigis tre arda etoso de kunlaboremo. Kultura parto abundis: tri koncertoj de profesinivelaj gekantistoj impresis la partoprenantojn; ĉinaj kaj koreaj kantoj kaj surpriza magia spektaklo fare de la simpozianoj; ĉarmaj prezentaĵoj ĉe la Infana kaj Junulara Centro. Aparte menciindas la unu-hora Esperanto-lingva prezentado fare de municipa pupteatra trupo, pri kies debuto jam la ĵurnaloj atentigis la urbanojn invitante spekti.

La simpozianoj aparte vizitis muzoejn kaj geografiajn instituton, en kiu troviĝas ne nur lokaj raraĵoj sed ankaŭ historiaj dokumentoj prilumantaj la rilaton inter Esperanto kaj la urbo Vladivostoko.

Interamikiĝo okazis vikle kaj entuziasme inter rusaj kaj eksterlandaj partoprenantoj kaj en la simpozioj kaj en la hotelo kaj dum la ekskursoj.

En la lasta sesio la simpozianoj subskribis la jenan rezolucion, kiu ja inaŭguras novan fazon de la Esperanto-movado en la Azia-Pacifika Regiono:

Honore al la centjara funkciado de la Vladivostoka Esperanto-Klubo "Pacifiko" kiel la unua Esperanto-Asocio en Azio post 1891, kunvenis en la urbo Vladivostoko okdek esperantistoj reprezentantaj la jenajn landojn, regionojn kaj urbojn: Ĉinio, Japanio, Koreo kaj Rusio (el Aldano, Arĉomo, Habarovsko, Kamĉatko, Komsomolsk-sur-Amuro, Magadano, Moskvo kaj Vladivostoko), diskutis pri la supre menciita temo, kaj konfirmis pri la sekvantaj punktoj kiel aferoj komunaj al ĉiuj partoprenantoj.

(1) Pri la necesaj paŝoj praktikaj por antaŭenigi disvastigon de Esperanto en la Azia-Pacifika Regiono;

(2) Pri regula okazigo de similaj aranĝoj kiel la nuna Simpozio en la urbo Vladivostoko, ĉar ni konstatas, ke tiu ĉi urbo prezentas per geografia situo tre konvenan lokon por ligi esperantistojn de la Azia-Pacifika Regiono kun tiuj de okcidentaj kaj aliaj partoj de la mondo.

(3) Pri konkretigo de komuna kunlaborado inter esperantistaj grupoj de la Azia-Pacifika Regiono surbaze de la informada kaj turisma interŝanĝado, utiligante la eblecojn kaj potencialojn de Esperanto; kaj □

(4) Pri plioftigo de interesperantista vizitado trans diversaj landlimoj en la mondo per reciproka helpado materia kaj morala.

Por realigi la supre menciitajn punktojn ni proponas eldonon de komuna informilo por esperantistoj en la Azia-Pacifika Regiono, kaj ni komisiis al la organizintoj de la nuna Simpozio, nome la Esperanto-Klubo Pacifiko en Vladivostoko kaj la Internacia Kultura Laborejo en Tokio, interkonsiliĝi kaj konkretigi la suprajn punktojn komunikante kun esperantistaj grupoj reprezentataj en la nuna Simpozio. Tiurilate ĉiuj partoprenantoj jam esprimas sian plenan subtenon al la nomitaj komisiitoj pri la iniciatoj.

Ĉiuj partoprenantoj aparte esprimas sian grandan dankon al la Pac-Komitato de la Primorje-Regiono pro la malavara aŭspiciado realigi la nunan Simpozion.

Ni ankaŭ notas kaj gratulas al la movado Oomoto en Japanio pri la centjarigo de

ĝia fondiĝo, kiu koincidas kun la centjara funkciado de la unua Esperanto-Asocio en Azio.

Ni sendas pere de la ĉina delegacio niajn korajn bondezirojn al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazonta ĉi-aŭguste en la ĉina urbo Qindao por ĝia granda sukceso.

Ni, simpozianoj, samtempe esprimas nian moralan subtenon por la sukcesa okazigo de la 79-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, Koreo, en 1994.

Profitante la nunan okazon ni montras nian profundan simpatian al la civitanaro de Vladivostoko pri la neatendita akcidenta eksplodo de municioj kaj deziras al ili rapidan regajnon de bona humoro kaj pli prosperan vivadon.

La 28-an de majo, 1992.

[Subskribis: Aleksandro Titajev kaj Yoshimi Umeda, prezidantoj de la Simpozio, kaj reprezentantoj de la landoj, regionoj kaj urboj supre menciitaj.] □

ALDONO AL LA LIBROKATALOGO 1992

- 678: *Al la Tero Returne*. Gilbert R. Ledon. Ekologio. 160p., broŝ. \$14.90.
 193: *Ekologio: La Alia Verda Movado*. Red. Ralph Harry. 64p., broŝ. \$8.00.
 150: *Facetoj*. Rejna de Jong. 42p., broŝ. \$7.65.
 33: *Fundamenta Krestomatio*. Zamenhof, L.L., red. Gaston Waringhien. 446p., bind. 18a eldono. \$41.50.
Manuskriptoj por Bruligo. Ljubomir Trifonĉovski. 32 paĝetoj. \$4.40
 134: *Moroj de Ĉinaj Nacimallimultaj*. Red. Li Qiang. 105p., broŝ. \$2.40.
 005: *Rakontoj pri la Historio de la Ĉinaj Medicino kaj Farmakologio*. Diversaj aŭtoroj. Tr. Liao Zhigen. 258p., broŝ. \$6.90.
 198: *Sennaciece Tra Nia Mondo*. Gilbert R. Ledon. 224p., broŝ. \$19.20.
 [Step by Step in Esperanto. Montague C. Butler. Lernolibro. 9a eldono. 280p., bind. Havebla en aŭgusto. Prezo ĉ. \$19.00. Recenzo aperos en nia septembra numero.]
 657: *Ŝirpecoj (anstataŭ monumento)*. Red. Chr. Declerck. Poemoj. 168p., broŝ. \$16.20.
Tabuaj Vortoj en Esperanto. Red. Ljubomir Trifonĉovski. 32 paĝetoj, broŝ. \$3.30.
 579: *Winnie-la-Pu*. A.A. Milne. Dua eldono. 164p., bind. \$23.50.

BIBLIOTEKO

informas RALPH HARRY



a Biblioteko de AEA ricevis, lastatempe, la sekvantajn librojn, kaj dankas la donacintojn:

Lilli Giloteaux: *Arboj—Plurlingva Terminaro*, 2a eldono, 1991. La terminaro estas en la lingvoj Esperanto, latina (scienca nomo), germana, franca, nederlanda kaj angla. Entute estas 62 arboj, ĉiu kun bildo de la arbo kaj de la folio/nukso. La Enhavo (indekso) donas la nomojn laŭalfabete en Esperanto, la latina, germana kaj franca, sed ne en la angla aŭ nederlanda. Ĉiu ĝardenisto aŭ amanto de la naturo trovos ĉi tiun libron tre utila. Eldonis la aŭtoro, ĉe 3/6 Allé Béranger, F-591700 Croix, Francio.

Ada Sikorska-Fighiera: *De Tajgo al Minaretoj—el la Taglibro de 11-Jarulino*. Esperantotur, Bydgoszcz, 1991. 36p. Ĉi tiu libreto rakontas pri la deporto de pola familio dum la Dua Mondmilito al Kazahstano, kaj pri iliaj vojaĝoj poste al Irano, Libano kaj Britio. S-ino Sikorska-Fighiera en sia enkonduko substrekas, ke ĝi ne pretendas esti historia priskribo de la periodo. Ĝi komence estis taglibreto sendita de 11-jara knabino al sia onklino en Lvovo. Sed ĝi ja estas fascina dokumento.

Brian Merriman: *La Noktmeza Kortumo*. El la originala irlandia lingvo tradukis Albert Goodheir. Vulpo-Libro/W.F. Pilger, Lelystad, Nederlando, 1980. Brian Merriman estis la lasta granda poeto kiu verkis en la irlandia lingvo. Li mortis en 1805. La temo de ĉi tiu longa (25paĝa) poemo

(sonĝo pri gigantino kaj fea reĝino) venas el la pratempa kelta mitologio. Ĝia loko en la irlandlingva literaturo estas klarigita en bonega antaŭparolo de Albert Goodheir. Ĉi tiu notas, ke Merriman uzis internajn asonancojn, kiujn li ne povis reprodukti, sed ke li provis redoni la kvarakcentan version kun fina asonanco. La lingvaĵo de la traduko estas, kvankam poezia, klara, kaj kvankam puritano aŭ katoliko eble eĉ en 1992 ne aprobus la filozofion de la aŭtoro ĝi estas ege interesa verko.

Antologio de la Serba Parola Literaturo. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1991. 345p. Ĉi tiu estas grava antologio de lirika poezio, eposa poezio, rakontoj, proverboj kaj enigmoj de la serba popolo. La tradukinto de preskaŭ ĉiuj lirikaĵoj, kaj de multaj rakontoj, kaj redaktoro de la antologio estas Zivko Ivanović. Skipo helpis pri la elekto de la materialo kaj la traduko de la eposoj. Estas 33paĝa enkonduko de Snežana Samardžija. Kelkaj el la proverboj estas, aŭ similas al, internaciaj (*"Al donacita ĉevalo oni dentojn ne rigardas"*¹; *"malplena barelo pli laŭte sonoras"*²) sed plejparte ili verŝajne rivelas la unikan serban spiriton (*"Malplena sako pli pezasa ol plena"*). Entute ĝi estas bona aldono al la kolekto de antologioj en Esperanto de nacia literaturo. □

¹En *Proverbaro Esperanta* Zamenhof inkludis (N^o 15 en la Stafeto-eldono 1974) *"Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras"*.

²En *Proverbaro Esperanta* n^o 148: *"Barelo malplena sonas plej laŭte"*—la Red.

EK AL LEG'! LEGOLIBRO POR PERFEKTIGO EN ESPERANTO

recenzas VERA PAYNE



**k al Leg'! Legolibro por
Perfektigo en Esperanto.**
Red. Hektor Alos. Sofio:
Bulgara Esperanto-Asocio,
1991. Kajero 1, 92p.
broŝ.

En la enkonduko la kompilintoj klarigas, ke mankegas taŭgaj Esperanto-instruiloj en Bulgario. Simpatiaj homoj tuj vidas modest-aspektan libreton, el recikligita papero (hura!) kun blanka, karta kovrilo surprisita per nur unu koloro. Bedaŭrinde, kredeble por teni malalta la koston, la eldonistoj utiligis tre malgrandajn preslitterojn. Verŝajne ankaŭ mankis inko, ĉar kelkaj paĝoj en la komenco de la libro estas tiom pale presitaj, ke miaj ne-plu-printempaj okuloj tre laciĝis dum mi legis, malgraŭ uzo de okulvitroj kaj forta lumo. Plue, ankaŭ por konservi spacon, oni malŝparis eĉ ne spacon de unu linio! Tuj post la tri steletoj signifantaj la finon de iu ero, komenciĝas enkonduko al la sekvonta. Ekzemple, je la fino de p.69, post pluraj paĝoj de poezio Kalocsaya, troviĝas unu sola linio pri Ĉeĥo, Stefo Urban, kaj sur la sekvanta paĝo troviĝas ties verko. Jes, mi konsterniĝis!

Kaj la enhavo? La legaĵojn al mi novaj mi ja trovis interesaj. Ĉu vi scias kial estiĝis la kibuĉoj en Israelo? Aŭ kiu fariĝis la unua instrulingvo en la groenlandaj lernejoj? Aŭ ke, "en Koreio [la verkinto] plurfoste aŭdis

seriozajn plendojn pri manko de maljunaj Esperantistoj"! Ĉu vi volas scii kie troviĝas tricent mil enbalzamigitaj kato-kadavroj? (Kaj, ke Louis Pasteur opiniis la katon "la plej pura besto kun malplej da virusoj kaj baciloj"?). Ĉu Jean Forge estis franco? Kio estas burasko? Ĉu vi iam lancinis? Aŭ sentas sin kiel feĉon? Ĉu indas esti malgrasa kiel ŝindo? Al ĉi tiuj kaj pluraj aliaj demandoj vi trovas la respondojn en ĉi tiu maldika volumo.

Se vi interesiĝas pri fenomenoj pri kiuj ekzistas diversaj hipotezoj sed neniuj ĝusta klarigo, vi nepre trovos la koncernajn artikolojn elstaraj. Precipe al mi plaĉis la verketoj de la majstra Johán Valano. Ĉu restas iu Esperantisto kiu ne konas la diversajn legaĵojn de Profesoro Claude Piron? Sur p.25 de *Ek al Leg'!* troviĝas bonega resumo pri lia vivo kaj verkoj. Sekvas "La miriga skatolo" kiu estas ne-resurmetebla ĝis oni ĝin finlegas. Troviĝas kvin frandaĵoj (liaj karakteroj ludas kartojn "en plej paca militeto", posedas "pensujon" dum ni ordinaruloj nur havas menson...) Pironaj ĉi tie. "Valano uzas en siaj rakontoj lingvaĵon profunde Esperantan. Li scias, ke ĉie homoj preferas la apartaĵojn de sia lingvo, kaj konsekvence li verkas per tipe Esperanto-formoj..."

La bone konata (franca) esprimo, "Ju pli la aferoj ŝanĝiĝas, des pli ili restas la samaj" estas bone ilustrita en la artikolo "Tra Usono" verkita de Edmond Privat post sia vizito al tiu

lando en 1907. "Strange estas kiom rapide oni tie kutimiĝas rigardi Eŭropon kiel malgrandan, malnovan parteton de la mondo, kie tridek nacioj kaj nacioj konstante disput-aĉas kaj interbatalas." Kaj: "Multajn ecojn de la usona karaktero mi admiris kaj ŝatis, aliajn ne. La gastameco kaj amikeco al la gastoj estas ĉarma. La egaleco inter viroj kaj virinoj en publika vivo tre plaĉis al mi, sed la rasistaj antaŭjuĝoj kompreneble ne povis plaĉi al juna Zamenhofano." (p.51). Kaj sur p.63 Julio Baghy per sia "Estas mi Esperantisto" elvokas la saman opinion: "Ŝajne malmultaj aferoj pliboniĝis de tiam..." "Ĉe samovaro" kaj "En ĉi murdepoko" taŭgas hodiaŭ en Eŭropo kiel kiam Baghy kaj Kalocsay ilin verkis.

Plaĉe lertaj estas la de Kalmán Kalocsay poeziigitaj Ezopaj Fabloj.

"Fajron sentas mi interne" priskribas la unuan kontakton kun Esperanto fare de 16-jarulo. Sekvas inda informo pri la revuo de TEJO, *Kontakto*. Tiu gazeto enhavas legajojn laŭ kvar lingvoniveloj, kaj en *Ek al Leg'!* troviĝas pluraj ekzemploj en almenaŭ tri noveloj (agnoskitaj). Tre utila ne nur por la novulo sed ankaŭ por ni ceteraj kiuj nepre bezonas refreŝigon pri Esperantologio estas tiaj informopecetoj kiuj heroldas al ĉiu sekvonta aŭtoro, aŭ enkondukas al diversaj libroj, gazetoj kaj organizaĵoj Esperantaj.

Inter la bukedo da poemoj mi trovis kortuŝa la ampoemon de Victor Sadler (p.83) kaj korskira la "Lulkanto por gaskamero" p.81. "Apartheid" p.79 en kvar linioj klarigas ĉion klarigendan pri tiu temo. Tikle diskutinda mi trovis "Lingvoj" de Baldur Ragnarsson, kaj perfekta la elekton de la lasta

ero en la libro, poemeto de Giorgio Silfer.

"...nia emo estas iel helpi la iniciat-emajn instruistojn kaj memlernantojn per modernaj altnivelaj internaciaj materialoj nepre simplaj por perfektigo lingva kaj stila... Ĉiam...ni klopodas distri, kaj zorgis enmeti interesajn, amuzajn, fojfoje eĉ pikajn rakontojn." p.3. Verdire multaj el ĉi tiuj eroj ne estas modernaj, kaj ne-plu-nova Esperantisto probable jam legis la plimulton en aliaj antologioj, lernolibroj, legolibroj aŭ gazetoj. Sed por novuloj aŭ por tiuj kiuj ankoraŭ ne multe sin banis en Esperantoliteraturo, ĉi tiu libreto estas indaĵo. Ankaŭ por legi en klubbrondoj.

La materialo ankaŭ ne estas nepre simpla. Du vortoj tute fremdas al mi: "akaŝa" p.20 kaj "rumpa" p.85. Tute eskapas min la signifo de "rumpa jam el via into". Kaj ankaŭ "La atestoj sonas ĉiujn simile." La klarigo de vortoj ne tute kontentigas min, ekz. p.20 "ornami" signifas "beligi" (nu, jes, sed specife per aldono de io), kaj sampaĝe "bulo" signifas "ronda peco" (ĉu monero estas bulo?) Kelkaj esprimoj estas, nu, malkutimaj, ekzemple, p.59 "Mi volas klarigi al vi, ke vi iom eraris en mia persono dum tiu komuna vespero, kiun ni pasigis en mia loĝejo..." Mia pensujo boglas!

Jen plendeto kiu eble ridetigos kelkajn virojn, sed mi trovas bedaŭrinda la iom seksismajn elektojn inter p.59-62. Feliĉe tiujn erojn oni skribis antaŭ pluraj jaroj. Tamen "maĉismo"¹ vivas kaj fortas kaj estas abomeno en la urbo, en la vilaĝo, tra la tuta mondo; ĝian finan rezulton ni vidas en detruo,

¹Seksŝovinista virecismo.—la Red.

perforto, mortigo mond-vasta. Prefere tiajn "ŝercojn" ni ellasu. Ankaŭ acida estas "Vivu do L'Akademi" de Raymond Schwartz. Lerta? Jes, sed vunde negativa. Tamen, ĉar ĝi ne celas unu etan tian grupon, "Mankas krotaloj" de Wm Auld p.75 trafe plaĉas.

Domage, ke ĉi tiu lego-kajero kaj ĝia kunulo (Kajero Dua) ne havas la for-

maton de, ni diru, *Faktoj kaj Fantazioj*. Tamen, pro sia kompakteco, la libro estas plaĉe malpeza kaj certe arboŝpara! Entute, precipe por la progresanto, valora libro. Mendu ĉe AEA Libroservo.

[Recenzo pri Kajero Dua aperos en nia septembra numero.] □

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso. Korespondemuloj eksteraŭstralaziaj: Bonvolu sendi viajn korespondpetojn al la ĉisupra adreso por ebligi aperon en *The Australian Esperantist*.

♂ Igor Zalyotnov, 1/80 Bonch-Bruevich Str., Nizhny Novgorod 603009, Rusio. 25jara viro, komencanto, deziras aŭstraliajn geamikojn.

♂ Vandj Mam, Pnom Don Pessa Universitato, Kampuĉeo. 21jara studento, interesiĝas pri edukado kaj esperanta korespondado.

♂ Halina Roens, Os. Kazimierza 43/5, 62-200 Gniezno, Pollando. Edukita virino, eksinstruisto.

♂ Borjana Vasileva, Sofia-1220, PK 74, Bulgario. Deziras kontakton kun solecaj geesperantistoj.

♂ Alma Tello, Orol Dehuibide No 500, San Felipe Oaxaca Oax, Meksiko. 17jara, komencanto, ŝatas legi, muzikon, dancadon. □

HEROLDO DE ESPERANTO

KAJ LA UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO


Heroldo de Esperanto sendos senpage al ĉiu petanto ekzempleron de sia duobla numero kun ilustrita raporto pri la Universala Kongreso de Esperanto en Vieno (25 Julio — 1 Aŭgusto, 1992). Sendu vian peton al:

Heroldo de Esperanto

Via Sandre 15

I-10078 Venaria Reale (Torino)

Italio



• *Norda Prismo nun jam reaparis.* Numero 1/1992 havas 40 paĝojn malgrandajn (14x19.5cm.) kaj havas la subtitolon "Kultura revuo pri Nordio en Esperanto", kvankam oni iom larĝe difinas "Nordion" tiel ke ĝi inkluzivas la tutan mondon. Tamen la eldonantoj estas Finnaj. En numero 1, multa poezio (11p.) tradukita kaj originala, artikoloj: "Pri celkonscia modifado de la estona lingvo", "Geografio de Esperantujo" (pri ekssoveta respubliko Komi), "...La bona Dio tiel amis la skotojn" (intervjuo kun William Auld pri priskotaj ŝercoj), "En la komenco estis Heine", "Pola komponisto pri 'Persone' [la rok'bando]", "Pola prezidento en ŝercoj kaj anekdotoj" (tre maladmira ŝercaro pri Lech Walensa). Eldonas: Oy Mendo-servo Ak, Kivistöntie, 05510 Hyvinkää, Finnlando. Abonprezo: A\$19. Por tio kontaktu la AEA-Libroservon.

• *Helpo bezonata:* "Mi nomiĝas Viktor Iourkov. Mi estas rusa kaj venis al Kanado por elmigri. Mi petis agnoskon kiel 'rifuĝanto' sed Kanada registaro rifuzis min. Nun mi havas nur unu eblecon: iri en Aŭstralion, sed mi devas trovi iun (personon aŭ organizon) kiu sponsorus min. Mi estas 30-jara, mi ne estas edziĝinta. Mia ĉefa profesio estas kontisto. Mi konas lingvojn: Rusan, Francan, Anglan, Esperanton." [NB: la prezidanto de la

Esperanto-Societo Kebekia sendis rekomendleteron pri Viktor Iourkov, kiun li konas de pli ol unu jaro.—La plena letero de Viktor, kun detaloj pri li, haveblas de Ray Ross, sekretario de AEA; ankaŭ la rekomendletero el-kebekia.]

• *Zi vol lölik*—*rara Volapuka gazetserio rehabebla:* Per la represo de la revuo *Zi vol lölik* ("Ĉirkaŭ la mondo" 1888-1892) grava fontodokumento, kies kompleton posedas eĉ ne unu biblioteko, rehabeblas. Ĝi donas aŭtentikan impreson pri kulturhistorie interesa movado kaj donas panoraman rigardon al la historio kaj praktika utiligo de Volapük. La volumon prizorgas la eldonejo Georg Olms, la planata vendoprezo estas 238 DM (≈A\$200). Pliaj informoj: Eldonejo Olms, Hagentorwall 7, DW-3200 Hildesheim, Germanio.

• *Bonvolu korekti en la maja numero:* sur paĝo 2, la nomo de la eksdiktatoro rumania estis Ce aușescu, do "Ĉaŭŝesku", ne "Ĉaŭĉesku". Sur p.11 (dekstre, malsupre) legu "kaosa" ne "kaoza". Kaj sur p.13: István Ertl estas la "malnova" redaktoro de la gazeto *Kontakto*, ne la "nova". Temis pri la lasta de li redaktita numero de tiu gazeto.

• *Ankoraŭ pri Kontakto:* Nin atingis la unua numero de la renovigita gazeto *Kontakto* preparita de sia nova redak-

toro Francisco Luis Veuthey (el Argentino kaj Brazilo. Finfine eble Esperanto komencas mildigi sian eŭropocentrismon!?) La nova *Kontakto* estas tre alloga prezentita, kun multaj bone elektitaj kaj aranĝitaj ilustraĵoj, kaj plejparte presita per grandaj literoj, kio multe helpas la novesperantiston. Ĝia multkultura enhavo estas laŭdeginda. Gratulojn, Francisco! (NB *Kontakto* estas eldonata de UEA por sia junulfako TEJO. Abonojn oni povas mendi ĉe UEA.)

• **Kongresistikaj Notoj** estas la nomo de nova libro 57paĝa verkita de Gian Carlo Figliera. Temas pri la detaloj konsiderendaj kiam oni entreprenas profesinivele aranĝi kongreson aŭ alian grandskalan kunvenon. La libron disponigis Monda Turismo (Asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto), kaj estas pruntehavebla ĉe la redakcio de *The Australian Esperantist*.

• **Ĉiam juna!...** Ankoraŭ pri *Dulcie Sawkins*: En la nekrologo (*TAE* 273 p.20) pro kopieraro estis dirite ke Dulcie estis "unu el la kurantoj por la Einihovici-Premio". Nu, ja enkore, sed nelaŭĝe! La teksto devas diri: "unu el la kuratoroj de la Einhovici-Premio".

• Rilate al la Einhovici-Premio, pro la morto de Dulcie kaj la emeritiĝo de Idyss, la nuna kurataro de la fonduso estas Vera Payne, Kep Enderby kaj Andrew Raiter.

• **VERDire**, *Ekologiisma Gazeto en Esperanto*, aperigis sian sesan numeron en majo 1992. Ĉi tiu nova gazeto ankoraŭ havas nur 80 pagintajn abonantojn, 200 estas necesaj por ebligi daŭran eldonadon. La eldonanto ne havas monon por reklami la gazeton, do petas redakciojn recenzi ĝin tiucele.

Presita sur recikligita papero, 20 paĝoj A4-formataj, kun ilustraĵoj. Abono kostas 15 nederlandajn guldenojn (≈A\$11) por 4 numeroj, abonebla ĉe UEA. Ĝenerale bone redaktata (kvankam multaj mankantaj akuzativoj). Ĉefartikoloj en numero 6 estas pri la Biciklada Esperanto-Movado Internacia (BEMI); Monda Funduso de Solidareco kontraŭ la Malsato; recenzo pri la libro *Al la Tero Returne*; la Ĉarto de la Tero (verkita de Ralph Harry); Curitiba [Brazilo], urbo mirinda; La Unua Mondo vidita el la Tria Mondo; recenzo pri du komputilprogramoj priekologiaj; pri "Verdaj" Politikaj Partioj; kaj similaĵoj. Provekzempleron oni povas akiri de Jean-Claude Thumerelle, Rue Pierre de Simpel 10, B-7784 Warneton, Belgio. El numero 6 ni ĉerpas la sekvantan artikoleon:

• **Fruktoŝuko sen aldono de kondomoj...** Germanio estas unu el tiuj eŭropaj landoj kiuj pli kaj pli zorgas pri sia (jam duondetruiĝinta) medio. Kiam industriistoj ne uzas kemiaĵojn por produkti siajn varojn, ili tion klare indikas sur la pakaĵo, ĉar tio fariĝis grava vendargumento. Sed plurfoje francoj povis mire legi pri el Germanio eksportitaj fruktoŝukoj, ke tiuj ne entenas **kondomojn**. La klarigo de tiu strangaĵo estas ke la produktistoj uzas la esprimon "*sans préservatif*", kiel ili diras en la angla "*without preservatives*". Tiu lasta efektive signifas "sen konservigilo", dum la vorto "*préservatif*" en la franca signifas "kondomon"!

• **Post-lerneja rondiro de Aŭstralio:** Dum la Foiro de Monda Turismo en Bydgoszcz en septembro 1991, unu el la reprezentantoj de Monda Turismo

por Usono, Robert Burgess, proponis al la MT-reprezentanto por Aŭstralio, Max Wearing, ke oni okazigu dumonatan rondiron de Aŭstralio tuj post la Aŭstralia Somerlernejo en Adelajdo (11-23 januaro, 1993). Tia anonco jam aperis en kalendaroj de Monda Turismo, de *Heroldo de Esperanto*, kaj de la gazeto *Esperanto*. Oni intencas, ke la rondiro estu tute ne luksa, kaj ke oni akceptu nur Esperantoparolantojn. Se malmultaj homoj aliĝos, oni uzos tendojn kaj publikajn aŭtobusojn. Se multaj homoj montros intereson, oni eble aĉetos aŭ luprenos aŭtobuseton. Japana paro jam aliĝis. Aŭstraliaj esperantistoj, kiuj deziras partopreni aŭ gastigi alilandajn partoprenantojn kontaktu kiel eble plej frue Max Wearing, 30 Westbury Street, Hackney SA 5069.

• *Landaj somerlernejo kaj kongreso 1993*: La Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo nun preparas la programon kaj aliĝilon por la 9-a Aŭstralia Esperanto-Lernejo, kiu okazos en Aquinas College en januaro 1993. Same kiel en 1989 kaj 1991, la kursoj okazos dum du semajnoj (lunde ĝis ven-

drede), sed oni rajtos loĝi en la kolegio ekde dimanĉo la 10-a ĝis la mateno de sabato la 23-a. Inter tiuj, kiuj instruos estas Trevor Steele, Vera Payne, D-ro So Gilsu (el Koreo) kaj S-ro Song Zibin (el Ĉinio). Dum la semajnfino (sabato la 16-a kaj dimanĉo la 17-a) okazos mallonga kongreso por la Aŭstralia Esperanto-Asocio, kiu nun devas okazigi kongreson ĉiujare. Krom la estrar- kaj ĝeneralkunsidoj ĝi inkluzivos ekumenan diservon, eksterurban ekskurson, kaj bankedon. La programo/aliĝilo baldaŭ haveblas de Max Wearing (adreso supre donita).

• *Muzeo en Adelajdo havos Esperanto-komentaron*: La Malnova Parlamentejo antaŭ nelonge invitis la esperantistaron en Adelajdo registri tradukon de la komentario por lumbilda prezentaĵo pri la historio de Sud-Aŭstralio. Oni jam prezentas la programon en la angla, la germana aŭ la japana. Individuaj Esperantistaj vizitantoj povos aŭskulti per apartaj aŭskultiloj dum prezentado en la angla, sed oni prezentos la programon tute en Esperanto por Esperantogrupoj. □

LA ESTONTA JUNULARO DEPENDAS DE VI! verkis IDYSS EINIHOVICI

Kun granda ĝojo mi informas niajn gesamideanojn ke post kvar jaroj da senĉesa laborado por starigi Junularan Vojaĝ-fonduson, mi atingis la sumon \$16 084.95. La mono troviĝas en la banko R & I [okcident-aŭstralia banko] atendante sukcesan kandidaton por reprezenti nian landon ĉe la Esperanta Junulara Kongreso en Montrealo, Kanado. Aliĝis 10 kandi-

datoj, skribe, el Okcidenta Aŭstralio, kaj kelkaj el aliaj ŝtatoj. Bedaŭrinde, ĝis nun neniu el ili estas preta por ekzameniĝi.

Al vi, karaj gesamideanoj, mi elkore dankas pro la subteno de la fonduso kaj malavaraj donacoj al la fonduso. Oni esperas ke gesamideanoj daŭre helpos per donacoj por fortigi tiun gravan fonduson. □

UNIVERSALA KONGRESO 1997 EN AŬSTRALIO?



La Direktoro Ĝenerala de la Universala Esperanto-Asocio, Simo Milojević, vizitis Adelajdon (13-16 junio) kaj Melburnon (16-18) por vidi la kongresejojn en tiuj urboj kaj por pripensi la eblecon okazigi Universalan Kongreson en Aŭstralio en 1997. La prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, Juĝisto Kep Enderby, pasigis dimanĉon, la 14-an, en Adelajdo, diskutante kun Simo Milojević kaj adelajdaj esperantistoj.

Intervjuate de Svetislav Kanački en Radio 3ZZZ, Simo Milojević diris: "Adelajdo havas unu el la plej belaj kaj plej modernaj kongresejoj, kiujn mi vidis tra la mondo—kaj mi vidis tutan amason da kongresejoj. Mi ankaŭ vizitis la Mondan Kongresejon en Melburno, kaj estis tute imponita de ĝiaj salonoj. Mi kredas, ke en ambaŭ lokoj ni havus tre bonajn—mi eĉ povus diri escepte bonajn—fizikajn kondiĉojn por organizi Universalan Kongreso. Ĉu tiaj diversaj instancoj montras intereson pri nia kongreso? Jes, kompreneble!

Eble estas tempo, ke esperantistoj komprenu, ke ne estas malfacile trovi intereson ĉe turismaj kaj aliaj oficialaj

instancoj pri kongreso, kiu aligas mil aŭ dumil aŭ dumil kvincent homojn, ĉar tio estas sufiĉe granda turismo kuko por ĉiu urbo tra la mondo. Eble esperantistoj ne konscias, ke Universala Kongreso de Esperanto estas unu el la plej grandaj regule ĉiujare okazantaj internaciaj aranĝoj en la mondo—kaj sekve ĉiu kongresejo batalas por ricevi tian kongreson.

Kiam mi renkontis vian novan prezidanton, S-ron Enderby, en Adelajdo, mi provis disbati iajn antaŭjuĝojn kaj iajn malagrablajn memorojn de antaŭ preskaŭ deko da jaroj. UEA nun faras neniamajn financajn postulojn kaj neniamajn financajn respondecojn de AEA. Ni eĉ interkonsentis, ke ni ne kolektos ĉi tie garantian kapitalon. Ni lasis la eblecon, ke eventuale ni invitos la aŭstralian esperantistaron donaci laŭ sia povo malgrandajn aŭ mezgrandajn kontribuojn, kiuj helpas la kongresajn financojn—kiuj fakte en la fino ne iros al UEA aŭ AEA, sed ebligos al la organizantoj de la kongreso helpi (ekzemple) homojn el landoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj tamen reprezentanti ilin en kongreso, se tiu okazos ĉi tie."

Raportis Max Wearing □

ROVA SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

LA ONDO DE ESPERANTO reaperas. Ĉi tiu fama rusa gazeto, subtitolita "dumonata soci-kultura revuo en esperanto" aboneblas je A\$11 ĉe la AEA-Libroservo. En la unua numero por 1992, 32 paĝoj, troviĝas interesa literaturo (poezio, originala novelo avangarda, tradukita novelo, recenzo), sociaj komentoj pripensindaj kaj—por okcidentuloj—informaj, anekdotoj. Ĉio bone redaktita. □



EL LA REGIONOJ

QLD: *Brisbano-Vortfesto-1992.* Ĉi tiu 'festo' okazis en la Kultura Centro, la 10an de majo; entute pli ol 30 grupoj partoprenis. Por la Brisbana Societo Tom O'Grady kaj Ray Ross starigis budon kun libroj, revuoj kaj la kutimaj broŝuroj. Ray prelegis pri Esperanto dum kvaronhoro. Ni ne atendas 'inundon' de komencantoj, sed ni semis...Estis tre valora tago por prezentado de kulturaj aspektoj de ĉiutaga vivo, inkluzive de Esperanto. —*El La Voĉo.*

Konferenco de la Esperanto-Federacio de Kvinlando okazos en Clontarf, 10-11 oktobro.

NSW: Sidneja Esperanto-Klubo: En Februaro ni elektis novan estraron. James Harwood estas prezidanto; Tom Elliott kaj Margaret Chaldecott estas vicprezidantoj; Margaret Chaldecott estas sekretario; Mavis Elliott estas kasisto; Alan Dixon estas bibliotekisto. Edna Turvey instruas. Redaktas la bultenon *Teloŭeo* Margaret Chaldecott. [Bonvolu rimarki ke ĉi tiu listo estas iom pli komplete ol tiu en la AEA *Adresaro*.—Red.]

SA: Nova prezidanto de la Adelaide University Esperanto Club estas Sandhya Limaye, 12 Brunswick Street, Walkerville SA 5081. (Bonvolu korekti vian 1992 AEA *Adresaron*.) Sandhya gvidas grupon de studentoj ĉiujährde

dum la trimestro. Kun la helpo de Dan Ehlers, Zbigniew Wybraniec, Margaret Furness kaj Max Wearing, ŝi disdonas afiŝojn kaj informilojn pri la Einihovici-Premio en la altlernejoj de Adelajdo, kaj ricevis plurajn respondojn.

Eksstudento de la sama universitato, Joseph Wearing, nun faras longan vojaĝon tra Indonezio, Tajlando kaj Kampuĉeo. Ĉiu havas Esperanto-klubo(j)n. Pro vizito de Jozefo en Bangkoko, vizitanta franca pastro petis aliĝilon por la somerlernejo en Adelajdo, 1993.

VIC: Nova prezidanto de la Melbourne Esperanto Society estas Paul Desailly, 48 Pearson Street, Brunswick West Vic. 3055. (Bonvolu korekti vian 1992 AEA *Adresaron*.)

Paul Desaille estas nomita Ekspozicia Estrarano por la Federacio kaj Klubo rilate al la Language Expo 1992 okazonta en Melburno.

ALDONE AL LA LISTO DE INFORMILOJ

bonvolu noti ke ankaŭ haveblas du enkondukaj kursoj pri Esperanto sur Macintosh komputil-diskoj. Petu ekzemplerojn de la Sekretario de AEA, Ray Ross, 41 Agnes St., Sunnybank Qld 4109.

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST

Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2488



Numero 275: Septembro-Oktobro 1992
Speciala Aŭstralia kaj Nov-Zelanda numero

La Aŭstralia Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562.
☎ (09) 574 1307.

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Vicprezidantoj: Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014; Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Vicsekretario: Herbert Koppel, GPO Box 2122T, Melbourne Vic 3001.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Help-kasisto: Dianne Lukes, 26 Noll St, Toowoomba Qld 4350.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.

P.R.O. (Oficisto pri Rilatoj kun la Publiko): Ronald Gates, MSF 2001 Wangaring, Kelly's Plains Rd, Armidale NSW 2350.

Presfufisto: Odlo Bokserp, adreso ĉe la redakcio.

Membrokutoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). \$15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. [Ekster Aŭstralazio, abono al *La Aŭstralia Esperantisto* kostas A\$33 (45 ned. gld.) kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de AEA; aŭ pagu al la UEA konto de la Libroservo de AEA acal-w kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.]

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adres-slipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 30 oktobro.

La kovrildesegno: ĉi tiu desegno estis preparita de Cliff Hall. Ĝi estas la tria en serio de desegnoj elektitaj el proponoj por nia kovrilkonkurso. En ĉi tiu numero ni petas vin voĉdoni por tiu desegno kiu plej plaĉas al vi. Pri tio vidu paĝon 10.

En ĉi tiu numero:

"La Diluvo" (dramo) de Vera Payne	3
Nia kovrilkonkurso.....	10
Naciaj himnoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando.....	14
Diversaĵoj.....	15
"Veterana brigistino sukcesas" de Ralph Harry.....	17
Peto el Tanzanio, de Charles K. Hiza....	18
Lingva angulo, de Alan Towsey.....	19
Retrokomentoj, de Brian Currie.....	21
Deziraj korespondoj.....	25
Feriraporto, de Odlo Bokserp.....	26
El la regionoj.....	27
Nekrologo:	
Charlotte Harvey.....	20
Libroj:	
<i>Pri Nia Universo</i>	15
<i>Aktoj de la Akademio III</i>	15
<i>Lingvaj Respondoj (Zamenhof)</i>	16
<i>Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius</i>	16
Aldono al la librokatalogo 1992.....	26
Speciala enhavo:	
Normaj Landnomoj (Akademio de Esperanto).....	22
English Supplement.	

**SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO
VERKU ARTIKOLON!**

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *La Aŭstralia Esperantisto*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi vian verkon al ni tajpitan aŭ sur 3½-colaj diskaj MS-DOS aŭ Macintosh. Se vi sendas manuskripton bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitaĵojn manuskriptojn ni ne akceptas. Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj laŭbezone ĝi povos esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

LA DILUVO de VERA PAYNE

Laŭ mezepoka miraklo-teatraĵo, prezentita kaj premiita en la dramo-konkurso dum la AEA/NZEA Esperanto-Kongreso en Sidnejo, januaro 1992.

[*Ĉiuj rolantoj, escepte de la Anĝelo, la Dio kaj la Amikino (kiuj atendas en ĉambreto, aŭ malantaŭ ekrano, dekstre) staras en vico ĉe la malantaŭa muro, vizaĝ-al-mure, Noa vicofine-dekstre. Ĉiu portas propran ilon. La ceteraj aĵoj inkluzive de la "arkeo" kuŝas sur la planko antaŭ ili. Sonas mezepoka muziko. La Anĝelo eniras, paŝas ĝis la centro de la scenejfronto. La muziko grade mallautiĝas.*]

Anĝelo: Bonvenon geamikoj ĉiuj

Al nia teatraĵo

Por via ĝuo venos nun

Eta amuzaĵo.

Pri la Diluvo de la Dio

Jam vi scias ĉion

Ĉar, piĵaj homoj, nepre vi

Studas la Bibliion.

Sed en la mezepoko

Ne multaj povis legi

Pro tio, dramoj montris

Kiel la menson regi.

Por okazigi bonon

Ĉie kaj en ĉio

Necesas sur la tero

Helpantoj de la Dio.

Kaj ĝuste tia estas mi,

Help-anĝelo de la Di'

Ĉiam okupata mi... [paŭzo]

Bonaj geamikoj ankaŭ vi

Imagoplenu nun kun ni... [paŭzo]

Atentu jen al ĉio ĉi! [Eliras]

La Dio: [eniras] Mi estas la Dio, kaj

ĉion mi kreis

La ĉielon kaj la teron. El nenio ĉion

ĉi.

Sed vidas mi, ve, ke mia popolo
Age kaj pense, fie celas la malbonon.
Do, restos en homar' Spirito mia
(en fia homo kiu iĝas malamiko mia)
(Restos Spirito mia) jardekojn nur
dek du;

Dum tempopaso tiu

Nepre la pekad' ĉesu.

[*La Anĝelo eniras, paŝas laŭlonge la scenejon, montrante afiŝon kiu informas: FORPASAS 120 JAROJ. Staras apud Noa. Tuŝas lin sur la dekstra ŝultro je la dia vorto "bedaŭras" por ke li paŝu al la Dio por la vortoj "Pro tio, Noa..."*]

La homon, kreitaĵon mian, mi
detruos,

Kaj ankaŭ beston, birdon, vermon,

Ĉar vere min ĉagrenas la homar'.

Ĝiskore vundas min malic' ilia

Kaj senrezerve mi bedaŭras la estiĝon

De la kreitaĵo mia.

[*Noa aperas*]

Pro tio, Noa, homo senmakula,

Nobla, virta viro,

Ŝipon baldaŭ vi konstruos;

Pro arkeo tiu

Estontece iĝos granda miro.

Konstruu ĝin el ligno seka kaj

malpeza,

Ene estu pluraj apartaĵoj,

Kaj per peĉo, zorgoplene ŝmiru

La internon kaj l'eksteron

(Ne necesas ornamaĵoj).

[*Eniras Anĝelo kun 'plano' de la arkeo. Donas ĝin al Noa kaj staras apud la malantaŭuloj. Dum la Dio priskribas la arkeon, Noa montras*

la planon al la spektantaro, mallonge, poste koncentriĝas je ĝi.]

Tricent ulnojn longa estu ĝi
Kaj kvindek larĝa, por forti ĝin;
Alta, tridek ulnojn. Mezuru zorge.
Fenestron unu lerte faru
Ulnon unu longa, unu larĝa.
Kaj estu pordo en la flanko de la ŝipo
Ĉar en-kaj elirejo devas esti.

Malsuprajn spacojn faru
Entute tri etaĝojn,
Ĉar intencas mi per akvo
Dronigi miajn kreitaĵojn;
La malvirton mi detruos.

Sed vi, edzino via, kaj filoj tri,
Kaj la edzinoj de la filoj,
Kune saviĝos ĉiuj vi, pro boneco via:
Tiel decidis mi. [*Tras scenejfronton, dekstre, kaj restas tie.*]

Noa: Ho Dio, laŭte kaj ĉiame dankas
mi
Pro la sinteno Via al mi kaj al la miaj.
Vian ordonon mi plenumos
Kaj neniam plu ofendos

[Je la vorto "ofendos", la Anĝelo tuŝas ĉiun rolanton en la vico sur la dekstra ŝultro. Ĉiu siavice sin turnas dekstren por alfronti la spektantaron. Anĝelo eliras.]

Vin, la Dion, kiu gracon al mi donas.

[Al la familio:]

Venu, viroj kaj virinoj ĉiuj!
Kio ajn okazos, ni laboru
Je arkeo ĉi, je ĉambro kaj je halo.
Ni plenumu dian volon.

Ŝem: [*portas grandan hakilon el kartono, farbitan arĝenta. Li alpaŝas la patron:*]
Patro, jen mi staras, preta jam,
Kun hakilo tiel akra
Kiel iu ajn havebla,
Por komenci nun la taskon
Ne plu diskuteblan. [*Li surgenuiĝas.*]

Ĥam: [*portas hakileton. Li staras apud Ŝem.*]
Kaj vidu hakileton mian,
Avidas ĝi por mordi;

Ne haveblas en la urb' alia
Por kun tiu ĉi akordi. [*Surgenuiĝas.*]

Jafet: [*portas martelon. Staras apud Ĥam.*] Kaj bone faros mi la kejlajn
Profunden kun martelo-ĉi
Rekten enŝovos ilin mi.
Patro, sen plua prokrasto, mi pretas!
[*Surgenuiĝas.*]

La Edzino de Noa: [*portas arbobranĉon sur la ŝultro*] Kaj ligno-pecojn povos ni
teni.

[Nun ironie al la spektantaro:]

Vi ĉiuj bone scias, ke
Tro malfortas ni, virinoj,
por laborEGon entrepreni.
[Paŝas antaŭ la viroj, malantaŭ la aliaj edzinoj, kaj restas scenejfronte, maldekstre.]

La Edzino de Ŝem: [*portas "hakoblokon" faritan el kartono kaj farbitan griza.*]

Jen bona hakobloko
Por hako kaj por bato;
Forta kiel roko ĝi,
[Nun al la spektantaro:]
Ĉar en ĉi tiu loko, inter ni
Pigruloj mankas, vidos vi.
[Paŝas dekstren kaj staras malantaŭ sia edzo.]

La Edzino de Ĥam: [*portas sitelon (ian ajn) kaj grandan farbobrosan.*]

Por kolekti peĉon iros mi
La ŝipon por kalfatri;
Tabulon, trabon, kejljon—
Baldaŭ per ŝmir' teatri!
[Svingas grandan farbobrosan, larĝe ridetas. Dekstren, por stari malantaŭ sia edzo.]

La Edzino de Jafet: [*portas faskon da lignopecetoj*]

Ligno-pecetojn kolektos mi
Por fari fajron por ĉiuj vi;
Kaj pretiĝos mi la manĝojn
Por satigi la malsaton.
[Dekstren, por stari malantaŭ sia edzo.]

Noa: Nun en la dia nomo komencos
ni
La ŝipon konstrui. En ĝi ni loĝos.

Por flosi estos ni pretaj
Kiam la diluvo alvenas.

[*La Anĝelo eniras. Ĉiuj agas kvazaŭ laborante per staj diversaj iloj. La Anĝelo ludas bekfluton dum la laborantoj kantas, laŭ la melodio de "Hey ho, hey ho, it's off to work we go!" el Neĝulino kaj la Sep Nanej. Kuraĝe!*]

Ho ho, hi hi
Labori eku ni,
Por ke l'arkeon faru ni
Ho ho, ho ho, ho ho, hi hi! [*Ripetu.*]

[*Ĉiuj restu senmove kiel statuoj, por fari belan bildscenon dum Noa parolas:*]

[*La "tabuloj" de Noa estas la kruda flanko de la "arkeo" kiu estas granda, dike skizita desegno sur kartono, faldita por ke ĝi povu stari per si mem, ete kurbigita.*]

Noa: Ĉi tiujn tabulojn kunigas mi
Por ŝirmi nin kontraŭ la ŝtormoj;
Tien kaj reen skuiĝos ni—
Sed trankvilaj niaj dormoj.

[*La masto estu la branĉo kiun portis la Edzino de Noa.*]

Maston mi faros el arbo ĉi tiu,
Ligitan per kabloj longdaŭraj;
Kaj velon por ĉiu ventego.
Pruon, estradon, buspriton
Kaj ĉion necesan pretigos mi ankaŭ.

Kaj tion tre fortan. Jen kordo, [*volvita maldika ŝnuro*]
Ŝnurego... [*paŭzo*]...alvenos la vento,
Pluvego, tempesto, diluvo;
Arkeo ĉi, estu ĝi preta!

[*Ĉiuj refoje laboru diversmaniere kaj kantu:*]

Ho ho, hi hi
Laboru pluen ni,
Por ke l'arkeon finu ni
Ho ho, ho ho, ho ho, hi hi! [*Ripetu.*]

[*Post kiam ĉiu finas sian taskon pretigi la arkeon, ĉiu sekvas la Anĝelon kun la bekfluto, dekstren el la scenejo. Restas Noa kaj Edzino.*]

La arkeo povas esti klare vidata de ĉiuj en la halo. Ĝi staras, milde kurbigita. Oni pentru

verdan steleton sur unu ekstremajo.]

Noa: [*iom estrece al sia edzino:*]
Edzino! Ja en ujo ĉi, sekuraj estos ni.
Ke vi eniru, kun la idoj, tuj! tion
ordonas mi.

La Edzino de Noa: Ĉu vere? Moŝto via
Malgraŭ via ĝentileco [*sarkasme*]
Ne komplezos mi al vi.

Noa: Nu, bona edzino, faru nun laŭ
mia volo.

La Edzino de Noa: Je Kristo ne! Ĉar
ne necesas.

[*Paŭzo. Manoj sur koksoj:*]

Ĉu tiel fiksrigardi min la tutan tagon
Al vi plaĉos?

[*Ili kvazaŭ luktodancas. Ŝi paŝas antaŭen, li paŝas malantaŭen per la para piedo. Post du, tri paŝoj li rezignas.*]

Noa: [*okuloj suprenrigardantaj, permane petegante:*]

Ho Dio, kiel bone scias vi,
Ĉiam perversaj la virinoj
[*La Dio kapneas kaj admonas Noan*]

Kaj neniam humilaj estas!
Aŭdacas diri tion mi.

[*Al la spektantaro:*]

Kaj tion ja atestas nun
Ĉiuj el vi!

Bona edzino, mi petas vin ĉesigi
La bruadon kaj la kontraŭon.
Ĉiu jam scias, ke vi estras min!
Mi akordas, je Sankta Johano!

[*La Dio antaŭenpaŝas. Noa staras kun la dorso kontraŭ la Dio. Poste li sin turnas. La Dio parolas al Noa:*]

Noa, kun la familio
Travivos vi ĉi tiun fazon
Ĉar, bonega homo, vi
Meritas plene mian savon.

Atentu! Ankoraŭ restas unu pli
Tasko nun por ĉiuj vi.

→

El puraj bestoj kun vi prenu
Po paroĵ sep: lin kaj ŝin.
El brutoj la nepuraj prenu du:
Nur unu vir' kaj unu in' estu.

El birdoj puraj sep, nepuraj du,
Kunulojn havu ĉiuj;
Kun la bestoj kaj rampaĵoj
Saviĝos sole tiuj.
Kaj, manĝaĵon en la ŝipon metu
(Tre baldaŭ venos ja la pluvo)
Kaj trinkaĵon por sufiĉi
Dum la daŭro de l'Diluvo.

[Al la spektantaro:]

Ĉi mondo pekoplenas tro
Vi ĉiuj tion scias;
La homo ne atentis min
Sed ĉiam, ĉiel, fias.

[Al Noa:]

Ankoraŭ restas tagoj sep
Por envenigi ĉion.

[Al la spektantaro:]

Post tio, plezurigos min
La homaron ĝeni iom.
Kvardek tagojn kaj kvardek noktojn
Pro hom'-abomenindaĵoj
Faligos mi la pluvon
Kaj pereos miaj kreitaĵoj.

[Reiras al sia angulo, scenejfronte dekstre.]

Noa: Dio mia, Vian ordonon
Kun ĝojo mi plenumos,
Ĉar vere gracoplena
Ĉiam mi Vin trovas.

Cent vintrojn kaj dudek
La konstruon mi prokrastis
de ŝipo tiu ĉi,
Por vidi ĉu konduto
De l'homaro en diskuto
Pliboniĝus. Sed ho ve,
Verŝajne ili ne meritis la
kompatindulgon Vian.

[Al sia familio:]

Sufiĉe, viroj kaj virinoj!

[La familio ekrigardas amase, kun nur la

kapoj videblaj.]

Rapidegu ni, pro timo de l'inundo.
Certigu, ke la bestoj estu
En sia propra stalo, ĉiu,
En arkeo tiu-ĉi.

De puraj bestoj estas sep,
De malaj estas du;
Laŭ dia volo faris ni.
Rapidegu, nu!

[Al la spektantaro:]

Baldaŭ tempestos,
Atendu ni ne plu!

[Noa eniras la arkeon kun sia familio, escepte de la Ezino. La bestoj kaj birdoj nun menciitaj estu pentritaj sur longegaj pecoj da tolo kia kalikoto, tiel ke la vortoj akordu kun la bildoj. Du homoj tenas ĉiun pecon da tolo, ekzemple Ŝem kaj Ham dum Ŝem parolas "Kara Dio, jen leono..." La tolon oni tenu firme kaj alte, por ke ĉiu klare vidu la animalojn. La Anĝelo tenas la dekstran ekstremajon de la lasta tolpeco, kaj ankaŭ la pluveron por meti en la manon de la Edzino de Jafet. Do, la bestoj eniras la arkeon kun la koncernaj parolantoj kiuj staras en densa grupeto. La Anĝelo eliras.]

Ŝem: Kara Dio, jen leono kaj leonin'.

Ĉeval' kaj ino, virbovo kaj bovin'.

Geporkoj kaj gekaproj,

Geŝafoj kaj geaproj;

Laŭ via ordono obeas ni vin.

Ĥam: Kameloj, azenoj troviĝas,

Koaloj, vombatoj, emuoj,

Krokodiloj kaj eĉ kanguruoj.

Rapidu! Ni baldaŭ moviĝos.

Jafet: Venigu la katojn kaj hundojn,

La lupojn kaj vulpojn—ho Di'!

Jen gaje hop-hopas leporoj

Brasikon mordetos ili.

La Edzino de Noa: Simioj, serpentoj
kaj strigoj

Ululantaj...kaj ursoj kun ungoj

akregaj;

Kvieta, kunkune kuŝantaj.

La Edzino de Ŝem: Por la katojn

feliĉigi jen musetoj,

Por ĉiujn fortimigi jen rategoj!
 Belaj cignoj kaj testudoj...
 Eku ni, sen plujaj preludoj!

La Edzino de Ĥam: Atendu! Jen
 birdoj, kaj grandaj kaj mal:
 Estas pavoĵ, kolomboĵ, papagoĵ,
 Jen kokoj, kornikoj kaj korvoj...
 Ho, birdkanto-plenos la tagoj!

La Edzino de Jafet: Akcipitroj, anasoj,
 abeloĵ,
 Papilioĵ, langustoj, formikoj.
 Kaj manĝaĵo por ĉiu el ili!
 [Etendas la brakojn supren, en miro. La
 Anĝelo pendigas pluveron.]
 Ho! Pluvero! Ni eku, amikoj!

Noa: Edzino, envenu! Ankoraŭ vi
 prokrastas
 Perversa ĉiam vi!
 Refoje mi aŭdacas ĵuri tion.
 Envenu, je la Dio!
 Ĉar venis jam la horo
 Kiam Di' dronigos ĉion.

La Edzino de Noa: Ho jes, ja, sinjoro,
 hisu vian velon;
 Kaj malsukceso akompanu vin!
 Nepre mi ne iros for
 Sen amikinoj miaj.
 Al ili savos mi la vivon,
 Ĉar bone amas ili min.
 Forremu, Noa, kien ajn.
 Akiru novelzinon!
 Restos mi ĉi tie por
 Helpi l'amikinon.

Noa: Ŝem, filo, ve! Via patrino koleras
 Sed pli da tio mi NE toleros!

Ŝem: Patro, mi nepre envenigos ŝin.

[Al la patrino:]
 Panjo, la patro sendis min
 Por enŝipigi vin.
 Sentu la venton kaj suprenrigardu,
 Ho panjo, atentu! Ne pluen vi tardu!
 La velojn malferlas po ĵardo...

[Noa "malferlas" kaj skuas alten pecon da

tolo.]
 Mi petegas, kun ardo...

La Edzino de Noa: filo, iru re al li,
 Kaj diru, filo, NE al li!

Noa: Envenu, edzino, je dudek diabloĵ
 [kolera nun]
 Aŭ restu por ĉiam ekstere!

Ĥam: Ĉu ni ĉiuj envenigu ŝin?

Noa: Jes, filoj, kun krista beno kaj la
 mia,
 La tempon ne malŝparu.
 Tre timas mi la diluvon,
 Do, kion ajn bezonas, vi faru.

Amikino [prefere diketa kaj en ruĝo vestita,
 kuregas sur la scenejon, portante du botelegojn
 (el kartono) da vino, konsternite parolante de
 sia unua paŝo. Al la Edzino de Noa:]
 La akvoj fluas rapidege,
 Divastiĝas ĉiuflanden.
 Konsterno kaj teruro kaptas min.
 Bona amikino, apogante min sur vin,
 Mi petas, ke ni kune trinku bonan
 vinon
 Por mildigi mian timon.

La Edzino de Noa: Kara amikino, jen
 Bona, forta, dolĉa vino.
 Ĝi ĝojigas langon, koron...
 Venu vi al mia sino,
 Brakumu ni kaj drinku ni... [Ili kun-
 drink-ad-as]

Eĉ se Noa posedus la biskopan mitron
 Mi ignorus lin, ĝis ni drinkos la tutan
 litron!

[Ili ridegas kaj ŝanceliĝas.]

Jafet: Panjo, vin petegas ni ĉiuj,
 Envenu vi l'arkeon nun,
 Pro l'amo de Dio kiu
 Nin savos. Tutmalaperis la sun'!

La Edzino de Noa: fi al vi! [Ridegas.
 Kantas, kun la amikino:]
 Plenigu viajn glasojn ĝis la vino
 superfluas,
 Ĉar venu morgaŭ kio ajn, la nunon ni

tre ĝuas,
Tra la la la, la la la la, Tra la la la, la la
la la... [finu mallauté]

Ŝem: Je la bona Dio, vi venos—
Ĉu vole nevole!

[Ili kaptas ŝin, ebrian. La amikino
ŝanceliĝas foren.]

Noa: Bonvenon, edzino, en la ŝipon!

La Edzino de Noa: fi al vi kaj via ŝipo!
Kaj jen por vi! [Orelfrapas lin kaj kolapsas
ronke sur la plankon.]

Noa: Per Dio! Estas bone ĝui pacon!
Familio mia, ekas la movo.

La Dio nun faru laŭ Sia povo.

Ho potenca Dio, kiu estas tiom bona,

Tiu kiu ne faris laŭ Via volo

Nun troviĝos en granda doloro!

[Ĉuj kapjesas profunde.]

[Noa ŝirmas la okulojn per la mano. La aliaj
faras same, kaj movas la kapon samdirekten
kiel Noa:]

La tuta mondo inundiga,

Per la propraj okuloj mi vidas.

La fenestron mi fermos, la ĉambron
eniros;

Ke vi savos nin, Dio, mi fidas.

[Noa fermas la fenestron. La fenestro estu el
alia peco de kartono. Oni tranĉu truon
kvadratan sur tri flankoj kaj pentru kadron
("ulnon unu longa, unu larĝa"). Noa povas
tiel "fermi" kaj "malfermi" la fenestron.

Ĉuj malaperas malantaŭ la arkeon, kaj faras
kiel eble plej laŭtajn bestobruojn. Tiam,
komenciĝas laŭteĝaj ŝtormobruoj. Oni
enkasedigu tondron, pluvegon, ventegon kaj
ludu la kasedon kiel eble plej laŭte. Dume, la
rolantoj kviete pretigu siajn "bestojn". Grade
mallautégu la ŝtormon, dum eniras la Anĝelo,
scenejfronte, centre. Se eblas, mallumigu la
scenejon dum la ŝtormo, kaj nun lumigu nur la
Anĝelon.]

La Anĝelo: Kaj la akvo treege fortiĝas,

Kaj sur la tero multiĝas;

Dek kvin ulnojn leviĝas!

Ekstermiĝas

Ĉiu ekzistaĵo sur la ter'!

[La Anĝelo iras stari apud la Dio scenejfronte,
dekstre.]

Noa: [malfermante la fenestron li ĉirkaŭen-
rigardas:]

Nun kvardek tagoj jam forpasis.

Sendos korvon baldaŭ mi

Por serĉi grundon, arbon, ŝtonon
sekan.

Kaj se ne revenos ĝi

Sur tiun ĉi ferdekon,

Signifos tio, ke sur montet'

Aŭ ebenaĵo jen sekot'

Kaj baldaŭ tereniĝos ni.

[Li ŝajnigas forsendi korvon, grandan el
papero, sed efektive slugigas ĝin en la arkeon,
de kie li prenas blankan kolombon en sia mano
kaj faras la samon, dirante:].

Ankaŭ kolombon mi sendos, kun
peto:

Nepre revenu vi, plej humila kaj milda
birdeto.

[Li forsendas la kolombon. La Anĝelo iras de la
Dio, donas kolombon kun olivobranĉeto en la
buŝo al Noa, kaj restas je la dekstra flanko de
la arekeo.]

Ho Dio! Benita estu Vi

Kiu min tiel ĝojigas hodiaŭ.

Jen signo ke nun la diluvo

Malaltiĝas.

La dolĉa kolombeto al mi prenis

Olivobranĉeton en sia beko.

Jen signo de graco de Dio;

Jen signo de paco. Ho, Dio,

Mi dankas al Vi.

La Dio: [parolas al Noa:]

Noa, kun via edzino nun iru,

[Noa eliras, scenejfronte, centre, surgenuas
vizaĝe al la Dio. Lia Edzino kuras al sia
antaŭa loko, scenejfronte, maldekstre.]

Elŝipiĝu la idoj kun vi.

[Ĉuj elvenas el la arkeo kun sia bestoj-tolo,
malrapide, maldekstren, por ke la spektantaro
refoje vidu la bestojn. La Anĝelo helpas teni
rekte kaj alte la tolojn.]

Kaj ankaŭ la bestoj, rampaĵoj kaj
birdoj

Elarkeiĝu ĉiuj ili.

Surtere ke ili multiĝu

Tio tre plaĉos al mi.

[*Paŭzo. La toloj estas zorge faligitaj sur la plankon je la malantaŭa muro. La viroj staras en vico unuflanke de la scenejo, la virinoj je la alia flanko. Ĉiu staras senmove. La Anĝelo eliras. Dume, la Dio diras al ili:*]

Jes, fruktu kaj multiĝu vi,
Disvastiĝu sur la tero,
Kaj estiĝu pli!

Noa: Ho, Dio mia; laŭ plaĉo Via
Tiel estu.

La Dio: Noa, ĉiam al mi vi kompleksas;
Tute mi fidas en vi.

Promeson, do, faros nun mi:
Ne plu mi malbenos la teron
Pro homkulpo vundiga al mi,
Ĉar delonge la homo pekemas
Kaj stultege faras al si.

Multegaj estos viaj idoj,
Pleniĝos la tero je bestoj kaj birdoj;
Super ĉio regos vi.

La fiŝoj kiuj en la maroj flosas
Nutros vin;
Kaj ankaŭ ne hezitu manĝi
Herbon, bestojn, birdojn ĉiuspecajn.
Sed ilin ne mortigu nenecese.

La murdon ĉiam abomenu.
Se iu homo sangon verŝos
Alia homo venĝon prenos:
Ambaŭ la diablo benos.

Kun vi, Noa, faros mi nun
Interligon,

Kaj kun via idaro post vi.
Kaj kun ĉiu vivaĵo hodiaŭ
Elarkeiĝinta kun vi.

Neniam plu Mi per akvo
Pereigos la teran karnon.

[*Al la spektantaro:*]
Sed zorgu vi, kaj porĉiame
Timu vi la fajron!

[*La Anĝelo eniras, paŝas laŭlonge la scenejon, montrante bildon de granda, nuklea "fungo"-nubo. Tiam ŝi eniras la arkeon kaj staras sur*

tabureton.]

[*Paŭzo. Al Noa:*]

Da venĝo nun sufiĉe.

[*La Anĝelo, sur tabureto kaj du homoj samstaturaj malvolvas ĉielarkon. La ĉielarko estu granda kaj brila—sur tolaĵo, kaj kun stango je ĉiu ekstremo.*]

La ĉielarko en la firmamento
Kolorplena aĵo ĝi
Estu inter vi kaj Mi
Testamento de l'promeso Mia.
Miajn benojn nun mi donas tie ĉi
Al vi, Noa, fidelulo Mia,
Kaj al ĉiuj ĉi.

[*Etendas la brakojn al la spektantaro:*]

Iru vi en paco nun,
Prizorgu unu la alian
Kaj ĉiun kreitaĵon mian.
Sur la tero nur mallonge
Gastas vi sub mia sun'.
Brilu ame, kandeletoj miaj
Je ĉiu oportun'.

[*Oni movu malrapide kaj zorge la ĉielarkon super la kapon de la Dio, kaj malsuprenigu ĝin, por ke ĝi staru planko-tuŝe. Ĉiu rolanto nun venas kaj staras malantaŭ ĝi, tenante ĝin per unu mano. Sonas mezepoka muziko. La Anĝelo disdonas olivarbobranĉetojn kiuj estis en korbo scenejfronte maldekstre apud la ŝtupetaro. Kiam ŝi revenas, ĉiuj kune turnas sin maldekstren kaj trotetas ritme el la scenejo, portante la ĉielarkon.*]

LA FINO

Noto de la aŭtoro: Dum multaj epokoj oni kredas pri la detruo de la tero pro homkulpo al La Dio. Pro la avida kaj stultega konduto de la homaro unu al la alia, kaj fakte al ĉio, povas esti, ke atendas nin la fina katastrofo. Do estas bone revivi la lecionon verŝajne donitan al niaj prapatroj.

Ĉi tiajn drametojn oni prezentis al tre simplaj homoj mezepokaj. Juroj, kiel ekzemple "Laŭ Kristo!" kaj "Je Sankta Johano!" estis oftaj, kvankam ĉiuj komprenis, ke la Diluvon okazigis La Dio longe antaŭ la naskiĝo de Jesuo Kristo kaj Sankta Johano. □

NIA KOVRILKONKURSO

En januaro nia gazeto fariĝos komuna gazeto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Tiucele ĝi ricevos novan nomon: *Esperanto sub la Suda Kruco* (mallonge: *ESK*). La nova titolo estas elektita por daŭrigi tradicion, ĉar en 1920-1934 ekzistis kun la titolo *La Suda Kruco* same komuna gazeto de la du asocioj. La redaktoro restos D-ro Broadribb, la nuna redaktoro de *The Australian Esperantist*.

En nia Januar-Februara (1992) numero ni anoncis konkurson por efektiviĝi novan kovrildeseĝnon. Poste el la proponoj senditaj ni elektis tri, kaj ilin uzis unuope sur la kovriroj ekde la Maj-Junia numero. Ni nun deziras ke vi, la legantoj kaj legontoj de la gazeto, elektu tiun deseĝnon kiu estos uzita por la kovrilo de nia venonta numero kaj poste estos daŭre uzata por la nova *Esperanto sub la Suda Kruco*. Ni reproduktas sur la sekvantaj tri paĝoj la deseĝnojn uzitajn por la Maj-Junia, la Juli-Aŭgusta, kaj la aktuala numeroj, por ke vi povu facile kompari ilin. Ili portas la novan nomon de la gazeto, por vidigi la aspekton kun tiu titolo. La elektita deseĝno estos presata sur verda papero, kiel nun. Ni petas ĉiujn niajn aŭstraliajn kaj nov-zelandajn legantojn fari la elekton.

Bonvolu skribi al la redaktoro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio, indikante vian preferon pri la uzota deseĝno. La lasta dato antaŭ kiu via voĉdono devos atingi nin estas la 30a de oktobro. □

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

En ĉi tiu numero:

“La Diluvo” (dramo) de Vera Payne... 3	3
Nia kovrilkonkurso	10
Naciaj himnoj de Aŭstralio kaj Nov- Zelando	14
Diversaĵoj.....	15
“Veterana briĝtino sukcesas” de Ralph Harry.....	17
Peto el Tanzanio, de Charles K. Hiza.....	18
Lingva angulo, de Alan Towsey.....	19
Retrokomete, de Brian Currie.....	21
Deziras korespondi	25
Feriraporto, de Odlo Bokserp.....	26
El la regionoj.....	27
Nekrologo:	
Charlotte Harvey	20
Libroj:	
<i>Pri Nia Universo</i>	15
<i>Aktoj de la Akademio III</i>	15
<i>Lingvaj Respondoj</i> (Zamenhof).....	16
<i>Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius</i>	16
Aldono al la librokatalogo 1992.....	26
Speciala enhavo:	
Normaj Landnomoj (Akademio de Esperanto).....	22
English Supplement.	



Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2488
Numero 1 Januaro-Februaro 1993

ESPERANTO SUB *LA SUDA KRUCO*

Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2488



Numero 1 — Januaro-Februaro 1993
Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Registered by Australia Post
Publication No. WBG 2448
Numero 1 — Januaro-Februaro 1993

ANTAŬEN AŬSTRALP LA NACIA HIMNO AŬSTRALIA

Aŭstralianoj ĝoju ni, liberaj, junaj, ĉar
Kultivas riĉan grundon ni, ĉirkaŭas nin la mar’;
Benitajn de natura bel’, tra l’ tuta histori’
Stadio ĉiu gvidu nin: Antaŭen Aŭstrali’!

Rekantaĵo: fiere kantu ĝoje ni: Antaŭen Aŭstrali’!

Sub glora brila Suda Kruc’ laboras ni sen ĝen’,
Por ke famiĝu nia land’ tra ĉiu mondteren’;
Kun vi venintaj trans la mar’ dividas landon ni;
Kuraĝe, kune al la cel’: Antaŭen Aŭstrali’!

Rekantaĵo: fiere kantu ĝoje ni: Antaŭen Aŭstrali’.

Tr. Audrey Childs Mee. El Aŭstralia Antologio.

DI’ DE ĈIUJ ANTAŬ VI LA NACIA HIMNO NOV-ZELANDA

Di’ de ĉiuj antaŭ vi
Amligite staras ni
Aŭdu petojn niajn Di’
Por la libera land’.
Ŝiajn stelojn kontraŭ minac’
De konflikto kaj malpac’
Vi protektu per sagac’
Nov-Zelandon gardu Di’.

Kredas ni pri l’ pacdoktrin’,
Sed se iu invados nin
Ni batalos ĝis la fin’
Por la libera land’.
Ŝin konduku tra danĝer’,
Per justeco kaj esper’.
Ŝin celigu al la ver’.
Nov-Zelandon gardu Di’.

Kresku nia am’ por vi
Ĝuu vian benon ni
Ĉio prosperadu, Di’
Por la libera land’.
Ŝian nomon de malhonor’
Ĉiam ŝirmu kun fervor’
Kronu ŝin per fam’ kaj glor’
Nov-Zelandon gardu Di’.

(Laŭ la teksto kantita en la AEA-NZEA Kongreso 1992, tr. Kay Andersen kaj Gaye Phillips. Laŭ propono de Brian Fox la kvina linio estas modifita laŭ la angla teksto: “stelojn” anstataŭ “flagon”. En la dua strofo linio 7 estas korektita “celadu” al “celigu” de la red.)



WINDOW ON THE WORLD



Byelorussia: in the 1920's one of the most active Esperanto centres in the USSR, in more recent times Byelorussia suffered the fate of the other USSR republics in having its Esperanto activities prohibited. Now free, Byelorussia has to reestablish itself in the Esperanto world. A **Byelorussian Esperanto Association** has been founded with its centre in the city of Grodno, where Dr L.L. Zamenhof, creator of Esperanto, lived from 1894-1898. Its ambitious, yet realistic plans, include:

- (1) Through commercial and tourist activities to collect money for the purchase of Zamenhof's residence and renovate it;
- (2) To inaugurate a Byelorussian Esperanto Centre in the Zamenhof House, with a library and museum;
- (3) To publish Byelorussian-Esperanto and Esperanto-Byelorussian dictionaries;
- (4) To introduce Esperanto as an elective in the school system;
- (5) To set up an Esperanto section of the Byelorussian Cultural Foundation, for the purpose of acquainting foreign Esperantists with the city where Zamenhof once lived and, in general, with Byelorussian culture and history.
- (6) To set up enterprises and firms using Esperanto.

Cuba: The first Cuban Esperanto talking book for the blind has been published. Titled **Kubo Trarigarde**, it is on six audio cassettes. Until the World Esperanto Congress was held in Havana in 1990, Esperanto was virtually unknown in Cuba.

Czechoslovakia: A **Symposium on the Translation of Esperanto Literature into national languages** is to be held in Poprad, 1-6 October, 1992. The program includes lectures on translation into Bulgarian, Dutch, Hungarian, Italian, Polish and Portuguese.

In Croatia, at the end of May this year, the International Cultural Service held an unusual **Croatian poetry evening**. Foreign residents in Zagreb read aloud in their native languages poems by Croatian writers. The poems had first been translated from Croatian into Esperanto; Esperanto had then served as a "bridging language" for further translation into one or other of the eight languages. The poems were read each in its Esperanto form and then in its "final" translation.

IBM Compatible Esperanto Word Processing Program: The Computronic Corporation, PO Box 102, Savyon, Israel, has marketed **PC Universala**, a word processing program specially designed for Esperanto "and other languages". The program uses menus and mouse, and is available on 3½ or 5¼ inch disks. The cost, including postage, is US\$104. Payments by Visa, Amex, or bankcheck.

Australia: The Australian Esperanto Association's president has retired from public office: "NSW Supreme Court judge and former Commonwealth Attorney-General **Keppel Enderby** has retired. Justice Enderby was a minister in the Whitlam government and became Commonwealth Attorney-General in 1975. His Federal portfolios included Customs and Excise, Police, and Secondary Industry and Supply. Justice Enderby was appointed a Supreme Court judge in 1982 and has been national president of the Australia-USSR Society since 1986." (Syndicated news item, as published July 4, 1992 in *The West Australian*.) Justice Enderby became acting president of the Australian Esperanto Association in 1990 and full president in January, 1992.

The TV science fiction comedy series *Red Dwarf* (Channel 2, Tuesdays, 10pm) has one of the main characters studying a televised Esperanto course. Such "important" Esperanto phrases as "Bonvolu sendi por la pordisto, estas rano en mia bideo" ("Please send for the doorman, there's a frog in my bidet") are covered! Those who watch the program regularly will recognise that Esperanto is a running feature. [Noted in *esperanto/usa* (!!) 1992(3).]

USA: The Mayor of Chicago, Richard M Daley proclaimed the week of the 23-29 February the **Week of International Friendship**. He cited as examples the work of the Universala Esperanto Asocio, the Chicago Esperanto Society, and the new Esperanto course in Alcott Elementary School (Chicago). [From *esperanto/usa* 1992(3).]

THE WORLD CONGRESS OF ESPERANTO IN VIENNA

by Idyss Einihovici

Vienna, Austria, was this year the host for the World Esperanto Congress, 25 July -1 August. It was attended by over 3000 people of 65 nationalities and many cultures.

The venue was a gigantic ultra-modern construction with all possible amenities. Esperanto was the only language used in all proceedings without interpreters or translators. The diversity of cultures, dress and personalities created a kaleidoscopic atmosphere. The podium in the opening ceremony, filled with representatives of their respective countries, greeted the huge audience with loud acclamation.

Justice Keppel Enderby of the NSW Supreme Court greeted the congress on behalf of Australia. An unforgettable experience!

Simultaneously a congress for children 6-12 years old, under the auspices of teachers from a variety of countries, was in progress. The children are bilingual and enjoyed an eight day program prepared by their teachers with a better future as its goal.

The Congress in 1993 will be held in Valencia, Spain.

Our Correspondence Courses

by John Moore

2. Course 2—Jen Nia Mondo

Coming now to the conversation course *Jen Nia Mondo* (the name is from the song, the Esperanto version of "This land is our land") the skills developed by working through *Bonan Tagon* stand us in good stead. We already know the alphabet and most importantly, which letter has which sound, so can go straight to enjoying the interesting talks between Petro and Helena and eventually speaking along with them; their Esperanto is good enough to imitate exactly.

Each new word used is translated in the margin of the text of the conversation concerned; a handy device, saving much delving into the dictionary. There is a full word-list at the back of the book, and we still have our **Nixon** dictionary from *Bonan Tagon*, for use when composing or translating.

After each conversation there are good clear **notes** on the grammar, illustrated by many sentences to be constructed from various words in boxes. Writing out correct sentences is one of the best ways to become familiar with a language. In my school days this was called "transcription", and we did a lot of it before being let loose on free composition.

With each lesson there is a further set of exercises, to be sent to the tutor for checking, along with any questions the student has at that stage. These start around the level where *Bonan Tagon* finished. Most are straightforward; as we advance, some will need help—and that is what tutors are for! We just ask, or simply put a question-mark—and the reply comes by return mail.

Everyone I know who has worked through *Jen Nia Mondo* has benefited. Most can then read, write, hear, even speak a little in Esperanto, and are then ready to proceed to a detailed study of the grammar, and more vocabulary, in preparation for letter-writing.

This comes with our Course 3, the translation course based on Mason Stuttard's book *The Esperanto Teacher* with the Wells *Teach Yourself* dictionary. Read about this in our next issue.

John Moore is Director of Correspondence Courses for the Australian Esperanto Association. He can be contacted at 7 Pelican Street, Emu Park Qld 4702.

WHO ARE THESE ESPERANTISTS?

A survey was recently conducted by the Universala Esperanto-Asocio and published in the April 1992 issue of its journal concerning the make-up of its readership. Only 866 persons answered the survey, but they are distributed in 77 countries and presumably represent more or less accurately the general composition of the Esperanto movement.

Ranging from highest to lowest, answers were received from Germany; France; Netherlands; Brazil; USA; Britain; Italy; the former republics of the USSR, Sweden (equal), Japan and Finland (equal); China, Czechoslovakia (equal); Denmark; Spain; Yugoslavia (pre-civil war), Hungary, Switzerland and Iran (equal); Poland; Australia.

The languages spoken at home by the respondents were, in order of frequency, English (13%), German, French, Portuguese, Spanish, Swedish, Italian, Japanese, Chinese, Russian, Hungarian, Danish, Czech, Persian, Polish, and 56 other languages.

The breakdown by ages shows:

Age 01-20:....0.9%	41-60: ...34%
21-40: ...25%	61-40%

Indicating that rather more than half (59%) use Esperanto during their working years.

The breakdown by sex is intriguing and difficult to explain:

Male: 78.8% Female: 20% (1.2% no answer given).

Esperantists include an unexpectedly high number of professional persons:

retired	28.8%	medical personnel	03.9%
teachers.....	12.5%	natural sciences....	02.5%
technicians	12.5%	others.....	19.2%
office workers	11.6%	(no answer.....	05.0%)
students	00.04%		


(it is generally assumed that in the pre-World War II period most Esperantists were working class).

The level of education of present day Esperantists is relatively high:

Primary school .. 4.8% High school...32.7% University... 59.7% (N/A 2.8%)

Living status: Live alone...29.3% Live in a family...59.5% (N/A.. 10.7%) which is perhaps to be expected in view of the ages of the respondents and the large proportion of retired persons.

Respondents seem to be relatively committed Esperantists, given that nearly 83% have been members of the UEA, which conducted the poll, for 5 years or more.



•**Ni atentigas niajn legantojn** ke la libreto *Frank Reginald Banham*, biografio verkita de Audrey Bruton kaj eldonita de la Aŭstralia Esperanto-Asocio en marto, 1991, 36p., estas senpage havebla ĉe la redakcio de *The Australian Esperantist*. La formato estas sama kiel de *The Australian Esperantist*. Por ricevi ekzempleron, bonvolu sendi taŭgdimensionan afrankitan koverton.

•**Pri Nia Universo** estas la titolo de nova libreto el Ĉinio (112p., \$3.20 de la AEA Libroservo). Ĝisdataj informoj pri la suno, luno, kaj planedoj de nia sunsistemo, laŭ la scio de okcidentaj astronomoj, plus iom da interesa ĉina folkloro kaj informoj pri la evoluo de astronomia scio en la Okcidento. La libreto inkludas multajn informojn kiujn ni ŝuldas al la spacesplorprogramoj usona kaj soveta.

•**Per Aŭstralia Antologio aŭstralia literaturo disvastiĝas.** *La Verda Koro de la suprarejna basebeno*, gazeto inter Karlsruhe kaj Strasbourg, havas rubrikon "Eksterlanda Literaturo". En la numero de Majo/Junio 1992 aperis "Terra Australis" de James McAuley, tradukita de Winsome Greenhalgh. En la numero de Julio/Aŭgusto aperis "Mortigu por Manĝi" de Kath Walker, tradukita de Donald Broadribb. Ne estas agnosko de la fonto, sed la paĝoj estas kopiitaj el *Aŭstralia Antologio*. Bedaŭrinde oni ne korektis la preserarojn indikitajn en la "korektend-

ajoj". Sed oni ja aldonis kelkajn vortklarigojn, bazitajn ĉefe sur la glosaro de Alan Toswey. (Informas Ralph Harry.)

•**Aktoj de la Akademio III 1975-1991** estas ĵus eldonita kiel Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto numero 11. 79p., broŝurita, en stoko ĉe UEA kaj SAT, kaj mendebla pere de la AEA Libroservo. Ĉi tiu broŝuro, krom informoj pri la Akademio, ĝiaj historio, statuto, kc., konsistas plejparte el diskutoj pri la landnoma problemo en Esperanto, kun detaloj pri la studo kiu rezultigis la Liston de Normaj Landnomoj eldonitan en 1989 kaj plene represitan en ĉi tiu libro. Instruantoj de Esperanto kaj studentoj por la Supera kaj Klereca Ekzamenoj bezonas ĝisprofunde koni ĉi tiun verkon.

•**Trevor Steele, nia eksprezidanto kaj talenta romanisto** denove estas en Aŭstralio por mallonga periodo. Provizora adreso: 8/51 Rialto Street, Coorparoo Qld 4151. Lia dua libro, *Memori kaj Forgesi*, estas eldonita de Pro Esperanto en Vieno. Lia antaŭa romano, *Ne Nur Fragmento* kostas \$25.00 ĉe la AEA Libroservo.

•**Nova kolora turisma prospekto pri Nancio** en Esperanto aperis en Julio kaj estas senpage havebla de la Office de Tourisme de Nancy, 14 Place Stanislas, BP 810 - 54011 Nancy, Francio. Kiu intencas turisti en Francio trovos ĉi tiun faldfolion informa kaj helpa

por ekkoni Nancion.

• **Lingvaj Respondoj de L.L. Zamenhof** estas reeldonita en Jekaterinburg (Rusio) de la eldonejo Sezonoj, (55p. broŝurita. \$7.20 de la AEA Libro-servo.) Ĝi estas neŝanĝita represo de eldono de 1927, do sen notoj kc. (Malsimile al la multe pli detala eldono redaktita de Gaston Waringhien kaj eldonita de UEA.) Nuntempaj Esperantistoj ofte ne konas la klasikajn verkojn de la frua periodo de Esperanto. Inter tiuj verkoj estas pluraj dokumentoj klarigantaj la intencojn de Zamenhof rilate diversajn gramatik- kaj vort-uzojn. Liaj klarigoj helpas kompreni ne nur la historion de nia lingvo sed ankaŭ la detalojn de diversaj vortuzoj kiuj malklaras al nunaj anglalingvaj lernantoj de Esperanto. Kvankam *Lingvaj Respondoj* havas neniun oficialan statuson en Esperanto, ĝi estas la fonto de multaj reguloj troveblaj en *Plena Vortaro Ilustrita* kaj *Plena Analiza Gramatiko*. Tial estas salutinda ĉi tiu libreto. Kiu volas instrui nian lingvon aŭ studi por la Klereca Ekzameno vere bezonas bone koni ĉi tiun verkon.

• **Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić"**: limdato la 15a de novembro, 1992. Por lastlastuloj validas la poŝta stampo sur la koverto, montranta tiun daton. La konkurso entenas kvar branĉojn: Poezio (originala aŭ tradukita); Et-prozo (rakonto, eseo, sceno, kc. maksimume 500-vorta); Libro-forma eldonaĵo (por libro eldonita en 1992); Video-bendo (temo libera; maksimume 30-minuta). Ĉiu konkursaĵo devas esti ne jam publikigita. Sendu tri kopiojn de ĉiu konkursaĵo (nur unu, se temas pri videokasedo) al la sekretario de la Zagreba Esperanto-Ligo: Marija Beloŝević, Sveti duh 130, 41000

Zagreb, Kroatio. Sur via verko estu via pseŭdonimo; en aparta koverto via vera nomo kaj adreso. [Informo el *Eventoj*.]

• **Aktoj de Internacia Sciencia Akademio Comenius** volumo 1, red. Paul Neergaard kaj Christer Kieselmann ĵus aperis, eldonite de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1992. (118p.) JAN AMOS KOMENSKÝ (Johan Amos Comenius, 1592-1670) estis grava pedagogo, kaj honorige al li Paul Neergaard (mortis 1987) fondis la suprenomitan Akademion en 1986. Profesoro Christer Kieselmann, eminenta matematikisto kaj ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto estas nun ĝia sekretario. Ĉi tiu unua volumo de la *Aktoj* devis longe atendi eldoniĝon, sed nun feliĉige eniris la sunlumon. En ĝi estas 15 originalaj esperantlingvaj referaĵoj ĉiumaniere altkvalitaj, el diversaj fakoj: historio, filologio, juro, geografio, statistiko, astronomio, botaniko, ka. Ĝia nekredible malalta vendprezo faciligas ĝian aĉeton. **Sed atentu**: la enhavo estas tre teknika! Prezo: \$9.60 ĉe la AEA Libro-servo.

• **Amika Societo Honore al Kolomano Kalocsay** estas fondita. Kalocsay estis unu el la plej eminentaj verkistoj esperantistaj. La ĉefaj celoj de la Amika Societo estas kolekti, ordigi, kaj publikigi ĉiujn liajn verkojn esperantajn, kaj prizorgi monumentojn pri li. Por detaloj kontaktu: Ada Csiszár, Zsigmond tér 1/b, H-1023, Budapeŝt, Hungario. [Laŭ informo en *Eventoj*.]

Bonvolu Korekti

En nia Juli-Aŭgusta numero, p.21, kolumno 1, linio 30, la teksto devas diri "almenaŭ tri niveloj" (ne "...noveloj...")



VETERANA BRIGISTINO SUKCESAS

de RALPH HARRY

La plej maljuna ludanto en brig-turniroj, Julia Chadwick, mortis en la lasta parto de 1991 en Torquay, Anglio, aĝa 105 jarojn. Ŝi edziniĝis kun subpastro tuj antaŭ la Unua Mondmilito, kaj, kvankam ŝi ŝatis la viston, ne estis dece en tiu erao, ke la edzino de pastro ludas kartojn.

Sed post la emeritiĝo de Pastro Chadwick en 1951 Sinjorino Chadwick ludadis duplikatan brigon publike kaj vigle. Dum tri jardekoj ŝi kaj ŝia partnero veturis aŭte de kongreso al kongreso ĉie en la Britaj Insuloj, ofte gajnante. La tagon de sia 100-a datreveno S-ino Chadwick piediris pli ol kilometron kaj tiam ludis kvar horojn en ĉampionludo por geaj paroj.

En siaj naŭdekaj jaroj ŝi ludis la sekvantan manon:

NORDO
 ♠ A, R, D, 10, 9, 6, 3
 ♥ 8, 5, 3
 ♦ R, 2
 ♣ 2

OKCIDENTO
 ♠ F, 8, 7, 4
 ♥ F, 10, 9, 2
 ♦ F, 10, 8, 7
 ♣ R

ORIENTO
 ♠ 2
 ♥ 7, 6, 4
 ♦ 9, 5, 4, 3
 ♣ 8, 7, 6, 5, 4

SUDO
 ♠ 5
 ♥ A, R, D
 ♦ A, D, 6
 ♣ A, D, F, 10, 9, 3

La ofertado estis:

Okcidento	Nordo	Oriento	Sudo
	1♠	Paso	3♣
Paso	4♠	Paso	4 Senatutoj
Paso	5♦	Paso	5 Senatutoj
Paso	6♥	Paso	7 Senatutoj

La unua ekludo estis: la kera fanto.

La veteranino, en la suda seĝo, kuraĝigita de la salto al kvar pikoj, kiu montras solidan emblemon, sturmis al granda ŝlemo. La ofertoj de kvin karoj kaj ses keroj indikis, kompreneble, ke ŝia partnero havas unu ason kaj du reĝojn.

Ŝi kaptis la unuan trekon per la kera damo, kaj tuj kaptis per la keraj reĝo kaj aso. Tiam ŝi prenis tri trekojn per la karoaj reĝo, damo kaj aso. Kiam ŝi ludis la pikan kvinon, kaptante en la fantomo per la aso, kaj ludis la reĝon, ŝi ektrovis la malbonan novaĵon, ke estis kvar pikoj en la okcidenta mano. Sed ŝi observis, ke Oriento forĵetis trefon. Kiam ŝi ludis la pikan damon Oriento denove ludis trefon.

Restis nur kvar kartoĵ en ĉiu mano. Julia cerbumis: Okcidento komence havis kvar pikojn kaj almenaŭ tri kerojn kaj tri karojn. Tial Okcidento havis maksimume tri trefojn, kaj Oriento havis minimume tri. La fakto, ke Oriento jam forĵetis du malgrandajn trefojn indikis, ke li eble havas nur malgrandajn trefojn. Se li havas la reĝon sendube li ankaŭ havas du aliajn. Tial, fineso de la trefa damo ne sukcesigis la ŝlemon. Tio eblus nur se Okcidento havus la nudan trefan reĝon.

Do, S-ino Chadwick ludis la trefan duon el la fantomo, kaj la ason el sia propra mano, kaj...kaptis la reĝon triumfe! Sekvis la trefaj damo, fanto kaj deko, kaj la granda ŝlemo estis farita. La tutkomenca ludo de la ruĝaj emblemoj donis al ŝi la esencan

informaĵon. Sen tio, la normala tak-
tiko estus fineso per la trefaj aso kaj
damo.

(Ĉi tiu rakonto estas bazita sur
raporto en la *Bulletin* [Sidnejo] de la
2-a de junio. La aŭtoro, Paul Lavings

afable permesis.)

[*Bonvolu korekti:* Mi ekdormis dum
kompostado de "La Ekludo", kaj
aperis en TAE 174, kaj tajpis trifoje
"fanto"-n anstataŭ "fantomo".—RH] □

PETO EL TANZANIO

de CHARLES K. HIZA

Al la Aŭstralia Esperanto-Asocio
La 31an de julio, 1992

Tre estimataj samideanoj,

Mi unuafoje skribas ĉi tiun leteron
al vi. Mi trovis vian adreson en UEA
JARLIBRO de 1990. Mi pardonpetas ke
mi ĝenas vin per tiu ĉi mallonga lete-
ro. Sed mi havas gravan aferon.

Mi estas junulo 27-jaraĝa—hieraŭ
estis mia naskiĝtago. Mi estas instru-
isto en baza lernejo kaj instruas an-
glan, historion, matematikon, geogra-
fion kaj sciencon. Mi eklernis esper-
anton en la jaro 1984 per koresponda
kurso de UEA. Mi ankaŭ estas kasisto
de nova asocio, la Tanzania Esper-
anto-Asocio. Tio montras ke nia aso-
cio ankoraŭ estas tro juna. Bedaŭr-
inde en nia lando ĉiuj esperantistoj
estas junuloj. Kontraste al Aŭstralia
Esperanto-Asocio.

Mi petas Aŭstralian Esperanto-Aso-
cion ĝemeligi kun Tanzania Esper-
anto-Asocio. Ni tre deziras viajn help-
ojn en esperantaĵoj, instruiloj, eĉ
instruistoj. Mi konsilas al vi helpi al ni
per stipendio de unu persono aŭ pli
por pli studi esperantan instru-
metodon, organizadon de kongreso,

asocio kaj kluboj (grupoj) en Aŭstra-
lio dum unu jaro aŭ ses monatoj.
Bonŝance mi estas instruisto kaj nia
lando estas ekskolonio de Britio. Pro
tio oni multe parolas anglan kvankam
nia nacia lingvo estas svahila.

Mi esperas ke vi sendos librojn al mi
por disdoni al kelkaj grupoj kaj klub-
oj. Mi estas pioniro de esperanto en
mia lando.

Mi atendos vian afablan respondon
baldaŭ.

PS: Mi deziras vendi bildkartojn kaj
pentraĵojn (Afrikaj kulturo, vivmani-
ero ktp) al Aŭstralio por akiri monon
por mia korespondado esperante. Ĉu
vi akceptos mian peton por akiri
dolarojn el Aŭstralio? Ĉar petado de
mono estas almozo-peto al geesper-
antistoj, kaj ĝenas aliajn homojn, por
eviti tion mi vendos bildkartojn kaj
pentraĵojn. Bonvolu informi al mi se
vi akceptus miajn aĵojn (bildkartojn
kaj pentraĵojn).

Mia adreso:

Charles K. Hiza
Pangani Primary School
P.O. Box 77 Pangani
Tanga, Tanzanio. □



INGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

SI

Antaŭnelonge mi ie rimarkis misuzon de si: "Ŝi kaj sia avino loĝis..."

Tio devas esti: Ŝi kaj ŝia edzino...

"Al ŝi sia avino diris..." Tio devas esti: Al ŝi ŝia avino diris...

Si(a) ne povas esti parto de la *subjekto* de frazo!

SMELL

Mi trovis: dolĉe *flaranta* oleo. Tio devas esti: dolĉe *odoranta* oleo.

Flari estas *transitiva* verbo, t.e., ĝi devas havi *objekton*, kaj postulas la akuzativon:

La Eternulo flaris la agrablan odoron (*PIV*).

Elflari—to nose out (a mystery etc.).

Odori = to have an odour, smell (of).

Odori je brasika supo.

Odori brandon/je brando (smell of brandy).

La tuta atmosfero odoris pipron, safranon kaj zingibron²

Ĉie odoris agrabla parfumo (There was a pleasant smell/scent everywhere).

Ankaŭ metafore: Tio odoras perfidon! (= smells of treachery).

Kio kondukas al

OIL

Oil = oleo (ĝenerala vorto)

nafto (= crude oil—kruda petrolo: la krudmaterialo de la tuta petrolindustrio)

petrolo (= petroleum)

mazuto (= fuel oil)

benzino (= petrol—rafinita petrolo)

parafino (= paraffin)

keroseno (= kerosene—lampoleo)

Kerosena varmigilo—oil heater; kerosenlampo—oil lamp; hurricane lamp/
lantern—ŝtormlampo/lanterno

Kerosena/petrola fornelo—oil cooker.

Petrola ĝelo = vazelino (vaseline, petroleum jelly).

La Brita Petrolkompanio. Petrolfonta regiono—oil field.

Petrol/naftoŝipo—oil tanker.

Parafina vakso—candle grease.

Parafina kandelo—wax candle.

Mazuthejtata—oil-fired.

But: oil painting = oleopentraĵo.

PROVE

Mi vidis: "La enketo *pruvis* vane". Oni verŝajne volis esprimi la anglan: "The inquiry proved to be in vain". Tio devas esti: La enketo *montriĝis/rezultis/aperis*

vana.

Sed: prui teorion.

Se *prove* estas transitive kaj havas objekton, ĝi tradukiĝas per *prui*. Se ĝi estas netransitiva, kiel en *prove to be*, oni ĝenerale povas traduki ĝin per *montriĝi*.

WELCOME

Ie mi vidis: "Vi estas bonvena uzi ĝin". Oni ŝajne volis traduki la anglan "You're welcome to use it". Sed tio ne estas ĝusta. La angla vorto *welcome* uziĝas en diversaj sencoj, kaj oni devas traduki laŭ la ĝusta senco, kiel ekzemple:

Bonvenon! Bonvenu! bonvenigi iun, deziri bonvenon al iu.

Vi estas bonvena ĉi tie—You're welcome here.

Bonvena dormo/gasto/evento (event, opportunity).

Ĝi estos al li tre bonvena.²

Taso da kafo estas ĉiam bonvena/ŝatata.

Saluti decidon/ies aperon

Outstay one's welcome—pretertempe gastu/esti trudiĝema gastu/misuzi ies gastamon.

It was a welcome sight/welcome news—Ni (Li, ktp.) estis feliĉaj vidi tion/aŭdi la novaĵon.

It was a welcome relief to hear...—Mi (ktp.) vere trankviliĝis aŭdi...

Thank you! You're welcome—Dankon! Nedankinde.

You're welcome to try! (ironie)—Vi ja povas provi!

You're welcome to (use) my car—Ne hezitu uzi mian aŭton/Mia aŭto estas je via dispono.

She is welcome to come and go—Ŝi estas libera venadi kaj iradi.

You're welcome to any help I can give you—Mi estas je via dispono/Plaĉos al mi helpi vin iel ajn. □

Charlotte Harvey

Charlotte mortis la 12-an de majo, 1992. Ŝi eklernis Esperanton en oktobro 1987. Dum 24 jaroj ŝi instruis muzikon en Mildura, Vic., kaj foje partoprenis en la McGregor Somerlernejo ĉe la Darling Downs Instituto de Plua Edukado (nun la Universitato de Suda Kvinslando) kie ŝi studis kaligrafion. Pro sia sano, Charlotte devis fine foriri el Mildura, kaj ĉar la klimato de Toowoomba, kaj la homoj, al ŝi plaĉis, ŝi ekloĝis en tiu urbo. Ŝi zorgis lernantinojn ĉe la pensiona lernejo Glennie kelkjare, poste instruis ĉe Muzikcentro (Lowes) ĝis 1991, kiam ŝi emeritiĝis pro malsano. Reirinte al parencoj en Deniliquin NSW ŝi mortis pro kancero je sia 77-a jaro. Muzikisto ekde la aĝo de tri jaroj, ŝi multe ludis orgenojn en preĝejoj. Kion ajn ŝi faris, ĉiam ŝi strebis al perfekteco. Samtempe okazis funebra ceremonio en Deniliquin, kaj en Mildura kaj en Toowoomba memoriga soleno, la 15-an de majo. Adiaŭ, Charlotte...

[El Toowoomba Tereno]



Retrokomente



Skribas Brian Currie

Legante la anglalingvan suplementon en la julia-aŭgusta numero (274) de *La Aŭstralia Esperantisto* mi trovis min en nepra miro. Sub la rubriko "Books for reference" Donald Broadribb rekomendas vortarojn kaj konsultlibrojn por la studentoj de Esperanto kiel de "iu fremda lingvo".

La miron kaŭzis tio, ke li tute ne menciis la vortaron, kiu estas multe la plej aĉetata en Aŭstralio. Tio estas la verko *Concise Esperanto and English Dictionary*, alie konata kiel *Teach Yourself Esperanto Dictionary*, fare de iu certa J.C. Wells MA PhD ktp, nuna prezidanto de UEA. La librooperanto konfirmis al mi, ke ĉi tiu libro vendiĝas el la Libroservo kvardekoble, eble centoble, pli ol la du vortaroj menciitaj de Broadribb, tio estas *Esperanto-English Dictionary* de M.C. Butler kaj *English-Esperanto Dictionary* de Fulcher & Long, konsiderataj ambaŭ kune.

Kial la merkato tiel multnombro pli ŝatas la Wells-on?¹ Unue, ĝi estas forme pli konvena. En lerte tranĉita bloko da pulpligno granda 3x11x18 cm oni trovas dudirektan vortliston, plus mallongan sed sufiĉe kompletan klarigon pri gramatiko en la angla. Due, ĝi estas kompleta en si mem,

anstataŭante tri aliajn librojn (ni diru: La Butler, la Fulcher & Long, kaj *Step by Step*) almenaŭ por la pli kapabla lernanto.


Al komencantoj mi ĉiam rekomendas la progreson: elementa kurso → Wells → PV → PIV → PAG, Eichholz ktp. Per la Wells ili povas legi ĉiajn tekstojn en Esperanto krom la plej teknikaj jam de la komenco, kaj fari krudajn tradukojn el la angla. Por ekscii la precizan sencon de certa radiko aŭ kunmetaĵo Esperanta, ili serĉu jam en PV aŭ en PIV. La difinojn ili legu per Wells finfine. Tiuj kiuj inklinas al Monumentaj Taskoj ekkentreprenos la legadon de PAG.

Laŭ mia opinio la daŭra uzado de unudirekta vortaro, post la unua kurso, agas al multaj kiel kaptulo en la ĝangalan ĝardenon de la angla gramatiko. Frapitaj, ili forkuras al aliaj, pli mildaj hobiaj. Pli bone ili komencu jam de la komenco, kiel eble plej multe, pensi rekte en Esperanto, kaj ekuzi kiel konsultlibrojn pri Esperanto librojn skribitajn rekte en la lingvo mem.

Tamen eĉ atletoj foje bezonas lambastonon. Pro tio mi tre rekomendas al fakuloj la ekkonstruon de *Complete Esperanto Grammar* kiu povus klarigi al inteligenta lernanto, en sia hejma babililo, pri certaj atentindaĵoj survoje kiaj *Ata-Ita*, la uzado de **si**, la akuzativo, ktp. Elementaj tekstoj mal-sufiĉe povas klarigi ĉiujn detalojn. □

¹Plej verŝajne, laŭ mia opinio, ĉar oni kutime rekomendas ilin al lernantoj kaj malofte mencias la ekziston kaj valoron de Butler ktp.—Red.

LANDNOMOJ AKADEMIO DE ESPERANTO



En 1989 la Akademio de Esperanto publikigis liston de normaj landnomoj. "Normaj" ĉikaze signifas ke la nomoj plejparte ne estas oficialaj, sed estas rekomendataj cele al iama oficialigo post longedaŭra provado. Ĝenerale, la listo estas limigita al la nomoj de nacioj/ŝtatoj kiuj en 1989 estis membroj de Unuiĝintaj Nacioj. Tial mankas en ĝi nomoj de, ekzemple, la eksjugoslavaj respublikoj kaj de plej multaj ekssovetaj respublikoj.

Lastatempe la listo, senŝanĝa, kun multaj detaloj pri ĝia prepariĝo, estis reeldonita en libro *Aktoj de la Akademio III 1975-1991*. Estas dezirinde ke ĝin konu kaj uzu esperantistoj por komenci forviŝi la nuntempan kaoson.

La listo en la formo donita en *Aktoj de la Akademio III* estas malfacile uzbla por ordinara esperantisto. Ĝi estas dividita en plurajn partojn laŭ la origino de la nomoj, kun amaso da detaloj. Por plifaciligi la uzadon, ni donas ĉisube la saman liston sed laŭ strikta alfabeto ordo.

Kiel scias ĉiu esperantisto, landnomoj en Esperanto estas dumaniere farataj: (1) la plej multaj nomoj konsistas el simpla radiko plus -o, ekzemple: Argentino, Aŭstralio, Kanado, Nov-Zelando, Usono, Venezuelo, kaj multaj aliaj. Oni nomas civitanojn de tiuj landoj per -ano: argentinano, aŭstraliano, kanadano, nov-zelandano, usonano, venezuelano; (2) ĉirkaŭ triono de la landnomoj uzataj konsis-

tas el radiko kiu nomas la popolon plus -io aŭ -ujo aŭ -lando. Ekzemploj: angloj vivas en Anglio/Anglujo, francoj en Francio/Francojo, latvoj en Latvio/Latvujo.

Laŭ la rekomendoj de la Akademio, oni rajtas laŭvole uzi aŭ -io aŭ -ujo. Estas dezirinde limigi la uzon de -io al landnomoj kiuj internacie havas formon finiĝantan per -i-, kvankam estas esceptoj. Notu ke kvankam laŭteorie oni povas nomi tiujn naciojn ankaŭ per -lando, estas dezirinde limigi tion al nomoj kiuj internacie finiĝas per -land-, ekzemple Finnlando, Skotlando, Svislando. Bedaŭrinde ekzistas ankaŭ kelkaj neregulaj nomoj, ekzemple: Afganistano, kie loĝas afganoj; Islando, kie loĝas islandanoj; Kirgizistano, kirgizoj; Uzbekistano, uzbekoj. Tiuj nomoj estas uzataj en la plej multaj lingvoj kun tiuj neregulaj formoj, kaj tial enpenetris Esperanton kun neregula formo.

Kelkaj esperantistoj plendis ke ne aperas ilia lando en la listo. Tio ofte estas pro miskompreno: pluraj landoj formas sian nomon per kombino de simplaj vortoj kaj enlistaj nomoj, ekzemple: Nov-Zelando.

Plejparte landnomoj ne estas oficialigitaj vortoj. Tamen kelkaj aperis en la *Fundamento de Esperanto*, kaj pluraj aliaj estis oficialigitaj en la *Oka Oficiala Aldono*, 1975. En la ĉisuba listo oficialaj nomoj estas presitaj *kursive*. El ili, nomoj aperintaj en la *Fundamento* estas signifitaj per ^F.

En la ĉisekva listo aperas unue la

nomo de la lando kaj tujposte la nomo de civitano de tiu lando. Ekzemplo: Angolo, angolano; Angl-ujo/-io, anglo. Komentoj inter parentezoj ()

estas de la Akademio; komentoj inter [] estas de la redaktoro. Nur komentoj utilaj por ĉiutaga scio estas konservitaj en ĉi tiu represo.

Afganistano, afgano
 Afriko, afrikano
Alban-ujo/-io, albano
Alĝerio, alĝeriano
Andoro, andorano
Angl-ujo/-io, anglo^r
 Angolo, angolano
 Antigvo, antigano
Arab-ujo/-io, arabo
 Argentino, argentinano
 Armen-ujo/-io, armeno
Aŭstralio, aŭstraliano
 Aŭstrio, aŭstrianano. (Sed eblis diri Aŭstro-Hungario.)
 Bahamoj, bahamano
 Bangladeŝo, bangladeŝano
 Barbado, barbadano
 Barbudo, barbudano
 Barejno, barejnano
Belg-ujo/-io, belgo
 Belizo, belizano
Belorus-ujo/-io, beloruso
 Benino, beninano
 Birmo, birmano
 Bocvano, bocvanano
Bolivio, boliviano
Brazilo, brazilano. (La ĉefurbo estas Braziljo)
 Brit-ujo/-io, britoj (kaj Grand-Britio, Grand-Britujo)
 Brunejo, brunejano
Bulgar-ujo/-io, bulgaro
 Burkino, burkinano. ("Faso" en "Burkina Faso", ne tradukiĝas. Antaŭe: Supra-Volto.)
 Burundo, burundano

Butano, butanano
 Ĉado, ĉadano
 Ĉeĥoslovak-ujo/-io, ĉeĥoslovakoj
 Ĉilio, ĉiliano
 Ĉin-ujo/-io, ĉino
Dan-ujo/-io, dano
 Domingo, domingano.
 [La Dominga Respubliko estas la orienta parto de la insulo Hispaniolo. — Red.]
 Dominiko, dominikano
 Ebur-Bordo, ebur-bordano
 Egipto, egiptano
Ekvadoro, ekvadorano
 (El-Salvadoro, el-salvadorano)
 Eston-ujo/-io, estono
Etiop-ujo/-io, etiopo
 Fiĝoj, Fiĝiano
 Filipinoj, filipinano
 Finn-lando, finno
Franc-ujo/-io, franco^r
 Gabono, gabonano
 Gambio, gambiano.
 (Kreĝis federacio sub la nomo Senegambio dec. 1981.)
 Ganao, ganaano
German-ujo/-io, germano^r
 (Grand-Brit-ujo/-io)
Grek-ujo/-io, greko
 Grenado, grenadano
 Grenadinoj, grenadinano
 Gro(e)nlando, gro(e)nlandano
 Gujano, gujanano. (Sen-

dependiĝinta ŝtato (Guyana), kun ĉefurbo Geortgaŭno, eks-Brita Gviano, (Guiana); apartenas al la regiono de Gvajanoj, kune kun Surinamo kaj la Franca Gviano.)

Gvatemalo, gvatemalano
Gvineo, gvineano. (Nomo de kvar ŝtatoj, el kiuj tri respublikoj: Respubliko Gvineo, Respubliko Gvineo-Bisaŭo (ĉefurbo: Bisaŭo) kaj Ekvatora-Gvineo. La kvara estas Papuo-Nov-Gvineo.)

Ĝibutio, ĝibutiano
 Haitio, haitiano. (Respubliko Haitio okupas la okcidentan parton de la insulo Hispaniolo.)

Hind-ujo/-io, hindo
Hispan-ujo/-io, hispano^r

Honduro, hondurano
Hungar-ujo/-io, hungaro
 Indonezio, indoneziano
Irako, irakano

Irano, iranano. (Kun la Persa lingvo— kaj la iama Persujo/Persio.)

Irlando, irlandano
Islando, islandano

Israelo, israelano (Kun la Hebrea^r lingvo.)

Ital-ujo/-io, italo

Jamajko, jamajkano

Japan-ujo/-io, japano.
 Sinonimo: Nipono,

niponano	lingvo.)	<i>Paragvajo, paragvajano</i>
Jemeno, jemenano	Malajzio, malajziano	<i>Peruo, peruano</i>
Jordanio, jordaniano	Malavio, malaviano	Pol-lando, polo
<i>Jugoslav-ujo/-io, jugoslavo</i>	Maldivoj, maldivano	Portugal-ujo/-io, portugalo
Kabo-Verdo, kabo-verdano	Malio, maliano	Principeo, principeano
Kameruno, kamerunano	Malto, maltano	Ruando, ruandano
Kampuĉeo, kampuĉeano	<i>Maroko, marokano</i>	<i>Ruman-ujo/-io, rumano</i>
<i>Kanado, kanadano</i>	Maŭricio, maŭriciano	<i>Rus-ujo/-io, ruso</i> ^F
Kataro, katarano	Maŭritan-ujo/-io, maŭritano	Salomonoj, salomonano
Kenjo, kenjano	<i>Meksiko, meksikano.</i> (Sed: Urbo Mek-siko aŭ Meksiko-urbo.)	Salvadoro, salvadorano
Kipro, kiprano	Monako, monakano	[Vidu El-Salvadoro.—Red.]
Kirgizistano, kirgizo	Mongol-ujo/-io, mongolo	Samoo, samoano
Kiribato, kiribatano	Mozambiko, mozambikano	San-Marino, san-marinano
Kolombio, kolombiano.	Nauro, naurano	Sao-Tomeo, sao-tomeano
(Ne konfuzu kun Kolombio, Usona federala distrikto kun ĉefurbo Vaŝingtono.)	<i>Nederlando, nederlandano</i>	Sejŝeloj, sejŝelano
Komoroj, komorano	Nepalo, nepalano	Senegalo, senegalano
Kongolo, kongolano	Neviso, nevisano	Sent-Kristofa, sent-kristofano
Koreo, koreano. (La Korea etno nomiĝas Hanoj; sinonimo por la lando: Hanlando. Ne konfuzu Hanojn kun Ĥanoj, ĉefgento de Ĉinio.)	Niĝero, niĝerano	Sent-Lucio, sent-luciano
<i>Kostariko, kostarikano</i>	Niĝerio, niĝeriano	Sent-Vincento, sent-vincentano
<i>Kubo, kubano</i>	<i>Nikaragvo, nikaragvano</i>	Siberio, siberiano
Kuvajto, kuvajtano	Nipono, niponano (V. Japan-ujo/-io)	Siera-Leono, siera-leonano
Lanko, lankano [Vidu: Sri-Lanko.]	<i>Norveg-ujo/-io, norvego</i>	Singapuro, singapurano
Laoso, laosano	(Nov-Zelando, nov-ze-landano) [nomo formita el ordinara vorto "Nova" plus la enlistigita Zelando.—Red.]	<i>Sirio, siriano</i>
<i>Latv-ujo/-io, latvo</i>	Omano, omanano	Skot-lando, skoto
Lesoto, lesotano	<i>Pakistano, pakistanano</i>	Somal-ujo/-io, somalo
<i>Libano, libanano</i>	<i>Panamo, panamano</i>	Sovetio, sovetiano (U.S. S.R.) [Plejparte la eks-sovetiaj respublikoj ne havas nomojn en ĉi tiu listo. Krome, ĝis nun ne ekzistas komune uzata Esperanta nomo por la nova konfederacio de ekssovetiaj ŝtatoj.—Red.]
<i>Liberio, liberiano</i>	Papuo, papuano (Papuo-Nov-Gvineo rezultas el unuigo de Nov-Gvineo kaj de Papuo. La tria parto de la sama insulo estas la Okcidenta Nov-Gvineo, nun Iriano.)	(Sri-Lanko, sri-lankano)
<i>Libio, libiano</i>		<i>Sudano, sudanano</i>
Liĥtenŝtejnano		Surinamo, surinamano
Luksemburgo, luksemburgano		
Madagaskaro, madagaskarano. (Kun la Malagasa		

Svazi-lando, svazio <i>Sved-ujo/-io, svedo</i>	Vjet-Namo, vjet-namano	princ-io
Svis-lando, sviso	Zairo, zairano	reĝ-io
Tajlando, tajlandano	Zambio, zambiano	sultan-io
Tajvano, tajvanano	Zelando, zelandano	Adjektivoj kun politika
Tanzanio, tanzaniano	Zimbabvo, zimbabvano	senco:
Tobago, tobagano	Vortoj neoficialaj aper-	federativa
Togolo, togolano	antaj en PIV:	socialista
Tongo, tongano	dominio	sendependa
Trinidado, trinidadano	federala	unia/unuigita/unuig-
<i>Tunizio, tuniziano</i>	Islamo	inta
<i>Turk-ujo/-io, turko^r</i>	kooperativo	Propraj nomoj de dinas-
Tuvaio, Tuvalano	nomarko	tioj:
Ugando, ugandano	nomarkio	Haŝima
Ukrajno, ukrainano	soveto	Saŭda
<i>Urugvajo, urugvajano</i>	unio	
Usono, Usonano	Teritorioj regataj de di-	Ŝtataj reĝimnomoj:
Uzbekistano, uzbeko	versaj tradiciaj estroj:	Ĝamahirio
Vanuatuo, vanuatuano	duk-io	Komonvelto
Vatikano, vaticanano	emir-io	
Venezuelo, venezuelano		

La ĉisupra listo sur unu flanko de A4-folio estas havebla ĉe la redakcio.

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

Artoli Alberto, Via I. Nievo n^o1 int 2, 41037 Mirandola (Mo), Italio. 51ajara, diplomita mekanikisto.

Keta Sesmero Cutanda, Ronda 12 3^a-d, 4800 5 Bilbao, Hispanio. 30jara, interesiĝas pri historio, arto, literaturo, pedagogio.

Stanislav Čechman, Bří Jaronku 4063, CS-76001 Zlín, Ĉeĥoslovakio. 39jara viro, interesiĝas pri homoj, aŭtoj, joko, kuracarto.

María de Los Angeles, Carabello Mavri 7, Adieso Gonzalo de Quesada 74, Sagva la Giande Villa Clara, Kubo C.P. 52 310. Fraŭlino, deziras korespondi pri nia lando kaj intersanĝi poŝtmarkojn.

Lojos Szoke, Kazincbarcika, Gagarin ut 8 sz., H-3700 Hungario. 44jara redaktoro, deziras skribi.

Vesela Pavolo, 14a Gogol Str, 1124 Sofro, Bulgario. 26jara oficistino, interesiĝas pri muziko kaj literaturo. □

ALDONO AL LA LIBROKATALOGO 1992

- 011: *1887 kaj la Sekvo*. Gaston Waringhien. 312p., broŝ. \$43.50.
324: *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*, volumo 1. 188p., broŝ. \$9.60.
209: *Internacia Kuirlibro*. J. Shoter-Eyck. 190p., broŝ. \$5.50.
197: *Jen la Domo Kiun Joĝo Konstruis*. Gilmore & Mumford. Grandformata koloriglibro. 116p., broŝ. \$9.20.
305: *Lingvoj Respondoj*. L.L. Zamenhof. 53p., broŝ. \$7.70.
282: *Metodiko de la Esperanto-Instruado*. Rudolf Rakuŝa. 3a eldono. 189p., broŝ. \$15.20.
321: *Moderna Historio de Ĉinio laŭ Temoj*. Su Kaiming. 210p. broŝ. \$5.50.
277: *Pasporta Servo 1992*. 128p., broŝ. \$22.00.
128: *Pri Nia Universo*. Li Qiang. 112p., broŝ. \$3.20.
Diversaj kantasedoj: 130: *Cu ne?* (Amplifiki) \$26.20; 131: *En la Spiegulo* (Persone) \$29.50; 165: *La Mevo* (Bluo) \$29.50; 144: *Muziko Tutmonda* (Ranier Conrad) \$29.50; 141 *Procesio Multkolora* (Kajto) \$21.00. Ĉiuj kun tekstlibretoj.
Krome: 252 *Aŭto-Insigno* \$5.50; 775 *Mapo de Ĉinia Popola Respubliko*, \$0.95.

ПОСТЕРІЯРАПОРТО ДЕ ОДЛО БОКСЕРП

[Odlo Bokserp estas nemalhavebla membro de la stabo de nia redakcio. Dum pluraj monatoj li feris en Eŭropo, kaj li revenis al Perto nur lastamomente por inkludi sian raporton en ĉi tiu nia septembra numero.]

En mia lasta raporto nia Reaktoro forgesis englui la senditan foton, kio devigas min esprimi al li mian grandan malplezuron. Nu, ĉifoje mi sendas mian foton, kaj admonas lin ne forgesi presi ĝin—

Mi estas la ulo tute blanke vestita, staranta en la mezo antaŭ la neĝkovrita monto. Ambaŭflanke estas gekolegoj mias el Eŭropo, Azio, kaj Sudameriko. La ulo sur la supro de la monto estas mia frato el Antarkto, verŝajne la sola foto de li nun ekzistanta. Li multe helpas niajn aŭstraliajn sciencistojn, kies raportojn li fojfoje sendas al la televidstacioj por laŭtleĝo en la informbultenoj.

Reveninte al Perto mi devis rapide laboregi por pretigi la nunan numeron de La Aŭstralia Esperantisto, kies tekston nia amata Reaktoro hontinde preparis sen kompost-kaj pres-eraroj. Dum la noktoj post mia reveno mi erŝutis plurajn tiajn sed se la kvalito de ĉi tiu numero ne kontentigas vin, ne min kulpigu sed nian Reaktoron kiu strebis ĉiumaniere min malhelpi. Mi promesas ke en nia novembra numero la nombro da eraroj multe plimultiigos (jes, jam du pleonaŝmoj, Reaktorol Vi ne rimarkis ĉi tiu ne?). Mia spacogifingisli □



EL LA REGIONOJ

La 58-a Kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

okazos en Hamilton, ĉe la Universitato Waikato, de la 6-a ĝis la 10-a de januaro 1993. Ĉeestantoj rajtos alveni posttagmeze la 5-an kaj foriri post matenmanĝo la 11-an. La kosto de restado kaj manĝado estos proksimume \$A54.00 tage. Ni anticipas viglan kaj interesan Kongreson.

Hamilton situas 129 km sud-oriente de Aŭklando kaj estas grava agrikultura kaj kampara centro. Oni povas atingi Hamiltonon per aŭtobuso aŭ aviadilo el Aŭklando. Ni anticipas feliĉan renkontiĝon kun novaj kaj malnovaj amikoj.

Aliĝiloj estas haveblaj de Sino Jo Knight, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 3, Nov-Zelando.

QLD—Toowoomba: La 13an de junio Dianne, Sandra kaj Jean aranĝis reklam-fenestron pri Esperanto en vaka butikofronte al la ĉefstrato kie piedtrafiko densiĝas. Ĉiu vitrino prezentas reklamaĵojn bone aranĝitajn.

Dum vizito de 50 japanoj en Too-

woomba je la 9-10 julio, estis du esperantistoj: Takeuti Yosikazu (ĉefdirektoro de la Takatuki-Esperanto-Societo kaj komitatano de UEA) kaj lia edzino Tomiko. Bedaŭrinde nur du lokaj esperantistoj povis renkonti ilin, Jean Lehane kaj Sandra.

La 21an de majo Dianne prezentis premion al Kimberley Asher, venkinto en konkurso "fari kiom eble da vortoj el la vorto "Esperanto". Ŝi estas lernanto en la elementa lernejo Rangeville. Dianne parolis al la lernejarano prezentante la premion.—El *Toowoomba Tereno* Aŭgusto-Septembro 1992.

Vic. Radio 3ZZZ: Nia entreprenema kolego Svetislav Kanaĉki meze de julio disaŭdigis Esperanto-programon numero 170 en 3ZZZ. Kaj iomete pli frue, je la 27a de majo li ricevis atestilon pri sukceso en la meza kurso por radioprezentistoj de Radio 3ZZZ. Elkorajn gratulojn, Svetislav, kaj multajn centojn pli da Esperanto-programoj ni deziras por vi.

WA

MORTIS GORDON GREGSON


Ni ĵus informiĝis ke la 22an de aŭgusto mortis Gordon Gregson, de Dalkeith (Perto) WA. Ni esperas aperigi nekrologon en nia venonta numero.

La Aŭstralia Esperantisto

(The Australian Esperantist)

Registered by Australia Post

Publication No. WBG 2488



Numero 276 — Novembro-December 1992

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. ☎ (09) 574 1307.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank QLD 4109.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Korespondaj kursoj: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park QLD 4702.

Presfuŝisto: Odlo Bokserp, ĉe la redakcio.

Membrokotizoj: \$25 por individuo, klubo kc. \$30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso). \$15 (minimуме) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ekster Aŭstralazio, abono al *La Aŭstralia Esperantisto* kostas A\$40 (50 ned. gld.) kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Sendu pagon per internacia bankĉeko al la kasisto de AEA; aŭ al la UEA konto de la Libroservo de AEA ael w kun samtempa atentigo al la Libroservo de AEA.

Bonvolu avizi la redaktoron se via adreso estas neĝuste presita sur la adreŝlipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikajojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro. Limdato por ricevo de presotaĵoj por la venonta numero: 29 decembro.

La kovrildeseĝno estas modifita formo de tiu proponita de Terry Manley. Por detaloj, vidu paĝon 19.

En ĉi tiu numero:

ARTIKOLOJ:

La Totara Arbo (novelo de R. Finlayson)	3
"La Suda Kruco" (Ray Ross).....	11
Lingva Angulo (Alan Towsey)	12
La 17a Regulo de la Esperanta Gramatiko (Bernard Golden).....	14
Diversaĵoj.....	18
<i>Esperantic Studies</i> (anonco).....	19
Kanto Pri Mia Kanto (poemo de Mikaelo Bronŝtejn).....	20
AEA Statutamendoj kaj Propono Plialtigi la Kotizojn.....	22
Nekrologoj:	
Philip Sunde.....	22
Gordon Gregson.....	23
Lina Clara (Eve) Matasin.....	24
Deziraso Korespondi	24
Indekso 1992.....	25

SPECIALA NOTO:

Nia desegno-konkurso.....	19
---------------------------	----

LIBROJ:

<i>Step by Step in Esperanto</i>	7
<i>Ek al Leg'</i> (vol.2).....	8

ESPERANTIC STUDIES NO. 3

BONVOLU ATENTI KE EKDE JANUARO 1993 ĈI TIU GAZETO ESTOS LA OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO KAJ DE LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO. ĜI RICEVOS NOVAN TITOLON, **ESPERANTO SUB LA SUDA STELO.**

Manuskriptoj estas ĉiam bonvenaj. Ili *nebre devas esti tajpitaj* kun duobla spaco inter la linioj, kaj klare legeblaj. Oni ankaŭ povas sendi tekstojn sur komputildiskoj 3½-colaj IBM- aŭ Macintosh-kongruaj, kun printaĵo de la teksto por kontrolo.

La Totara Arbo

de RODERICK FINLAYSON

tradukis Ellen Lymburn, Jo kaj Derrick Knight
lingve kaj stile redaktis Donald Broadribb

[Presita laŭ afabla permeso de la aŭtoro kaj de la Presejo de la Aŭklanda Universitato.]

El ĉiu direkto kuris homoj scivolemaj pri la kaŭzo de la ekscitiĝo.

"Ho estas freneza maljuna Taranga kiu sidas kiel korvo en sia arbo ĉar la Pakeha¹ estro petis siajn dungitojn forhaki ĝin", klarigis Panapa treege ĝuante la ŝercon.

"Kion vi diras, forhaki ĝin? Forhaki la totaron² ĉu?" eĥis onklo Tuna, kies kolero kaj miro eĉ ankoraŭ pli sulkigis lian maljunan sulketitan vizaĝon. "Unue forhaku Taranga-n!" li ekkriis. "Ĉiuj scias, ke tiu totaro estas la naskiĝarbo de Taranga."

Onklo Tuna estis tiel maljuna, ke li povis pretendi, ke li memoras la tagon kiam la patro de Taranga plantis la junan arbon je la naskiĝo de la infano. Antaŭ preskaŭ cent jaroj diris onklo Tuna. Sed multaj homoj dubis ke li estas tiom maljuna. Li ja ĉiam fanfaronis.

"Nu ŝajnas, ke ili devos forhaki *kaj* Taranga-n *kaj* ŝian arbon", duonridis Panapa ĉagrenante onklon Tuna kiu malaprobis ŝercadon rilate aferojn pri tabuo.

"Ĉu la Pakeha ne povas toleri vidi

¹*Pakeha* = maoria termino por eŭropida nov-zelandano.

²*Totaro* = grandega arbo el kiu la Maorioj konstruis kanuojn. Botanike: *Podocarpus totara*.

unu solan arbon sen etendo de la brako por ekpreni hakilon?" demandis kolere onklo Tuna. "Tamen ĉi tiu arbo estas tabua", li aldonis finaserte, "do la Pakeha forhaku siajn proprajn herbaĉojn". Onklo Tuno malamis la Pakeha-ojn.

"Ae!³ Kial ili volas forhaki la arbon de Taranga?" demandis konfuzita virino.

"Pro la dratoj", klarigis Panapa arogante. "La arbo staras obstrukce sur la vojo kie supre laŭlonge de la valo kuros la novaj elektro-lineoj. Dek mil voltoj, eho!⁴ Tio estas potenco. Tion al vi mi diru! Nur tuŝeto de tio ĉe ŝia postaĵo baldaŭ devigus Taranga-n ek-salti el sia arbo, ehoa," Panapa aldonis kun kboldeca ĝuo kaj ruze kubutumis maljunan onklon Tuna-n. La maljunulo nur kraĉis malestime kaj paŝege foriris.

"Oho!" gluglis Panapa, "nur rigardu la grandan Pakeha-an estron malsupre dancantan kaj sakrantan je freneza maljuna Taranga supre en la arbo; kaj ŝi ne komprenas eĉ unu vorton kaj tute ne pri ĝi sin ĝenas!"

Efektive Taranga nur sidis supre fumante sian pipon da malbonodora

³*Ae!* = (Maorie): Jes, prave!

⁴*E-hoa* = (Maorie): amiko, kunulo, karamado.

torori¹. Nun ŝi forturnis la kapon kaj kraĉis malrapide kaj intence sur la teron. Poste ŝi denove fiksis siajn maljunajn duonfermitajn okulojn al la horizonto. Kaj kiel tiuj ruĝvizaĝaj Pakeha-oj malsupre babilaĉas kaj kriegas! Nu, ne gravas.

Intertempe granda amaso da homoj jam kolektiĝis ĉe la kabano kie Taranga loĝis kun sia nepo, antaŭ kiu kreskis la totara arbo de Taranga ĝuste sur la mallarĝa vojeto kiu apartiĝis de la rivero la vilaĝeton kiu etendiĝis sur la flanko de la monteto. Viroj sin apogis kontraŭ malnovaj kabanaj kaj klinis sin trans subpremitajn barilojn; virinoj kaŭris en malfermitaj pordokadroj aŭ promenis laŭ la vojo kun bebo en ŝalo sur la dorso. La pli aŭdacaj infanoj eĉ venis tre proksimen kaj per siaj malpuraj etaj fingroj faris markojn sur la granda aŭtomobilo de la Inspektoro. La ŝoforo devis diri al ili, "Ho! Vi! For de la aŭtomobilo!" Kaj ili lasis fali la kapon kaj paŭtis kaj per siaj grandaj sombraj okuloj timeme lin rigardis.

Sed post minuto la infanoj saltetadis pro ĝojo malantaŭ la Inspektoro. Kiel ĝojige vidi tian spektaklon—ĉiuj gravaj Pakeha-oj el la urbo venintaj por batali kontraŭ freneza maljuna Taranga kiu sidas en la arbo! Sed ŝi ja estis sorĉistino—same kiel ŝia patro la Tohunga.² Eble ŝi nur svingus sian nigran ŝalon kiel flugilojn kaj gakus kaj fariĝus birdo kaj forflugus. Aŭ eble ŝi malbenus la Pakeha-ojn kaj ili ĉiuj seke velkus kvazaŭ sekaj bastonoj antaŭ iliaj okuloj! Onklo Tuna diris, ke ŝi povus fari ion eĉ pli malbonan.

¹Maoria nomo de piptabako.

²Tohunga = medicinisto, tradicia pastro kaj klerulo pri tradiciaj medikamentoj.

Tamen, la pli aĝaj infanoj ne kredis tiajn asertojn pri sorĉaĉaĵoj.

Nu, dum la maljunulino sidadis, indiferece fumante, en la arbo, kaj la Pakeha-oj malsupre interdisputis kaj alvokis al ŝi tiel malsukcese kiel alvokante al la sorto, la amaso multe ĝuis la ŝercon. Sed kiam la Inspektoro fine perdis la paciencon kaj kriis al siaj helpistoj, ke ili perforte malsuprentiru la maljunulinon, la humoro de la amaso ŝanĝiĝis. La virinoj en la pordokadroj kriegis akre. Iu el ili diris, "Foriru, Pakeha, kaj tiranu urbanojn! Ni Maorioj ankoraŭ ne insultas arbojn aŭ maljunulinojn." La viroj sur la bariloj komencis grumbli malafable kaj la plej junaj uloj ekpaŝumis al la Pakeha-oj. La nepo de Taranga, Taikehu, kiu ĵus hakadis lignon, ankoraŭ enmane portis la grandan hakilon. Taranga eble estis freneza, tamen ĝi estas ŝia naskiĝarbo. Oni ne rajtas tiamaniere forhaki la arbon. Ae, oni rajtas ridi ĝisate pri la maljuna virino sidanta sur branĉo en la arbo kiel maljuna nigra korvo, sed ne taŭgas, ke Pakeha venas kaj priparolas subtiri ŝin kaj detrui ŝian arbon. Tiu impertinenta viro ja sin gardu.

Ŝajne ankaŭ la Inspektoro tiel opiniis. Al la lineistoj kiuj atendadis kun eskaloj kaj hakiloj kaj ŝnuroj kaj segiloj por forhaki la arbon li faris signon, ke ili ne estas bezonataj. Post tio li eniris sian grandan aŭtomobilon, la lipoj strikte kunpremitaj pro kolero. "Hej, gardu vin, vi infanoj!" kriis la ŝoforo. Kaj foriris la Pakeha-oj en odoraĉo de bruligita benzino, kaj Taranga estis forlasita kaj ĝis nun venkinta.

"Ili ja nepre revenos morgaŭ kun la policistoj kaj per ŝia kruro subentiros maljunan Taranga-n," ĝojaĉe diris Panna. "Ŝi ne povos venki la policistojn.

Sed ho! Mi ridegos vidante la unuan policiston kiu sentas ŝiajn ungojn!”

“Oho! ili ja venos kun soldatoj,” kantetis la infanoj multe ekscitite. “Ili venos portante maŝinpafilojn kaj t-t-t-t-os maljunan Taranga-n, sed ŝi nur glutos la kugletojn!”

“Fermu la buŝon, vi infanoj,” Panapa ordonis.

Sed iel la ekscito de la sieĝado de Taranga en ŝia arbo furioze disvastiĝis fulme tra la kutime dormema vilaĝeto. La buboj parolis pri pretigo de varmega bonveno por la Pakeha-oj morgaŭ. Onklo Tuna kuraĝigis ilin. Estas malkredeble, li diris, ke al enmiksig-emuloj licus profani tabuan arbon. La junuloj de lia generacio pli bone komprenis pritrakti tiajn aferojn! Li bone memoris ke li mem iam per tomahoko atakis Pakeha-on kiu malobservis la tabuon de enteriga grundo. Se antaŭ jaroj la homoj estus atentintaj lin, ĉiuj Pakeha-oj estus en sia ĝusta loko en la profunda maro —manĝaĵo por ŝarkoj! diris onklo Tuna kruelege. Sed la homoj jam enuis pri la multaj heroaĵoj de onklo Tuna, kaj ili ne restis por aŭskulti. Eĉ la infanoj nuntempe nur diris “Ho, ĉu ja?” kiam la maljunulo oratoris antaŭ ili.

Sed jam la viroj iom komike haka-dancis¹ ĉirkaŭ la totara arbo. Dika virino kun ruliĝantaj okuloj kaj longa lango kuraĝigis ilin. Ĉiu laŭte ridegis kiam ŝi stumblis pro sia longa ruĝa jupo kaj falis kaŭĉukece sur la vojon. Estis nun nedubbele ke ĉiu senbride dum la nokto distros sin. Forgesita estas la laboro kaj ĉiuj kunvenis ĉe la hejmo de Taranga. Taranga ankoraŭ trankvile atendadis en la arbo.

¹*Haka* = Maoria militdanco, laŭtvoĉa pozdanco por kuraĝigi soldatojn.

Panapa malaperis kiam alproksimiĝis la nokta krepusko sed li baldaŭ revenis kun sledo kiu portas barelon da hejmfarita biero por gajigi la okazon. Tio vigligis la aferon kaj la amaso iĝis rapidmova kaj pli furioza. Ili amasigis sekan arbitaĵon kaj faris festofajrojn por lumigi la scenon. Ili petis Taranga-n ke ŝi ne forlasu sian gvatejon kaj ili suprendis al ŝi korbojn da manĝaĵo kaj trinkaĵo; sed ŝi rifuzis tuŝi, mordeti, aŭ trinki. Ŝi sola el la tuta aro restis nun serena kaj dignoplena. La viroj armite per hakiloj, tranĉiloj kaj malnovaj taiaha-oj² dancis sovaĝajn hakaojn. Iu per pafilo daŭre pafis ĝis elĉerpiĝis la kugloj. Ankaŭ la barelo da hejmfarita biero de Panapa estis preskaŭ forkonsumita, kaj Panapa nur sidadis apogante sin per ĝi kaj ridadis kaj ridadis; kaj viroj kaj virinoj fanfaronadis pri kion ili faros morgaŭ kontraŭ la Pakeha-oj. Tamen maljuna onklo Tuna estis naŭzita de la tuta afero. Tio ne estas la ĝusta maniero por kontraŭi la Pakeha-ojn li diris; ili kaŭzos sian propran ruiniĝon. Li starigis apud la kunveneja domo kaj oratoris, sed neniu lin aŭskultis.

La infanoj kriĉis ĝoje kaj kuris ĉirkaŭ la festofajroj kvazaŭ brunaj demonoj. Ien, tien, kaj ĉien ili jetadis fajrobastonojn. Do ne surprize, ke la vepro ekbrulis kaj la domo de Taikehu apud la arbo estis flamanta antaŭ ol iu ajn ĝin rimarkis. La Ĉielo nin helpu! ja tiam okazis konfuzo! Taikehu, provante savi siajn plej bonajn vestojn, kurege eniris. Sed li elvenis kun nur siaj malnova palto kaj rompita gramofono antaŭ ol la flamoj supren flagris tra la

²*Taiaha* = militbastono, ornamita bastono longa 1½ metrojn, pinta ĉe unu fino kaj klaba ĉe la alia.

tegmenton. Kelkaj viroj komencis batadi la vepron per siaj hakiloj kaj bastonoj. Aliaj kuris al la rivero por ĉerpi akvon. Onklo Tuna ĉirkaŭkaprioladis, instigante la virojn savi la totaran arbon. Malŝparo de la spiro estas, prediki kontraŭ la Pakeha li kriis. Komprenoble tiu ĉi sensenca generacio de Maorioj celas sian propran detruigon li rikanis.

Ŝajnis, ke dum momento ĉiu forgesis pri kompatinda maljuna Taranga. Ĝis virino kriis al Taikehu, "Kion vi faras tie kun viaj malnovaj ĉifonaĵoj, vi maljuna stultulo? Vigliĝu kaj prenu la maljunulinon el la arbo." Tiam ŝi kuris al la arbo kaj kriis, "Hej Taranga! ne estu stulta. Malsupreniru rapide, maljuna panjo!"

Sed Taranga tute ne sin movis.

Kune la virino kaj Taikehu kaj kelkaj aliaj malsuprenigis Taranga-n. Ŝi aspektis kvazaŭ ankoraŭ profunde meditata. Sed ŝi ja estis mortinta.

"Aŭe!¹ sendube *longan* tempon ŝi jam estas mortinta—ŝi estas tute malvarma kaj rigida," Taikehu ekkris. "Do terurigo pro la fajro ja ne mortigis ŝin."

"Terurigo!" mokis Onklo Tuna. "Mi diras al vi, potkapo, ke virino kiu ŝarĝis fusilojn por mi sub la kanonobusoj de la Pakeha-oj verŝajne ne mortas pro timo je rubfajro." Li malestime ekrigardis la fumantan ruĝon de la kabanaĉo de Taikehu. "Ne! sed mi diros al vi la kaŭzon de ŝia morto," onklo Tuna daŭrigis. "Taranga-n ĉagrenis ĝismorte viaj Pakeha-aj kutimoj. Ĉagrenis ĝismorte!" La maljunulo kraĉis sur la teron kaj turnis la dorson al Taikehu kaj Panapa kaj iliaj kunuloj.

Intertempe la vento ŝanĝiĝis kaj la

viroj sukcesis estingbati la veprofajron, kaj la totara arbo estis savita. La fajro kaj la stranga morto de la maljunulino kaj la malmildaj vortoj de onklo Tuna jam sobrigis ĉiun, kaj la spiritstato de la aro ŝanĝiĝis de sia antaŭa frenezo al melankolio kaj ia superstiĉa soleno. Jen kelkaj virinoj komencis plorkrii ĉe la kunveneja domo kien oni alportis Taranga-n. Necesos aranĝi la tango-n.²

"Taikehu, ĉi tien venu", ordonis onklo Tuna. "Mi montros al vi la ĝustan lokon kie vi devos enterigi Taranga-n".

Nu, la Inspektoro sciis kompleze forresti dum la tango. Pli precize: Serĝento O'Connor, la ĉefo de la lokaj policistoj kaj bona amiko de la popolo de Taranga, konsilis al la inspektoro, ke li ne intermiksi sin antaŭ ol ĝi finiĝos. "Tangio indiĝena aŭ mortfesto niaspeca, certe ĝi estas same malĝoja kaj sankta", li diris. "Nu, mi konsilas, ke vi ne enmiksi vin ĝis kiam ĝi finiĝos".

Sed la Inspektoro ja poste iris al la vilaĝeto. Panapa ĝojaĉe iom poste rakontis la historieton en la drinkejo de la urbeto.

"Ho-ja-ho!" li diris, "vi ja devus aŭditi tion, kiel la fiaĉa Sinjoro Inspektoro nomis Serĝenton O'Connor kiam li sciiĝis, ke ili enterigis la maljunulinon ĝuste sub la radikojn de la malbenita arbo! Tamen mi opinias, ke al Serĝento O'Connor plaĉis la ŝerco. Kiam la Inspektoro ĉesis sakri, O'Connor dir's al li, 'Ja vere estas ke la situacio ankoraŭ ne ŝanĝiĝis. Taranga restas en sia arbo'".

²Tangi = (Maorie): funebro, solena lamentado, ceremonio kaj festo por la mortinto.

¹Aŭe = (Maorie): ve!

Nu sekve oni eĉ pli prokrastis rilate la elektro-lineojn kaj okazis poste, ke ĉi tiu malkutima situacio ja estis menciita en la Parlamentejo kaj la Maoriaj membroj deklaris fortan malakcepton fare de la Maorioj rilate permeson profani la enterigajn lokojn kaj la Pakeha-membroj senescepte aplaŭdis tiujn bonegajn oratorojn. Do la Administrantaro de Elektro trovis necese konstruigi specialan fundamentan

platon el betono por la mastoj en la riverfluejo por ke la lineoj ne tuŝu la arbon de Taranga.

"Oho" Panapa duonridas rakontante la historieton al fremduloj kiuj haltas por rigardi la tombon sub la totaro apud la vojflanko. "Taranga mortinta gardas sian arbon pli bone ol Taranga vivanta. Ho jes ja, ŝi kostis al la Pakeha-oj *mult* milojn da dolaroj, mi opinias!" □



STEP BY STEP IN ESPERANTO

recenzas DONALD BROADRIBB

Step by Step in Esperanto, de M.C. Butler, 9a eldono. El Cerrito (Usono): Esperanto League for North America, 1991. 281p. bind. \$19.00 de la AEA Libroservo.

Jam en 1947 mi ekkonis ĉi tiun lernolibron, kaj de tiam ĝi estas familiara amiko. Je la unua vido ĝi aspektas iom timiga, dense presite per malgrandaj preslitteroj. Ĝi ne estas dividita en lecionojn aŭ ĉapitrojn. Anstataŭe, ĉiu paragrafo (kio ne signifas ĉiun alineon¹) estas nombrita. Tio signifas ke la instruisto aŭ hejms-tudento povas progresi laŭbezone en ĉiu horo, sen la devo iel kongruiĝi la instru/lernhorojn kun arbitra lecionarango en tradicistila lernolibro. Ĉar la paragrafoj plejparte havas titolojn, oni facile trovas celatan eron; malavantaĝe, tamen, tio des pli timigas la uzanton, kiu vidante ĉiupaĝe novajn du aŭ tri subtitolojn ekterurigas pro la

supozata komplekseco de la libro. Efektive, tamen, ĉi tiu verko estas unu el la lernolibroj plej "amikemaj al la uzanto" troveblaj.

Butler estis esperantologo altranga. Liaj instruoj pri la gramatiko esperanta estas plejparte klaraj, ĉiam kleraj, kaj tre malofte eraraj. Estas domaĝe ke la eldonintoj ne utiligis la oportunon ĝisdatigi kelkajn partojn de la libro; ili limigis sin al senŝanĝa represo de la 8a eldono, plus listo de adresoj de la Esperanto-asocioj en la diversaj angla-lingvaj landoj inkluzive Aŭstralion kaj Nov-Zelandon. ELNA atentigas ke anonima mondonacinto ebligis la fotorepreson de la libro, kaj kredeble tiu mondonaco ne sufiĉis por enmeti revizion de kelkaj eroj. Eble la plej grava ellaso estas la vaste uzata landsufikso -io, kiu dum la vivo de Butler ankoraŭ estis "malrekomen-dita" de la Akademio (nuntempe ĝi estas "tolerata", t.e. akceptata kvankam ne oficiala). Kaj la plej grava revizio bezonata? Nu, Butler mem avertas ke liaj prononcindikoj celas

¹"Paragrafo" = section; "alineo" = paragraph laŭ la anglalingva signifo de tiu vorto.

nur britojn—kaj pri tio li tute pravas. Usonano aŭ aŭstraliano kiu provus lerni la prononcon de Esperanto laŭ liaj indikoj grave erarus.

La fotorepreso ne estas tre bona. Multaj linioj estas palaj, ne sufiĉe inkumitaj, kaj la kvalito de la papero ne estas bona. Kaj (ho! ĉu mi rajtas eĉ flustri la ideon?) kial oni ne profitis la oportunun pligrandigi la formaton por ke la preslitteroj estu pli facile legeblaj? ELNA eldonas tre bonaspektan gazeton (kiun ĝi ial preferas nomi "bulteno"), kial ne doni egale grandan atenton al la aspekto de la plej grava Esperanto-lernilo angla-lingva?

Ĉi tiu lernolibro estas "sen bildoj kaj konversacioj" do nepre "nemoda", sed plena de ŝercoj, neniam teda, ĉiam klara, aŭtoritata, kaj nepre taŭga ankaŭ por la plej komencanta komencanto. Senrezerve rekomendata.

Unua ampleksas duoble da paĝoj, kaj prezentas preskaŭ sepdek aŭtorojn. Abundas preskaŭ tiom da temoj kiom da aŭtoroj. Jen kelkaj: Zamenhof kaj la Esperanto-movado kaj -literaturo, la vivo kaj la morto, amo kaj amoro, la geedza vivo (nepre trista), sciencfikcio, la kosmo, la sorto de soldatoj kaj de malliberuloj, insekto-seksumo kaj penisproblemoj... Entute, la homa kondiĉo.

Ke Esperanto-literaturistoj trafe kaptis la belecon de la mondo kaj de la vivo evidentigas en eroj kiaj "Kolektaĵo de ĉielarkoj" de Tibor Sekelj. Tre bela rakonto (kiun vi sendube jam renkontis en *Paŝoj al Plena Posedo*), en ĉi tiu kajero ĝi akompanas lian "Tra subtera rivero", kiu ankaŭ atestas, ke la aŭtoro estis elstara naturo-amanto. La ritmo de perĉevaltrita sledo bele eĥas la ĝojon de l'vivo en "Vintra fabelo" de Nikolaj Hohlov.

Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel
rido de cimbaloj
por dancanta ciganin',
uraganu, akompanu, dolĉe tiklu,
ĝutiranu
per freneza takto nin!

Imagoplene kaj vortomajstre pentras Hendrik Adamson: "...lag' ne laktas nun nebule". Venelin Mitev tute ĉarmas per "Fabelo pri bulgara knabino". En "Ploro" de Baldur Ragnarsson troviĝas mirindaj, mornaj bildoj, kiujn kiel ĉe moderna arto oni ne facile komprenas. Tamen ĉe poezio gravas la sento se ne nepre la signifo!

Sed kiam John Sharp Dinwoodie verkis "La venkonto"—

Malsupren klinu vin: Aŭskultu
tie,
kiel la herbo ridas ironie...
Sonas de horizont' al horizonto
la rido de la verda mondvenk-

EKAL LEG'

Kajero Dua
recenzas VERA PAYNE

[Recenzo pri la unua volumo de ĉi tiu verko aperis en nia julia numero.]

Ek al Leg' Legolibro por Perfektigo en Esperanto. Red. Hektor Alos kaj Kiril Velkov. Red. Ljubomir Trifonĉovski. Sofio: Bulgara Esperanto-Asocio, 1991. 196p. broŝ. Speciale mendebila per la AEA Libroservo.

Ĉi tiu "ĝemela" kunulo de Kajero

¹Cito el Lewis Carroll.

onto.

li eĉ ne povus imagi, ke post nur kelkdekoj da jaroj, la herbo mem estos minacata per estingo. Ni gravuru sur la koro la vortojn de Hendrik Adamson el "Nia plimulto": "Faskoj de taskoj, polvo da solvo".

En "Armilaranto" Albert Goodheir demandas:

Ĉu kamparane fosu mi terpomojn?

Oni pli bone pagas por pafiloj.

Ĉi tiu moderna tendenco ĉasadi la monon estas ankaŭ la temo de "Ĉu ŝafi?" de Julius Balbin. Rejna de John en "Homo" speguligas la pardon de graco en tiu murdanta diablo. Tiel ankaŭ Hendrik Adamson per "Infana regalo", kaj la brila "Socia hierarkio" de Emile Van Damme traktas la saman tempon. Maŭro Nervi trafas pike per rimarkoj kiaj:

Sur la ekrano aperis kvinjara etulo, ploranta ĉe la kadavro de mortinta virino. B profunde suspiris, kaj la maldekstra mano ekkaptis frandan kukon.

(Somalia '92: ĉu iu el ni ne kulpas iomgrade same kiel S-ro B?)

"Amikon mi havis" de Giorgio Silfer neintence ilustras kial bezoniĝas Amnestio Internacia. Korpremas "La vena valso" de Vladimir Glazunov. Mi dividu kun vi la jenan ironion:

Li estis homo poeziema kaj imagema. Eĉ en la infero de la milito liaj pensoj iam ŝvebis en alteco neatingebla por homoj praktikemaj kaj realisme pensantaj.

(Esperantisto bone scias, ke la nura realisto estas la idealisto, sed kiu aŭskultas?)

La brile simpla stilo de Johan

Valano en "La soldato kiu marŝas" sage trafas:

Jam tro pezas la pafilo
kaj la kasko
kaj la sako
kaj la kaĉo el argilo
gluiĝanta ĉe la ŝu'.

"Neŭtraleco" de Julius Balbin pripensigas la krucumon de Jesuo. "La lasta te-seanco" de Miyamoto Masao ilustras samtempe la kruelecon kaj stultecon de la rigidaj japanaj samurajaj moroj kaj la misteran belecon de la tradiciaj kutimoj. Seke ironia kaj brile konciza estas "La tago de rememoro" de John Islay Francis. Ĉu Marjorie Boulton antaŭvidas la inferon kiu estas eks-Jugoslavio nun, kiam ŝi verkis "Hejmo"? Ankaŭ ĉe la altaro de la sudafrika Edwin de Kock mi genuas, jen pro "Mateo 25:41-45":

Kristo lacis

pro la ŝarĝo de jarcentoj...

Ĉu vi plendas pro la pluraj ĝenetoj kiujn kaŭzas Esperanto al vi? Legu "Stalin kaj la esperantistoj" de Ulrich Lins (el *La Danĝera Lingvo*).

Absolute, tute, nepre leginda estas de Giorgio Silfer "La esperanto-literaturo: fenomeno unika". "...'artefarita' en la senco de 'farita arte'". Li petas nin pensi pri la elfolingvoj kiuj inspiris John R.R. Tolkien—ankaŭ artefaritaj sed entute akceptitaj de liaj adeptoj/adorantoj. Li ankaŭ klarigas, ke Esperanto "ne plu temas pri peze propagandada motivado".—

La unua vivjarcento de Esperanto (se paŭsi la Manifeston de Raŭmo) demonstris ke per la lingvo iniciatata de Zamenhof eblas diri **ĉion**: la dua jarcento devos demonstri ke oni havas **ion** por diri—novan, originalan,

necesan por la homa kulturo. (P.134.)

Ljubomir Trifončovski poeziekonomie bildigas scenaron por pure fantazia ombroteatro en prozpeceto kun la sama nomo. Fascinas Juan Régulo Pérez per sia "El tia ŝtof" ni estas, /kiel niaj songbildoj":

...ĉe la submikroskopa nivelo la kriterioj pri la realeco estas fundamentaj diferencaj disde tiuj, kiujn ni aplikas ĉe nia nivelo.

Nepre leginda estas la vortludlerta "Saluto al Gaston Waringhien" de Reto Rossetti. Kaj lia "Katje la modelino" plaĉas laŭ stilo kaj laŭ enhavo; la rakonteto estas samtempe malmolderna kaj ĉiamverda, ĉar temas pri ĉiuvir' kaj ĉiuvirin'.

En nur 12 versoj, la Svedino, Magda Carlsson, kondukas nin de teneraj kisoj kaj nuptoflamo ĝis tedo, frido, "rutinkoito"—post nur dek jaroj da geedzeco! Kroatino Zora Heide sprite renversas la rolojn de viro kaj virino en "Egal-rajto". Giorgio Silfer ankaŭ modernas en "Serĉi loĝejon en grandurbo": "...vi scias, mia edzino kaj mi estas ŝanĝista paro" [t.e. "swingers"] .

Por mi, la plej sopiriga diamanto en ĉi tiu kesto estas la ampoemeto "Memore", kiun verkis por sia edzino Claude Piron.

De la subluma al la mala: Post la krudaĵoj de Peter Peneter/Kalocsay mi povis skribi nur "Yuk!" (esperante: fiaĉ'!). Eble por la viroj stimula, por la virinoj (ĝenerale) naŭza. Sendube la fratoj frandus ankaŭ la versaron ĉi tie de Gaston Waringhien/Georges E. Maŭra:

Ah! Ĉu do gravas io
krom vi, krom vi, Amoro?
el "Sexcelsior". Dio mia. Aliflanke,

"Via kato" de Marjorie Boulton mi trovis ege "seksinspira" (Ĝis la ŝok-horora, neatendita fino...)

La stile brila "Kia la semo" de la multpremiita Hispano, Georgo Kamaĉo vere eksterordinaras, kaj la libro preskaŭ aĉetindus nur pro ĝi. Ĝi estas tia gemo kia konversaciigus grupon almenaŭ duontagon. Absolute, arrogante vireca (la aŭtoro sin nomas Maĉo¹), ĝi tamen enhavas multajn klasikajaludojn, kaj la enigma fino plaĉegas al mi. (Kvankam, dum mi legis mi agacate pensis: ho Dio mia, ĉu ĉiam ĉiu viro vere vore pensas nur per sia Peter?)

"Ĉu ŝi mortu tra-fike?" de Johan Balano/Valano estas nek pornografia, nek erotika, nek voluptoinstiga, kvankam ĝi komenciĝas: "'Ĉu vi permesas ke mi montru al vi mian penison?' li demandis kun afabla rideto".

Videble, ne ĉiu ero plaĉis al mi. Persone mi trovas "Kongresa runo" de Kalocsay iom trouma. Sed eble impetas vin vortgrupo kia:

Kreu kuna konstruado

Novan Sanktan, savan Sampon...

Julian Modest per "Aŭtuna rendevuo" promesas multe, vekas interesejon, sed subite kaj abrupte finiĝas. La samo okazas en "Mistera lumo". Ĉu intence nefinitaj rakontoj? (Aliflanke, "Mi kaj li" estas perfekte polurita juvelo.)

La vekriroj pro forpasinta juneco ne trovas kompaton ĉe mi. En "Vesperkanto" de Hendrik Adamson, nur mankas violonoj. La alternativo al maljuneco estas apenaŭ pli alloga!

¹Vidu TAE Julio-Aŭgusto 1992, p.21, piednoto.

²"Too much!"<tro-um-a. (Vorto proponita de la red. de TAE).

Ĉe la pli junaj aŭtoroj, precipe, oni bezonas helpgvidanton. Eĉ la du poemoj de Victor Sadler restas por mi enigmoj.

La kompilintoj, en la enkonduka paĝo, informas ke ili "strebis esti akurataj prezentante la verkojn kaj fontojn el kiuj [ili] ĉerpis ilin". Akurataj? Troviĝas pluraj eraroj, la plimulto el ili preseraroj. Ankaŭ estas pluraj (de mi) nekonataj vortoj. Jen du: prolegomeno, vervenoj. Neolog-

ismoj abundas—eĉ "ŭesten"!

La instruistino en mi volas korekti, plibeligi, rearanĝi. Tamen, finfine, malgraŭ la eraroj kaj la tro maskla elekto kaj vidpunkto, la eroj estas plejparte neformetebaj ĝis la finlego, kaj mi senrezerve rekomendas al iniciatemaj instruistoj aŭ grupoj ĉi tiun pro sia enhavo profunde pridiskuteblan legolibron. □

"LA SUDA KRUCO"

de RAY ROSS

La Suda Kruceto "Organo de la Aŭstraliaj Esperantistoj" aperis en julio 1920. Ĝi naskiĝis post la Tria Aŭstralia Kongreso en Sidnejo tiun saman jaron. La unua redaktoro estis S-ro A.M. (Maurice) Hyde, ĝis junio 1921, kiam li translokiĝis al Rabaul (Nov-Gvineo). En januaro 1921 la subtítulo ŝanĝiĝis al "Organo de la Aŭstralaziaj Esperantistoj" pro forta subteno de *Suda Kruceto* fare de grupoj en Nov-Zelando. Poste, en junio 1921, la revuo estiĝis "Oficiala Organo de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio".

De julio 1921 ĝis aprilo 1927 *Suda Kruceto* estis redaktata de S-ro C. W. Ballard, ĝis kiam li eksterlandis; S-ro F.R. Banham transprenis la oficon de redaktoro en aprilo 1929 kaj ĉi tiu situacio daŭris ĝis la eldonĉesigo en oktobro 1934, pro la malfacilegaj kondiĉoj dum la tiama mond-depresio.

En aŭgusto 1935 aperis *La Suda Kruceto* (*SUKRO*), private eldonata de Joab Eljot. Ĉi tiu monata revueto iom plenigis la vakuon kaŭzitan de la mal-

apero de la antaŭa nacia gazeto, *La Suda Kruceto*, sed neniam estiĝis oficiala revuo. Joab Eljot en 1937 starigis la Aŭstralian Esperanto-Asocion.

"Esperantistoj en Nov-Zelando aliĝis al la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, grupe kaj individue, post la fondiĝo de tiu asocio, la 15an de oktobro 1920. Dum la eldon-periodo de *La Suda Kruceto*, oficiala organo de la nacia asocio, kluboj kaj societoj en Nov-Zelando konstante raportis pri agado kaj personoj kiuj estris kaj gvidis tiujn grupojn. Eĉ post la refondiĝo, la 26an de januaro 1929, de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE) raportoj aperis monaton post monato en *Suda Kruceto*, ĝis la fina eldono en 1934.

En januaro 1993, la titolo de la nacia revuo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ŝanĝiĝis al *Esperanto sub la Suda Kruceto*. Estas certe, ke nenio perdiĝos pro tiu ŝanĝo, kaj ĉi tiu ĉenero liganta nin al la fruaj jaroj prezentos unikan oportunon por kunlaborado en la regionoj "sub la Suda Kruceto". □

LINGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

Mi ricevis de pluraj korespondantoj komentojn, demandojn kaj sugestojn pri estontaj artikoloj, kaj pro tiuj mi tre dankas.

Unue, mia amiko Ralph Harry atentigas, ke (mi citas liajn vortojn): “*Just for that* havas en la angla du nuancojn:

- (a) *ĝuste* pro tio (I came just for that—that is exactly what I came for).
- (b) *nur* pro tio (Did I come just for that, just to be mocked?)—kiel en “He just managed to escape (Li *nur* malfacile sukcesis eskapi)”.

Pri “reach”, Ralph ankaŭ demandis, kiel oni tradukas:

- (1) He reached for his gun;
- (2) On the windward reach (sailing)?

Mia respondo: (1) Li etendis la manon al sia pafilo.

- (2) Kvankam mi dubas, ĉu multaj aŭstraliaj Esperantistoj entuziasmas pri velado (mi certe ne!), mi proponas: “je la lofflanka bordo”. (Ĉu komentoj de eventualaj velspertuloj?)

Kio ĉio demonstras la malfacilecon, preskaŭ neeblecon, pritrakti *ĉiujn* nuancojn de iu vorto en iu ajn lingvo!

Ralph ankaŭ petis min “verki noton pri la diversaj (prozaj) specoj de ‘verkaĵo’.”
Do jen:

- romano—novel.
- romaneto—novelette.
- romanco—romance (music), ballad.
- novelo—short story. Novelaro—collection of short stories.
- noveleto—short short-story.
- rakonto—tale. Firakonto—dirty joke, smutty story.
- anedkoto—anecdote (about a detached event).
- historio—history (continuous record), train of events. Bela historio!—A pretty business! La tuta historio—the whole affair. Malnova historio—an old story. Natura historio—natural history.
- raporto—report.
- fabelo—fairy story, fairy-tale. *La Fabeloj de Andersen*.
- fablo—fable (animal story with a moral). *La Fabloj de Ezopo*. Fabla besto—mythical creature.
- verko—a work, opus. *La verkoj de Zamenhof*. Ĉefverko—masterpiece.
- ĵurnalo—newspaper.

gazeto—journal, magazine, gazette (to keep people up-to-date).
magazino—illustrated (popular) magazine (with articles on various topics,
e.g. *Woman's Day*).
revuo—review, periodical (devoted to special subject). *Biblia Revuo*.

- Related ideas: romance—am(afer)o.
romantic—1. idilia, am(ec)a. 2. romantika (literatura movado de la 19a jarcento). 3. latinida (lingvo) (ekz. la itala, franca ktp.).
fabulous—1. fabela. 2. (konversacia, familiara) bonege! Mirinda (koncerto)!
-

Sino Pat Harkin petis min diskuti la uzon de *fojo* kaj *tempo*.

tempo = time in general

fojo = a single occasion.

Tempo

La tempo flugas. En tiu tempo—At that time, in those times. Niatempe—nowadays.

La tasko postulas multe da tempo. Mi ne havas la tempon por fari tion.

intertempe—meanwhile. Gustatempe—at the right time, just in time.

Ĉiutempe—at all times. Siatempe—in due course, duly.

Fojo

unu fojon por ĉiam—once and for all. (Ankaŭ, laŭ la senco: fine, definitive).

Ankoraŭfoje—once more/again. For once (just for this time)—ĉi-foje; (in the past) tiufoje (ekz. Tiufoje li silentis—For once he said nothing).

ĉiutempe kiam—whenever. Dufoje—twice. Kiomfoje?—how often? La lastan fojon, kiam mi vidis lin... Iufoje—at times, from time to time, now and then.

Foje—sometimes.

Notu ankaŭ: Iam—once (upon a time); at some time; ever (Ĉu vi iam ...is?).

jen...jen...—sometimes...sometimes..., now (you see it), now (you don't).

once you have read it—post kiam vi legis ĝin,

at once—tuj (= immediately); samtempe (= simultaneously).

for the time being—provizore; (la) tiam (prezidento).

time of day = horo. Timetable—horaro, horplano.

timeswitch—memŝaltilo.

Oni trovos en la vortaroj multajn pluajn ekzemplojn de la uzado de ĉi tiuj vortoj—ne estas spaco ĉi tie por citi ilin ĉiujn!

Kial necesas tiel longaj klarigoj pri iuj vortoj en Esperanto? Ĉu Zamenhof ne kreis tre simplan lingvon? La respondo estas, ke Zamenhof ja forigis el sia lingvo la plej grandan parton de tiu nenecesa balasto, kiu tiom malfaciligas multajn lingvojn—sed vere oni ne povas plene posedi kiun ajn lingvon sen iom da penego, kaj se Esperanto celas esti adekvata internacia komunikilo, ĝi devas povi esprimi la subtilajn nuancojn de la homa penso kiel ĉiu alia lingvo. □

LA 17-A REGULO DE LA ESPERANTA GRAMATIKO de BERNARD GOLDEN



elo de la esplorado

Por ke mi povu prezenti doktorigan disertacion en la Akademio Internacia de la Sciencoj de la Respubliko de San Marino, kadre de la sekcio Humanistiko, kies dekano estas Prof. D-ro Fabricio Penacchiotti, mi serĉis temon sur ankoraŭ neplugita parto de la tereno de la esperanta gramatiko. Mi elektis ekzameni la historion de provoj enkonduki 17-an regulon en la Fundamentan Gramatikon kaj analizi ĝian enhavon, ĝuste ĉar tradiciaj lernolibroj kaj gramatikaj traktatoj prisilentas tiun aldonajon al la regularo de Esperanto. Ĉi-sube estas la dokumentado kolektita ĝis nun.

Blaga ekzemplo de la 17-a regulo

Kiam mi komencis lerni Esperanton en 1946 en Nov-Jorko, mi foje aŭdis en kunveno de la loka grupo la cinikan eldiron, ke laŭ la 17-a regulo de Esperanto, se edzo aŭ edzino estas esperantisto, la alia parulo estas kontraŭ Esperanto. Oni fiere montris plurajn ekzemplojn de tiu situacio inter la klub-membroj por pravigi tiun regulon. Tamen, pro iu stranga kialo, eĉ unu vorto ne estis dirita pri la fenomeno de "edzperanto", okulfrapa escepto, kiu dementas la regulon. Mi, do, karakterizas tiun 17-an regulon kiel puran blagon, ne meritantan seriozan konsideron. Cetere, ĝi temas pri la movada vivo kaj ne la gramatiko.

La 17-a regulo kaj la nekonformeco de "peri" kaj "far"

Antaŭ tri jardekoj H.V. Rasmussen, la kunredaktoro de *Esperanto*, publikigis artikolon titolitan simple "La 17-a regulo"¹ Li tuŝis problemojn rilate verbigon de prepozicioj kaj prepoziciigon de verboj, kaj citis la 4-an paragrafon de la Bulonja Deklaracio:

La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo *Fundamento de Esperanto...* Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en *Fundamento de Esperanto*, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta...

Rasmussen opinias, ke tiu permeso estas mankhava, ĉar la rajto pri libera elekto de esprim-manieroj devas esti limita per ĝuste 17-a regulo, kiun li formulis jene: "ke tiuj esprimmanieroj estu inter si konformaj". Por ilustru tiun regulon, li donas ekzemplojn de la uzo de "peri" kaj "far".

La 17-a regulo pri la neologisma radiko "zoz"

Preskaŭ kvaronjarcenton post la propono de Rasmussen, nova formulado de la 17-a regulo aperis rezulte de

¹HVR = H.V. Rasmussen, "La 17-a Regulo", *Esperanto*, 1958.

ESPERANTIC STUDIES

Number 3 Australasian Spring 1992

Language Futures by E. James Lieberman

Who dares forecast the fates of languages? How much credence do such visions deserve? Can we make linguistic prophesy more useful? The book *Megatrends 2000* by J. Naisbitt and P. Aburdene (Morrow, 1990) and a recent forecast of "simultaneous translation of human speech ... in just 20 years" raise these concerns.

"Global lifestyles and cultural nationalism" evolve paradoxically together, says the new *Megatrends*: "The more homogeneous our lifestyles become, the more steadfastly we shall cling to deeper values—religion, language, art, and literature. As our outer worlds grow more similar, we will increasingly treasure the traditions ... from within" (ch. 4).

Megatrends 2000 sees English as the main force for a global lifestyle, though it says English is supplementing, not replacing, other languages. English is the language of computers, science, international business, diplomacy, and youth culture.

Still, foreign language study is up in U.S. schools, with a trend toward Japanese and Chinese, notes *Megatrends*. And there is a resurgence of Catalan in Spain, Welsh in Wales, French in Canada. Governments have restricted English in the Philippines, Singapore, and Sudan. The Soviet Union embraced some 100 languages, many of which are being heard again more widely.

This countertrend of difference against the juggernaut of

Newsletter of the Esperantic Studies Foundation, Inc., 3900 Northampton Street, N.W., Washington DC 20015. The Esperantic Studies Foundation conducts, disseminates, and promotes research on international language problems and solutions. Communications may be directed to **E. James Lieberman, M.D.** (George Washington University), at the above address (telephone 202-362-3963, facsimile 202-363-6899, Internet ejl@gwuvvm.gwu.edu, CompuServe 72450,607) or to the other members of the Board of Directors: **David K. Jordan, Ph.D.** (Department of Anthropology C-001, University of California, San Diego, La Jolla CA 92093; telephone 619-534-2250, Internet dkjordan@ucsd.edu); **Jonathan Pool, Ph.D.** (Department of Political Science, DO-30, University of Washington, Seattle WA 98195, telephone 206-543-7946, facsimile 206-685-2146, Internet pool@u.washington.edu, telex 4740096 UW UI); and **Humphrey Tonkin, Ph.D.** (Office of the President, University of Hartford, West Hartford CT 06117, telephone 203-768-4417, facsimile 203-768-5417, Internet tonkin@hartford.bitnet).


sameness has nonlinguistic symptoms, too. The Vienna accords on human rights (1989) following on those of Helsinki (1975) are among them. *Megatrends 2000* predicts further expression of ethnic pride and prowess in 1992, as the single European market comes to life.

Which side of this paradox does an invented world language belong to? Contrary to appearances, I think it falls on the differentiating, not homogenizing, side. Most Esperanto speakers, for example, want not only global communication but also linguistic diversity. So, they have been enthusiastically about the use of their language to help computers translate.

What, then, about machine translation? The Institute of Electrical and Electronic Engineers in March 1991 gave an optimistic spin to a Gallup survey of its members. But only 58% of the 150 respondents expected automatic simultaneous interpretation by 2010; 23% felt there was less than an even chance. The optimists were 66% of the government, 60% of the corporate, and 48% of the academic engineers; the doubters rose from 16% in the first two groups to 36% in academia. Self-interest (professional aggrandizement) may blinker this survey, which didn't address the engineers' linguistic sophistication. Vendors of simplistic translation devices, such as the 30,000-word *Spanish Assistant*, likewise overlook the many mistranslations their products generate when finding examples for advertising copy.

Machine translation is making progress again with advances in linguistics and artificial intelligence, after initially being hyped and then hamstrung. Though linguist David Crystal, writing in the 1987 *Cambridge Encyclopedia of Language*, doubts machines will ever replace human translators, he finds exciting progress in computer-assisted translation and doesn't rule out the possibility that useful automatic interpretations of telephone conversation will be realized by 2000. Commercial systems' limits remind us we have far to go, while the high quality (in limited domains) of the best academic projects suggests we can go far.

But automated translation will change human behavior, according to a March 1991 article by Peter Benton in *Byte*. "Adopting machine translation requires a great deal of learning and dedication. Work flow, job descriptions, and habits must change. The fact that raw translation is now performed by a machine, rather than people, transforms the fundamental nature of the process. Term banks, pre-editing and post-editing, voice recognition, parsing and disambiguation have found their way into the lexicon of inter-language processing. Will facilitated translation in science, technology, business, and tourism make language learning obsolete? Don't assume so—did computers make the study of mathematics superfluous? The forecasts of *Megatrends 2000* provide a needed balance. So does the saying "*Les traductions, lorsqu'elles sont belles, elles ne sont pas fidèles, et lorsqu'elles sont fidèles, elles ne sont pas belles.*"



Multilingual Machine Translation

By Dan Maxwell

Distributed Language Translation (DLT) is a multilingual machine translation (MT) project. It was developed and implemented between 1984 and 1990 in BSO (Buro voor Systeemontwikkeling), a Dutch software firm. Funding of \$10 million came from BSO and the Dutch government. A prototype program, designed to translate texts on airplane maintenance in a simplified English, was completed in 1988. DLT was discontinued when the allotted time (though not the money) ran out without an industrial partner willing to invest in further development.

DLT uses a fully developed intermediate language (IL), a slightly modified version of the planned language Esperanto, as a link between source and target languages. This makes DLT unusual. One advantage of an IL is to reduce the number of translation steps in dealing with more than three languages. For example, if there are four languages, we can model systems with and without an IL as shown in the two figures. Without an IL we need $4,3 = 12$ translation steps; with an IL we need only $2,4 = 8$. The IL functions like the center point in a wheel linking the spokes. As the number of languages increases, so does the difference between the numbers of translation steps in the two models. For example, an IL reduces the steps from 90 to 20 with 10 languages.

The most difficult problem in translating by computer is the indeterminacy of meaning in natural languages. A given word or word group often means different things in different contexts. And context functions in different ways in different languages to make the meaning more specific. DLT approaches this problem by considering the context associated with any word being translated and by using a "knowledge bank" of relationships between words.

The sentence *cut the cake* exemplifies this problem. In DLT, the first step in translating that sentence into a target language is to translate it into Esperanto. But there are at least two ways to translate *to cut*: *tondi* and *tranĉi*. The only clue in this sentence is the verb's direct object *the cake*. This suffices, here, to tell us *tranĉi* is the choice (actually, the imperative form *tranĉu*. *Tondu* would be right if the object phrase were *hair*, for example. *Tranĉ-* has the sense of *slice* and *tond-* the sense of *snip* or *clip*. Initially, the system offers both candidate translations—*tondu la kukon* and *tranĉu la kukon*.

To choose the better translation, we consult the knowledge bank. It reveals words that combine with each of the two candidate translations of *cut*. The word *kuko* (cake) may be in the knowledge bank in the direct-object relation with *tranĉi*. If so, *tranĉi* is selected as the better translation. If there is no precise match in the knowledge bank with either candidate translation, an algorithm known as SWESIL (Semantic Word Expert in the IL) calculates the semantic proximity of the words in the knowledge bank to the words such as *kuko* which have a specific syntactic relationship to the word being investigated. Even if *tranĉi kukon* is not in the knowledge bank, perhaps such pairs as *tranĉi panon* (cut bread) or *tranĉi gorĝon* (cut a throat) are found there. Linked with *tondi*, on the other hand, we ought to find words like *papero* (paper) and *herbo* (grass). What basis does SWESIL have for deriving the conclusion, intuitively felt by the human translator, that the words in the knowledge bank with *tranĉi* are more like *kuko* than the words with *tondi*? In DLT, several different methods of automating such intuitions about meaning were tried. The version of SWESIL ultimately used in the prototype calculated the semantic proximity of any two words on the basis of the number of words in the knowledge bank related to both of them. This often leads to the correct result. On the other hand, SWESIL ignores contexts larger than two-word combinations. The so-called Bilingual Knowledge Bank, developed after the prototype, has as its basis of knowledge entire texts rather than word pairs and thus offers the hope of dealing with larger contexts. It remains to be seen if this avenue of development will be pursued in future attempts to automate solutions to the language barrier.

[Dan Maxwell is a theoretical linguist, specializing in syntax. He works on computational applications of linguistics in the software company

Buro voor Systeemontwikkeling, Baarn, Netherlands. He is a co-editor of *Metataxis in Practice: Dependency Syntax for Multilingual Machine Translation* (Foris, 1989). For more about DLT, see Victor Sadler, "Machine Translation Project Reaches Watershed", *Language Problems and Language Planning*, 15 (1991), 78-81.]

Interfering with Interference

By Derek Roff

Students and teachers of second languages are often frustrated by linguistic interference, that is a speaker's knowledge of one language interfering with the correct production of another. Yet, despite the widespread awareness, little practical guidance is available to ameliorate the problem.

Invented languages aren't immune to interference. In cooperation with Professor James Cool and his students in two intermediate levels at the 1991 Intensive Esperanto Program at San Francisco State University, I did a preliminary study of interference with Esperanto. After a week's immersion, the students' written exercises were free from errors attributable to other environments, primary activities, or "being rusty" in Esperanto. Therefore, I was surprised that interference errors comprised the second largest group, after mistakes with the accusative case. Since students at this level think predominantly in their native language, mental mistranslation is a factor. But how can we characterize interference types, and what is the best pedagogical approach for minimizing these errors? In an attempt to better understand the phenomenon, I divided the errors into seven categories based on the linguistic factors and on distinctions made by students:

1. One language has greater precision than the other—a word in one language does the work of two or more in the other language.
2. Different concept mapping—several words in each language describe similar concepts, but the divisions between concepts differ, so no word adequately translates a word in the other language.
3. Differences in tense sequence and verb usage.
4. Sound or spelling similarity.
5. Omitted words—obligatory words in one language that are optional or absent in another.
6. Direct translation of idiomatic expressions.
7. Interference from previous second languages.

I suspect interference is even more common among Esperanto students than among students of other languages. The rapidity with which students can begin to express themselves and the regularity of the language encourage students to attempt to express ideas well beyond what

is possible with the language elements that they have "mastered". If their communication efforts are fairly successful, they are likely to continue to push their limits. It is likely that this accelerates the learning process and student satisfaction. Teachers must recognize that this will result in more errors, and apply proper correction in a way that will diminish error production, without dampening the student's enthusiasm.

In combating interference, teachers should distinguish errors from mistakes. We can define "errors" as faults due to a lack of knowledge and "mistakes" as momentary deviations from understood principles. Students often knew this difference and resented teachers who explained in detail things they already knew. If these students are representative, this presents a major challenge to teachers, who must be attentive to interference as a common cause of errors and apply proper correction for both mistakes and errors, without frustrating the student.

[Derek Roff is the learning technologist for the Modern and Classical Languages Department at the University of New Mexico, where he develops multi-media learning materials. Write us for a report of this ESF-funded study.]

Speaking Through an Interpreter ...?

By Jonathan Pool

The world, of course, is multilingual. The number of languages in use is estimated as two thousand to seven thousand, depending on which speech varieties count as "languages". With the number of countries about two hundred, linguistically diverse countries are the rule, not the exception.

But for most people it's frightening to think about getting prepared for life in a multilingual world. How many languages do I need to learn? Which ones will be the best bets? Can I really make myself understood? Will they speak slowly enough for me? Will they laugh at my accent?

Do we protect ourselves linguistically from this linguistic anxiety? Consider how we talk about languages. Radio journalists in the United States introduce translated voices with "Speaking through an interpreter, XYZ said that ...". Even if the speaker is a Venezuelan speaking Spanish in Caracas, or a Russian addressing the United Nations General Assembly in Russian, one hears the same phrase. A U.S. official speaking English in Paris is never described as "speaking through an interpreter". If journalists said "Heard through an interpreter ...", the suggestion would be that we hearers need help to hear, because we don't understand the speaker's language. The current phrase suggests the opposite: the speaker needs help to speak.

You can find other examples if you look. People are said to “not speak the language”, as if they were alingual and it were their duty to learn “the language” rather than the duty of those serving them to learn theirs. Languages are called “dialects” and the idea that it might be appropriate for us to learn them is thereby disparaged. “English” is used as a synonym for “language”, helping us forget that the ordinary language is, for most people, something else.

The suggestion is that we are central, others are peripheral, and it's their job to adapt to our language. This is the linguistic analogue to our habit of describing some Philippine village as “remote” or the customs there as “exotic”, when for those living there New York may be remote and 5:00 p.m. traffic jams may be exotic.

Illusions are comforting, but they can inhibit the recognition and hence the solution of problems. Unexamined phrases, in turn, can subtly promote illusions. As a small but significant step toward solving the problems associated with world multilingualism, we can teach ourselves to talk more impartially—less self-centeredly—about languages.

Esperantic Studies is reprinted by the Australian Esperanto Association through an arrangement with the Esperantic Studies Foundation, Washington D.C. Extra copies of this issue (No. 3) can be obtained from Owen Loneragan, 36 Deverell Way, Bentley WA 6102. If you wish to be placed on our regular mailing list, please let us know. Bulk orders for future issues may also be placed, please contact the above address for details. Individual copies of issues 1 and 2 may be obtained from Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Please address any editorial queries to the American editors, addresses given on page 1.

JANUARY SUMMER SCHOOL WITH WEEK-END AEA CONGRESS

by Max Wearing

As an incorporated body, the Australian Esperanto Association must now call at least one general meeting each year, so it will hold a short congress during the week-end of the coming Australian Summer School (11-23 January, 1993) at Aquinas College, North Adelaide. The form of the Summer School, however, will be very much the same as in the past: 3-hour “core” courses for each level, “electives” in the afternoons, talks and social activities in the evenings, and Wednesday afternoons free for meetings, individual study, or recreation. In addition, there will be short afternoon walks and excursions for those wanting to get to know Adelaide.

konstato farita de Louis Beaucaire pri misoj kaj mankoj en la 16 reguloj de Zamenhof. En verketo titolita "Zozo, la deksepa regulo de la Fundamento", la aŭtoro proponas jenan aldonajon al la teksto de la Fundamenta Gramatiko: "Kiam parolanto de la lingvo Esperanto ne scias vorton, li simple uzu la radikon *zoz*, kiu memstaran signifon ne havas."¹ Sekve la radiko "zoz-" funkcias kiel speco de lingva jokero, kiel ilustras tiuj ĉi tri frazoj, en kiuj ĝi anstataŭas la nekonatajn vortojn "ombrello", "fumas", kaj "bone":

1. Kiam pluvas, mi prenas mian zozon.
2. Mi zozas cigaredon.
3. Ĉu vi fartas zoze aŭ malzoze?

Post publikigo de la 17-a regulo de Beaucaire en 1981 oni vane atendis ĝian akcepton fare de gramatikistoj. Eĉ la neologisma radiko "zoz-" ne sukcesis enradikiĝi en la lingvo, ĉar ĝi mankas en la *Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro* kaj la glosaroj de neologismoj de Henri Vatré, 1983; Rikardo Ŝtalo, 1987; Edwin de Kock, 1988; André Cherpillod, 1988. Tio ne signifas, ke speco de zozo-vorto ne estas bezonata en Esperanto, eĉ se ĝi ne havas la saman funkcion kiel lingva jokero. Tion ni vidos ĉe la fino de tiu ĉi studaĵo.

La 17-aj reguloj de Richard Schulz

Richard Schulz (alinome Rikardo Ŝulco), la nuntempa korifeo de la Analiza Skolo fondita de Luis Mimó,

¹Louis Beaucaire, *Fabeloj de la verda pigo*. Antverpeno kaj La Laguna, TK/Stafeto, 1981, p.85.

en du verkoj pritraktas enkondukon de 17-a regulo kun la celo pravigi lingvouzon, kiu liaopinie estas kontraŭfundamenta. En letero sendita al Isaj Dratwer (1983.06.02) Schulz polemikas pri la uzo de minuskloj: "Nomojn de popolanoj, monatoj, adjektivoj, adverboj oni ĉiam skribas minuskle¹ vi skribas. Ĉu tio estas iu de vi starigita 17a regulo de la Plena Gramatiko? En sia du volumojn ampleksanta *plena verkaro de l.l. zamenhof ludovikito* skribas minuskle eĉ la frazkomencojn kaj la proprajn nomojn mem. Ĉu vi jam plendis kontraŭ li pri tio?"²

La dua okazo temas pri lingva eraro de Zamenhof kun rilato al esprimado de maniero kaj grado:

Se en la kazo de "tiel/kiel" ni agnoskus la Zamenhofan lingvouzon, ni bezonus deksepan Fundamentan regulon, diranta [tiele!] ke por la indiko de manieroj kaj gradoj, oni, ne distingante ilin, uzas "tiel" kaj "kiel", sed ne "iel", ĉar tiun adverbon oni devus anstataŭigi per "iom".³

Schulz skribas ankaŭ pri enkonduko de 18-a regulo! Li trovas erara uzon de "unu" kiel nedifinitan artikolon en la frazo "Unu vidvino havas du filinojn", kaj esprimas sian malaprobobon jene:

²Rikardo Ŝulco (= Richard Schulz), *Pledo por unueca lingvo*. Paderborno: Esperanto-Centro, 1985.

³Rikardo Ŝulco, *Sur la vojoj de la analiza skolo*. Paderborno: Esperanto-Centro, 1987, p.36.

Tio estas malbona Esperanto. La unua regulo de la Fundamenta Gramatiko nemiskompreneble diras: "Artikolo nedifinita ne ekzistas". Kion ni nun faru? Malpravigi Zamenhofon aŭ malpravigi la *Fundamenton*, kiu ja ankaŭ estas Zamenhofa? Ĉu ni almetu al nia 17-a regulo ankoraŭ dekkan, kiu diras: "Kvankam nedifinita artikolo en Esperanto ne ekzistas, oni povas laŭplaĉe uzi la numeralon 'unu' kiel tian?"¹

Estas evidente, ke la demandoj prezentitaj de Schulz pri la 17-a kaj 18-a reguloj estas retorikaj. Laŭ la dogmoj de la Analiza Skolo, la *Fundamento* estas absolute netuŝebla, kaj Schulz estas la lasta persono, kiu serioze proponus aldonajn al la dek ses reguloj. Li menciis la 17-an kaj 18-an regulojn nur por reliefigi sian opinion pri kontraŭfundamenta lingvouzo, eĉ fare de Zamenhof mem!

De zozismo al anglingva manio

Jam de longe mi observis la tendencon de kelkaj esperantistoj, kiuj, ne sciante kiel diri vorton aŭ esprimon en Esperanto, uzas surgaton—ne zozovorton sed anglingvajon. Tri citaĵoj ilustras tion:

1. "Bolingbroke Mudie estis tipa talenta organizanto kaj angla *business-man*." (Edmond Privat, *Aventuroj de Pioniro*, 1963, p.16.)
2. "Temas pri lando, en kies parlamento onidire agadas relative granda grupo—

'lobby'— de deputitoj favora al la Internacia Lingvo." (*Hungara Vivo*, 1987/4, p. 122, kol.1.)

3. "Estis pli facile intertrakti pri labortempo, salajroj, laborkondiĉoj kaj nombreblaj faktoroj kiuj karakterizas la 'golden sixties'." (*Infoduktoj*, 1988, p.94.)

Sekvante la iniciaton de Beaucaire, mi verkis artikolon titolitan "La 17-a regulo (Pri la uzo de la angla lingvo en Esperanto)"² kaj formulis novan regulon: "Se oni ne scipovas esprimi koncepton per elementoj de la Esperanta vortprovizo, oni diru aŭ skribu ĝin en la angla lingvo". Sekvis kvin citaĵoj el la plumoj de t.n. bonaj verkistoj. Mi klarigis, ke la fenomeno de la uzo de anglaj vortoj en Esperantaj tekstoj jam antaŭ longe manifestiĝis en la lingvo, do adopto de la 17-a regulo estus nura formalajo. Mi proponis, ke dum la dua jarcento de Esperanto estu pridiskutata la valideco de la nova regulo. Fine, mi defiis legantojn esperantigi la kvin anglaĵojn aperintajn en la citaĵoj: *thriller, five o'clock, wishful thinking, best seller* kaj *slow motion*.

Reagoj

Ĝis nun, laŭ mia scio, aperis en presita formo du reagoj al mia propono. Tibor Papp el Hungario, la redaktoro de *Debrecena Bulteno*, en artikolo du kaj duonan paĝojn longa argumentas kontraŭ la alprenado de

²Bernard Golden, "La 17-a regulo (Pri la uzo de la angla lingvo en Esperanto)". *Latinamerika Memuaro*, 4:3-4, sept.-dec. 1988, p.3.

¹Samloke.

nova 17-a regulo, ĉar jam ekzistas la 15-a.¹ Tamen, li konsentas, ke la temo meritas pritraktadon dum la dua jarcento de Esperanto kaj konkludas, ke anstataŭ superflue formuli la 17-an regulon, oni uzu la anglajn vortojn sen ortografiaj ŝanĝoj sed ĉiam kun enkrampa proksimuma prononco kaj glosa en Esperanto, kvankam tiu procedo ne povas solvi ĉiujn problemojn.

La dua kontribuinto al la diskuto estis Gaston Waringhien, kies komentoj pri mia malkovro de la insida influo de la angla lingvo en Esperanto aperis en la sekva numero de *Latinamerika Memuaro*.² Waringhien bagateligas la danĝeron de la angla lingvo super Esperanto kaj pravigas la kutimon (li uzas la vorton "manio") citi fremdlandajn citaĵojn. Estas strange, ke li ne esprimis opinion pri la valido akceptigi la 17-an regulon, ĉar ĝuste tia regulo povas apogi lian starpunkton.

La demando, do, ankoraŭ estas sur la tapiŝo, kaj estus interese ekscii la opiniojn kaj reagojn de legantoj de *The Australian Esperantist*.

[Noto de la redaktoro: ĉi tiu verko estis sendita al TAE antaŭ pli ol jaro, sed pro mismeto ĝi sin kaŝis ĝis nun en la arkivo. Intertempe ĝi ne perdis sian humuran kaj samtempe avertan karakteron. Bernard Golden petas reagojn, do jen mia: eventoj lastatempaj eksmodigis lian proponitan

¹Tibor Papp, "'Thriller' kaj ĝiaj kunuloj (aŭ Propono por apliki transparentajn vortojn)". *Latinamerika Memuaro*, 49:24-26, aprilo 1989.

²Gaston Waringhien, "Leter-ero". *Latinamerika Memuaro*, 50:3, januaro-aprilo 1989.

17-an regulon. Oni bezonas nur rigardi kiun ajn esperantan gazeton (kun kelketaĵoj esceptoj) por trovi la plejaktualan regulon: "Laŭeble ĉiam oni transprenu en Esperanton iun ajn anglalingvan vorton kaj aldonu la finaĵon -o". Sekve ni legas pri mitingoj, reporteroj, viedoklipoj, marketingo (mi eĉ legis pri marketinga direktoro!), komikso, hapeningo kaj sendube, ie, iam (se ne jam) ni trovos vikendon (<weekend>). En la praktiko temas pri setakomplia³ reverko de la 15-a regulo. Mi rimarkas ankaŭ ke devas esti subparagrafo diranta: "Ĉiam kiam eble, donu specife anglalingvan signifon al kiu ajn vorto jam uzata en Esperanto." Ekzemploj? Nu...Ĉe membro de nia Asocio unue oficiale ricevis la titolon "publicisto" (angle: publicist, P.R.O. La vere esperanta publicisto = journalist); mi ofte en la internaciaj esperantaj gazetoj trovas ke kontroli jam uzas por signifi regi/reguligi eĉ rusaj esperantistoj. Interese estas ke inter la plej oftaj ofendantoj estas la redaktoroj de El Popola Ĉinio, eble ĉar la plej multaj artikoloj en tiu gazeto estas nur tradukaĵoj el anglalingvaj propagand-aĵoj? Rajtan!⁴ esperantistoj de Aŭstralio, ankaŭ viajn kontribuojn ni volas legi! □

LA PLEJ LAŬMODA VORTO DE LA JARO 1992

estas la verbo "engaĝi", preskaŭ ĉiam en sia participa formo "engaĝita". Ĝia signifo? Preskaŭ io ajn, nur neniam la difino donita en PIV.

³Ĉi tiu vorto estas © 1992 Odlo Bokserp. [*fait accompli*, iam franca esprimo sed nun parto de la angla repertuaro.—Red.]

⁴Ankaŭ ĉi tiu vorto estas ©1992 Odlo Bokserp. [*right on*—Red.]



DIVERSAĴOJ

• **Nova Fonduso por Opero:** Laŭ ideo de Imre Nehéz, la hungara kaj aŭstra Esperanto-asocioj starigis fonduson por ebligi la komponon de esperantlingva opero bazita sur la verko *Tragedio de l' Homo* de Imre Madách cele prezentadon okaze de EXPO '96 en Hungario. La opero estos prezentata samtempe en Budapeŝto kaj Vieno. Oni petas monon por ebligi la fonduson kaj sekve la operon. Adreso: p.k.250, H-8500 Pápa, Hungario. [Laŭ raporto en *Eventoj* 009 julio 1992.]

• **"Najtingalo": nova songazeto en Azio.** La ideo estas per ĝi ne nur interligi movadojn aziajn, sed ankaŭ informi eksterzian Esperanton pri tiuj relative nekonataj kontinento, movadoj, kulturoj, ktp. Specialaj valoroj de la songazeto: fortigi la komprenkapablon de esperantistoj kiuj malofte havas oportunan aŭdi la voĉojn de alilandanoj; doni muzikan ĝojon per Esperanto-kantoj; proksimigi prononcadon de samlandaj kaj alilandaj esperantistoj; helpi blindajn esperantistojn, kiuj por utiligi gazetaron ĉiam bezonas alies helpon; kc. *Najtingalo* aperas sezone. La nuna numero estas la somera (t.e. la somero de la norda hemisfero!). Abonprezo: ≈ A\$20. Mendu per la AEA Libroservo. Adreso de la redakcio: PO Box 405, CPO Tokyo, 100-91 Japanio.

• **Eŭropo-Azio '92, "La Rusa Vintro":** 29 decembro-9 januaro. Internacia trajn-

vojaĝo Moskvo-Jekaterinburg-Toboljsk-Jekaterinburg-Ninĵij Novgorod-Moskvo, inkludante la tutan programon de Eŭropo-Azio '92, plus ekskursoj kaj noktumado en Ninĵij Novgorod kaj Moskvo. Detalojn donas: Ruslanda Esperanto-Asocio, 620077 Jekaterinburg-77, pk 27, Rusio.

• **Kiu deziras daŭre informiĝi pri la Esperanto-movado en Azio,** tiu povas aboni la bultenon *Esperanto En Azio*, eldonatan por UEA de Profesoro D-ro So Gilsu, rok 158 600, Yangchon p.o. Kesto 11, Seoul, Korea Respubliko. Por abondetaloj kontaktu la AEA Libroservon.

• **Survoje, dumonata revuo de Unuiĝo por Novtĵipa Internacia Kulturo** estas la nomo de gazeto nun en sia tria jaro. Eldonata en Sevastopol, Ukrainio, ĝi estas avangard- (alternativ-[-?]) -kultur-gazeto/literatura revuo. En la 12a numero: "Homo, stelo kaj porkoj", "Letero al amiko", "Pri maro da revuoj kaj amaro de revoj", "Principoj de feniksismo", "Nenio nova sub la suno", "Plurokule", "Veprokulturo", "Kvar cikloj", "Lingvo de birdoj", "Malvenko", "Sage Derby", "El katalogo de neokazinta ekspozicio", "Okoo", "Utopio en spegulo de kultur-memkritiko". —Ĉiam pensiga, plejparte interesa, senescepte agaca, por personoj kiuj volas legi aktualajn avangardajn literaturon kaj pensaron. Tre bone redaktata. Abono por 6 numeroj: ≈ A\$40.00.

Mendu per la AEA Libroservo, aŭ de La Gazeto (por *Survoje*), F-55210 Creue, Francio (prezo: 130 francaj frankoj). Adreso de la redakcio: *Survoje*, 335057 Sevastopol 57, pk 168, Ukraino. Avertu: *kies okuloj estas feblaj, tiu ne klopodu legi tiun periodaĵon.*

• **Esperanto-Ligo de Israelo kaj Kooperativo de Literatura Foiro** invitas al la 3a Mediteranea konferenco de esperantologio en Telavivo 13-14 aŭgusto 1992 pri la temo **Zamenhofologio: Esploroj kaj kontribuoj.** ✉ LF-Koop., cp 232, CH-6830 Chiasso 1, Svislando.

• **Rezulto de nia konkurso por nova desegno por la kovrilpaĝo:** 48 personoj voĉdonis. El ili 14 preferas la desegnon faritan de Cliff Hall, 18 tiun de Jay Grant, kaj 16 tiun de Terry Manley; pluraj petis ŝanĝojn en detaloj de la de ili preferata desegno. Post konsulto kun artisto, la redaktoro decidis elekti modifitan formon de la desegno proponita de Terry Manley. Ĉiuj tri desegnintoj ricevos premion.

• **Memori kaj Forgesi, la nova novelaro de Trevor Steele, estos havebla en februaro,** prezo ĉ. A\$32. eld. Pro Esperanto en Vieno. 143p., broŝ. Recenzo sekvas. Antaŭrecenza takso: Trevor Steele montras sin inda posteulo de Stellan Engholm kaj Ferenc Szilágyi.

• **Nin plezurigas anonci ke John Abood,** en Darvino, sukcesis kun honoro en la Elementa Ekzameno. Ni gratulas lin pro la sukceso

UK 1993 EN VALENCIO, HISPANIO

Kotizoj por partopreno:

Por ne-individua membro de UEA:
\$237.00.

Por individua membro de UEA:
189.00.

Por akompananta kunulo (ne individua membro de UEA): \$143.00

Por akompananta kunulo (mem individua membro de UEA): \$95.00

La prezoj validos ĝis 30 decembro 1992. Post tiu dato ili altiĝos ≈ \$63.00. Detalojn, aliĝilojn, pagojn: Libroservo de AEA.

Dumviva membreco en UEA: \$1475 ĝis 30 decembro 1992. Ekde 1 januaro 1993 la prezo altiĝos al \$1875. (Por nov-zelandanoj haveblas simila oferto; kontaktu Gwenda Sutton.)

Nia Libroservo atentigas ke jenaj gazetoj ne aperas en la abonlisto 1993 pro livermanko al klientoj dum 1992: *Enigma, Fonto, Simpozio, Melodia, Lingva.*

Esperantic Studies

estas la nomo de duonjara periodaĵo eldonata de la Esperantic Studies Foundation en Washington D.C., Usono. Laŭ speciala interkonsento kun la eldonanto, ni represas la jusan numeron 3 en ĉi tiu numero de *La Aŭstralia Esperantisto* anstataŭ nian kutiman anglan suplementon. La angla suplemento reaperos en nia januara numero. Numero 4 de *Esperantic Studies* estos represita post sia apero meze de la venonta jaro, en la nova *Esperanto sub la Suda Kruco*. Ekstraj ekzempleroj de *Esperantic Studies* estas haveblaj de nia AEA kasisto Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102, Aŭstralio, kaj oni povas antaŭmendi kvantojn da ĝi ĉe la sama adreso. Se vi deziras ekzemplero(j)n de *Esperantic Studies* numeroj 1 kaj 2, vi povas ilin akiri kontraŭ afrankita taŭgdimensia koverto, de la redaktoro de *La Aŭstralia Esperantisto*.

KANTO PRI MIA KANTO
de MIKAELO BRONŜTEJN
(Rusio)

La dua vintro neĝon malfavoris,
Sed panjo ploris—ankaŭ mi ekploris.
Ja tiu alta monument' liphara¹
Por ŝi, ankaŭ por mi, do, estis kara.
Revenis post "ripozo" en tendaro
Barbulo—onklo nur en kvindek kvara,
Sed la oldulo ĉiam svene palas
Eĉ nun, se aŭdas pri Lavrentij Palijĉ.²
Por ni, senpantalonaĵ kaj senmanĝaĵ,
Apenaŭ gravis politikaj ŝanĝoj.
En hindaj filmoj vivo elegantis—
Do ni, kvinjaraj, "Vagabondon" kantis.

Refreno: Unu, du, tri, kvar—forpasas jaroj kun amar',
Kaj tamen sonas mia kant'!
Jen la eta rond'—mi kredas—ie en la mond'
Amikoj miaj aŭdas min.

La blua tempo de la justo ŝajna—
Kvazaŭ la loterio senmalgajna.
Efikis same bone la sloganoj
Por ni infanoj, kaj por veteranoj.
De l'voĉ' radia kun fervoro pleja
Inspiris malgraŭ la esenc' mensoga.
Sed povris mi, kaj la estonto loga
Inspiris, malgraŭ la esenc' mensoga.
En ĉiuj kampoj kreskis nur maizo,
Trans dudek jaroj brilis komunismo,
Kaj marŝis mi, la juna pioniro,
Kun kant' komuna en komuna iro.

Mi kreskis por konkuri kaj konkeri,
Por la estonton belan plu esperi.
Kaj Esperanto gravis ne pli ol la
Kutima aktivado komsomola.³
Sen laŭtaj vortoj, sen sloganoj, tamen

¹"Alta monument' liphara" = Stalin.

²Lavrentij Palijĉ = Berija, ĉefo de la sekreta polico de Stalin.

³Komsomolo = junulara komunisma organizaĵo.

Mi diligente movis ĝin antaŭen
En la amika rondo tutunia...
Kaj venis kantoj al la koro mia.
Vi, kiu mian kanton laŭte mokis,
Kiu al beno kaj obeo vokis—
Komprenu, min inspiris, certe, ne la
Betula ordonado kolonela.¹

Sen kredo jam, sen ajna emocio
Mi aŭdis pri disfloro de l'socio,
Ĉar nun ĉe la vendisto, ĉe l'najbaro
Abundis hinda teo kaj kaviaro.
Por lia filo estis deca flego—
Volumoj, akiritaj ne por lego
Li alproprigis ekde la mamnutro:
Por luksa viv' necesas luksa putro.
La suda lando² buĉis la heroojn,
La larĝa brust'³ postulis stelojn novajn,
Mensoga laŭdo ŝtate elefantis,
Kaj nur nemultaj pri l'vekiĝo kantis.

En la jarloĝo mia jam kvardekas,
Min pensoj pezaj ĉiunokte vekas.
Dum ŝajna iro al estonta bono
Ne feliĉigas senvalora mono.⁴
Nur la cikatrojn ŝiras personvago:
Ĉu por ŝtelitaj jaroj eblas pago?
Al ni, ligitaj en komuna nodo,
Vikimoj de la stagna periodo.⁵

Sloganoj novaj sonas jam, aŭ pretas...
Se nun la historion ni ripetas—
La samon spertos morgaŭ via filo—
Kaj vi, amiko, sidas en trankvilo. □

¹En la Sovetia Esperanto-Unio estis KGB-ano kies nomo signifas "Betulo"-n. Li forte bremsis liberan disvolviĝon de Esperanto-grupoj, provis fari el ili organojn de la oficiala politiko.

²Afganistano.

³Breĵnev havis manion porti ĉiam pli da medaloj.

⁴La rublo konstante perdas valoron.

⁵"Stagna periodo": oficiala Gorbaĉova termino por la jaroj de Breĵnev, Andropov kaj Ĉernjenko.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO STATUTAMENDO KAJ ĜENERALA KUNVENO 1993

1. Statutamendo:

Rezulto de la perpoŝta balotado, laŭ detaloj en *The Australian Esperantist* numero 274: anoj kiuj voĉdonis unuanime aprobis la proponitajn amendojn al reguloj 15 kaj 16 de la Statuto, kaj la akcepton de aldona regulo N-ro 28A. Laŭ la Statuto, regulo 31 (b), la necesa kvorumo aprobis la amendojn al la Statuto; anoj bonvolu amendi siajn ekzemplerojn de la *Adresaro kaj Jarlibro 1992*.

2. Ĝenerala Kunveno de A.E.A., 1993:

La Ĝenerala Kunveno de A.E.A. okazos en la kadro de la Somerlernejo de A.E.A. en Adelajdo, la 16-17an de januaro 1993. (Laŭ regulo 16 de la amendita Statuto.)

PLIALTIKO DE KOTIZOJ

Pro la plialtigo de poŝttarifoj, necesas plialtigi la kotizon por membreco en AEA. Proponita estas altigo ĝis \$30 por ordinara membreco, \$35 por membreco inkl. familion, kaj \$20 por studentoj, pensiuloj kc. La Ĝenerala Kunveno devos voĉdoni pri tiu altigo.

Philip Sunde

Mortis frue en oktobro Philip Sunde, 101jaraĝa, unu el la pioniroj de okcidenta Nov-Zelando kaj aktiva Esperantisto. Ĝuste ses semajnojn antaŭe mortis lia edzino Nellie, 94jara. Ili estis geedzoj jam 69 jarojn. Ambaŭ naskiĝis lastan jarcenton en la kampara urbeto Podgora ĉe la marbordo de Dalmatio, nun parto de Kroatio, tiam parto de la Aŭstro-Hungaria Imperio. Ni donas nian kondolencon al la du filoj Alex kaj Victor, kaj al la genevoj.

Philip kun sia frato Dominic migris al Nov-Zelando en la jaro 1907. En Nov-Zelando Philip kaj Dominic unue laboris en la fora nordo por la industrio de elfosado de kaŭrirezino. Philip, kun pluraj aliaj dalmatianoj, lernis Esperanton. Oni ofte rimarkis inter la jugoslavo, ke tiuj kiuj lernis Esperanton ankaŭ plej bone lernis kaj parolis la anglan. Certe la jugoslavo en la Aŭklanda Esperanto-Klubo plej bone parolis Esperanton.

Nellie migris al Nov-Zelando en 1923. Tiun saman jaron, tri semajnojn post sia renkontiĝo, Nellie kaj Philip geedziĝis. Philip kaj Nellie fondis vitejon kaj frukt-arbaron en la okcidenta parto de Aŭklando, kaj personoj kiuj konis ilin kaj legas la novelon de Frank Sargeson "La fariĝo de Novzelandano" povas rekoni la similecon. Ilia filo Alex informis la prezidanton de NZEA ke restas kelkaj dokumentoj el la fruaj tagoj de la Esperanto-movado en Nov-Zelando, kaj ke Philip volis donaci ilin al la arkivoj.

[Kompilita laŭ informo de Brian Fox kaj ĵurnalraportoj.]

Gordon Grgson

de Shirley Gradussov

Ĉiam aktoro, li tre dramece faris la lastan eliron. Sub blua ĉielo en varma sunbrilo, promenante "skoltpaŝe" kun kara amikino apud la maro ĉe Cottesloe, li subite falis, tuj morta.

La funebrajn ritojn ĉeestis pli ol 200 homoj—familianoj, kolegoj, amikoj. Inter ili oni mire demandis "Ĉu ankaŭ vi konis lin?" "Jes, ano de Rotary dum multaj jaroj. Kaj vi?" "Ano de la Dram-Societo de Diplomitoj." "Kaj mi, dram-aktoro por la ABC." "Jes, li plantis arbojn kun ni en la infan-lernejo." "Ni kantis kun li en la Universitat-Horo." "Li estis ano de la Dante Alighieri Societo." "Ĉu? Li partoprenis nian German-konversacian Rondon." "Ĉe ni li aktoris en radio- kaj televid-reklamoj." "Li sekretariis en la Societo pri Belartoj kaj Antikvaĵoj." "Li estis mia lojala amiko dum sesdek jaroj." (Eric Hurst.)

Kaj el la Edukada Fako bruemis granda aro da instruistoj, eksinstruistoj, lernejestroj kaj eksstudentoj, ĉiuj feliĉe rememorigante unu la alian kaj la neforgeseblajn okazojn, kiuj iel ĉiam akompanis Gordonon.

Kiam komenciĝis la solena ceremonio en la kapelo, ekkantis kvindek anoj de la Universitat-Horo du-tri belajn himnojn memore al Gordon—estis kortuŝe! La pastro estris la ritojn laŭ la Liberal-Katolika tradicio, sendube konforme al la teozofiaj principoj de Gordon. Poste sekvis de Eric Hurst la mortparolado. Li ridigis kaj kortuŝis nin per anekdotoj, kiuj substrekis la multajn karigajn trajtojn de la mortinto—ege lojala amiko, aventurema kaj kuraĝa, fojfoje malsaĝe impulse aventurema, sed ĉiam bonintenca, honesta kaj helpema.

Ni Esperantistoj ankaŭ konservis interesajn memorojn de talenta artisto kun temperamento kaprice ekscitigema. Iu foje ŝtelis lian viskion. Kia eksplodo! Vulkano erupciis! Tamen, post la kolerego li reĝis bonhumora gasto, ŝercanta kaj afabla. Li bonege sciis distri kaj amuzi la homojn, kaj li ŝatis homojn. Ĉu vi memoras semajnfinan kurson en Esperanto ĉe Mundaring Weir, kiam li majstrece estris la ĝuigan programon? Ĉu vi ĉeestis la kongreson en Adelajdo en 1982, kiam Gordon rolis heroon en la konkurso? Ĉu vi vizitis nian kongreson en 1986 en Perto? Gordon kantis en la ĥoro, ankaŭ ludis mirindan rolon kiel friponon en la dram-konkurso. (Ĉu surprizas vin, ke ni okcidentanoj tiam gajnis ambaŭ trofeojn?)

Nekutiman talenton li havis. Lin fascinis voĉoj, fremdaj akĉentoj, nekutimaj parolmanieroj. Li sciis perfekte imiti iun ajn voĉon, nederlandan, francan, ĉinan, eĉ la plej subtilan nuancon. Fakte en drinkejo en Londono li konatiĝis kun du japanaj Esperantistoj. Post kelkaj minutoj li mem parolis japan-akĉente. La novaj amikoj ridis tiom, ke ili preskaŭ ploris.

Ho ve, Gordon, nia perdo estas riĉa gajno por la Zamenhofa rondo en la venonta mondo. Adiaŭ portempe, kara amiko!

[El *La Nigra Cigno* oktobro 1992, modifita.]

Lina Clara (Eve) Matasin

de R. G. Robertson

"Eve" Matasin naskiĝis en Leipzig, Germanio kaj per Esperanto ŝi renkontis Johanon, migranton el Jugoslavio, kiu antaŭiris ŝin al Sidnejo kaj trovis laboron kiel fabrikisto de mebloj. Eve sekvis lin en 1929 kaj edziniĝis en Aŭstralio. Ili ambaŭ estis anoj de UEA, SAT kaj la Sidneja Esperanto-Klubo, kaj dank' al ilia iniciatemo kaj fervoro la klubo akiris Esperanto-Domon.

Ili posedis belan hejmon apud la haveno en Northbridge antaŭ ol tiu antaŭurbo fariĝis laŭmoda, kaj loĝis tie ĝis la forpaso de Johano en 1980. Eve konstruigis apartamenton ĉe la sama adreso kaj restis tie ĝis 1989, kiam ŝi devis translokiĝi pro malbona sanstato.

En la hejmo ili gastigis multajn eksterlandajn Esperantistojn de la movado, kiel Lantin kaj Lapennan. Ŝi laboris sindoneme kaj efike kiel kasistino de la LKK por starigi kongreson en Sidnejo dum Januaro 1980; sen ŝia helpo tute ne povus okazi la fina sukceso.

Ĉiam modesta kaj ne pretendema, ŝi malofte vidiĝis ĉe podio, sed multe sin okupis en la fono. Unue mi renkontis ŝin antaŭ 40 jaroj survoje al la naĝejo apud ŝia hejmo, kie ŝi daŭre naĝis preskaŭ ĝis la fino de sia vivo, kaj ĉesis ludi tenison nur kelkajn jarojn antaŭe. Ĉiam ŝi estis afabla kaj helpema.

Postvivas ŝin filo, filino, kaj tri genepoj, al kiuj ni esprimas elkoran kondolencon.

El Teloĉeo Oktobro 1992.

Dezirata Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

/ Hana Škeříková, Štútného 20, Kamenice nad Lipou-394 70, Ĉeĥoslovakio. 37-jara oficistino kaj Andrea, 20jara filo. Interesiĝas pri muziko, naturo, kulturo.

/ Andrej Djaĉkov, Lesnaja 10a-11, SU-424032 Toŝkar-Ola, Rusio. 20jara studento.

/ Helen Avdick, pr. 40 Let Pobedy 70, 72 Grodno, Belorusio. Patrino kaj 7jara filo lernas Esperanton.

/ Norodin G. Mensong, Mindanao State University, Dinaig Maguindanao, 9601 Filipinoj. Studanto.

/ Adai Paukštvtėi, Darės 9-9, 5800 Klaipėda, Litovio. Juna, ankaŭ studis la anglan, deziras korespondantojn en ĉiuj kontinentoj.

/ Eugeniusz Piasecki, ul. J. Matejki 2, 67400 Wachowa, Pollando. Diversaj temoj; poŝtmarkoj.

LA AŬSTRALIA ESPERANTISTO

Indekso 1992

KODO:

271 = Januaro-Februaro
272 = Marto-Aprilo
273 = Majo-Junio

274 = Julio-Aŭgusto
275 = Septembro-Oktoebro
276 = Novembro-Decembero

Post la kodnumero sekvas la paĝnumero.
Ekzemple 274/12 signifas Julio-Aŭgusto
1992 paĝo 12.

Mallongaj notoj estas inkluditaj en la
indekso nur se ili temas pri io grava.

Akademio de Esperanto:

Aktoj de la Akademio III 275:15.
Donald Broadribb en: 274/15.
Landnomoj 275:22.

Analoj maloficialaj de 1991: 272/9.

Aŭstralia Esperanto-Asocio (Statutamend-
oj): 276/202

Biblioteko de AEA, de Ralph Harry: 271/
13.

Brigartikoloj (de Ralph Harry):

"Ambasadora ruzo": 273/4.
"La autoj de la ambasadoro": 272/18.
"La edzino de la ministro subtenas":
271/5.
"La ekludo": 274/14.
"Veterana brigistino sukcesas": 75/17.

Citajkvizoj, de Ralph Harry: n-ro 8: 271/
23.

Diversaĵoj:

Asdresni, poemoj de: 272/26.
Ĉu vi laboris alilande antaŭ ol veni al
Aŭstralio?: 271/16.
Enketo pri influo de naciaj lingvoj sur
Esperantouzado: 273/8.
Esperanto en Azio (gazeto): 276/18
Eŭropo-Azio '92: 276/18
Esperanto Insurrectionists: 273/10.
Expolingua Habana, Kubo 1992:
271/20.
Fruktosuko sen kondomoj: 274/24.
Gabriel Gaté: 273/11.

Komputilo: 271/12.

Konferenco pri Zamenhofologio: 276/
19

Kvina pacifika kongreso en Qindao:
273/12.

La Suda Kruco (de Ray Ross): 276/11.

Language Expo Australia: 273/13.

Mortis Gaston Waringhien: 272/26.

Mortis William Solzbacher: 272/26.

Mozaiko (ludo): 273/11.

Muzeo en Adelajdo: 274/25.

Najtingalo (songazeto): 276/18

Nice, Esperanto-Domo en: 276/19

Nifologio (UFO-oj): 272/26.

Novuloj (aŭstralia ligo): 273/11.

Opero, nova fonduso por: 276/18

Premio Einihovici: 273/11.

Rondiro de Aŭstralio 274/24.

Simpozio: Pacifiko, lingvo, kulturo, ko-
operado: 273/11.

Somerlernejo 1993: 274/25.

Survoje (gazeto): 276/18

Transskribo de urbnomoj: 273/19.

UMEA Shinoda-Kuracejo: 271/26.

Volapuka gazetserio: 274/23.

Dramo *La Diluvo* (de Vera Payne) 275/3.

El la regionoj: 273/26; 274/27; 275:27.

Esperantic Studies (gazeto): 276/19.

Grésillon, Kultura Esperanto-Domo: 271/
13.

Hearne, Eddie:

"Fino de perfekta tago": 273/9.

"Kial mi malamis labori en karbmin-
ejoj": 274/7.

Indekso de TAE 1991: 271/25.

Informiloj de AEA: 273/27; 274:27.

Innokentij, Seryšev (de N.P. Stepanov):

- 272/21.
- Kalocsay, amika societo honore al 275/16.
 "Kiu diris tion": vidu "Citajkvizoj".
 Kongreso, de AEA + NZEA en Sidnejo (de Ray Ross): 272/3.
 58a NZEA 1993: 275/27.
 Konkurso, literatura "Ivo Rotkvič" 275/16.
 Konkurso, por nova kovrildesegno: 271/21; 275/10.
 Konkurso: respondoj por tradukoj de "san"-vortoj: 271/14, 272:19.
 Landnomoj, listo 275/22.
 Lingva Angulo, de Alan Towsey:
 Da 271/7.
Learn, Conclude, Appear 272/20.
Just, Extend, Reach 273/16.
Just, Reach, "Verkajo". *Time* 276:12.
Da, Like, Sympathy 274:12.
Si, Smell, Oil, Prove, Welcome 2275/19.
 Lingvaj diskutoj: La *biskvita* familio (de Doug Portmann): 272/16.
 La 17-a regulo de la esperanta gramatiko (de Bernard Golden): 276/14
 Lingvaj Notoj, de Marcel Leereveld:
Could, Should 271/8.
Shall, Will, Would 273:18.
 Medio: Kion povas fari la ordinara homo por efike protekti la medion? (de Wolfgang Gunther) 273/6.
 Naciaj himnoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando 275/14.
 Nekrologoj:
 Averkoff, Flora: 274/13.
 Gregson, Gordon: 276/23.
 Harvey, Charlotte: 275/20.
 Huts, Albertus ("Happy"): 271/19.
 Matasin, Lina Clara (Eve): 276/24.
 Rozsa, Magdalena: 271/24..
 Sawkins, Dulcie: 273:20.
 Schwerin, Kathé: 272/8.
 Sunde, Philip: 276/22.
 Noveloj: *La Mankintaj Diamantoj* (de Donald Broadribb): 272/12.
La Totara Arbo (de Roderick Finlayson) 276:/3.
 Odlo Bokserp:
 Ferio en Usono kaj Francio: 272/26.
 Helpanto en *Kontakto*: 273/13.
 Poŝtkarto de ferianto: 271/15.
 Postferiraporto: 275:26.
 Poezio: *Rustika Erotiko, NOKT•PENS•AD, Infano de la Lingvo* de G. Gazizi: 271/10.
Kanto pri mia kanto de Mikaelo Bronŝtejn, 276/20.
 Recenzoj:
Aktoj de la Akademio III (rec. Donald Broadribb) 275/15.
Albana Esperantisto (rec. Donald Broadribb) 272/26.
Antologio de la serba parola literaturo (rec. Ralph Harry) 274/19.
Arboj—Plurlingva Terminaro (rec. Ralph Harry) 274/19.
De Tajgo al Minaretoj (rec. Ralph Harry) 274/19.
Dek Rakontoj el Vieno de Walter Klag (rec. Donald Broadribb) 271/16.
 Du novaj enciklopediaj verkoj (rec. N.P. Stepanov) 273/24.
Ek Al Leg'! (volumo 1, rec. Vera Payne):274/20, (volumo 2) 276/8.
Esperanto Aktuell (rec. Donald Broadribb) 273/12.
Eventoj (jurnalo) (rec. D. B.: 273/12.
Kongresistikaj Notoj (rec. Donald Broadribb) 274/24.
La noktmeza kortumo (rec. Ralph Harry) 274/19.
Lingvaj Respondoj de Zamenhof (rec. Donald Broadribb) 275/16.
Manuskriptoj por Bruligo de Ljubomir Trifončovski (rec. D. Broadribb) 273/8.
Ne Facilas Esti...Sloveno en Italio de A.P. Altherr (rec. Vera Payne) 273/21.
Norda Prismo (rec. Donald Broadribb) 274/23.
Nova Esperanta Krestomatio (rec. Donald Broadribb) 271/3.
Pri Nia Universo (rec. Donald Broadribb) 275/15.
Step by Step in Esperanto (rec. Donald Broadribb) 276/7
VERDire (rec. D. Broadribb) 274 /24.
Voĉo el Ukrainio (rec. Donald Broadribb) 273/11.
Winie-La-Pu de A.A. Milne (rec. Do-

nald Broadribb) 273/13.
 Retrokomento:
 de Brian Currie: 275/21.
 de Dorothy Threlfall: 272/24.
 Steele, Trevor, raportoj de:
 Bonan vojaĝon! 274/3.
 Internacia studumo pri turismo, komenco bona, ĉio bona? 271/18.
 Krizo en la orienteŭropa Esperantomovado: 273/3.
 Tanzanio, Peto el 275/18.

Televida kurso de Esperanto, propono de la Venezuela Esperanto-Asocio: 273/14.
 UK 1997 en Aŭstralio? 274/26.
 UNESKO-Asocio, Esperantista: 271/17.
 Viktor Iourkov 274/23.
 Vladivostoko: La vladivostoka simpozio inaŭguris novan fazon de la Esperantomovado en la azia-pacifika regiono (de Yoshimi Umeda): 274/16.

Index: English Supplement to *The Australian Esperantist* 1992.

- Action E3 272/4
 Africa, Esperanto congress in 273/1
 Australia:
 Dr Broadribb in Academy of Esperanto 274/2
 Justice Kep Enderby 275/2
 Books for reference 274/4
 Byelorussia 275/1
 Children around the world 271/1
 China:
 Amateur Esperanto radio 274/1
 Beijing international symposium 273/3
 Esperanto hotel 274/1
 Esperanto in medical college 274/1
 Qindao watch factory 274/1
 Comparative linguistics thesis in Korea 273/1
 Computer program 275/1
 Croatian poetry evening 275/1
 Cuba 271/3, 275/1
 Czechoslovakia: Symposium on translation 275/1
 Ecology 272/4
 Esperantic Studies grants 274/1
 "Go" 272/1
 Green Parties 272/1
 Hungarian telephone book 274/2
 Intergovernmental organisations 271/4
 Ivo Lapenna Foundation 272/2
 Literacy program in Togoland 273/2
 Mongolia 272/1
 Our correspondence courses: 1. 274/3; 2. 275/3
 Poland 272/4
 Radio 272/1
Red Dwarf program on ABC 275/2
 Russia: Vladivostok symposium 274/2
 Russian joke lost in translation 272/2
 SAT congress in Lithuania 272/2
 Statistics about Esperantists 275/4
 Switzerland 271/4
The Basics of Esperanto (Fundamento de Esperanto) 273/2
 Ukraine 274/2
 UNESCO 271/4
 USA:
 Arizona Suno 271/4
 San Francisco State University Summer Program 272/3
 University of California (Berkeley) 271/4
 University of Hartford Summer School 273/1
 Week of International friendship in Chicago 275/2
 Venezuela 274/1
Winnie-La-Pu in Esperanto 273/2
 World Esperanto Congress in Vienna 275/2
 Youth congresses 27/4
 Zamenhof prize for international understanding 273/1

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6010.